

B.TRAVEN ĈARO

Mahagonciklo
unua romano



romantraduko el la germana

PRI LA TRADUKO

Aŭtoro: B.Traven

Titolo: Ĉaro

Tradukis

Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ la unua eldono el la jaro 1931 „Der Karren”
de Librogildo Gutenberg, Berlino.

Lingve kontrolis

Juan Jacobo Schmitter

Vladimir Türk

Aranĝis

Frank Vohla

Hans-Georg Kaiser

Finredakto

je la 26-a de aŭgusto
en la jaro 2026

Ĉapitro 1

1/1

Andreo Ugalde havis pure indiĝenan sangon kaj apartenis al la granda popolo de la celtaloj.

Li devenis de la bieno Lumbojvil en la distrikto de Simojovel. La kompleta nomo de tiu bieno estis *Santa María Dolorosa Lumbojvil*.

Lumbojvil estis la pramalnova indiĝena nomo de ekonomia komunumo de indiĝenoj kaj ĝi signifas „kultivita tero“. Post la hispana konkerado oni forprenis tiun komunumon de la indiĝenoj, kaj la ĉefa guberniestro, kiu tie komandis, vendis aŭ donacis la grundon al hispana soldulo, al dungosoldato, kiu transformis la komunumon en *finca*-on, en bienon. La indiĝenoj, la originaj posedantoj, restis en la vilaĝo, kiu troviĝis meze de la iama komunuma terposedo, ĉar ili povis iri al neniuj aliaj lokoj. Parte ili restadis tie plu pro sentimentala fideleco al la tero, sur kiu ili naskiĝis, kaj parte pro la rapide disvastiĝanta ekkono, ke atendus ilin tute simila sorto, kien ajn ili irus. Ili tiam ne plu estis sendependaj kamparanoj sur propra terposedo. La bienposedanto, la nova mastro sur la grundo, asignis laŭ sia plaĉo kaj bontrovo al ili agrojn, sur kiuj ili kultivis fruktojn bezonatajn por vivteni sin kaj siajn familianojn. Tio estis la pago por la laboro, kiun ili devis plenumi por la nova mastro, kies servutuloj ili fariĝis.

Hispanoj, kiam ili akiris tian komunumon, adoptis la malnovan indiĝenan nomon, ĉar tio estis la ununura maniero ebligi, ke la indiĝena loĝantaro uzinta la nomon dum jarcentoj, povu scii, kie ili estas kaj kien ili apartenas. Sed la hispanoj, por esti certaj pri la protekto de siaj propraj dioj en la ĵus akirita tereno, metis

antaŭ la indiĝena nomo bone pian. En tiu ĉi kazo: *Santa María Dolorosa*.

Pro heredaĵoj kaj vendoj la bieno en la kuro de la tempo trapasis la manojn de multaj posedantoj. Sed tio, kio neniam ŝanĝiĝis ĉe tiaj aĉetoj kaj vendoj, estis la grundo mem kaj ties originaj loĝantoj. Sur la bieno loĝis ankoraŭ la samaj familioj, kiuj tie jam loĝis antaŭ ol venis la hispanoj. Fidele al la tero, ili atendis trankvile kaj pacience la tagon, kiam ili denove estos la posedantoj.

La tiama posedanto estis *don* Arnulfo Partida, meksikano de hispana deveno. Pri sia hispana deveno li tre fieris, kvankam li verŝajne havis en siaj vejnoj pli da meksika kaj indiĝena sangoj ol hispanan.

1/2

Okazis malofte, ke familiano de la peonoj povis forlasi bienon. Se patro estis peono, ankaŭ la filo estis peono, kaj la filino estis la edzino de peono. Tio estis preskaŭ leĝo. Kaj se peono forkuris por vivi propran vivon, la bienposedanto pagis kvin pesojn al la prezidanto de la distrikta *municipalidad*, kaj la prezidanto ordonis al la polico kapti kaj rekonduki la eskapintan peonon en la bienon. Post la trasufero de speciala puno pro forkuro, la peono ankoraŭ devis pagi kvin pesojn per laboro. Sed indiĝeno havas tiajn intimajn rilatojn al sia familio kaj al siaj sangokunuloj kaj amikoj, ke peono nur tre malofte ekpensas forkuri de la bieno, al kiu li apartenas.

Andreo Ugalde forlasis la bienon sen fuĝo. Ĉu la forlaso de devena bieno, kvankam ĝi estas certa servuteco por la peono, ĉiam estas bonŝanco, ne respondeblas certe. Estas tre ofte aŭ je lia persona malultilo aŭ je lia avantaĝo. Por scii tion antaŭe aŭ eĉ lerte

kaj sukcese adaptiĝi al la nova ĉirkaŭo, mankas al peono la inteligenteco, ĉar la bienposedanto timeme evitis evoluigi ĝin. Kaj se tiu evoluigo de la inteligenteco de la peonoj eĉ okazas fare de la ŝtato, la bienulo fariĝas malagrable, tiukaze li fariĝas tre maloportuna por la ŝtato. Li fariĝas monarkiisto aŭ bolŝeviko aŭ gvidanto de ribeluloj, io ajn, se li nur povas malhelpi per tio la danĝeran zorgadon de la ŝtato pri siaj peonoj.

Rimarko

municipalidad = municipo aŭ municipio (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)

1/3

Filino de *don* Arnulfo edziniĝis kaj vivis ekde tiam en Tenejapa. Tenejapa estas bela kaj pura urbeto priloĝata je duono de meksikanoj, tiel nomataj *ladinos*, idoj el pursangaj indiĝena kaj blankula partoj. La indiĝenoj kaj la meksikanoj loĝas en izolaj urbokvartaloj. Sed sur la foirplaco kaj en ĉiuj vendejoj la indiĝenoj miksiĝis kun la meksikanoj, tiel kiel ĉie en la mondo miksiĝas loĝantaro de urbo. La meksikanoj havas sian propran urbestron kaj la indiĝenoj havas sian propran *jefe*, do tribestron aŭ kacikon, aŭ kiel ajn ili nomas lin.

Doña Emilia ne povis trovi en sia nova loĝejo la ĝustajn servoknabinojn. Aŭ ŝi ne povis kutimiĝi al la indiĝenaj knabinoj en Tenejapa, aŭ ŝi volis havi familiarajn vizaĝojn ĉirkaŭ si, aŭ ial ajn. Ĉiukaze ŝi sendis indiĝenan servoknabon kun letero al sia patro. Ŝi petis la patron sendi du knabinojn de la hejma ranĉo. Kaj ŝi tuj menciis la nomojn de la dezirataj knabinoj, Ofelia kaj Paŭlina. Ambaŭ knabinoj jam servis hejme en la domo de la patro, kaj *doña* Emilia havis ilin dum longa tempo ĉirkaŭ si en la kuirejo

kaj en la loĝoĉambroj. Por peti la deziratajn personojn senprokraste, ŝi skribis ankaŭ al la patro, ke li sendu lertan knabon, kiun la juna edzo nepre bezonas en sia vendejo.

Don Arnulfo ne povis rifuzi ion al sia filino, des malpli, ĉar ŝi aludis, ke li fariĝos avo en la preskribita tempo, kion ŝi subite rimarkis en la pasinta semajno. La patro pro tio rapidis sendi la du deziratajn knabinojn, kaj li ankaŭ tuj elektis la knabon, kiu kuniros.

Tiu knabo estis *Andreo*. Unu el la knabinoj, *Ofelia*, estis lia onklino. Ĉar li foriris kun sia onklino, estis pli facile por li foriri de la patra *jacalito*, de la argila kabaneto, en kiu li naskiĝis.

Okazis la unuan fojon en lia juna vivo, ke li foriris de la hejmo. La patrino ploris, kiam ŝi knedis la maizan kaĉon por li. Sed lia patro estis stoika kaj ne montris, kion li vere sentas. Tamen la knabo perceptis per sia vira instinkto, kiel profunde la patro lin amas kaj kiom lin dolorigas la traskuiga apartiĝo. Kvankam tiu ne montris eĉ per la plej eta movo en sia vizaĝo, kion signifas por li la apartiĝo de sia filo. En la nigre brunaj okuloj de la patro estis nur iometa flagrado, stranga brilado, kian la knabo antaŭe vidis ĉe la patro neniam. Sed ĝi malkaŝis al la filo tiom profundan amon, kiun li ĝis tiu momento neniam supozis ĉe la patro. Ĉar *Criserio* estis simpla viro, kiu sciis pri la mondo kaj la vivo ne pli ol instruis lin kaj povis instrui lia *milpa*, la maizkampoj, lia fazeola kampoj, liaj ŝafoj, la kampoj kaj brutaroj de lia patrono, li povis esprimi nek per vortoj nek per gestoj siajn sentojn, li ankaŭ tute ne ekpensis esprimi ilin.

Tiu palpebrumo en la okuloj de lia patro ĉe la adiaŭo de la filo de hejme destinis la tutan pluan vivon de la knabo. Ĝi estis la granda turnopunkto en la formado de lia karaktero kaj la komenco de lia sortokonstruado. *Andreo* tiam havis dek unu jarojn.

Rimarko

ladinos = ladinoj (ne en PIV)

ladino = mestizo = ido de blankulo kaj de indiĝeno, en Ĉiapaso uzata specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nepre nur mestizoj, sed ankaŭ blankuloj

1/4

La du knabinojn oni sidigis sur ĉevalojn, kaj iliajn malmultajn vestoĉifonetojn kaj dormokovraĵojn oni pakis en fragmitajn matojn kaj poste sur mulon. Andreo kaj la junulo, kiu estis kun-sendita, por ke li akompanu ilin kaj rekonduku la bestojn, iris perpiede.

La vojaĝo daŭris tri tagojn.

Havante hejmsopiron, ambaŭ knabinoj kaj la knabo sentis plifaciliĝon, kiam ili revidis la bone konatan vizaĝon de *doña* Emilia en Tenejapa. Eĉ kvankam ŝi naskiĝis en la domo de la patrono, *Doña* Emilia naskiĝis ja sur la sama tero kiel ili. Ŝi estis nur jaron pli aĝa ol Ofelia kaj nur tri jarojn pli aĝa ol Paŭlina. Ili kune plenkreskis, ĉar la du indiĝenaj knabinoj tre frue komencis sian servon en la domo. Kaj en tiu domo ili kune mastrumadis en la kuirejo kaj en la loĝoĉambroj, kune ridis, ploris, dancis, surgenuis antaŭ la sanktaj bildoj en la kapelo de la bieno kaj havis siajn komunajn sekretetojn. *Doña* Emilia parolis la indiĝenan lingvon tiel flue kiel la knabinoj, kaj la knabinoj scipovis sufiĉe de la hispana lingvo por komprenigi sin inter meksikanoj.

Doña Emilia estis ĉiam tre ŝatata ĉe la peonaj familioj de lia patro, kvankam kompreneble kun la ofta limigo, ke oni ŝatis ŝin tiel, kiel en reĝlando iafoje oni ŝatas la kronprincon pli ol la reĝon. Sed ŝi ĉiam helpis al malsanuloj kaj provis esti justa, kiam ajn tio estis ebla, se laŭ ŝia opinio maljustis iu al iu el la peonoj,

la patro aŭ la *mayordomo*, la intendanto. Kaj tiel, restante en la proksimo de la familia junulino, la du knabinoj kaj la knabo jam post kelkaj tagoj preskaŭ forgesis, ke ili troviĝas en nova ĉirkaŭo.

Don Leonardo, la edzo de *doña* Emilia, estis afabla viro, kiu ŝajne ne povis esti malica al iu ajn. Li ankaŭ ne interesiĝis pri la servistaro de sia edzino. Al la knabinoj ŝajnis, ke li estas pli bona kaj pli bonkora patrono ol *don* Arnulfo, kiu ofte tre koleriĝis.

1/5

Don Leonardo estis *comerciante*, komercisto. Li havis en Tenejapa certan *tienda de abarrotes*, nutraĵvendejon kaj magazenon por ĉiuj specoj de varoj: sukero, kafo, maizo; fazeoloj, sapo, faruno, brando, konservujoj, ŝuoj, lanternoj, hakiloj, konfekciaj vestaĵoj, ĉemizoj, kotonŝtofoj, silkaj rubandoj, fonografoj, medicino, tabako, sanktaj bildoj, inko, biero en boteloj, parfumoj, seloj, kartoĉoj. Estis kvazaŭ *Wanamaker Department Store* en liliputa formato, kiun oni devis nomi en tiu duone indiĝena kaj duone meksika urbo Tenejapa kun ĉirkaŭ mil loĝantoj granda kaj metropola.

Don Leonardo tute bone sola kapablis zorgi pri la ampleksa vendejo. En ekstrema kazo, se venis tro multe da homoj, ekzemple, se ino deziris kandelon por tri centavoj kaj indiĝena ino samtempe por du centavoj volis havi ricinan oleon, *doña* Emilia kelkfoje alsaltis por helpi. Sed, ke du homoj samtempe venis en la vendejon por aĉeti ion, tio okazis nur malofte, kaj se tio efektive iam okazis, tiam en foira tago. La kutima vendeja tago pasis tiel, ke frumatene je la kvina kaj duono kaŭris antaŭ la pordo indiĝeno, kiu en la sama momento, kiam oni malfermis, eniris kaj postulis por *quinto*, do por kvin centavoj, tabakfoliojn. Du horojn poste venis infano kaj postulis por *medio*, do por ses centavoj,

muelitan kafon. Je la deka kudristino sendis infanon pro maŝinaj kudriloj de la grandeco sep. La vendeja posedanto ordonis informi, ke li ne havas la grandon sep. La infano kuris hejmen, revenis kaj diris, ke ankaŭ grando ok akcepteblas. *Don* Leonardo ordonis informi, ke li, bedaŭrinde, ankaŭ la grandon ok ne havas, sed nur grandon naŭ. La infano revenis kaj aĉetis por tri centavoj kudrilon de la grando naŭ. En la paso de la tago oni interŝanĝis tiam la kudrilon kvarfoje, ĝis la partioj finfine interkonsentiĝis vespere pri grando kvin kaj la vendo estis finita per tio; sub la kondiĉo, ke la kudristino havas la rajton interŝanĝi la kudrilon en la paso de semajno, se la grandeco tamen ne taŭgus.

De tempo al tempo kompreneble ankaŭ paro da botoj trovis aĉetanton, aŭ ses metroj da krepŝtofo aŭ dudek kvin piloloj el kinino aŭ eĉ tuta blua robo por dudek tri pesoj. Tio estas, dudek tri pesojn *don* Leonardo postulis por ĝi, ĉar li importis la robon laŭ aserto el Nova Jorko. Post kvar horoj la robo estis vendita por dek kvar pesoj, kion *don* Leonardo kaj ankaŭ la aĉetintino priploris, aŭ almenaŭ ŝajnigis priplori. Li, ĉar li devis fordoni la robon sub la aĉetprezo kaj nur pro tio povus fari tion kaj faras, ĉar ŝi estas najbarino kaj iros al geedziĝa festo, kaj ĉar li esperas, ke ŝi ekde nun estos lia fidela klientino ĝis la fino de lia vivo. Dum ŝi ŝajnigis plori, ĉar ŝi intencis aĉeti robon nur por ok pesoj kaj nun devas fordoni sian tutan ŝparitan monon, por ke ŝi povu pagi ĉi tiun skandale multekostan robon. Kiam la vendo estis finita, *don* Leonardo rakontis al sia juna edzino, ke li gajnis ses pesojn je la robo, kaj la aĉetintino rakontis en la tuta urbo, ke ŝi lerte trompis *don* Leonardon, ke ŝi avantaĝe akiris la robon, kiu valoras minimume tridek pesojn, por la ridinde malgranda prezo de dek kvar pesoj, kaj ke ŝi aĉetis neniam en sia tuta vivo tian bonan kaj modernan robon por tiom malmulte da mono.

Tiu *tienda* sinjoron Leonardon ne riĉigis, kaj apenaŭ bonstatigis. La konkurenco estis tro granda. Ĉiu tria domo en la urbeto estis

vendejo. Kompreneble la ceteraj vendejoj ne estis tiel grandaj kaj la varoj ne tiom multaj, kiom tiuj de *don* Leonardo. La plej multaj vendejoj ne estis pli ol anguletoj, kaj en duono de ĉiuj vendejoj oni povus aĉeti ĉiujn ekzistantajn varojn por la elvenda prezo de dek pesoj, kaj ĉe tio oni eĉ riskus perdi monon.

Don Leonardo faris aliajn negocojn, kiuj enspezigis pli. De indiĝenaj kamparanoj, loĝantaj en sendependaj komunumoj, li aĉetis grandkvante maizon kaj vendis ĝin poste kun konsiderinda profito en la pli grandaj urboj *Jovel*, *Tuxtla*, *Yalanchen*, *Balún-Canán*. Li aĉetis en la distrikto Simojovel kafon kaj en la distrikto Pichualco kakaon kaj vendis tiujn varojn al la pli grandaj usonaj aĉetistoj de kafo kaj kakao ĉe la fervojstacio. Li aĉetis en Hucutsin milojn de tabakfaskoj kaj vendis ilin al la komercistoj en la urboj. Li faris tiujn negocojn ne grandskale. Kompreneble ne. Por tio mankis al li sufiĉe da kapitalo, kaj ĉeestis ankaŭ tro multe da aliaj grandkvantaj aĉetistoj, kiuj malfaciligis reciproke la vivon kaj la ekzistadon. Krome la produktado ne estis sufiĉe granda kaj stabila por riĉigi lin. Sed tamen tiuj kromnegocoj estis granda helpo por atingi komfortan staton. Li havis taŭgajn kialojn konsideri sin pli bonstata ol lia bopatro, *don* Arnulfo.

Rimarkoj

Balún-Canán = antikva majaa nomo, loko, kie troviĝas nun la urbo *Comitán* en Ĉiapaso.

Jovel = malnova indiĝena nomo de *San Cristóbal*

1/6

Ĝis nun lia onklino helpis al li en la vendejo. Sed ekde lia geedziĝo la onklino kaj li estis malamikoj. Patrinoj kaj onklinoj estas tiaj, ke ili fariĝas malicaj kaj eĉ mordemaj, se iliaj protektatoj geedziĝas kaj ili ne estas kunakceptataj en la geedzeco ĝoje kaj per vaste etenditaj brakoj. Kaj onklinoj, speciale, se ili estas onklinoj

postrestintaj, foje pli sangosoifas ol bopatrinoj. La bopatrino, eĉ la bona, la escepto, estas postrestaĵo el la tempo de la kavernaj homoj. Tion oni tiel ofte forgesas, kaj tial la ŝercoj pri la bopatrino estas plej ofte tiel enuaj.

Don Leonardo ne emis havi sian junan edzinon ĉiam en la vendejo, kvankam tio estis normala en malgrandaj urboj de Meksiko kaj precipe en etaj vendejoj de la suba meza klaso. Meksikanino ĉe negocoj tre superas viron. Ŝi estas pli laborema ol li, pli lerta kaj pli rapida en la komprenado de situacioj. Kiam la inoj en la lando Meksiko iutage eniros la politikon – okazaĵo, kiu ĉe la elektoj de la jaro 1929 tre proksimis – tiam la meksika respubliko certe havos internan pacon kaj enorme progresos, ĉar meksikaninoj disponas pri io, kio tute mankas al meksikana viro: la kapablo antaŭkalkuli kaj la trankvilo pacience atendi la antaŭkalkulitan.

Ĉar *don* Leonardo ne deziris vidi sian edzinon ĉe la laboro en la vendejo, almenaŭ ne necese, li pensis pri knabo, kiun li tiel povus instrui en la vendejo, ke li kapablos anstataŭi lin, kiam li, pro siaj aĉetoj ne povas esti hejme. *Doña* Emilia priskribis kaj rekomen-dis la knabon Andreo al li. Andreo venis naŭjara en la patronan domon de *don* Arnulfo por servi ĉe la manĝotablo. En la ranĉoj kaj *haciendas* en Meksiko preskaŭ ĉiam knaboj servas ĉe la manĝotablo, tre malofte knabinoj. Estas preskaŭ ĉiam knaboj de unu aŭ de kelkaj peonoj de la *hacienda*, do ĉiam indiĝenaj knaboj. Kompreneble ofte estas ankaŭ infanoj, kiuj naskiĝis kiel rezulto de amrilatoj de la bona patrono aŭ de liaj plenkreskaj filoj kun unu aŭ pluraj indiĝenaj knabinoj de la bieno.

La laboro de knabo en la domo de patrono estas konsiderata deviga laboro, kiun oni kreditas al lia patro. Al patro de filo oni asignas eble iom pli grandan agron, aŭ oni minusas unu aŭ du tagojn de lia dusemajna ĉiumonata deviga laboro ĉe la patrono,

aŭ li ricevas la rajton tenadi kelkajn kaprinojn aŭ eĉ bovinon sur la paŝtejoj de la patrono, aŭ la knabo nuligas per sia laboro ŝuldon ĉe la patrono faritan de la patro, eble pro tio, ke tiu bezonis ŝtofon por ĉemizo aŭ ĉar li akiris porkidon aŭ hundeton de la mastro.

Andreo servis ne nur ĉe la tablo, sed li helpis ankaŭ ĉe la lavado de manĝilaro, li helpis ĉe la purigado de ĉambroj, akvumis la flo-rojn en la ĝardeno, purigis rajdistan ekipaĵon de la patrono, helpis ĉe la banado de la rajdoĉevaloj, helpis alporti akvon el la rivero, kaj kiam videble nenio alia farendis, vokis lin la *mayor-domo*, la intendanto, kaj tiukaze li devis helpi ĉe la tordado de ŝnuroj. Kaj tamen, kion ajn li faris, ĝis la eksceso li laboris neniam. Tiel, kiel neniuj peono devis laboraĉi ĝismorte, eĉ ne unu el ili, kvankam ili ĉiuj troviĝis en certa formo de servuteco. Sur tiu bieno ĉiukaze ne, ĉar oni faris nenion tro haste, nek ĉi tie nek sur iu alia bieno en la posedo de meksikano aŭ de hispano kun indiĝena sango. Se iu el la domo iam alvokis la knabon Andreo, kaj tiu ne venis, ĉar li interbatiĝis kun aliaj knaboj de la vilaĝo, oni superŝutis lin per insultoj, kaj ĉeokaze ankaŭ vangofrapo trafis lin, sed poste oni tuj forgesis la incidenton.

Kaj tamen la servo en la domo por Andreo estis granda avantaĝo. Li aŭskultis tie la hispanan lingvon kaj en la tempo post la alveno en Tenejapa-n, li lernis la lingvon tiel rapide, ke li baldaŭ povis paroli ĝin tiel bone, kiel la tieaj meksikanaj knaboj. Kaj ĉar li samtempe parolis ankaŭ sian gepatran lingvon, la celtalan, kiun la indiĝenoj en Tenejapa kaj en ties vasta ĉirkaŭo parolis, malgraŭ tio, ke ĝi iom deflankiĝis de la dialekto de Andreo, la knabo havis grandan valoron por *don* Leonardo. Ĉar *don* Leonardo havis, precipe en foiraj tagoj pli da klientoj indiĝenaj ol meksikanaj.

Don Leonardo baldaŭ havis bonan opinion pri la knabo. *Andreo* volonte lernis kaj li estis inteligenta kaj lerta. Li lernis rapide diferencigi la diversajn varojn kaj ĝuste nomi ilin, li lernis, por kio ili uzeblas kaj kiun kvaliton ili havas, li memortenis iliajn prezojn kaj baldaŭ li lernis ankaŭ, kiun maksimuman prezon li devas proponi por certa varo kaj kiom multe eblas malpliigi ĝin, por ke lia mastro ankoraŭ havu gajnon.

Don Leonardo sendis la knabon en vesperan lernejon, por ke li lernu legi, skribi kaj kalkuli. Ne pro troigita amo al la knabo kaj eĉ malpli pro zorgo pri la estonteco de la knabo, sed kun certeco pro pure egoistaj motivoj, ĉar tio estis utila por li mem. La knabo nur tre malmulte scipovis kalkuli. Kiam iu kliento donis al li peson kaj la venditaj varoj kostis okdek ses centavojn, li devis unue demandi *don* Leonardon aŭ *doña* Emilia-on aŭ devis eĉ antaŭe serĉi ilin, por ke ili diru la sumon, kiom li devos redoni. Tio estis komplika, kaj ofte ĝena, kiam *don* Leonardo ekzemple sidis ĝuste ĉe la tablo aŭ volis legi gazeton. Kaj krome tio estis molesta, ke la knabo ne povis legi surskribojn sur kestoj kaj pakaĵoj kaj pro tio ofte malfermis malĝustajn kestojn aŭ intermiksas ciferojn de la prezoj kaj tiel riskis vendi varojn tro malkare.

Don Leonardo konsideris kaj konkludis kalkulinte, ke la knabo havus pli grandan valoron, se li povus legi, skribi kaj kalkuli. Ĉi tie je malgranda skalo okazis nur tio, kio ĉie en la mondo okazas grandskale. La fabrikistoj, la grandkapitalistoj, la grandbienuloj en la fundo de sia naturo malinklinas la klerecon de la proletoj. Ili ĝuste kaŭze sentas, ke la edukitaj proletoj povas endanĝerigi ilian privilegiitan pozicion en la mondo. Sed la ekonomia vivo fariĝis tiom komplika kaj komplikita, ke fabrikiston, kiu havas needukitajn proletojn, bankrotigas tiuj fabrikistoj, kiuj arigas edukitajn kaj tre inteligentajn laboristojn ĉirkaŭ si. Tornisto de

fero, kiu ne povas kalkuli, kiujn transmisiajn radojn li devas alĝustigi, se li devas torni unucolan kanelon el dek helicerroj, estas en la nuna tempo sen valoro por fabrikisto. La maŝinoj, kiujn la laboristoj devas manipuli en la nuna tempo, plej ofte estas tiel komplikaj, ke la laboristo, kiu ne povas fulmrapide legi ĉiujn surskribojn sur sennombraj levumiloj, radoj kaj brakoj sur sia maŝino, povas kaŭzi al fabrikisto dum du sekundoj ekzemple damaĝon dekmildolaran. Laboristo, kiu ne kapablas legi kaj kompreni surskribojn kaj labori laŭ la prezentitaj teknikaj desegnaĵoj, ne estas uzebla por nuntempa fabrikisto. La nuntempa kapitalisto, por esti kaj resti kapitalisto, devas subteni, ja eĉ instigi la ŝtaton, ke ĝi donu al la infanoj de la proletaro tian edukitecon, kian antaŭ cent jaroj nur malofte havis la infanoj de fabrikistoj, ĉar li ja iutage bezonas ilin kiel laboristojn. La kapitalisto devas subteni la edukadon de la proletaro kun siaj pagitaj impostoj. Li faras tion kun kolerego en la koro, sed li ne havas alian eblon. En la nuna tempo, kaj eĉ pli en la estonteco, en la unua loko en la mondo ne staros tiu lando, kiu havas la plej kleran regantan klason, sed tiu decidus pri la valoro de la dolaro, kiu edukas interne de siaj landlimoj la plej kleran proletaron.

Tial estis puraj konsideroj pri utileco kaj propra avantaĝo, kiuj instigis *don* Leonardon, doni al la knabo limigitan lernejan edukadon. Kaj oni certe jam nun povas diri, ke tiuokaze, se la knabo iam farus individuan uzon de sia klereco laŭ maniero, kiu ne plaĉus kaj ne utilis al *don* Leonardo, tiu nomus lin sendankema kreitaĵo, knabo, el kiu li faris homon, kaj kiu nun rekompencas la grandan bonecon de sia mastro per senhonta sendankeco. Kaj li aldonus, ke tiuokaze, se li, *don* Leonardo, estus sciinta tion pli frue, li estus lasinta la knabon en ties kota indiana vilaĝo kaj certe sin detenus de tio elspezi monon, por ke la knabo lernu ion.

La nekara mono, elspezita de *don* Leonardo por la lerneja edukado de la knabo, ne estis konsiderinda, estis sesdek centavoj ĉiumonate. Sed *don* Leonardo faris laŭtan bruon pri tiuj elspezoj.

Efektive li havis kaŭzon multe paroli pri tio. Li certe estis la ununura homo en la urbo, kiu sendis indiĝenan servoknabon en la lernejon kaj eĉ pagis tion. Al aliaj meksikanoj loĝantaj en Tenejapa kaj havantaj indiĝenajn servinfanojn, eĉ ne venis en la kapon ebligi al siaj servantoj la akiron de iom da edukiteco. La servinfanoj, ĉu knaboj ĉu knabinoj, laboris de la kvina frumatene ĝis la deka vespere. Ne estis en ĉiu kazo streĉiga laboro, sed ili ĉiam devis esti sur la piedoj, kaj ili devis ĉeesti, kiam ajn oni vokas ilin. La servinfano ne malhaveblis eĉ horon. Almenaŭ imagis tion liaj gemastroj. Kaj sendi lin eĉ en lernejon estus ne nur frenezaĵo, sed ankaŭ peko. Frenezaĵo ĝi estus tial, ĉar povus okazi, ke la indiĝena knabo post iom da tempo pli kapablus kaj pli sciis ol la propra filo de la mastro. Ĉar oni kutime tre neglekte zorgis pri la edukado de la gemastraj infanoj. Plej ofte oni rigardis tion sukceso jam tiam, kiam ili iom povis legi kaj skribi. Peko estis pro tio, ĉar la eklezio ne estis tre bonvolema, se temis pri la edukado de la indiĝenoj. La eklezio volis lasi la indiĝenojn en ilia senkulpeco kaj senscienco, ĉar tiel la ĉiela regno estas certa al la senkulpaj infanetoj, dum ĉe edukita indiĝeno oni neniam scias, kien kondukos lin lia eduko. La ekzemplo de la indiĝeno Benito Juarez estis tiam ankoraŭ tre freŝa kaj restas freŝa eĉ nun. Tiu indiĝeno el Oaksaca, vivinta ĝis la dekkvina jaro en paradiza senscienco, ricevis la eblon akiri iom da edukado. Kaj kiam tiu post multaj penoj finfine fariĝis klerigita homo, li konfiskis la eklezian posedon por la meksika popolo kaj tiel radikale stucis la eternajn rajtojn de Dio persone transdonitajn al la eklezio, kiel kuraĝis

tion antaŭe ankoraŭ neniu kontraŭ la katolika eklezio. Ne mirakle, ke la eklezio oblikve rigardis la edukadon de la indiĝenoj. La sesdek centavoj, elspezataj de *don* Leonardo por la lerneja edukado de Andreo, fakte estis multe malpli granda elspezo ol ŝajnis. La kialo: Andreo ne ricevadis salajron.

Kiu estus tiel freneza pagi salajron al indiĝena knabo?! La indiĝena knabo devas ĝoji pri la honoro, ke oni permesas al li labori. Tio estas sufiĉe da salajro. Kaj la patronon oni danku por tio, ke li okupas lin. Andreo ricevis la manĝon. Ĝi estis abunda. Tion oni devas koncedi. Sed lia manĝo estis malofte io alia ol flanoj el maiza kaĉo, nigraj faboj kaj akraj kapsikoj, aŭ por diri tion pli precize, *tortillas*, *frijoles* kaj akra verda pepro. Se la knabo ne tuj ĉemanis, kiam oni vokis lin, aŭ se li misfaris ion dum sia laboro, oni diris ĉiufoje al li, ke li eĉ ne meritas la manĝon, kiun lia mastro ĉiutage perdas pro li.

Krom la nutraĵoj li ricevis ankaŭ la vestaĵojn de sia patrono. La vestoj konsistis el blanka kotonpantalono, blanka ĉemizforma kotonjako kaj bastĉapelo. Ŝuojn kaj botojn la knabo ne ricevis. Eĉ ne sandalojn. Li iris ĉiam nudapiede kaj neniam dum sia vivo havis ion je la piedoj. La knabo kutimiĝis pri tio kaj ne sciis tion pli bone.

Kiam estis *fiesta*, la festo de la sankta patrono de Tenejapa, la knabo ricevis eble kvin centavojn, aŭ se lia mastro estis en donacema humoro, du realojn, do dudek kvin centavojn, por ke li povu aĉeti *dulces*, bombonojn. Tio estis unufoje en la jaro, ĉar la *fiesta* okazis nur unufoje en jaro. Sed tio ne estis ĉio. Se la knabo havis sian *día del santo*, la tagon de sia propra sankta patrono, li ricevis denove dek centavojn kaj eble novan *cinturón rojo de lana*, ruĝan lanozonon, rubandon, kiu servis por la firmtenado de lia kotonpantalono ĉirkaŭ la koksoj.

Liton li ne havis. Li ankaŭ ne kutimiĝis pri iu. Li dormis sur *petate*, sur mato el basto, kiun li sternis en angulo de la kuirejo aŭ en angulo de la portiko. La petaton li kunprenis de hejme. Ĉar la knabo ricevis ankaŭ dum sia servado en la patrona domo de la bienulo neniam salajron, kaj tie eĉ ne unu centavon sur la manon, li tute ne sciis, kio estas salajro. Kaj ĉar li nun ricevis dufoje en la jaro kelkajn centavojn de sia mastro, li opiniis, ke li faris en sia vivo grandan paŝon antaŭen. Jen sistemo, kiu kapitaliston povus paligi pro envio, kaj kies laŭleĝa tutmonda enkondukado estas la volupta revo de ĉiu labordonanto.

1/9

La instruisto facile povis eduki la knabon por sesdek centavoj ĉiumonate.

Li havis salajron da dudek kvin pesoĵ dum monato.

La Jefe Politico, la distrikta ĉefo, havis sescent pesoĵn ĉiumonate, se oni ne konsideras la enspezojn, kiujn li enkasigis el ĉantaĝoj kaj kiel ŝmirmonojn. Tio estis pli ol ties salajro.

El ĉiuj dungitoj de la ŝtato la instruisto havis la plej malgrandan salajron.

Prokurorojn kaj policajn direktorojn oni pagas dudekoble pli bone. Oni pagas ilin dudekoble pli bone kaj estimas ilin centoble pli alte, ĉar estas ilia tasko ronĝi la difektojn de la homaro. Tasko, kiu estas necesa por konservi la ŝtaton kaj komprenigi al la homoj, ke la agnosko de la privata propraĵo estas signo de la civilizacieco.

La instruisto ne povis ĉantaĝi iun, ĉar li havis je tio nek rajton nek la potencon. Kaj neniu penis pagi ŝmirmonon al li, ĉar estis tute

egale por la gelernantoj aŭ iliaj gepatroj, ĉu iu en la lernejo sukcese trapasis ekzamenon, ĉu ne.

Li povis plibonigi siajn enspezojn nur per tio, ke li aranĝis vesperan lernejon por plenkreskintoj kaj infanoj, kiuj dum la tago ne povis veni en la lernejon. La plimulto de la urbetaj infanoj, kaj de la indiĝenoj ĉiuj, devis labori dum la tagoj. Kelkaj sur la kampoj, kaj la aliaj en iu hejmindustrio, kie ili gisis kandelojn, tordis cigaredojn, formis el argilo kuirejajn vazojn, teksis lanajn kovrilojn, prilaboris ledon, bolis bombonojn kaj plektis ĉapelojn.

La instruisto kalkulis por ĉiu lernanto, ĉu plenkreska ĉu ne, peson ĉiumonate. Multaj familioj ne povis pagi tion, kaj tial la infanoj restis sen lerneja edukado. *Don Leonardo* estis bona komercisto, li sciis, kiel formarĉandi de la peso, pagenda al la instruisto por *Andreo*, ankoraŭ kvardek centavojn. Oni decidis, ke *Andreo* iru ĉiun vesperon en la lernejon, kiu okazis de la sepa ĝis la naŭa aŭ ĝis duono antaŭ la deka. *Andreo* volonte tien iris, ĉar li ekhavis ĝojon pri la lernado. Sed, se lia patrono bezonis lin en la vendejo, li ne permesis al li iri en la lernejon. La vendejo estis pli grava, kaj la lernado estis nenio alia ol disipo de tempo.

Don Leonardo ne aĉetis librojn por la knabo. Kiam li efektive iam donis al li malpuran skribokajeron el la vendejo aŭ duone rompitan krajonon aŭ malfreŝan inkon en boteleto, li faris tion kun multaj vortoj kaj tordita mieno. Sufiĉis ja, se la knabo ricevis malnovan pakpaperon, kiu ne plu uzeblis por envolvi ion. Kaj sendite ien, *Andreo* devis atenti surstrate, ĉu ne eblas levi krajonstumpe-ton, kiun iu perdis aŭ forĵetis.

Kvankam tiu maniero de edukado tute ne estis kompleta, *Andreo* lernis multon.

La plej grava afero, kiun li lernis, estis tio, ke la edukado gravas. Eĉ la gravecon scipovi legi kaj skribi oni ekkomprenas nur tiukaze, se oni jam scipovas legi kaj skribi.

Ĉapitro 2

2/1

Andreo havis nun jam dek kvin jarojn. Li ankoraŭ nun iris nuda-piede. Kaj li dormis ankoraŭ nun sur petato, kiun li sternis en angulon de la kuirejo aŭ en sekan angulon de la portiko, kaj kiun li matene, ekstarinte, denove kunrulis kaj ie ŝovis sub ĉevronon. La petato, la mato el basto, ne plu estis tiu, kiun li kunprenis de la hejmo. Ankaŭ la lana kovrilo, per kiu li kovris sin, ne estis plu la sama. La petato finfine estis per kuŝado truigita. Sed *don* Leonardo ne donis novan al li, ĉar petato kostas peson kaj dudek centavojn.

Doña Emilia en tiu tempo vizitis dufoje sian patron en la bieno por hejme montri siajn infanojn, kiujn ŝi intertempe naskis, kaj lasi admiri ilin. Ĉe tiuj vojaĝoj Andreo akompanis ŝin. Li ja nun jam estis granda knabo, al kiu *don* Leonardo trankvile povis konfidi sian edzinon kaj siajn infanojn.

Tiel Andreo revidis siajn gepatrojn kaj gefratojn kaj la tutan parencon. La patro donis al li novan petaton kaj novan lankovrilon, vidinte, kiel aĉe aspektas tiuj aĝoj de la knabo.

La lankovrilon la patro devis aĉeti el la *bodega* de la patrono. Ĝi kostis naŭ pesojn, ĉar ĝi estis bonkvalita, farita de la indiĝenoj en Chamula. La patro devis aĉeti ankaŭ la petaton de sia patrono.

Tiu petato kostis peson kaj sepdek kvin centavojn, ĉar en la *bo-dega* de la bienposedanto ĉiuj aĵoj kostis kvindek aŭ cent procentojn pli ol en vendejo en la urbo.

Patro Criserio kompreneble ne povis pagi la lankovrilon kaj la maton, ĉar li ja ne ricevis salajron. Sekve li devis pruntepreni la aĵojn de la patrono kaj aĉeti ilin kredite. *Don Arnulfo* diris: „La kovrilo kostas naŭ pesojn.“

„Tio estas tre multekosta, patrono“, respondis Criserio, „en Simojvel mi povus aĉeti kovrilon por kvin pesoj.“

„Tion vi povas, Criserio, se vi havas la monon.“

„Sed mi ne havas monon, patroncito, ĉefĉjo“, respondis Criserio.

„Vi ne aĉetu la kovrilon, Criserio, se ĝi por vi estas tro multekosta“, diris *don Arnulfo*. Li reŝovis la kovrilon en la bretaron. „Sed mi ja devas havi la kovrilon por mia *hijito*, por mia filĉjo, alie li ja mortus de frosto“, diris Criserio kun senmova vizaĝo.

„La kovrilo kostas naŭ pesojn, Criserio. Pli malkare mi ne povas lasi ĝin al vi. Se ĝi estas tro multekosta por vi kaj vi povas aliloke aĉeti la kovrilon pli malkare, vi estas libera fari tion. Vi ne estas devigita aĉeti la kovrilon ĉe mi. Ĉu vi eble pensas, ke mi volas, ke vi faru ŝuldojn? Tion mi certe ne volas. Mi preferus, se miaj *muchachos*, miaj laboristoj sur la bieno, ne havus ŝuldojn. Tiukaze mi ne havus malagrablaĵojn, kaj miaj *muchachos* estas liberaj kaj povas foriri, kiam ili volas. Ĉi tie ne estas sklaveco.“

„Tion mi bone scias, sinjoro“, diris Criserio. „Ni ne estas *esclavos*, ni estas liberaj kaj povas foriri, kiam ni volas kaj kien ni volas.“

„Se vi ne havas ŝuldojn ĉe mi, ĉu ne, tion vi ja scias?“

„Tion mi scias bone, patrono. Se ni ne havas ŝuldojn ĉe la patrono.“ Criserio diris tion kvazaŭ li lernis tion parkere. La sencon li ne pripensis. La senco estis tro fora por li.

Sed *don Arnulfo* akcelis nun la aferon. Li ne havis la tempon marĉandi kun unu el siaj peonoj kaj komenci interparoladon pri la rilatoj de ŝuldodependeco kaj la libera elekto de la loĝejo. Tiaj temoj estis nek por li nek por iu alia bienulo problemoj. Estis frida, seka objektiveco. La ŝtato, la registaro, la soldatoj kaj la polico gardas liajn rajtojn kiel kreditoron.

„Ĉu vi do volas havi la kovrilon ĉu ne? Diru, kion vi volas, kaj se vi volas nenion, foriru. La kovrilo kostas naŭ pesojn. Vi ne devas preni ĝin, se vi ne volas fari ŝuldojn.“

„Mi prenos la kovrilon kaj la petaton“, diris Criserio.

„Bone“, respondis *don Arnulfo*, „mi do skribos ĝin en la libron, en vian konton.“

„Jes, *patroncito*, skribu ĝin en mian konton, mi bezonas la kovrilon kaj la petaton por mia fileto, kiu ja nun tiom malproksimas.“

Don Arnulfo malfermis la libron, foliumis ĝis la konto de Criserio Ugalde aperis, kaj dum li skribis en la libron, li diris: „Atendu ĝis ni havos tion tute en ordo.“

„Jes, *patroncito*, mi atendas.“ Criserio prenis la aĵojn kaj ŝovis ilin sub la brakon.

Don Arnulfo gratadis la plumon, por ke ĝi skribu, kaj ekkalkulis laŭte: „La kovrilo kostas naŭ pesojn. Ĉu tio estas ĝusta, Criserio?“

„Jes, tio estas ĝusta, patrono, naŭ pesojn.“

Don Arnulfo skribis kaj poste diris: „La mato kostas peson kaj sepdek kvin centavojn.“

„Patrono“, interrompis lin *Criserio*, „la petato estas vere tre multekosta. En Yajalón bona petato kostas nur sep realojn.“

„*Por el diablo*, ĉe la diablo, ĉu vi volas havi la petaton ĉu ne? Klarigu en via kapo, kion vi volas, kaj kion vi ne volas. Mi ne plu havas tempon.“ *Don Arnulfo* fariĝis nun tre malbonvolema. Por ne igi lin eĉ pli ĉagrenita, diris *Criserio*: „Jes, patrono, kompreneble mi volas havi la petaton, por mia filo, por *Andreo*.“

„*Bueno*, en ordo, ĝi kostas peson kaj sepdek kvin. Ĝuste, *Criserio*?“

„Tio estas ĝusta, patrono.“

„*Muy bien*, tre bone“, diris skribante *don Arnulfo*. „Tio do faras kune rondigite dek unu pesojn. Ĉu tio estas ĝusta, *Criserio*?“

„Tio estas ĝusta, patrono.“

„Tio faras do dek unu pesojn. Kaj ĉar vi ŝuldas al mi dek unu pesojn kaj ne pagas, tio faras dek unu pesojn kaj tio sekve faras dudek du pesojn. Dek unu pesojn por la kovrilo kaj la petato kaj dek unu pesojn, ĉar vi ne pagas kaj restas ŝulda la sumon al mi. Ĉu tio estas ĝusta, *Criserio*?“

Criserio ne povis kalkuli. Neniukaze li povis tion tiel rapide sumigi. La ciferoj konfuzis lin, ĉar li ne tiel rapide povis sekvi ilin, kaj li ankaŭ ne volis fari la patronon malbonvolema, kaj krome la patrono diris la ciferojn ĉiujn hispanlingve, kiujn *Criserio* efektive rekonis kiel hispanlingvajn, sed en sia cerbo ne povis percepti.

Tiel estis tute normale, ke Criserio diris: „Tio estas ĝusta, patrono.“

Ĉar la patrono diris tion, ĝi devis esti ĝusta. Tia patrono, tia fiera kaj riĉa mastro, ne riĉigas sin trompe je povra indiĝeno.

„Ĉu konsentite, Criserio?“ demandis *don* Arnulfo.

„Konsentite, patrono“, respondis Criserio.

Don Arnulfo al Criserio ne permesis, ke tiu ŝmiru sur la konton konfirman kruceton. Criserio la belan puran kontolibron inaŭguritan per „En la nomo de Dio!“ tamen nur grase makulaĉus per inko. Konfirmaj krucetoj ne necesis. Se ekestus disputo, kio neniam okazis, demandus neniun oficisto pro la kruceto. La krucetoj estus senvaloraj jam pro tio, ĉar nek Criserio nek iu alia peono de la bieno povis legi, kion li konfirmu per sia kruco. Tial estis tute egale, ĉu tie estis krucetoj ĉu ne. *Don* Arnulfo demandis: 'Ĉu vi konsentas?' kaj Criserio respondis 'Jes, patrono, mi konsentas.' Ĉiu juĝisto en la respubliko Meksiko en proceso inter bienulo kaj peono agnoskus tiun buŝan konfirmon. La peono konfirmis buŝe la konton, kaj per tio li estis respondeca por la farita kaj konfirmita ŝuldo.

Don Arnulfo estis honesta kaj honora mastro. Li traktis siajn peonojn pli bone ol multaj aliaj bienuloj, kiujn li konis. Aliaj terposedantoj ne estis tiel mildkoraj al siaj peonoj.

„La ĉemizo kostas kvin pesojn. Ĝuste, jes? Bone. Kaj ĉar vi ne pagas la ĉemizon, tial estas kvin pesoj. Kaj ĉar vi ŝuldas al mi la kvin pesojn, tial estas kvin pesoj. Kaj, ĉar mi de vi neniam povos ricevi la monon kontante, tial estas kvin pesoj. Tio estas do kvin kaj kvin kaj kvin kaj kvin, tio faras dudek pesojn. Konsentite?“

„Jes, patrono, konsentite.“ La peono nenie aliloke povas aĉeti ĉemizon, se li bezonas ĝin, ĉar li ja nenie en la mondo havas krediton, nur ĉe sia mastro, por kiu li laboras kaj kiun li ne rajtas forlasi, se li ankoraŭ havas eĉ nur unu centavon da ŝuldoj ĉe li.

Ili ne estas sklavoĵ, la peonoĵ. La sklavecon oni forigis en Meksiko, kiam oni deklaris la sendependecon je Hispanio. La neekzistado de la sklaveco en Meksiko estas konfirmita pere de la konstitucio. En unu sekcio de la dia monda ordo oni profitas el tio, se la proletoj povas legi, skribi kaj fulmrapiĉ kalkuli; en alia sekcio de tiu prudenta monda ordo oni eĉ pli profitas el tio, se la proletoj ne povas kalkuli kaj ne lernas la hispanan lingvon. Kiu volas enspezi monon, tiu devas nur decidi, kiun sekcion li deziras ekspluati. Ambaŭ sekcioj entenas orminejojn.

2/2

Criserio ne konsideris, ĉu ĉio ĉi estis justa ĉu ne. Tiel komplekse li ne pensis por percepti kaj kompreni tiajn negocojn. Se iu eĉ dum horoj provus klarigi al li, ke oni hontinde mensogis al li en tiu afero, li ne akceptus tion. Li aŭskultus kaj aŭskultus, kaj finfine li dirus: „La patrono pravas; ĉar la patrono estas nobla viro, kaj li ne trompas povran indiĝenon. Li kalkulis tute ĝuste, mi ja ekde nun ŝuldas al li la dek unu pesojn, kaj tial tio do estas dudek du pesoĵ. Tio tute pravas.“

Don Arnulfo kompreneble povus iri alian vojon por ricevi la dudek du pesojn. Li simple povus diri: 'La kovrilo kaj la petato kostas kune dudek du pesojn, aĉetu aŭ ne aĉetu ilin.' Sed tiel la indiĝeno ekkomprenus, ke estas prezo uzura. Tiukaze li ne aĉetus la varojn kaj havigus al si anstataŭaĵojn, kiujn li mem povus akiri, ekzemple felojn de ĉasitaj bestoj. La prezojn por aĵoj li ja komprenas. Li ankaŭ komprenas, ke en la bieno ĉiuj varoj devas esti pli multekostaj ol ĉe la foiro en la urbo, ĉar la bienulo havas ja

transportkoston. Kaj krome li ne scias, je kiu prezo la bienulo aĉetas la varojn. La simplajn prezojn komprenas la peono; kion li ne komprenas kaj kion li ne povas percepti tiel rapide en la kapo, estas la hasta ĵonglado per ciferoj kaj transkalkuloj fare de bienulo. Se temis pri kalkulado per ciferoj pli grandaj ol kvin, ĉesis por peono ĉia kompreno. Ĉu do estis dek kvin aŭ dudek du aŭ sesdek sep pesoj, tio signifis por li ĉiam la samon. Tiaj ciferoj ĉiufoje konfuzis peonon tiel, ke li baldaŭ falis en specon de hipnoto. Kaj tiu hipnoto ankoraŭ profundigis, se efektive okazus, ke juĝistoj aŭ oficistoj inspektus la kontojn de la bienposedanto por eltrovi, ĉu oni faras aŭ ne faras maljustaĵon al la indiĝenaj kamp-laboristoj. En la tuta mondo ili konis nur unu homon, al kiu ili povis turni sin por plendi pri io, kaj tiu homo estis ilia patrono.

Sed ĉu povra indiĝeno ĉu ne povra indiĝeno. En alte civilizitaj landoj ekzistas la sama dieca sistemo: Soldato tradraŝita de la kapitano rajtas plendi nur ĉe sia kapitano, kaj tiu kapitano decidas, ĉu la plendo estas rajtigita kaj transdonebla aŭ ne. Tial soldato en civilizita lando ne pravas, se li rikane rigardas el fiera alto mal-supren al povra senscia peono, kiu pacience devas toleri ĉion.

Estas multspecaj sistemoj de la sklaveco kaj prirabado de homoj surtere, kiujn prudenta kaj normala homo ne povus eltrovi, se ili ne ekzistus efektive.

2/3

Criserio estis feliĉa, ke li povis doni la kovrilon kaj la petaton al sia filo. Li diris al li, ke la aĵoj kostis dek unu pesojn. Sed li ne diris, ke li pro tio ŝarĝis sin per ŝuldo de dudek du pesoj.

En lia kapo la afero alie speguliĝis. La varoj kostas dek unu pesojn. Tio estas ĝusta. Ke li fakte ŝuldis dudek du pesojn, tute ne koncernis tiujn aĵojn, sed estis nur pro tio, ke li ne povis pagi la

dek unu pesojn kontante. Tial li ne konsideris necesa interparoli pri la dek unu pesojn kun sia filo.

Andreo eĉ ne povus ŝanĝi ion, se li sciis tion. Sed li bone sciis, kia nekredeble alta sumo dek unu pesojn estas por lia patro. Li ja sciis la ekonomiajn rilatojn de la peonoj en bieno. Li eble ne sciis kaj ne komprenis ilin, kiam li foriris de la hejmo. Sed nun li pli maturiĝis, kaj ĉe du vizitoj en la bieno li aŭskultis en la kabano de la gepatroj kaj en la aliaj kabanoj de peonoj pri ĉiuj tiuj aferoj.

Se la peonoj en la kabanoj interparolis pri tiaj rilatoj, tio ne okazis kritike. Ili akceptis la aferojn tiel, kiel ili estas. Oni rigardis ilin eterna destino de la sorto, kiu ne ŝanĝeblas fare de homo. Tiel, kiel homo ne povas ŝanĝi tion, ke akvo de rivero fluas malsupren kaj ne supren. La patrono estas la patrono, kaj la peono estas la peono. Tiel estas kaj tiel restos. La filo de peono fariĝas peono. Kaj kiam la patrono transdonas la bienon al sia filo aŭ vendas ĝin, ŝanĝiĝas la nomo de la patrono, sed je la sociaj rilatoj ŝanĝiĝas nenio. Se oni efektive kritikis ion, estis nur pro tio, ke la grundo, asignita de la patrono al tiu aŭ al tiu peono, estas tro malfekunda, ke ĝi havas tro multajn ŝtonojn kaj montojn, aŭ, ke oni volonte havus iom pli da grundo, aŭ, ke la prezoj de la porkoj, pagitaj de la komercistoj devus esti pli altaj dudek kvin aŭ kvindek centavojn, ĉar du pesojn kaj okdek centavojn por bona elkreskinta porko efektive estas tro malmulta.

Sed la peonoj ne kritikis, ke la patrono havas la aĉetan prioritaton por ĉiuj porkoj, kaproj kaj ŝafoj, kiujn vendas ties peonoj. Kaj, ke li mem fiksas la prezojn por tiuj porkoj, kiujn li intencis aĉeti de siaj peonoj por poste mem vendi ilin, kaj ke la peonoj unue devis peti lian permeson, kiam ili intencis vendi siajn malgrandajn brutojn al pretervagantaj komercistoj, kaj ke ili devis pagi al la patrono por ĉiu vendita besto kvindek ĝis sepdek kvin centavojn aŭ eĉ peson. Tio estas, kaj ĉiam estis, la bona rajto de patrono. La

porkoj, ŝafoj kaj kaproj plenkreskis ja sur lia bieno. Sed la peonoj devis aĉeti la porkidojn kaj kapridojn; kaj la maizon, la nutraĵon de la bestoj, kiun la indiĝenoj kultivis mem.

La peonoj ankaŭ ne havis la rajton vendi superfluan maizon aŭ superfluajn fazeolojn de siaj kampoj al la vagantaj komercistoj aŭ sur la foirplaco de la plej proksima loko. Ankaŭ pri tio patrono havis la aĉetoprioritaton, kaj ankaŭ en tiu kazo ili devis peti la aĉetopermeson. Kaj parton de la ricevita mono ili devis doni al la patrono. Se ili havis ŝuldojn, kaj ili ĉiuj havis ŝuldojn ĉe li, ili tute ne rajtis vendi ion, sed ĉion devis doni al li. Kaj la patrono dekal-kulis la ŝuldon nur tiom multe, kiom li fiksas la prezon.

Ĉio tio estis justa. Ĝi estis laŭleĝa kaj destinita de la ĉielo, kaj la eklezio konfirmis ĉi tion. La dioj estis ja la samsangaj parencoj de la patrono, kaj ili neniel estis parencoj aŭ boparencoj de indiĝenoj.

Estis tiel, kaj oni ne povis ŝanĝi tion. Ĉiam estis tiel kaj ĉiam tiel restos. La peonoj tion ne sciis pli bone. Ili sciis nur, ke tiel estas ĉie sur la mondo. Ĉar kien ajn ili iris aŭ kien ajn ili venis, en ĉiuj bienoj de la najbaroj estis tute same. Sekve devis esti tiel sur la tuta tero. Ilia tero, aŭ pli bone dirate, kion ili sciis tero aŭ mondo, estis la tereno, kie loĝis la indiĝenoj, kiuj parolis la saman lingvon kiel ili mem. Kie oni ne parolis ilian lingvon, tie estis mondo, kiu estis fremda por ili. Kaj kiaj sociaj rilatoj regis tie, ili ne sciis kaj ankaŭ ne povis ekscii.

En ilia distrikto troviĝis multaj vilaĝoj, kiuj estis sendependaj. Ili estis plej ofte vilaĝoj, kie vivis indiĝenoj, kiuj neniam estis peonoj en bieno. Aŭ la grundo estis tiel magra, ke neniu hispano iam ajn havis la sopiron posedi ĝin, aŭ la indiĝenoj estis ĉiam tiel ribelemaj, tiel kontraŭstaremaj kaj tiel murdemaj, ke neniu hispano povis elteni tie. Tiel estis en Bachajón kaj en multaj aliaj

vilaĝoj. Sed, se la peonoj rigardis tien, ili trovis, ke tiuj sendependaj indiĝenoj vivas ankoraŭ multe pli mizere kaj pli povre ol ili mem. Tiuj sendependaj indiĝenoj vivis foje tiel mizere, ke ili libervole forlasis siajn sendependajn vilaĝojn kaj libervole transloĝiĝis al bienoj por fariĝi peonoj. La kaŭzoj estis multnombraj. La plejmulto el tiuj kaŭzoj havis la radikon en la karakteraj ecoj, en la kutimoj kaj moroj de tiuj indiĝenoj. Sed la ĉefa kaŭzo estis la malesperiga manko de scioj de la indiĝenoj kaj la granda lerteco de la grandaj bienposedantoj kaj de la eklezio interligita kun ili, teni la indiĝenojn en tiu sensciado.

2/4

La patro de Andreo tute ne estis devigita aĉeti novan kovrilon kaj novan petaton por sia filo. Li faris tion pro amo al sia filo, kaj ĉar li ne povis elteni, ke la filo suferas.

La viro, kiu devus doni al Andreo novajn aĵojn, estis lia mastro, *don* Leonardo. Sed al tiu estis tute egale, ĉu Andreo frostotremas, ĉu li devas dormi nur sur nuda tero aŭ ĉu li malvarmumis kaj malsaniĝis, aŭ ĉu la knabo restos sana kaj vivoforta. Kial zorgi pri la bonfarto de indiana knabo?! Se knabo ekhavis pneŭmonion aŭ febron kaj mortus, ĉu estus problemo por li? Estas miloj de indiĝenaj knaboj. Li petus sian edzinon skribi al la patro, ke li sendu alian knabon. Kien tio kondukus, se li zorgus pri nuda-pieda indiĝena knabo? Dek unu pesojn la knabo ne valoris. Krome tute ne damaĝas al indiĝena knabo, se li dormas sur nuda tero. Ili kutimiĝis pri tio, ili estas tiel rezistofortaj kiel iliaj hundoj. La dek unu pesojn li bezonas por siaj negocoj.

Salajron Andreo ankoraŭ tiam ne ricevis, kaj *don* Leonardo neniam konsideris iam doni iun ajn al la knabo. Li ne pagus salajron al li eĉ tiukaze, se Andreo havus jam dudek aŭ tridek jarojn kaj plenumus la taskojn por la vendejo tiel bone kiel juna viro el *San*

Cristóbal, kiu farus la laboron ne por malpli ol dudek pesoj ĉiunmonate kaj la manĝo.

La solan diferencon, kiun li faris ĉe la knabo en la du lastaj jaroj, estis tiu, ke *Andreo* ĉe festo en Tenejapa ricevis ne kvin aŭ dek centavojn sed *tostón*-on, do kvindek centavojn.

„Ne aĉetu sensencaĵojn por tio, kaj precipe neniun *aguardiente*, neniun brandon“, admonis lin *don Leonardo*, kiam li transdonis la kvindek centavojn kun mieno, kvazaŭ li donus ormoneron dudekpesan al li.

2/5

Don Leonardo nun konfidis al *Andreo* de tempo al tempo jam tre respondeplenajn taskojn.

Li sendis lin kun konsiderindaj monsumoj al *San Cristóbal*, al la plej proksima pli granda urbo, kie *Andreo* devis aĉeti varojn kaj intertrakti kun la *arrieros*, kun la mulpelistoj, kiuj devis transporti la aĉetitajn varojn al Tenejapa. Li akompanis la varojn, li devis atenti pri tio, ke ili estu kompletaj kaj alvenu sen difekto en Tenejapa-n.

Tiuj laboroj konsiderinde plivastigis la spertojn de la knabo. Li konatiĝis kun vere granda urbo, rigardis la abundon kaj la diversecon de varoj el la tuta mondo kaj aŭdis pri urboj, kiuj estas miloble pli grandaj ol *San Cristóbal*, kiu ŝajnis al li, alveninta tien je la unua fojo, pli granda kaj pli bela urbo ol ĉiu alia surtere. Ĝi havis stratojn, kiuj estis longaj kilometrojn, domon apud domo, ĉiuj el ŝtonoj kaj multaj kun fenestroj. Antaŭe li ne sciis, ke ekzistas domoj kun fenestroj, ĉar li neniam antaŭe vidis tian domon. En Tenejapa estis kelkaj, sed la fenestroj estis nur lukoj kun kradoj. Kaj nun li vidis ĉi tie fenestrojn kun vitrotabuloj, kaj

li vidis eĉ vendejajn fenestrojn kun grandegaj vitrotabuloj, post kiuj la varoj estas staplitaj kaj aspektas tiel, kvazaŭ oni tuj povus forpreni ilin.

Li vidis tie bovoĉarojn, *carretas*, je la unua fojo. Ĝis nun li ne sciis, ke ekzistas iuj ĉaroj aŭ veturiloj, kaj ke tiujn ĉarojn povas tiri bestoj, ĉar ankaŭ tirbestojn li ne vidis antaŭe. La kampojn de la bieno, kiel ankaŭ la kampojn en Tenejapa, oni ne plugis. Oni puŝis simple bastonon en la teron, en kiun oni ĵetis la maizograjnojn aŭ fabojn. Se efektive necesis iom plugi, ekzemple pro tomatoj aŭ pro kapsikoj, tio okazis per plugo, kiu verdire ne estis pli ol bastonego, tirata de peono. El kio Andreo do povus preni la scion pri tirbestoj? Tiaj vojoj, sur kiaj grandaj veturiloj aŭ nur ĉaroj povas veturi, ekzistis eĉ ne unu en la tuta vasta kaj granda distrikto. Ĉiuj vojoj estis nur mallarĝaj padoj, ofte tiel mallarĝaj, tiel ŝtonplenaj, tiel truigitaj kaj tiel malfirmaj, ke estis eĉ por pakmuloj malfacile iri sur ili sen danĝero. Andreo aŭdis de ĉaristo, ke la ĉaroj faras veturojn dekkvinoble pli longajn ol la vojdistanco de Tenejapa ĝis *San Cristóbal*. Kaj de Tenejapa ĝis *San Cristóbal* ŝarĝmulo bezonas tutan tagmarŝon.

La knabo skeptike rigardis la ĉariston, kiu rakontis tion al li. Sed aliaj ĉaristoj diris la samon. Kaj indiĝena salokomercisto, vendante siajn varojn surstrate, demandate de li, diris, ke tio estas tute ĝusta, kaj ke li scias tion, ĉar li iam akompanis saloŝarĝon sur ĉaro ĝis Arriaga.

Tiel Andreo ricevis je la unua fojo impreson pri la grandeco de la terglobo, sur kiu li vivas.

Ĝis tiam li tute ne havis imagon pri la grandeco de la tero, sur kiu li vivas. Por diri la veron, li neniam pensis pri tio. Kiam oni parolis en la domo aŭ en la vendejo de *don Leonardo* pri *Tuxtla*, *Tonalá*, *Tapachula*, *San Gerónimo*, Verakruco kaj pri Meksikurbo,

li imagis al si la urbojn tiel, kiel estas Tenejapa, la sola urbo, kiun li konis. Kaj se oni interparolis pri tio, ke tiuj urboj estas tre malproksimaj, li kalkuladis por si, ke ili certe malproksimas duoble aŭ trioble aŭ maksimume kvaroble ol la hejma bieno Lumbojvil de Tenejapa. Ĉiukaze li certis, ke tiuj urboj ankoraŭ troviĝas interne de la horizonto. Ĉar tie la mondo, kiel scias iu ajn, tute finiĝas.

Alia ĉaristo, kiun li renkontis en la portiko de la *cabildo*, do de la municipa sidejo, kun kiu li vespermanĝis maizoflanojn kaj nigrajn fabojn varmigatajn de indiĝenino sur lada plato, diris al li, ke la veturo de la ĉaroj finiĝas en Arriaga, kaj ke Arriaga estas fervojstacio. Kaj kiam Andreo demandis, kio tio estas, la ĉaristo klarigis al li, ke tie grandegaj veturiloj alportas el malproksimaj landoj la varojn, kiujn oni poste ŝarĝas sur ĉarojn kaj transportas en la internon de la lando. Li diris eĉ pli. Li diris, ke tiaj veturiloj estas multe pli grandaj ol ĉaro, ke tia veturilo estas tiel granda kiel ŝtona domo, kaj ke sola ĉarego entenas tiom da varoj, ke oni per ili povas plenigi ĝis la rando kvardek aŭ kvindek ĉarojn. Tiuj veturiloj veturas sur vojoj faritaj el fero, kaj kvardek tiaj veturiloj kaj eĉ multe pli da ili estas tirataj de alia granda veturilo, kiu faras multe da fumo kaj ege ĝemas kaj ŝvitas kiel granda besto. Kaj tiu nomiĝas *ferrocarril*, fervojo.

La vorton *ferrocarril* Andreo konis, ĉar li lernis skribi ĝin ĉe la instruisto. Sed la instruisto ne povis klarigi la aferon al li, ĉar la instruisto mem neniam vidis fervojon, eĉ ne bildon pri ĝi, kaj tial li ne povis imagi la aĵon. Li devis esti kontenta per tio, ke la lernantoj lernis skribi senerare la vorton. La vorto estis en la legolibro. Sed ĉar Andreo povis legi kaj skribi la vorton, li sentis strangan parencecon al la aĵo. Kiam la ĉaristo klarigis la fervojon, kiel ĝi aspektas, ĝemas, ŝvitas, tusas, bojas kaj anhelas, preskaŭ ŝajnis al la knabo, kvazaŭ li jam vidus ie fervojon. Ĝi ne estis fremda, ne nova kaj neatendita afero por li, ĉar li sciis kiel nomi

ĝin, ja eĉ kiel skribi ĝin. Spite al ties ĝemado kaj muĝado la monstro ne timigis lin. Tute male, li deziris vidi la monstron proksime antaŭ siaj okuloj. Kaj li eltrovis, sen konsciiĝi pri la okazaĵo, ke la sciado de nekutima aĵo kaj la sciado de ĝia nomo, forrabas de la aĵo la potencon disvastigi teruron. Kaj, ĉar li ne nur sciis tion, sed eĉ povis skribi la nomon, tio donis al li fortan senton de sekureco kaj vekis en li memkonscion tian, kian li sentis neniam antaŭe.

Pro tiu por si mem apenaŭ rimarkinda interna travivaĵo, kiun li havis en tiuj kelkaj minutoj, do, ke terura monstro, prezentita de la fanfaronema ĉaristo multe pli terura kaj timiga ol ĝi estis fakte, ŝrumpis en sobran aĵon, nur tial, ĉar oni konas ĝian nomon kaj ĝin per literoj kapablas komprenigi kaj videbligi al si, la knabo subite tute komprenis la valoron de edukiteco. Li povis klarigi tion al neniuj, li nur sentis tion.

Kaj ju pli li meditis pri tio, des pli klara fariĝis por li, des pli klara iĝis ĉirkaŭ li, kaj des pli klara iĝis per unu fojo la tuta mondo. La sciata vorto klarigis kaj dismembrigis tiel komplete la tutan aĵon, ke neniuj misteroj plu restis je ĝi. *Ferrocarril*. Tre klare. *Ferro* signifas feron, *carro* signifas veturilo, *riel* relo; do veturilo el fero, kiu veturas sur reloj. Tio ĉi en la vorto estis nur iom obskurigita, ĉiun vorton oni faris pli konciza, por ke la tuta vorto ne fariĝu tro longa.

Tial li havis la ideon, ke tiel estas propable pri ĉiuj vortoj, ke ĉiuj vortoj precize klarigas aĵojn aŭ procedojn kaj tre sobre solvas la sekretojn de la aĵoj aŭ procedoj. Li serĉis per sia cerbo kelkajn aliajn vortojn. Kaj efektive, laŭ lia rapide ekfulmanta opinio estis tiel ĉe ĉiu vorto.

Ekde nun li havis tute alian opinion pri edukiteco. Li nun ne plu pensis, ke edukado estas utila nur por labori pli sukcese kaj pli rapide en vendejoj. Li sentis, ke la lernado kaj la edukiteco havas

ankoraŭ alian, eble eĉ pli grandan valoron ol la nuran utilecon en negocoj. Li faris pensajn saltojn.

Li travivis similan kiel iu, kiu deduktas malgrandan filozofian teorion el akre limigitaj rilatoj en la ekonomia aŭ socia vivo de la homoj. Li ne scias, ke tiun saman teorion antaŭ li deklaris jam miloj de homoj, kaj ke inter ili estas ĉirkaŭ kvindek homoj, kiuj jam sciis la bazan ideon de tiu malgranda teorio, kiam Aristotelo ankoraŭ vendis sandalrimenojn en la stratoj de Ateno, por ke li almenaŭ povu vivi. Jam en tiu tempo filozofo nur de siaj mondojn renversigaj doktrinoj ne povis vivi; li bezonis laboron, kiu sekurigas al li panon kaj salon, komercon por artikloj de la ĉiutaga senfilozofia vivo. Kaj kiel al ĉiuj okazas, se ili opinias, ke ili kreis novan ideon, tiel ankaŭ al Andreo. Li supozis, ke la eduko povus detrui la minacantan kaj timigan potencon de idoloj, de pastroj kaj de ĉiuspecaj fantomoj de la superstiĉo, kiuj per siaj grimacoj influas la homojn. Kaj li pensis, se la eduko povas sendanĝerigi nekonatajn monstrojn kiel la fervojon, se ĝi povas puŝi idolojn kaj minacantajn fantomojn de ĝiaj fundamentoj, la eduko certe ankaŭ devas esti kapabla liberigi la patron kaj ĉiujn peonojn de la hejma bieno de eterne ŝarĝanta sklaveco.

Li havas la edukitecon, kaj li liberas.

Sed liajn konfuzajn pensojn abrupte interrompis Lucio, la mulisto, kiu sekvatage matene kun li transportos la varojn al Tenejapa.

„Kie vi dormos, Andreo?“ demandis Lucio.

„Mi ĉie povas dormi en la portiko de la municipa domo“, diris Andreo. Li jam sternis sian petaton, nur tri paŝojn for de tiu indiĝenino, kiu tenis ĉi tie varma la tutan nokton la simplajn manĝojn por mulistoj kaj ĉaristoj.

„Tion ne faru“, diris Lucio. „Iru kun mi. Ni dormos en la pordega enirejo de *don* Ambrosio, kie estas la varoj. La muloj, starantaj en la malantaŭa korto, rapide atingeblos. Ni ŝarĝos ilin je la dua matene. Tiel ni ĉirkaŭ la kvara jam estos sur la vojo.“

Tio memorigis Andreon pri tio, ke li ne estas libera, ke li ne povas fari, kion li volas, ke li eĉ ne povas dormi ĉi tie en la portiko, kie, pro la alvenantaj kaj forveturantaj viroj sur ĉevaloj, pro ĉaristoj, mulistoj, vagantaj indiĝenaj potokomercistoj kaj korboplektistoj, regas vigla vivo dum la tuta nokto, kie multe da aferoj rigardeblas kaj aŭdeblas. Li devis dormi tie, kie la mulisto Lucio plej rapide povas disponi pri li sen antaŭe devi serĉi lin. La remarŝon kun la varoj komandis Lucio, kiun lia mastro persone respondecigis pri la transporto. Kaj ankaŭ Andreo havis sian mastron, kiu ordonis al li, ke li akompanu la varojn, ĉu plaĉis, ĉu ne plaĉis al li. Ĉar la mastro donis la manĝon al li kaj la permeson, ke li sternu la petaton en angulo de ties domo.

Andreo en siaj sovaĝe kirliĝantaj pensoj eltrovis por si la ideon, ke la eduko, kiun li supozis havi, povas detrui ĉian timon pri monstroj kaj idoloj. Sed kiam Lucio, kiu sobre kaj praktike parolis pri la ĉiutagaj taskoj, memorigis lin pri lia mastro, Andreo ektimis denove. Pro sperto li bone sciis, kiel furioze kaj kolere *don* Leonardo povas reagi, se oni eraris pri laboro aŭ se io ne funkcias tiel, kiel ĝi funkciu laŭ lia deziro. Li sciis, ke *don* Leonardo, kiam li koleras, sen hezito ekkaptas breton aŭ pezan bastonegon aŭ feran kestorubandon, aŭ ion ajn, kion li povas preni en la manon, kaj batos per ĝi sur la kapon de la knabo.

Kiel helpu edukiteco en tiu kazo, pensis Andreo, kiam li troitis kun Lucio tra la tenebraj stratoj al la domo de *don* Ambrosio. Ke li, Andreo, povas legi, skribi kaj kalkuli, utilas nur al lia mastro, al *don* Leonardo, ne al li mem. Li restas tiu, kiu li estis, peono, kiu ne ricevas salajron, kiu devas obei, kion ajn oni ordonas al li, kiu

dum dudek kvar horoj de tago devas ĉeesti, se oni vokas kaj bezonas lin.

Sed li estis tamen libera. Ĉar li sciis, kio estas libero. Libera estas la peono, kiu ne estas enfermita en ŝmira truon, kiu havas la nomon karcero aŭ prizono. En tiun truon la patrono povas sendi peonon, kiam ajn li volas. Kaj libero estis, se ili dimanĉe ne kunligis al oni la manojn kaj la piedojn sur la dorson pro maldiligenteco dum la semajno, aŭ pro malobeemo, aŭ ĉar forkuris bovido.

Andreo ne povis diri, ke li estas mallibera. Li kuŝis nek en karcero nek ligita en la selokamero de la bieno. Li estis libera. Kiam li iris je la sekva mateno kun la ŝarĝitaj muloj kaj la vojo estis sur la maldekstra flanko tro malfirma aŭ tro ŝlima, li havis la liberon elekti la vojon sur la dekstra flanko por konduki la mulojn nelezitaj al la celo. Kaj li havis la liberon pli ŝarĝi la flavan mulon per kelkaj kilogramoj ol la grizan mulon. Kaj li havis la liberon fumi kelkajn cigaredojn, sub la kondiĉo, ke li havas ilin. Kiun pluan liberon peono atendu de la vivo?! Eble ankoraŭ la liberon edziĝi, kiam li havas la necesan aĝon kaj alia peono donas sian filinon al li, por ke li edzinigu ŝin. Kaj tiam li havis la lastan grandan libercon, fari sufiĉe multajn infanojn kaj plenkreskigi ilin de la fruktoj de la malgranda kampo, kiun la patrono asignis al li por tiel provizi la patronon per freŝaj peonoj.

Li havis ĉiujn liberojn, kiujn li konis. Kaj se iu demandus lin pri tio, li blekus per laŭta voĉo la dogmon, kiun oni enkapigis en la lernejo per soldateca dresado al la infanoj: „Mi estas libera civitano de sendependa nacio. *Viva la patria! Viva!*“ Kaj li kredus tion, kion li babiladis.

Ĉapitro 3

3/1

Don Leonardo aĉetis en Chilón tre malmultekoste tridek mulojn de bienulo, kiu nepre bezonis monon. Li lasis peli la mulojn en akompano de *Andreo* al Tenejapa, kie li zorgis pri ilia intensa flegado, por ke ili havu plaĉan aspekton.

Li faris enketon, kiom kostas flegataj muloj, kaj li eksciis aŭskultante, ke oni momente pagas la plej bonajn prezojn en *La Concordia*, kie kelkaj posedantoj de kafoplantejoj intencas aĉeti kelkajn centojn de muloj.

Post pliaj enketoj eksciinte, ke tiu informo estas vera, li tuj decidis konduki la mulojn al *La Concordia*.

Li prenis sian plej bonan ĉevalon kaj ekrajdis jam tre frue por intertrakti la negocon. La mulojn devis akompani *Andreo*, ricevinte ankoraŭ kelkajn helpantojn, ĉar dum tia longa vojaĝo tridek muloj ne povas marŝi la saman troton kiel sola bona ĉevalo, sur kiu sidas lerta rajdanto.

Don Leonardo vendis la mulojn du tagojn pli frue ol ili venis. La aĉetinto kaj la vendinto estis kontentaj pri la negoco. *Don Leonardo* abunde enspezis, kaj la planteja posedanto akiris la mulojn multe pli malkare ol li supozis.

Se li estus devigita aĉeti la mulojn en Tabasko, la prezo pliiĝus ankoraŭfoje je duono.

En *La Concordia* ĉeestis tre multaj homoj dum tiu semajno, ĉar estis okazonta festo, eĉ kun *feria*, kun kermeso.

Tie estis ĉevalkomercistoj, brutkomercistoj, azenkomercistoj el *Comitán*; agentoj, kiuj varbis indiĝenajn laboristojn el la sendependaj vilaĝoj por la kaf- kaj kakaoplantejoj; aĉetistoj de kafo, maizo aŭ ligno; agentoj por maŝinoj, agentoj por feraĵoj kaj laboriloj por la agrokulturo, aĉetistoj de terposedaĵo, komercistoj de ŝtofoj kaj de varoj por la ĉiutaga bezono. Ĉiuj ĉi homoj havis ĉe si multe da mono por validigi kontraktojn. Tiuj homoj enspezis multe da mono, kaj ĉiuj esperis enspezi eĉ multe pli da mono ol kutime.

La vesperoj estis tre longaj. Oni sufiĉe trinkis. Kaj ĉar la homoj ne sciis kiel pasigi la tempon dum la vesperoj aŭ kion fari, se ili ne interparolis pri negocoj, ili pasie ludis.

Vendinte siajn mulojn, *don* Leonardo ne tuj reveturis. Per la enspezita mono li uzis la okazon por novaj negocoj kaj por enspezi multe da mono aldone. Sed li finis siajn negocojn per kontrakto same tiom malofte rapide, kiel ĉiuj ceteraj homoj. La viroj ne rapidis, ĉar ili havis sufiĉe da tempo, kaj ĉiu esperis eĉ pli bonajn okazojn kaj eĉ pli bonajn ofertojn.

Kaj ankaŭ *don* Leonardo ne sciis, kion fari dum la vesperoj. Tial tio estis do tute normala, ke li sidiĝis kun grupo de viroj kaj ludis, tiel, kiel faris tion ankaŭ ĉiuj aliaj.

El la *caballeros*, kun kiuj li ludis, li konis ĉiun. Ili ĉiuj, ankaŭ li mem, estis honestaj kaj fidindaj ludantoj, kvankam ili ĉiuj, inkluzive de li mem, en negocoj sufiĉe ofte provis trompi la kon-

traŭulojn per ĉiuj eblaj artifikoj. Sed ĉe ludo oni devas esti honesta, tio postulas la honoro de *caballero*. En negocoj neniu estas tiel akurata, kaj tamen ĉiu restas honorindulo. La grupo ludis *Siete y Medio*. Tio estas tre rapida ludo. Ĝis frumatene je la dua *don* Leonardo forludis la tutan monon ricevintan por la muloj. Sed li daŭrigis la ludadon. Li jam ne havis eĉ unusolan peson por povi ludi plu per ĝi, kun la espero regajni sian monon. Kaj ĉe la ludado neniu *caballero* pruntedonas monon. Tio estis malnova, bone elprovita leĝo.

La viroj ludis en *La Concordia*, en granda ĉambro en la domo de civitano, kiun ili konis. Ĉiuj mastroj havis siajn *muchachos*, siajn servoknabojn, ĉe si.

Tiuj knaboj estis ĉiam ĉe siaj mastroj. Ĉi tie la knaboj proksime kuŝis dormante sur siaj matoj. Kelkaj dormis en la portiko, aliaj dormis en angulo de la ĉambro, en kiu ludis iliaj mastroj. Tio tute ne ĝenis la sinjorojn.

De tempo al tempo mastro per piedo puŝis tiun aŭ tiun el la servoknaboj: „Hola, Lazaro, eksaltu, kuru transen kaj frapu la por-don de la kantino, jen dek du realoj por plia litro da *comiteco aňejo*. Nu, ek do, saltu tuj, ne hezitu. Niaj gorgoj estas sekaj.“

Rimarko

caballero = sinjoro, ĝentlemano, kavaliro

comiteco aňejo = pli longe aĝigita komiteko en lignaj bareloj ol simpla komiteko

La Concordia = La Konkordo

3/3

Ĉifoje estis ne Lazaro, sed Andreo, kiun puŝis unu el la sinjoroj per piedo. Ĉe tiaj kunvenoj la servoknaboj estis la socia komuna

proprieto de ĉiuj ĉeestantaj sinjoroj. Tial neniuj atentis, kiu alvokis kies servoknabon kaj forsendis lin kun komisiono.

Andreo revenis kun la komitekobotelo kaj starigis ĝin sur la tablon.

„Jen, trinku plengorĝon, *muchacho*“, diris *don* Laŭreano, kiu komisiis la knabon. Li plenigis glason kaj ŝovis ĝin al Andreo. Tiu eltrinkis ĝin per unu fojo. Tiam li prenis per dentpikilo peceton de la distranĉita fromaĝo sur la telero.

La rilato de mastro al sia servoknabo en Meksiko ne estas tia, kia tiu inter mastro kaj sklavo. Precipe dum vojaĝo la mastro ne estas tro fiera trinki el la sama botelo kiel lia servoknabo, tute egale, ĉu ĝi entenas akvon, kafon, brandon, aŭ sodotrinkaĵon. Kaj pri la manĝo tio validas same. Kiam la vetero estas tre frida, la mastro kunruliĝante envolvas sin en kovrilon tuj apud sia servoknabo, por ke ili reciproke tenu sin varmaj. La mastro dividas sian rostitan meleagron sufiĉe honeste kun sia servoknabo; kaj tiu detiras per la fingroj de la maizkaĉa bulo aŭ de la viandopeco tiom, kiom li pensas bezoni, kvankam li mortus pro malsato, se la mastro ne manĝas samtempe aŭ ne manĝis antaŭe. Sed, kvankam la *muchacho* ĵus trinkis el la sama botelo kiel la mastro, tiu ne havas ian skrupulon, tuj poste piedbati la servoknabon, se tiu ne sufiĉe rapide suprensaltas por kapti fortrotantan ĉevalon antaŭ ol ĝi estas tro malproksima.

Andreo intencis rekaŭri en sia angulo, kiam *don* Leonardo rimarkis lin.

„Atentu, *don* Laŭreano“, tuj diris *don* Leonardo, „mi vetas kun vi pri mia *muchacho*, kiom vi donus por li?“

Don Laŭreano tenis la ludobankon.

Li rigardis supren, kontrolis la knabon Andreo per rapida rigardo de supre ĝis piede, tiel, kiel oni kontrolas ĉevalon, kies aĉeton oni devas decidi en la sama momento.

„Ĉu li parolas la kastilian aŭ nur idiomon?“ demandis *don* Laŭreano, dum li miksis la ludokartojn.

„Li parolas ambaŭ lingvojn, kaj li scipovas iom legi kaj skribi“, respondis *don* Leonardo.

„Dudek kvin pesojn“, diris *don* Laŭreano koncize per voĉo, kiu klare aludis, ke tio estas la maksimuma sumo, kiun li pretas doni por li.

„*Aceptado*, akceptite“, respondis *don* Leonardo.

La kartoj falis kaj *don* Leonardo ne gajnis la ludon.

Li tiris la revolveron el la zono kaj pesis ĝin en mano. Ie aliloke la ludantoj suprensaltus por deteni *don* Leonardon de hasta suicido. Sed kvankam ĉiu el la sinjoroj vidis la movon, neniuj ekminis, kvazaŭ li tuj kaptus brakon de sinjoro Leonardo.

Ĉiu estis sufiĉe filozofiema por diri al si: 'Se li volas mortpafi sin, tiuokaze estas lia afero, tio tute ne koncernas nin. Ni zorgos pri lia deca enterigo, ĉar tio estas nia devo kiel *caballeros* kaj amikoj.'

Sed la sinjoroj estis tro bonaj meksikanoj por ne scii, ke neniuj tiel rapide pafmortigas sin. Se li ankoraŭ ne forludis sian ranĉon, sian domon kaj la domon de sia bopatro kaj krome eĉ sian plej bonan ĉevalon, ne ekzistas danĝero de suicido. Meksiko estas tro bela por io tia, kaj ĉu oni havas en dua vivo la bonŝancon denove surteriĝi en Meksiko, neniukaze estas certa. Tial estas pli bone, se oni konservas tion, kion oni havas, krome oni ne tentu la diojn.

Don Leonardo karesis sian revolveron, kaj poste li metis lin antaŭ *don Laŭreanon*.

Don Laŭreano interrompis la miksadon de la kartoj, demetis ilin kaj rigardis la revolveron, tiel, kiel oni rigardas artverkon. Li pesis ĝin, svingadis ĝin, rigardis en la tubon, kontrolis la mekanismon kaj diris: „Kalibro 38. *Bueno, muy bueno. All right*, kvindek pesojn.“

Unu el la kunludantoj vokis: „Mi donas sesdekon por ĝi.“

„Tion ankaŭ mi donas“, *don Leonardo* diris senemocie. „Ĉu iu proponas pli?“ li demandis ĉirkaurigardante.

Neniu proponis pli.

„En ordo, sesdek pesojn“, *don Laŭreano* kapjesis al *don Leonardo*.

„*Aceptado*“, respondis *don Leonardo*.

„Ĉu vi riskas la sesdek pesojn, ĉu vi malpliigas la sumon, *don Leonardo*?“ demandis *don Laŭreano*.

„Mi volas vidi mian unuan karton, poste mi decidus.“

„*Bueno*, laŭ via plaĉo, *amigo*.“

Don Leonardo levis la karton donitan al li. Estis sepo. Li diris: „Mi ludos pri la sesdek pesoj.“

„En ordo“, respondis *don Laŭreano*. „*Otra*, ĉu plian karton aŭ sufiĉas al vi?“

Don Leonardo dum momento pripensis la aferon. La sepo estis tiel favora, ke estus sen senco postuli plian karton. Se li malgajnus la revolveron, restus al li nur la selo, kaj poste nur la ĉevalo. Tiukaze li devus retrorajdi sur prunteprenita ĉevalo, kaj tio estas por *caballero* preskaŭ tiel hontiga kiel devi migri eĉ surpiede, kvazaŭ indiĝeno. Meksika *caballero* iras surpiede nur tiukaze, se lia ĉevalo renversiĝis sub li. Perpiede iri tie, kie eblas rajdi, eĉ se tio estus tre klopoda kaj daŭre danĝera por la besto kaj la rajdanto, tion faras nur usonaj esplorvojaĝantoj. Kaj tial ili ne estas tre estimataj de meksikaj sinjoroj, ankaŭ se tiuj esplorvojaĝantoj konatigis sian nomon per siaj libroj en la tuta civilizita mondo.

Don Leonardo meditis ankoraŭ momenton, dum li rigardis tiel trafenetre kaj intense la karton detiritan jam je duono de la kartostako de *don* Laŭreano, kvazaŭ li esperus vidi ĝian valoron sur la kovroflanko.

Li decidis diri: 'Sufiĉe, *gracias*.' Sed tute kontraŭvole, li elpuŝis la vorton: „*Otra*, unu plian.“

Oni donis la karton al li. Li tenis ĝin dum momento tiel, kiel li ricevis ĝin, kun la bildo sur la malantaŭa flanko, kvazaŭ li timus vidi la karton. Ĉiuj ludantoj rigardis lin, por tute povi ĝui lian streĉitecon. Ludoj estas ja nur pro tio tiel interesaj, ĉar oni ĉiam travivas du streĉiĝojn, la propran kaj tiun de la kunludantoj.

Don Leonardo memgarde turnis la karton. Ĉiuj kunludantoj ja nun jam sciis, ke lia unua karto devas esti seso aŭ sepo. Se li havis malpli, li ne hezitus postuli novan karton.

Li vidis, ke li ricevis reĝon.

Malkovrante li metis ambaŭ kartojn sur la tablon kaj diris laŭte elspire: „*Siete y Medio, caballeros*, sep kaj duonon, sinjoroj.“ Trankvile, kvazaŭ alia ludofino tute ne eblus, li prenis sian revolveron kaj remetis ĝin en sian pistolozonon. Li kunrastis kelkajn centojn de pesoĵ, kaj krome li gajnis la bankon. Kiu tenas la bankon, tiu ricevas la avantaĝon pri duono de ludpunkto, kiun li havas pli ol la aliaj kunludantoj.

3/4

La ludado estis daŭrigata.

La sekvan tagon posttagmeze je la kvina la sinjoroj deklaris, ke nun la tri lastaj ludoj estas disdonotaj, kaj ke poste neniu plu rajtos postuli aŭ akcepti revanĉon. Pri tio la sinjoroj interkonsentiĝis, ĉar ili nun ĉiuj estis tiom lacaj, ke ili apenaŭ kapablis plu teni la kartojn kaj komencis jam nombri malĝuste.

Don Leonardo regajnis la tutan monon kaj ĉirkaŭ dumil pesoĵn kaj kelkajn centojn aldone.

Ĉe proksimuma interkalkulado de la gajnitaj kaj malgajnitaj sumoj evidentiĝis, ke neniu el la sinjoroj suferis tro grandajn perdojn. El la du aŭ tri mil pesoĵ, kiujn tiu aŭ tiu malgajnis, oni ne faris tragedion. La sinjoroj, kiuj malgajnis, jam en duondormo kalkulis, kiom ili devus pliigi la prezojn de la vendendaj varoj por ekvilibrigi la ludoperdon. Se oni faras la finkalkulon, kutime montriĝas, ke estas malofte la ludantoj, kiuj pagas la perdon. Iu, kiu tute ne partoprenis la ludadon, pagas per sia sango.

3/5

La viroj ŝanceliĝante ekstaris kaj paŝis en la portikon. La servo-knaboj, kiuj ĉi tie senokupe sidadis kaj atendis sian mastron, al-saltis kaj elportis la ĉambroseĝojn de tie, kie la sinjoroj ludis, ek-steren en la halon. La viroj sinkis lacaj sur la seĝojn. Kelkaj iom dormis, aliaj interparolis pri endormigaj banalaĵoj, unuavice por resti maldormaj, ne por interparoli serioze. Tridek minutojn post tio la dommastro alvokis la virojn, ke ili bonvolu veni al la *comedor*, en la manĝoĉambron.

Post la vespermanĝo la viroj ekstaris, etendiĝis kaj ekpaŝis sur la stratojn por vidi, kio okazis intertempe en la mondo: ĉu la negoc-oj estas pli proksimaj al kontrakto, kaj kiun oni povus renkonti por interparolado.

Don Laŭreano foriris kun *don* Leonardo. Ambaŭ loĝis en la sama *fonda*, do gastejo.

Kiam ili eliris tra pordego, staris tie Andreo, kiu apogis sin al an-gulfoŝto, interbabilante kun alia servoknabo, kiu same atendis sian sinjoron.

Don Laŭreano tuŝetis ŝultron de Andreo kaj diris: „Kiel vi nom-iĝas, *hijito*, filĉjo mia?“

„Andreo Ugalde, *su servidor*, je via servo, *señor*“, respondis la knabo.

„Do, Andreo“, diris *don* Laŭreano. „Ĉu vi jam iam laboris kun bovoj?“

„No, *señor*“, rediris la knabo.

„Tio ne estas tre malfacila“, daŭrigis *don* Laŭreano. „Tion vi lernos baldaŭ. Vi estas forta junulo kaj havas tre prudentan vizaĝon. Mi pensas, ke vi sukcesos ĉe mi. Tion ni baldaŭ vidos. Vi scias kompreneble, ke vi nun estas mia *muchacho*, ĉu?“

Andreo rigardis *don* Leonardon kaj diris: „Kun via tre afabla permeso, patrono, sed mi apartenas al *don* Leonardo.“

Don Laŭreano turnis la kapon, rigardis al *don* Leonardo kaj diris: „*Don* Leonardo, ĉu vi ne diris al li, ke li nun estas ĉe mi?“

Pro tiu demando *don* Leonardo memoris kiel en sonĝo, ke li vetis la knabon kaj malgajnis lin. Kiam li riskis la revolveron kaj poste regajnis ĝin, li tre rapide reprenis la revolveron kaj ŝovis ĝin en la pistolan zonon. Tion li faris pli rapide ol la kunrastadon de la mono gajnita en la sama ludo. En tiu ludo li gajnis ankaŭ la bankon, kiel li nun eĉ pli bone memoris. Kaj de tiam li pensis ĉiam nur pri la mono, kiun li malgajnis kaj intencis regajni. Sed, ke li perdis la knabon, tion li tute forgesis. Alie li estus postulinta de *don* Laŭreano, kiam tiu ĉirkaŭ tagmezo, preskaŭ sen centavo en la poŝo, jam komencis ludi anstataŭ per mono per personaj kunportitaj aĵoj, ke tiu unue vetu kun li pri la knabo, por tiel regajni lin.

Sed la ludado nun estis farita. *Don* Laŭreano ne devus redoni la knabon, ankaŭ ne post repago de la dudek kvin pesoĵ, vetitaj por li.

En Meksiko ne ekzistas komerco pri homoj; neniu homo aĉetebblas, neniu homo vendeblas. La konstitucio malpermesas tion, la konstitucio solene deklaras ĉiun enloĝanton de la respubliko kiel liberan, sendependan, netuŝeblan homon, je kiu nur la propra patro, la polico, la prokuroro kaj la ŝtato sub certaj kondiĉoj havas korpajn rajtojn. Tial *don* Leonardo post la preterlaso povis

ŝanĝi tion neniel. Li ne povis oferti al *don* Laŭreano dudek kvin aŭ eĉ kvindek pesojn. Tio estus aĉeto de homo. Kaj lin kaj *don* Laŭreanon, ambaŭ, oni povus kondamni je severaj prizonoj punoj. Krome ili ambaŭ estis bonaj kaj ortodoksaj katolikoj, por kiuj estus peko vendi kristanon, eĉ, se estas nur indiĝeno. Ambaŭ, ankaŭ kiel *caballeros* kaj meksikanoj, hontus oferti aŭ eĉ akcepti monon por kunloĝanto de la respubliko kaj tiel trakti la proprajn samlandanojn kiel varon. En ĉiu kazo estus rompo de la bona moro kaj kontraŭ la kutimo.

Sed la moralo estas tiel komplika, kaj ne nur en Meksiko, ke oni konsideras tion ne maldeca, ne malpermesita aŭ fia, se sinjoroj ĉe ludo riskas la propraĵon de siaj edzinoj, infanoj aŭ gepatroj, kaj ke oni akceptas, ke sinjoroj vetas kun iu pri la korpa honoro de sia edzino aŭ de la filino aŭ de la amatino, kiam mankas eĉ centavo kiel havaĵo por povi ludi plu.

Tamen, en tiu okazo la moralo estis tre senemocia. Andreo estis peono, kiu apartenas al la bieno kiel movebla havaĵo. Kvankam li ne vendeblis pro la konstitucio, li tamen laŭrajte estis interŝanĝebla inter la mastroj. La peonon oni pro tio ne demandis, ĉu li deziras havi la novan mastron, ĉu ne. Li estis tiel bonege edukita de la eklezio kaj de la bienegaj posedantoj, ke li eĉ ne konsiderus per penso diri eĉ riproĉan vorton kontraŭ la interŝanĝo. Tio estus malobeo. Kaj neniuj peono havas la rajton esti malobeema.

Al la peonoj la bienulo estis malpli fidela ol al siaj preferataj ĉevaloj. Kaj al Andreo *don* Leonardo estis malpli fidela ol al du realoj. Alveninte hejmen, li tuj havigos al si alian knabon de la bopatra bieno.

Li diris dormeme: „Jes, tio pravas, Andreo . Vi estas nun la *muchacho* de *don* Laŭreano.

Per tio la afero estis finita por li. Li daŭrigis la interparoladon, tie, kie ĝi estis interrompita. Pri ludoperdoj oni ne funebras kaj oni ne priploras ilin. Avara oni ne estu. *Caballero* estas ĉiam grand-anima.

3/6

Semajnon poste *don* Leonardo revenis hejmen al Tenejapa. Lia akompananto estis ekde *La Concordia* servoknabo, kiun li luprenis por la vojaĝo. Li pagis salajron al li kaj resendis lin.

Doña Emilia ne tuj demandis pro *Andreo*. Ŝi supozis, ke *Andreo* havas iun komision kaj venos pli malfrue. Se edzo kaj edzino post tri aŭ kvar semajnoj revidas unu la alian, kaj ili ankoraŭ ne tro enuas en la edzeco, ili kutime interparolas pri aliaj aferoj, kiuj ŝajnas al ili pli gravaj kaj pli agrablaj ol la aktuala restada loko de indiĝena *muchacho*.

Sed post kiam du tagoj pasis kaj *Andreo* ankoraŭ ne revenis, demandis *doña* Emilia la edzon: „Cetere, kie estas *Andreo*? Mi tute ne vidis lin ĝis nun.“

En tiu momento *don* Leonardo intencis diri: 'La knabo havis akcidenton survoje. Piedbatis lin mulo, kaj ni devis enterigi lin.'

Jen tio, kion *don* Leonardo elpensis survoje. Sed ekdironte tion, li trovis tion tro stulta. Tial li rimarkis indiferente: „La knabo? Do tiu, ĉu? Li perdis tri mulojn survoje, kostis tagojn kaj monon al ni kapti la mulojn. Ili estis tute elĉerpitaj. Mi ne scias, kiu diablo lin subite rajdis. Li ne plu uzeblas. Eĉ ribelema kaj impertinenta li fariĝis. En *La Concordia* li forkuris. Al kelkaj aliaj servoknaboj li diris, ke li iros al Tapachula, kie li povus perlabori multe da mono. Mi ne postkuris lin. Se li emas foriri, li ja tamen forkuros.

Tio estas la danko, ke mi ne ŝparis penojn je li. Ni skribu al via patro, ke li sendu alian taŭgan knabon de la bieno.“

Ĉar la edzino ĝuste en tiu momento trovis la ĉirkaŭbrakojn de sia edzo precipe dolĉaj, kiel ofte okazas kiel sekvo de pli longa interrompa disiĝo de agrablaj kutimoj, ŝi ne emis kvereli. Tio nur ĝenas dolĉajn revidajn solenaĵojn. Tial ŝi ne plu diris ion pri tio. Oni forgesis la knabon Andreo. La nova knabo, sendita de *don* Arnulfo, bone al kutimiĝis. Ĉar li, ĵus veninta de la bieno, tre obeis kaj tre humilis, kaj ĉiumatene humile kisis la manojn de sia mastro kaj de sia mastrino, kiel li kutimiĝis en la bieno, *doña* Emilia kaj *don* Leonardo interkonsentiĝis, ke la nova knabo estas pli bona, pli laborema, pli komplezema, pli obeema, pli fidela, pli honesta kaj pli fidinda ol Andreo.

Ĉapitro 4

4/1

Don Laŭreano Figueroa estis *komisionero*, io tia, kiel komerca agento. Li loĝis en Chiapa de Corso. Li estis la reprezentanto de ducent aŭ eĉ tricent komercaj entreprenoj en Meksiko, Puebla, Monterrey, Usono, Hispanio, Francio kaj en kelkaj aldonaj landoj, pri kiuj li sciis nenion krom la nomon. En sia distrikto li estis la ĝenerala agento por kudromaŝinoj, por sengrajnigiloj de maizo, por porcelanovaroj, por gudritaj kartontegmentoj, por ondolado, petrolo, skribmaŝinoj, hispanaj pulvopafiloj ŝarĝendaj tra la tubobuŝo, florsemoj, dornodrato, gazetoj, ĵurnaloj, botelbieroj, vinoj kaj cigaredoj. Li transprenis fraĵtojn kaj ekspedojn al ĉiuj punktoj de la terglobo, kiel legeblis sur la kapo de liaj letterfolioj. Li aĉetis kaj vendis terposedaĵojn, domojn kaj hipotekojn. Li estis pli bone konata en ĉiu urbeto de la federacia ŝtato

ol la gubernia estro aŭ la politikaj ĉefoj. Ekzistis en la ŝtato neniu loko kun meksikaj enloĝantoj, kie ne estis videbla en ĉiuj vendejoj, en ĉiuj *fondas*, en ĉiuj hoteloj kaj en ĉiuj oficejoj surmura kalendaro kun bildo de multkolora kaj mirinde bela pejzaĝo de speco tia, kian oni trovas en Meksiko nenie. Super tiu bela pejzaĝo, graslitere presita, troviĝis lia nomo, kaj la pejzaĝo havis kadron el la presitaj nomoj de ĉiuj ĉi aĝoj, kiujn li reprezentis kiel ĝenerala agento.

Ke *don* Laŭreano kiel ĝenerala agento reprezentis tiom da firmaoj, oni ne rigardu kiel ridindan aferon. Se li reprezentus kiel agento nur unu grandan firmaon, li mortus pro malsato. Li estis la ĝenerala agento de monde fama pianofabrika en Nov-Jorko. En tri jaroj li sukcesis vendi ununuran pianon. Sed li havis, kiel li skribis al la firmao, la motivitan esperon vendi plian pianon ene de du jaroj, ĉar novbakita geedza paro jam de monatoj intencas aĉeti pianon. Kudromaŝinoj vendiĝis iom pli rapide; sed ankaŭ tiu komerco estis trista afero. Li havis grandan fidon pri bonaj negocoj kun skribmaŝinoj. Skribmaŝinoj ĝuste komencis konatiĝi ĉe la negocistoj de la federacia ŝtato, kiuj ekuzis ilin. Li amike rilatis kun la politikaj ĉefoj, kaj li esperis provizi ĉiujn oficejojn de la ŝtato per skribmaŝinoj.

Lia plej grava negoco estis kompreneble la ekspedado, la transporta entrepreno estis kvazaŭ la sekurigita ĉiutaga pano por li, la bazo de lia tuta ekonomia ekzisto. Li havis kvardek ĉarojn, kiuj moviĝadis inter Arriaga kaj *Balún-Canán*. Ĉar li kaj la familio, al kiu li apartenis, estis bone konataj en la ŝtato, kaj ĉar li mem havis la reputacion esti nepre fidinda kaj honora, neniam mankis al li frajtaj komisioj. Al liaj karavanoj oni konfidis ne nur multvalorajn frajtojn kaj transportojn de mono, sed ankaŭ solece veturantajn damojn kaj infanojn sen akompano, senditajn al iuj parencoj aŭ en lernejon. Ĉie oni sciis, ke liaj ĉaristoj, kiam ili devas

defendi la konfidentajn frajtajn aĵojn, riskas la propran vivon kontraŭ banditoj aŭ kontraŭ katastrofoj de la naturo.

4/2

Andreo ne rompis la kapon pri tio, kial oni transigis lin tiel sence-remonie kaj sen demando pri lia opinio de unu mastro al alia. Tio estus sen utilo kaj ne ŝanĝus ion je la faktoj. La mastroj inter si vendis kaj interŝanĝis ja ankaŭ azenojn, ĉevalojn kaj mulojn. Demandis neniun, ĉu ĉevalo volas iri al la nova mastro ĉu ne, kaj neniun deziras scii, kiel tio plaĉas al ĝi. Andreo eĉ ne ekpensis diri ion pri tio. Ankoraŭ multe malpli venis en lian kapon, ke li eble povus havi eĉ la rajton diri jes aŭ ne pri afero, pri kiu interkonsentiĝis jam la mastroj. Ke ekzistas homaj rajtoj aŭ io tia, li ne sciis. Li sciis nur tion, kaj tion li sciis ekde la infaneco: peono devas obei. Kie en la tuta mondo oni permesas al soldato diri ion kontraŭ tio, se la superulo sendas lin en militaj aŭ pacaj tempoj en marĉon, kie povos okazi, ke li sinkos kaj mortaĉos? Obeo estas la unua devo de soldato; kaj des pli obeo estas la unua kaj plej grava devo de peono. La soldaton oni sendas al Flandrio ĉu plaĉas al li ĉu ne; kaj liaj mastroj lin interŝanĝas. Hodiaŭ li batalas kaj sangas por la bonfarto de la angloj, morgaŭ por la rajto de la francoj provizi la mondon per komplezemaj inoj, kaj postmorgaŭ li batalas por la demokratio de ĉiuj landoj kaj por la rajto pri memdecido de la malgrandaj nacioj, kiuj havas koruptitan propran lingvon kaj koruptitan ambicion fare de siaj profitavidaj kapitalistoj. Se la obeo de la proletoj ekŝanceliĝas, ekstremas la fundamentoj de la ŝtato kaj la ribelo kaŭriĝas por eksalto. Ĉiuj leĝoj de la naturo ekribelus kaj konfuziĝas, se bienulo, iam ajn, subite havus la ideon demandi peonon: '*Hijito mío, cómo te gusta*, kiel tio plaĉas al vi, filĉjo mia?'

Andreo ankaŭ neniam atendis de sia patrono, ke tiu demandos lian opinion. Li faris tion, kion oni ordonis al li. Ne pli kaj ne

malpli. Li povus rifuzi, se lia mastro ordonus al li pendumi sin je la plej proksima arbo; ĉar tio estus kontraŭ la leĝoj de la eklezio. Male al tio ne estis kontraŭ la leĝoj de eklezio, se oni ordonis al li, ke li toleru sian skurĝadon aŭ lasu enfermi siajn manojn kaj piedojn kurbigite en la aperturoj de forta duparta tabulo, el kiu li ne povas liberigi sin plu. La eklezio instruis lin, ke tie, kie ne estas oboe al mastro, de Dio destinita al li, ankaŭ ne atendeblas oboe al Dio kaj al Sankta Patro. Nur se oboe sur ĉiuj vojoj estas sekurigita kaj tre bone sekurigita, estas sekurigita ankaŭ la oboe al Dio kaj al la eklezio. Tion oni tuj de la komenco devas meti en la sangon.

Kio eble vere tuŝis la knabon Andreo ĉe la tuta komerco, estis nur tio, ke oni transigis lin el vivo, al kiu li kutimiĝis, en vivon novan. Se oni ĵetas iun kontraŭ ties volo el malnova kutimo en novan, tio estas plej ofte doloriga.

4/3

Jam dum la vojaĝo al la loĝejo de *don* Leonardo Andreo rimarkis, ke estas multe pli agrable servi por la nova mastro ol por la eksa.

Don Laŭreano sciis nenion pri la intima vivo de bieno. Li sciis, ke bieno havas peonojn; sed li ne sciis, kia severa disciplino, ja tiraneco, regas en bienoj. Kiam li foje pro negocoj estis gasto sur bieno, li ne ricevis la okazon ĵeti pli detalan rigardon al la efektivaj rilatoj de la proletaro en la bieno. Li ankaŭ ne interesiĝis pri tio. Ne estis lia afero tie fari studojn. Li volis fari negocojn kaj volis havi la bienulon kiel daŭran amikon. *Don* Laŭreano estis negocisto. Kaj li traktis ĉiujn siajn ĉaristojn kaj *muchachos* laŭ la ora principo de ĉiuj bonaj negocistoj: Se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu! Pro riĉaj spertoj li sciis, ke tia principo, se ĉiuj negocistoj konsideras ĝin, estas tre favora al ĉiu negoco, komerco

kaj trafiko. Estas vere, ke ĉiuj liaj laboristoj vivis simplan kaj severan vivon. Sed, se ili komparis sian vivon kun tiu de la peonoj kaj kun tiu de multaj aliaj proletoj, ĝi ŝajnis al ili eltenebla. Laborilforĝisto en fabriko en Dayton, kiu perlaboras tridek dolarojn ĉiumonate, kaj ĉeokaze aŭdas ion pri laboristo de tekstilvara fabriko en Gastono, ekzemple, ke tiu perlaboras nur dek unu dolarojn ĉiumonate, koncedas: „Damne, mi ja ankoraŭ iel sukcese baraktas min tra la vivo, sufiĉe aĉe traktate kaj ĉasate, kun miaj kvar infanoj; sed rigardu tiun bedaŭrindan *son of a gun* en Gaston kun siaj dek unu arĝentotaleroj dum ĉiu monato kaj kun ok infanoj sur la nuko. Ĉe la ĉielaj trombonistoj, mi tamen ne volus esti en lia felo, kiom mi kontentas, ke mi havas tridek pesojn en ĉiu monato. Ĝi ne sufiĉas kaj por vivi kaj ne por morti, tio estas ĝusta, sed kiel la povra hundeto en Gaston kun la nuraj dek unu arĝenteroj dum monato tion eltenas, tio estas por mi la plej granda mondomiraklo sur la tuta terglobo.“

La homoj, kiuj laboris ĉe sinjoro Laŭreano, estis liberaj viroj. Kiam ili kun la ĉaro alvenis en la korto de sia mastro, ili povis diri: „Aŭskultu, patrono, mi volas foriri, mi volas serĉi ion alian.“ Tiukaze, se li estas bona kaj fidinda ĉaristo, *don* Laŭreano diris: „Kial vi volas foriri, Juliano? Vi estas nun jam kvar jarojn ĉe mi. Ni ĉiam bone akordiĝis. *Bueno*, mi donas al vi duonon de realo pli ĉiutage.“

La ĉaristo eble restis kaj ricevis duonon de realo pli ĉiutage kaj estis kontenta. Aŭ li ne restis kaj iris sian vojon. *Don* Laŭreano ne devigis lin resti, kiam li nepre volis foriri. La viro estis libera. Kompreneble li tre rapide lernis, multe pli rapide ol li antaŭe supozis, ke la libero, rigardata pli severe kaj ĉe taglumo, havas tre malmulte da libero je si, ĉar li trovis alian entrepreniston, kiu malpli pagis al li, kiu pli rigore laborigis lin, kaj kiu lin traktis hontinde. Sed ĉar ne satigus lin la plenigo de la stomako per pluv-eroj gutantaj al li en la vaste malfermitan buŝon, li devis servi al

la mastro, kiu promesis monon al li por lia laboro, por ke li povu aĉeti tortiljojn kaj fazeolojn. Per tiu ĉirkaŭvojo la libera ĉaristo lernis la saĝon, ke libero kaj la libera elekto de la loĝloko estas belaj vortoj, kreitaj por agrable vuali la nudan fasadon de krudaj ekonomiaj faktoj.

Tiel montriĝis, ke tiukaze, se oni sekvis la aferojn kaj rilatojn ĝis la sobra finrezulto, la liberaj ĉaristoj ĉe sia mastro same tiel fidele kaj fidinde eltenis, kiel devis fari tion la peonoj ĉe sia bienulo. La ĉaristoj sciis, ke ili estas liberaj viroj, kiuj povas foriri kiam kaj kien ili volas. La peonoj sciis, ke ili ne estas liberaj viroj kaj ne havas la rajton foriri, kiam kaj kien ili volas. Sed, se oni metis la finpunkton al la konstato pri iliaj ekonomiaj kondiĉoj, sub kiuj ili devas vivi, montriĝis, ke ambaŭ kaptiĝis en la sama marĉo. Nur, ke la marĉo de unu el ambaŭ grupoj ne havas la nomon de la marĉo de la alia grupo.

La bienposedantoj faris pli grandan profiton, se ili daŭrigis la peonan sistemon, kaj la ceteraj mastroj faris pli da mono, se ili laborigis liberajn virojn por si.

La mallibera peono faris nur tion, kion oni ordonis al li. Li transcedis la pensadon al sia patrono, kaj per tio li transigis al sia patrono ĉian respondecon por la rezulto de la ordonoj.

La libera ĉaristo devis mem pensi kaj devis mem transpreni la respondecon por tio, kion li faras. Se li farus strikte nur tion, kion oni ordonis al li, se li ne pripensus mem de unu kilometro de la vojo ĝis la alia, kiel li plej bone kaj plej sekure veturu per sia ĉaro, atingus ĉaro kun frajtaĵoj la cellokon neniam.

Bieno en la stato, en kiu ĝi troviĝas jam dum kvarcent jaroj, povas ekzisti nur helpe de la peonoj. Ekspedada entrepreno povas prosperi nur per laboristoj, kiujn oni persvadas, ke ili estas liberaj.

Sistemo kun liberaj laboristoj, kie oni povas ŝarĝi la liberajn laboristojn per respondeco, kaj kie la mastro prenas al si la rajton respondeci la laboriston je la salajro per dekalkuloj kaj punoj, se la laboristo eraras kiel respondeculo, estas pli favora por la profito ol la peona sistemo. Jen la sola kaŭzo, kial oni forigis la sklavecon surtere. Reformuloj kaj filantropoj ĉiam malfruas jarcenton. Ili atingas ĉiam nur tion, kio estas favora al progresinta kapitalisma ekonomio. Ne pli. Tiel, kiel respublika regadosistemo sekuras kontraŭ la atakoj de la monarkistoj nur tiukaze, se ĝi ebligas atingi ankoraŭ pliajn celojn en la ĝenerala ekonomia vivo kaj se ĝi promesas pli grandajn profitojn ol la monarkia sistemo. Teorioj kaj idealoj, kiuj celas la socian vivon de la homoj, havas la eblecon de realiĝo nur en tiu kazo, se ili garantias pli grandan sekurecon por la ĉiutaga pano. Ĉiuj ceteraj ideoj, eĉ se ili aspektas kiom ajn belaj, devas resti en libroj, broŝuroj kaj flugfolioj. En kunvenoj ili kapablas veki flamigantan entuziasmon, sed la sobra grizo de la sekva mateno sufokas eĉ la plej grandan entuziasmon de tiuj, kiuj volas satmanĝi kaj kiuj devas satmanĝi, por ke ili plu povas vivi.

4/4

Andreo rajdis apud *don* Laŭreano sur la vojo. *La Providencia*, kie ili tranoktis, troviĝis jam malantaŭ ili. „Do, ĉu vi ankoraŭ ne laboris kun bovoj, Andreo?“ demandis *don* Laŭreano, ekbruligante cigaredon kaj prezentante al la knabo la cigaredopaketon, por ke li eltiru unu el la cigaredoj.

„Ne, patrono. *Don* Leonardo ne havas bovojn kaj ankaŭ ne ĉarojn. Ĉaroj ne povas veturi sur la vojoj de Tenejapa ĝis Jovel kaj sur la vojoj ĝis Simojovel kaj supren ĝis Bilja la vojoj estas tro malvastaj, tro ŝlimaj, tro montecaj kaj ofte tro plenaj de ŝtonoj. Tie ni uzis nur transportmulojn, kaj eĉ muloj ne uzeblis sur mult-

aj vojoj, ĉar ili forrompiĝas kaj glitas en abismojn. Tie ni nur port-
istojn uzis sukcese.“

„Mi konas kelkajn vojojn tie supre“, diris *don* Laŭreano, „ofte mi
estis tie pro negocoj. Tutajn mejlojn oni devas gvidi surpiede la
ĉevalon, se oni ne volas perdi ĝin kaj rompi la nukon al si. Ĉu an-
kaŭ sur la bieno ne estis bovoj?“

„Nur en gregoj, sinjoro, por vendo. Kaj oni pelis ilin kiel liberajn
gregojn supren al Juan Bautista kaj Frontera, kiam la patrono
sendis ilin sur la foirojn en Tabasko.“

„Nu, ne gravas, *muchacho*“, diris *don* Laŭreano. „Tion vi baldaŭ
lernos. Tio ne estas komplika. Ŝajnas al mi, ke vi estas prudenta
kaj lernema. Vi baldaŭ lernos, kiel oni aljugas kaj jungas la
bovojn. Kaj se vi veturos dum certa tempo en la ĉarokaravano
kun miaj spertaj ĉaristoj, vi baldaŭ lernos scii la vojon kaj ĉiujn
artifikojn.“

„Certe, patrono.“

„La laboro ne estas tiom fortostreĉiga, kiel ŝajnas, knabo“, instru-
is lin la mastro. „Se la frajto estas ŝargita, vi preskaŭ ne havas
laboron. La bestoj konas la vojon pli bone ol la *muchachos*. Ili
iras eĉ en la plej nigra nokto sen gvidado. Kompreneble, tie, kie
la vojoj estas aĉaj, iam kaj tiam estas multe da laboro. Jen via in-
terveno necesas. Jen vi devas ĵeti vian korpan pezon sur la spo-
kojn de la ĉarradoj. Kaj kelkfoje oni devas levi ĉaron el truo,
ŝtonojn kaj palisojn oni devas ŝtopi en la kavojn por ebenigi la
vojon. Se vi bone atentis, kaj ne dormas sidante, vi nur tre
malofte havos rompitan radakson. Ankaŭ tio rezultigus laboron.
Sed tio tiam estus via propra kulpo. Estus puno por vi, ĉar vi dor-
mis kaj ne atentis.“

„Mi certe bone atentus.“ „Mi estas certa, ke la laboro tre plaĉos al vi. Vi konatiĝos kun multaj vojoj, vidos multajn lokojn kaj urbojn. Vi ofte malsupreniros ĝis la fervojo kaj ĉiam havos *compañeros*, kamaradojn kaj akompanantojn. De tempo al tempo vi havos familiojn en la ĉaro. Tiam vi eĉ foje rikoltos duonon de peso kiel trinkmonon, se vi estos afabla al la homoj kaj montriĝos servema. Mi havas nenion kontraŭ tio, se miaj *muchachos* ĉeokaze kunprenas kroman frajtpaketon de unu loko al alia aŭ permesas al vojaĝanto sursidi dum vojtago. La dudek aŭ tridek centavoj, pagataj por tio, estas por vi. Tion mi ne kalkulas tiom severe.“

„*Muchas, gracias, seño*r, mi tre dankas al vi, sinjoro.“

„Jes, sed nun pri la salajro, Andreo . Tion ni prefere tuj klarigu inter ni, por ke ni sciu, kie ni staras. Kiom pagis *don* Leonardo al vi por ĉiu tago?“

„Don Leonardo al mi ne pagis salajron“, diris la knabo laŭvere.

„Tio ne eblas ĉe mi“, klarigis *don* Laŭreano. „Ĉiu, kiu faras sian laboron, valoras sian salajron. Tio estas mia devizo. Por mi neniu laboras senpage. Ĉiun laboron mi pagas. Ĉe mi ne estas peonoj kaj ne sklavoj. Ankaŭ laboristo deziras vivi kaj celas prosperon. Mi havis karavanestron, *encargado*, kiu laboris dek ok jarojn por mi. Nun li havas belan vendejon en Suchiapa. Kaj aliulo, laborinta ĉe mi dek kvin jarojn, posedas nun tre belan *ranchito*-on, ranĉeton en Alcala. Tiuj homoj ne drinkis, bone laboris kaj ĉiam ŝparis sian monon. Mi volas, ke miaj *muchachos* prosperu kaj ne laboru dum la tuta vivo por fremdaj homoj. Anastasio, kiu havas la vendejon en Suchiapa, ricevas la tutan stokon de la varoj, kiujn li vendas en sia vendejo, de mi je kredito. Kaj li pagas ĉiam ĝustatempe. *Muchachos*, laborintaj kaj servintaj honeste kaj fidele al mi, trovas ĉe mi dum sia tuta vivo helpon kaj subtenon. Mi ne forgesas iun el miaj viroj.“

Ĉio ĉi estis tute prava, kion diris *don* Laŭreano. Neniu vorto estis troigita. Kiam la viroj tro maljuniĝis, por esti bonaj ĉaristoj – ĉar la vivo de ĉaristo estas fortoraba, kiel Andreo baldaŭ estos eksci-anta, – *don* Laŭreano helpis al ili fondi iun malgrandan vendejon. Ili tiam estis liaj plej bonaj klientoj kaj servis al li samtempe kiel subagentoj en la distriktoj, kie ili establis sin. Kaj ili bonege servis al li kiel informantoj pri aliaj komercistoj en la proksimo kaj donis bonajn konsilojn pri novaj terposedantoj kaj pri ties bezono je maŝinoj kaj varoj. Li bone sciis, kiel organizi kaj plivastigi siajn negocojn.

„Kiel mi jam diris, por mi neniu senpage devas labori. Mi jam pripensis vian salajron. Mi donas al vi ĉiutage unu realon kaj du realajn trionojn, do dudek centavojn. Tio faras ses pesojn dum monato. Tio estas bona salajro.“

„*Muchas gracias*, patrono.“ Por Andreo la salajro certe estis tre bona; ĉar li ricevis ĝis tiam neniun salajron. Ses pesoj, mezuritaj je liaj bezonoj, estis tre granda sumo. „Kompreneble, ŝuldon vi ja havas, Andreo, tiun vi antaŭe devos partopagi al mi.“ „Kiun ŝuldon, patrono?“ demandis Andreo. „Mi aĉetis nenion.“

„Tio estas prava, *muchacho*, vi aĉetis nenion. Sed mi devas diri al vi, ke *don* Leonardo ĉe la kartoludo malgajnis al mi dudek kvin pesojn. Kaj tiujn dudek kvin pesojn nature vi devos pagi.“

„Jes, sinjoro.“

„Tio faras – atendu momenton.“ *Don* Laŭreano kalkuladis mallaŭte murmurante. „Jes, tio estas dudek centavoj por peso, tio estas kvin... kaj dudek kvin peso... tio estas cent dudek kvin. Tio estas do cent dudek kvin tagoj. Tio estas do cent dudek kvin tagoj, kiujn vi devos labori antaŭ ol mi povos pagi al vi la salajron in *efectivo*, do kontante. Kompreneble, mi ne estas tirano. Se vi

bezonas ion, diru tion al mi, kaj mi donos al vi antaŭpagon, tri aŭ kvin pesojn, kiujn ni poste dekalkulos de via konta bonhavo.“

„Jes, sinjoro.“

„Tion vi ja komprenas, Andreo, ĉu?“

„Jes, sinjoro.“

„Sekve ni interkonsentiĝis?“

„Jes, sinjoro.“

„Kompreneble vi ricevas la manĝon. Vi ĉiuj ricevas por la vojo viajn porciojn el faboj, salo, sukero, kafo, rizo, sekigitaj fiŝoj, sekigita viando, de tempo al tempo krome ladujeton kun sardinoj, kaj vi ricevos la monon por la manĝoj kaj trinkaĵoj, por ke vi povu aĉeti tortiljojn sur la vojo. De miaj ĉaristoj ankoraŭ neniam iu mortis pro malsato. Kaj se ili ne disipis la monon por tekiloj kaj komitekoj, ili ĉiam ŝparis sian monon kaj tiel plibonigis sian staton en la mondo.“

„Jes, sinjoro.“

„Tio estu kompreneble klara al vi, ke vi ne rajtas forkuri ĝis kiam via kulpo da dudek kvin pesoj estos plene pagita, kaj se vi ricevis de mi antaŭpagon, tio kompreneble ankaŭ estas ŝuldo, kiun vi devos repagi, antaŭ ol vi povus pensi pri tio serĉi alian patronon aŭ eĉ forkuri al Gvatemalio. Tie en Gvatemalio la *muchachos* vivas ja multe pli aĉe ol mizere. Ja ne pensu pri tio, se ekzemple vagabondantaj *muchachos* en Arriaga volos rakonti al vi, ke oni multe perlaboras sur la plantejoj en Gvatemalio. Tio estas malicaj mensogoj de la vagabondoj, kiuj ĉirkaŭvagadas en Arriaga, *Tonalá* kaj en Tapachula. Restu en via patrolando, Andreo, servu al via mastro fidele kaj lojale, tiel nenio mankos al vi. *La patria, tu*

pais propio, en la propra lando estas ĉiam plej bona kaj sekura en la vivo, tie vi estas inter viaj homoj kaj neniam mortos pro malsato. Mi estas plene konvinkita, nun rigardante vin, ke vi estos bona kaj fidele ĉaristo.“

„Mi tre klopodos, patrono.“

„Tion mi vere esperas, Andreo. Kiel ĉaristo vi havos tre respondecan laboron. Se eble eĉ okazos, ke varoj el via ĉaro perdiĝos, ke oni ŝtelos ilin de vi, aŭ ke ili forbrulos, aŭ, ke ili falos en abismojn, vi kompreneble devos anstataŭi ĉion tion. Tion mi tiam devus de-kalkuli de via salajro, kaj vi havus ŝuldon ĉe mi. Sed, se vi bone atentis, io tia ne povos okazi.“

„Mi bone atentis, patrono, ke neniuj varoj perdiĝu.“

„Tion mi scias, vi estas fidele knabo, Andreo.“

Ili ankoraŭ dum iom da tempo trotante rajdis. Tiam *don* Laŭreano forĵetis la cigaredostumpon kaj diris: „Nun ni iom galopos, por ke ni avancu.“

Rimarko

La patria, tu pais propio = La patrolando, via propra lando

La Providencia = La Providenco = Saĝa regado de Dio super la aferoj de la mondo kaj de la homoj.

Ĉapitro 5

5/1

Ŝanceliĝante kaj brue tambure la ĉarokaravano sin trenis sur la dek kvin mejlojn longa vojo de *Chiapa de Corso* ĝis supren al la altmontara pasejo *El Calvario*. Tiu pasejo *El Calvario* kondukas transen de la plej alta punkto *Cerro de Chiapa*, kiu estas parto de la kruta rokmontara ĉeno nomata *Sierra*, kiu etendiĝas longe inter *Chiapa de Corso* kaj *Ixtapa* kaj disigas la tropikan malaltan ebenaĵon *Tuxtla Gutierrez* de la frideta alta regiono *La Mesa de Las Casas*.

La altmontara pasejo *El Calvario* havis spite al sia tiel pia kaj tiel katolika nomo diable malbonan reputacion. Ĝi estis vojo plena de suferoj en ĉia ajn pensebla rilato. Vojo de suferoj por vojaĝantoj de ĉiu maniero kaj de ĉiu speco; por vojaĝantoj, kiuj iris piede, rajdis sur ĉevaloj aŭ sur la dorso de muloj. Ne malpli ĝi estis vojo de suferoj por la indiĝenaj portistoj, kiuj devis pene porti pezajn ŝarĝojn kun varoj, aŭ portokorbojn, en kiuj sidis vojaĝantinoj aŭ oldaj ne rajdokapablaj viroj. Korpulentulinoj, sufiĉe ofte portendaj, pezis cent tridek ĝis cent kvindek kilogramojn. Kaj eĉ pli la pasejo estis vojo de suferoj por la gvidantoj de la ĉaroj aŭ por la pelistoj de pakbestaj karavanoj. Forlasinte antaŭ horo la afablan urbeton *Chiapa de Corso* nestigitan en la eterna verdo de palmoj kaj de bananaj arboj, tiuj gvidantoj komencis sakri, ĉar ili ne estis tiel stoikaj kiel la indiĝenaj portistoj, kiuj troitis alten silente kaj persiste per facilaj balanciĝantaj paŝoj. Ju pli kruta kaj komplika iĝis la vojo, ju pli detalaj kaj des pli sovaĝaj fariĝis la sakroj. Tiuj ĉarogvidantoj kaj mulopelistoj forĵuris kaj malbenis sur tiu ĉi vojo la proprajn animojn kaj la animojn de siaj patrinoj, ili malbenis siajn naskigintojn kaj ili malbenis la tagon, kiam oni naskis ilin, kaj des pli ili malbenis la tagon, kiu faris el ili ĉarogvidantojn. Ili malbenis per krientaj voĉoj Dion en la ĉielo

kaj Sanktan Virgulinon, kaj kiel kromdonon ili deziris, ke ĉiuj sanktuloj de la eklezio iru en la inferon. Ĉe ĉiu vojkurbiĝo de la vojo ili promesis sian animon kaj la animon de ĉiu el siaj infanoj al la diablo, se tiu bonŝance pasigos ilin sen rompita rado aŭ rompita akso, sen falo de tirbovoj en la profundajn abismojn, sen malsuprenglitado de pakbestoj de la vojo en la fendoriĉajn ravinojn.

Supre sur la kalvaria monto staris granda ligna kruco, evidente tre traktita de la vetero, ĉe alta ŝtonamaso, sur kiu kuŝis montoj de velkintaj floroj. Kaj, se la ĉaristoj kaj mulpelistoj atingis la krucon, tiam ili ĉiuj demetis siajn grandajn de fulmotondroj distaŭzitajn bastĉapelojn, faris tri genufleksojn kaj sin krucosignis. Per tio ili denove estis akceptitaj en la aron de la kredantoj kaj piuloj, kaj Satano ne plu havis potencon pri ili kaj pri iliaj animoj; ĉar Dio kaj Benata Virgulino grandanime pardonpetas al la pekinto, kiu reiras plena de pento al la laŭdokantoj kaj konsekritaj kandeloj, kaj ĉar Tiu, kiu kreis montojn, ravinojn, riverojn, marĉojn kaj lagojn, transprenis la respondecon por ĉio, kio okazas al tiuj kreitaĵoj kaj kion oni faras pro ili. Suprenveni sur la altmontaran pasejon ili ja nepre devis, kaj ĉu ilin helpas ĉe tio Dio aŭ Sankta Virgulino aŭ Satano, tio estis fakte egala al ili, se ili venos supren kun siaj ĉaroj, siaj bestoj, siaj ŝarĝoj kaj siaj varoj.

Post atingo de la kruco la kalvaria vojo kompreneble ne finiĝis, kiel oni povus supozi, ĉar tie ja staras la kruco, kiu promesas saviĝon al ĉiuj homoj. Tiel facile oni tion ne faras al la homoj surtere, alie ili tro rapide ekdiboĉus kaj malĉastiĝus. Kaj nur signi sin per kruco, tio ne sufiĉas. Tiom malkara la vivo ne estas en la lamentinda surtera mizera mondo.

Por multaj vojaĝantoj, speciale por tiuj sur ĉevaloj, kiuj vojaĝis sole aŭ nur duope kaj akompanate ĝuste nur de unu aŭ de du servoknaboj, komenciĝis nur tiam la aŭtentika kalvaria vojo.

El Calvario havis duoblan signifon. Kiam oni komprenis la unuan el la signifoj, sakrante, ĵurante, ĝemante kaj ŝvitante, oni havis ankoraŭ la solvon de la dua signifo antaŭ si. La solvado de la dua signifo sufiĉe ofte finiĝis per rapida kaj rutina kaj tial senkompata morto de la vojaĝantoj. Pro tio sakris pli ofte survoje, tiuj, kiuj ne estis tiel certaj, ke ili sane kaj sendamaĝite preteriros la krucon, kiel la *carreteros* kaj *arrieros*. Tiuj havis pli fortikan naturon kaj malpli ofte pensis pri la alia mondo, ĉar ili pli devis pensi pri la pli proksima ĉi-tiea mondo. La vojaĝantoj plej ofte mortis tiel subite, ke ne restis eĉ sufiĉe da tempo por krucosigni sin kaj sekurigi al si per tio ankoraŭ ĝustatempe oportunan vivon en la alia mondo.

Rimarkoj

arriero = mulpelisto

carretero = ĉaristo

5/2

La altmontara transpasejo estis fifama kaj timata pro la banditoj embuskantaj tie vojaĝantojn kaj karavanojn. La banditoj estis lertaj kaj prudentaj negocistoj, kiuj regis sian metion kaj faris sian laboron kun memgardemo kaj saĝeco. Tie, kie guberniestroj, generaloj, policaj ĉefoj, deputitoj, urbestroj kaj impostkolektistoj priŝtelas la landon kaj la popolon, kie ajn estas nur okazo, al centoj de neoficistoj ne restas io alia, krom simile priŝteli iun. Se oficisto ŝtelas ion, oni nomas tion korupteco, se neoficista persono ŝtelas ion, estas bandito. Sed nur tie, kie oficistoj ŝteladas, ŝteladas ankaŭ banditoj. Kaj tuj, se oni supre ĉesigas la ŝteladon, la banditoj malsupre ĉiuj formortas dum paso de semajno. La banditoj de la Calvariomonto ne embuskis ĉiutage. Tion iliaj edzinoj tute ne indulgus; ĉar ankaŭ la edzino de sia edzo volas havi ion alian aldone ol nur la ĉiutagan panon kaj ĉeokaze novan robaĉon.

Krome la embuskantoj ne povis vivi nur de la banditaj enspezoj, ili devis konservi sian bonan reputacion. Tial ili ĉiuj havis malgrandan, kelkfoje eĉ grandan farmon. Kaj al tiuj farmoj ili dediĉis la plej grandan parton de sia tempo. Unuavice por resti estimataj civitanoj, duavice por ne vekti nenecesan suspekton kaj triavice por havi sekuran enspezon por la infanoj, por ke tiuj povu plenkreski al honorindaj civitanoj.

Pro ĉiuj ĉi kialoj ili ne ĉasis ĉiutage. Krome tio fortimigus la vojaĝantojn efektive vojaĝi tie, aŭ ili veturus nur en grandaj grupoj, tiel, ke la banditoj ne plu povus fari negocojn. Kaj krome la registaro tie starigus daŭran komandan postenon, kiu estus ĝeno por la banditoj. Tial okazis, ke pasis multaj semajnoj, ja ofte eĉ monatoj sen iu rabatako. Kaj tiam oni subite dum tri tagoj prirabis ĉiujn vojaĝantojn kaj karavanojn, kiuj alvenis sur la vojon. Alitempe eble okazis, ke oni nur al unu aŭ du vojaĝantoj baris la vojon kaj prirabis nur malgrandan mulan karavanon, dum ĉiuj ceteraj, kiuj devis iri en la sama tago aŭ en la sama semajno la vojon, vojaĝis sen molesto.

Ĝuste la necerteco, kiam la banditoj aperos, faris la vojon terura. Neniam iu sciis antaŭe kun certeco, ĉu li traglitos sane kaj ne prirabite, ĉu ne. Neniam iu kun serena certeco povis porti de loko al loko monon bezonatan por aĉetoj aŭ gajnitan el vendoj, aŭ iujn aliajn valoraĵojn. Eĉ, se iu vojaĝante havis nek multan monon nek iujn valoraĵojn ĉe si, ne estis certe, ĉu oni ne senvestigos kaj murdos lin. Nur ĉevalojn kaj mulojn kaj selojn oni ne rabis. Ĉar ĉiuj bestoj havas siajn brulmarkojn, kaj seloj havas tiom da specialaj malgrandaj rekoniloj, ke per ili oni povus trovi la banditojn.

La vojaĝantoj kompreneble povus veturi en grandaj grupoj. Kompreneble ili povus fari tion. Sed oni ne povus aranĝi tion tiel facile kiel ĉe kompanio de soldatoj, al kiuj oni ordonas, ke ili ekmarŝu je certa horo, kaj tiam ili simple ekmarŝas.

Je la tago, kiam ekzemple kvinopo povus ekvojaĝi, la alia kvinopo, intencante vojaĝi kun la unua grupo, ne povas ekveturi, ĉar iu el ili intertempe havas malsanan infanon, la alia naskigontan edzinon, la tria aĉetis domon, kiun li devas inspekti je tiu tago, la kvara tro ŝarĝis sian stomakon, kaj kvina en la nokto eble decidis, ke la vojaĝo tute ne urĝas, kaj ke li ĝin prefere prokrastas. Poste ankaŭ la unua kvinopo ne restas kune. Iun viron oni alvokis ne atendite al tribunalo, al alia en frua mateno forbrulis la domo, kaj tial restas nur tri aŭ eĉ nur du homoj, kiuj nepre devas entrepreni la veturon, ĉar ilia tuta negoco dependas de tio esti je certa tago en *Tuxtla* aŭ en Arriaga. Tiel la restintoj veturas duope, je bonŝanco. Ili ekrajdas kun konsekritaj amuletoj, kun sennombraj krucosignoj de la familianoj kaj kun bonkvalita ĉirkaŭpendigita revolvero. Du tagojn aŭ du semajnojn poste oni trovos ilin mortpafitaj aŭ mortbatitaj en unu el la abismoj. Kelkaj el la banditoj, ne sciante ion, diligentaj kaj sobraj kamparanoj, al kiuj oni ne povus riproĉi iun honordifekton, helpas ĉe la serĉado, ili kulpigas per tondraj vortoj la registaron kaj plendas, ke mankas al la banditoj la eklezia kredo, kaj ke ili estas punoskurĝo por la lando, ĉar mankas al ili ĉiu kredo pri venĝo en la alia mondo.

5/3

Kiu ajn kreis la altmontaran pasejon, ĉu tertremo ĉu la kara Dio en la ĉiela alto aŭ tre lanta ŝanĝiĝo de la terkrusto, ĉiukaze tiu aŭ tio, kio kreis la pasejon, estis donacema. Li aŭ ĝi konstruis miraklon de la naturo.

La vojo kondukas kun pli ol kvindek kurbiĝoj sur la rokmontaran supraĵon. Eble estas eĉ okdek vojkurbiĝoj aŭ cent dudek. Kiu sciu? *Quién sabe!* Neniu kalkulus la kurbiĝojn. Kaj tiu, kiu planis kalkuli ilin, tre baldaŭ forgesas, kiom da ili li jam pasis, ĉar li devas koncentriĝi pri aliaj aferoj, kiuj momente estas pli gravaj ol

geografiaj aŭ topografiaj konstatoj. La suprengrimpado komenciĝas jam antaŭ ol oni forlasos la lokon *Chiapa de Corso*. La lasta preĝejo de la urbo staras jam tiom alte super la urbo, ke piuloj, kiuj rapide senspiriĝas, ne povas viziti ĝin.

En la urbo la stratoj estas bone pavimitaj, kun krudaj rondaj ŝtonoj de tiu speco, kiu estis tre moderna antaŭ kvincent jaroj. Sed tuj, kiam oni forlasas la lastan pavimitan straton, komenciĝas la turmentoj, el kiuj oni liberiĝos nur tiam, kiam oni atingos post preskaŭ cent kilometroj la sekvantan urbon kun pavimitaj stratoj.

Sur la tropika malalta ebenaĵo, kie la stratoj kaj placoj estas limigitaj de altaj palmoj, tie, kie la agroj, ĝardenoj kaj kultivitaj terposedaĵoj estas plenaj de riĉoj el plantoj, floroj, arbustoj kaj arboj de la varmega zono, grimpas la vojo supren sur la fridgetan altaĵon de la *Sierra*, kie staras abioj tiel belaj, fortaj kaj sveltaj kiel norde de Ohio.

Pli kaj pli profundaj fariĝas la krutaj ravinoj kaj abismoj ĉe la maldekstra flanko de la vojo; kaj dekstre staras preskaŭ je la tuta longo de la vojo la alta kruta rokara fronto de la *Sierra*, kiu ŝanĝiĝas nur rilate la karakterizajn trajtojn de la plantoj kaj la dornan vepron, kiuj kreskas tie. Tiam, supre sur la pasejo, oni vidas la tutan tropikan ebenaĵon, kiu sin sternas ĉe la piedoj. Tre malproksime ĉe la horizonto, en verde blua vibrado, leviĝas la longa montoĉeno de alia brako de la *Sierra*, kiu per siaj monto-suproj alte etendiĝas super la nubojn. Kiel arĝenta fadeno, kiu sen formo kaj sen dezajno estas enteksita en gigantan tapiŝon, kuŝas la rivero Grijalva ŝajne senmova kaj ŝajne fremdeca en la briletanta ebenaĵo.

Estas groteska tragiko, ke ĝuste en tiuj lokoj de la vojo, kie oni tute povas forgesi sin mem, dum oni rigardas la eksterordinarajn

donacojn de disipema naturo, plej proksimaj estas la banditoj kun revolveroj, fusiloj kaj tranĉiloj. Ĉar estas ĝuste tiuj lokoj, kie la vojaĝantoj kaj la karavanoj povas nek eviti, nek reiri nek fuĝi. Sur la maldekstra flanko de la vojo, ducent ĝis tricent metrojn profunde troviĝas la kruta roka abismo, kaj sur la dekstra flanko staras dura kaj kvazaŭ kreskinta el la vojo la rokara fronto, tiel kruta, tiel malglata, tiel dense kovrata de dorna vepro kaj fingro-longaj pikiloj de multaj diversaj kreskaĵoj, ke eĉ kaprino perdus ĉian esperon povi fuĝi sur tiu vojo.

Oni povas kompreni, kial multaj vojaĝantoj nomas la pasejon „*Ayúdame Purísima!*“ „Sankta Virgulino, patrino de Dio, helpu min!“ Sed ĉar ankaŭ la banditoj estas bonaj katolikoj, kaj same alvokas Sanktan Virgulinon, ke ŝi havigu grasan predon al ili, la ŝancoj por ambaŭ partoj estas kvindekprocentaj.

5/4

Ĉar la ĉaristoj bone konis la multnombrajn danĝerojn de la vojo, tio instigis ilin atendi en bivako ekstere de la urbo *Chiapa de Corso*, ĝis kiam sufiĉe da ĉaroj estos kune, por ke ili povu formi tre grandan longan karavanon.

Grandan karavanon la banditoj povas reteni certan tempon, sed ili ne povas sukcese ataki kaj prirabi ĝin. Se la rabistoj atakas la unuan ĉaron kaj eĉ knalas nur unu pafo aŭ eksonas nur unu krio de la atakita ĉaristo, haltas tuj la tuta karavano kaj la gvidantoj de la mezaj kaj malantaŭaj ĉaroj, bone ŝirmataj per la ĉaroj, avancas kun siaj pafiloj, maĉetoj, bastonegoj, tranĉiloj, radospokoj, ŝtonoj aŭ kion ajn ili krome havas ĉemane. Kaj tiam la situacio por la banditoj iĝas tikla, se ili ne fuĝas ĝustatempe. Se ili atakas la lastan ĉaron, okazas nur ŝanĝiĝo de la fronto, sed la rezulto estas la sama. Se la banditoj eksciis, ke la ĉaroj ŝargis metalmonon, okazis kelkfoje, ke oni samtempe atakis la unuan kaj la

lastan ĉaron. En la sovaĝa tumulto de la batalo, kiu estis la sekvo, la banditoj, rapide eljunginte per tranĉado la bovojn, sukcesis ĵeti kelkajn ĉarojn en la abismon, kaj ili ankaŭ sukcese elrabis kelkajn pliajn ĉarojn kaj ĵetis la enhavojn en tiujn abismojn, kie staris kelkaj viroj postene por tuj forporti la rabitaĵojn al sekura loko. Sed tiam por la supre batalantaj banditoj estis jam la plej lasta momento por foriĝi kiel eble plej rapide kaj kaŝi sin mem en sekura loko, ĉar jam pli ol duono el ili estis vunditaj kaj kelkaj el ili ne plu estis tute kompletaj rilate siajn korpajn partojn. Ili devis kapitulacii sen gajni aŭ nur vidi la monon transportatan de la ĉaristoj.

Se la ĉaristoj transportis ankaŭ varojn havantajn nur malgrandan komercan valoron, ekzemple salon, kahelojn, librojn, botelojn aŭ fraĵaĵojn ne bone vendeblajn de la banditoj, ekzemple maŝinpartojn, ladoplatojn aŭ ferstangojn, la ĉaristoj tiukaze iris en grupoj kun kvar ĝis ok ĉaroj. La ĉaristoj mem havis nur malmulte da mono ĉe si, ĉiu el ili eble nur sesdek aŭ sepdek centavojn, kaj tiujn malmultajn centavojn ili scipovis tiel bone kaŝi, ke neniu bandito povus trovi ilin.

Se la ĉaroj male al tio transportis valoran fraĵton, kiel ekzemple silkaĵojn, horloĝojn, vestajn ŝtofojn, juvelojn, vinojn, likvorojn, revolverojn, ĉasarmilojn kaj municion, ili iris nur en grandaj karavanoj kun kvardek ĝis sesdek aŭ eĉ pli da ĉaroj.

Sed la grandaj karavanoj, kiel ajn utilaj ili estis kiel protekto kontraŭ banditoj, havis multajn malavantaĝojn. Ili marŝis multe pli lante ol malgrandaj grupoj, kio altigis la fraĵtkostojn, ĉar ĉiu tago kaŭzas kostojn por la nutraĵoj de la bovoj kaj la salajron de la gvidantoj, kaj por la komercisto malfruiĝo je tago povas signifi, ke li ne povos ĝustatempe vendi la fraĵton. Por grandaj karavanoj estis multe pli komplike havigi la necesan bestofuraĝon ol por malgrandaj. En granda karavano la nombro de la aksaj rompoj

estas pli granda ol en malgranda. Kaj se la karavano ne volas disiĝi, la tuta karavano devas halti, ĝis kiam la rompitaĵoj estas riparitaj. Jen la kaŭzo, kial oni nur en tiu kazo iris en grandaj ĉarokaravanoj, se oni bezonis protekton.

5/5

La *carretas* estas plumpaj, peze konstruitaj duradaj ĉaroj. La radoj estas tre altaj, pro la riveroj kaj marĉoj, kiujn oni devas transiri en marŝoj. La ĉaro mem havas mallarĝan konstruon, ĝi estas duoble pli longa ol larĝa. Ĝi havas duonrondan tegmenton, kiu kuŝas sur framo el grandaj ringoj.

En karavano kun dudek ĉaroj estis apenaŭ du ĉaroj kun tegmento de la sama speco. Unu ĉaro havis tegmenton el kruda tolteksaĵo, alia tegmenton el fragmitaj matoj, plua havis kovrilon el interplektitaj palmfolioj, kaj aliajn oni kovris per feloj de cervinoj, antilopoj, pumoj aŭ jaguaroj, alia havis ĉifontegmenton, do kolekton el malnovaj ĉemizoj, kotonpantalonoj kaj disŝiritaj lankovriiloj. Kaj troviĝis eble ankaŭ ĉaro, kiu havis tegmenton el speco de korboplektaĵo, kaj alia havis tegmenton el brunaj, bone tanitaj feloj de bovinoj, kaproj aŭ ŝafoj.

Ĉiun ĉaron tiris bovoparo. La bovoj estis eksterordinare grandaj bestoj kun longaj kornoj. Multaj el ili aspektis tiel pezaj kaj grandegaj, kvazaŭ ili estus ensorĉitaj elefantoj.

La bovoj ne tiris per jugo troviĝanta sur ilia kolo, sed ili tiris per siaj fortikaj fruntoj.

Du bovojn, la tirparon, oni apudstarigis, tiam oni metis super ties kapojn tute proksime al la malantaŭo de la kornoj, pezan tirtrabon. Tiu trabo estas jam per si mem tiom peza, ke forta viro devas klopodi, se li sola surmetas ĝin. Kiam la trabo estas metita sur la deziratan lokon, kaj la bovoj havas la necesan distancon

inter si, oni ligas la trabon per firmaj kaj krude tanitaj ledorimenoj kun la kornoj. De tempo al tempo oni boras truojn en la kornojn, por ke oni povu firmiti pli sekure la rimenojn en ties situo.

Kiam la tirtrabo estas firme ligita per la rimenoj, oni ligas ĝin per aliaj rimenoj al la peza timono de la ĉaro. La timono estas rigide fiksita al ĝi.

La bovoj tiras la ĉaron per klinitaj kapoj. Neniu el ambaŭ bestoj sendepende povas fari movon per la kapo. Ĉiu kapmovado de unu el la bestoj kaŭzas la saman kapmovon de la apudulo. Dum la marŝo ili ne povas defendi siajn antaŭajn korpopartojn kontraŭ la mordoj de grasaj muŝoj kaj aliaj insektoj, kiuj milope ĉirkaŭsvarmas la ĉarojn. Ili sin ne povas leki, ja eĉ ne skui sin. Ili devas elteni, kion Dio, kiu kreis tiujn insektojn, ŝarĝas sur ilin. Tiel okazas, ke en tiuj tagoj, kiam pluvo minacos, aŭ se la insektoj pro aliaj kaŭzoj pli ol kutime malsatas kaj sangavidas, la bovoj de la kapo ĝis la piedoj estas kovritaj per sango, kiu senĉese fluetas en sennombraj mincaj strioj sur iliajn antaŭajn korpopartojn.

Rigide gapante per siaj grandaj kaj vitrecaj okuloj, movante apenaŭ iam okulglobon, la bovoj peze marŝas, tirante la ĉaron post si, paŝon post paŝo antaŭen. La paŝoj estas ekstreme lantaj, sed regulaj, kvazaŭ gvidus ilin maŝino.

La bovojn oni ne pelas per vipo, sed per longaj bastonoj. La bastonoj, eltranĉitaj el dura ligno, estas akre pintigitaj je unu finaĵo. Ĉe kelkaj oni anstataŭis la lignan pinton per najlo. Per tiuj bastonoj la ĉaristo pikas la bovojn en la postaĵojn, se li volas rapidigi ilin. Kion la insektoj ne povas atingi ĉe la malantaŭaj korpopartoj de la bovoj, ĉar tie la bestoj per siaj vosto forpelas la insektojn, tion la ĉaristoj atingas per siaj akre pintaj bastonoj. Se la irado sur la vojo estas eĉ pli malfacila ol kutime kaj la bovoj estas

malsataj kaj lacaj kaj ne tiel rapide avancas kiel la ĉaristoj deziras, la sango baldaŭ komenciĝas flueti en sennombraj strioj ankaŭ el la postaj korpopartoj de la bovoj. Sed la ĉaristojn siavice atakas la labordonantoj, pikas, insultas kaj minacas ilin per elĵeto el la laboro, se ili tro malfruiĝas survoje. Tiel la bovoj havas almenaŭ la kontentiĝon, ke la mondo estas perfekta, kaj ke Dio estas justa kaj venĝas ilin.

En la seka sezono la vojo estas kovrita de polvotavolo, kiu estas dudek ĝis kvindek centimetrojn alta kaj el tre blanka kaj fajna kalkeca substanco, kiu pikas kaj mordas kiel veneno la okulojn, la nazon kaj la buŝon. En la pluva sezono la vojo estas kovrita de tenaca tertavolo, kiu altas duonon de metro kaj firmkroĉiĝas al la ĉarradoj kaj la bovopiedoj kvazaŭ per ŝnuregoj.

Sed egale, ĉu estas seka sezono kun la ĉiama vualo de dikaj tavoloj el polvonuboj aŭ ĉu estas pluva sezono kun la diktavola, tenaca ŝlimo, la vojo estas ĉiam kaj eterne martiriga kun siaj miloj da truoj, vojsulkoj kaj kavaĵoj, kun siaj milionoj da ŝtonoj kaj rokblokoj, kun siaj dikaj ellavitaj radikoj de gigantaj tropikaj kaj duontropikaj arboj, kun sia deglitado de tutaj vojpartoj, kun sia bruado ĉe la falado de forrompitaj ŝtonamasoj kaj forputrintaj aŭ purlavitaj trunkoj. Jen kompatato ekzistas nek por la ĉaristoj nek por la bovoj, neniuj saviĝoj el miloj da suferoj de homoj kaj bestoj, ĉar en Suchiapa, *Tuxtla*, *Chiapa de Corso*, *Ixtapa*, *San Cristóbal*, *Comitán* kaj Sapaluta vivas miloj da homoj, kiuj bezonas salon, vestojn, librojn, mandolinojn, serurojn, likvorojn, horloĝojn, ŝuojn, skribmaŝinojn, fonografojn, porcelanajn tasojn, silkajn ĉemizojn, orelringojn, fotografajn aparatojn, parfumojn, feltoĉapelojn, alumetojn, cinamon, aspirinon, olepentraĵojn, kroĉtrikilojn, botelan bieron, krajonojn, tranĉilrazilojn kun garantiaĵo de sendanĝereco, okulvitrojn, cicumojn, ŝraŭbojn, ŝirfoliajn kalendarojn, butonojn. Sen transporto ne estas civilizacio.

Rampante la karavano grimpis sur la pasejon *El Calvario*. Tio estis grandioza brua komponaĵo tia, kian ĝin povus krei neniu artisto. Kiom ajn diferencaj kaj kiom ajn disonancaj estis la sonoj, ili formis tamen, ĉiuj kune, mirinde belan harmonion.

Aŭdiĝas anheloj, kelkfoje grumbla grunto de unu el la bovoj, la ĝemsimilaj sonoj de la ledaj rimenoj, la grincado de la radoj, la knarado de aksoj, la raslado de la surkonstruitaj ĉarofermoj, la bruoplena kaj vitreca tintado de malbone pakitaj objektoj en la kesto, la grincado kaj stumblado ĉe la veturado trans ŝtonojn, la ŝrikanta forglitado de rado de montosupro, la falado aŭ renversigo de unu ĉarofermo en kaveton de la vojo, la trasinkado en akve subminitan kavaĵon, la tamtamo sur roka parto plena de tuberoj, la tamtama bruado trans grandajn radikojn, krioj de la ĉaristoj, sakroj, insultoj, ĵuroj, pelantaj voko. Iu fajfas melodion, alia kantas ion, alia zumadas ion por si. Tiam sidas ĉaro tiom profunde en truo, ke ĝi firmpinĉiĝas. La viroj de la najbaraj ĉaroj venas por helpi, kaj kun multe da kriado kaj ĝemado oni ellevas la ĉaron. Poste la tuta karavano denove moviĝas kun sia peza ŝarĝo trenante sin antaŭen. Ĉe la vojflankoj en la vepro kaj en la herbejoj ĉirpas kaj flutas griloj kaj cikadoj, ie kantas kelkaj birdoj, abeloj flugas zumante tra la vibranta aero, papilioj flirtas tien kaj tien kaj sekvas la karavanon, atendante la malsekajn ekskrementojn de la bovoj.

La karavanon vualas vasta mantelo el polvo. Kiam vento blovas sur kelkaj lokoj de la vojo, tiam kolektiĝas grandaj pezaj nuboj el polvo, kiuj estas tiel densaj, ke la ĉaristo apenaŭ povas vidi la ĉaron, kun kiu oni marŝas antaŭ li. La ĉaristoj havas pezajn palpebrojn de la amasa polvo. La viroj aspektas kvazaŭ oni rulis ilin en faruno. Iliaj vizaĝoj estas nigraj de la miksaĵo el ŝvito kaj polvo.

Kiam oni staras supre sur la altaĵo proksime sub la altmontara pasejo, kie oni superrigardas samtempe multajn vojkurbiĝojn, oni gajnas la impreson de la marŝanta karavano, kvazaŭ kolosa, strange fremda vermo rampus alten. Ĉiu unuopa ĉaro aspektas kiel ringo en la longa korpo de la vermo. Kaj ĉar la ĉaroj tien kaj tien balanciĝas kaj kvazaŭ stumblas, la impresoj, ke tie supren-rampas granda vermo, fariĝas des pli reala. Ke ili estas ĉaroj, oni ne povas vidi de la altaĵo. La distanco kaj la varmega vibranta aero, kiu sin sternas kiel tremanta blanka nubovualo sur la teron, efektivas kaj realigas aĵojn, kiuj ĉe sobra rezonado ne povas esti realaj. Sed eĉ homo, kiu kutime klare pensas, perdas ĉian kapablon sobre rigardi kaj objektivu juĝi ion sub la ŝarĝanta tropika suno, homo, kiu vualite en ondoformaj polvonuboj grimpas plu kaj plu en la ĉiama konscio de la malfacilecoj kaj danĝeroj de la vojo.

5/7

La karavano nun atingis la pasejon. Elveninte el vojo tra rokoj de la lasta ravino kaj trairinte krutan rokan pordegon, la karavano venis sur la vastan altan ebenaĵon de *El Calvario*. Sur tiu alta ebenaĵo troviĝis tri ranĉoj. La plej granda el ili, la ranĉo *El Calvario*, aspektis kun la multaj peonaj kabanoj kiel vilaĝo. Alia malgranda ranĉo, ĉe la alia finaĵo de la ebenaĵo, faris per sia blanke kalkita domo kaj la kolonoj de la portiko puran kaj idilian impreson. Tiu ranĉo servis kutime kiel nokta restadejo kaj gastejo por vojaĝantoj sur ĉevaloj, ĉar ĝi troviĝis preskaŭ en la mezo de la vojo inter *Tuxtla* kaj *San Cristóbal*. La vojaĝantoj, kiuj venis de *San Cristóbal*, ĉiam provis atingi tiun malgrandan ranĉon, ĉar la vojdistanco de ĉi tie al *Tuxtla* ŝajnis al ili pli mallonga ol tiu ekde la urbeto *Ixtapa*, kiam ili nokte restadis tie.

La alta ebenaĵo estas ĉiam, dum la tuta jaro, kovrata de herboj. Je la fino de la seka sezono la herboj kompreneble estas tre malabundaj. Sed dure laborantaj bovoj, muloj kaj ĉevaloj sur tiuj vojoj rapide forgesas esti elektemaj ĉe la manĝado. Ili evidente ĝojas, ke ili finfine atingis la bivakon. La aspekto de la bonvena herbejo, eĉ, se la paŝtejo aspektas kiom ajn mizere, instigas la bestojn heni kaj bleki. Precipe la bovojn, kutimiĝintajn restadi ĉi tie la tutan laboran vivon, e la plej lerta ĉaristo ne pelus ilin plu eĉ nur kilometron. La marŝo de *Chiapa de Corso* ĝis tiu alta ebenaĵo estas la plej longa dum la tuta veturo inter Arriaga kaj *Balún-Canán*, ĉar la ĉaroj sur tiu vojo nenie povas halti. La vojo estas tro mallarĝa, kaj ne troveblas nutraĵoj survoje, kaj nur malmulte da akvo. Akvon bezonas ne nur la bestoj, sed eĉ pli la ĉaristoj. La alta ebenaĵo je unu flanko estas limigita de krutaj rokoj kaj montoĉenoj, kaj sur la alia flanko estas densa, dornoplena, tropika vepro.

Rimarko

kolono = Formacio, kies elementoj (grupoj, plotonoj, kompanioj, ŝipoj k.a.) estas aranĝitaj unu malantaŭ la alia por marŝado aŭ atako

5/8

Veninte sur la altan ebenaĵon la ĉaristoj plej volonte ĵetiĝus teren kaj dormus tuj tie, kie ili sin sternas. Ili estas lacaj kaj elĉerpitaj de la laboro ĝis la lasta hareto de sia korpo. Sed ili havas plian laboron antaŭ si.

Ili kunveturigas ĉiujn ĉarojn, ĝis kiam ili laŭvice apudas unu la alian, tiel, ke ĉiu ĉaro staras flanke de alia. La ĉaristoj, kiel ĉiuj indiĝenoj, havas denaskan senson por beleco. La kanonoj de artileria regimento ne povus stari pli bele kaj pli soldatece sur sia kampadejo ol la ĉaroj de karavano. Kun krioj kaj komandoj, kun

impeto kaj ŝovado oni rektliniigas la ĉarojn. Oni eljungas kaj dejugigas la bovojn.

La ĉarojn oni ĉiam rektliniigas. Sed okazas sufiĉe ofte, ke la ĉaristoj estas tiel elĉerpitaj de la laboro, ke ili ne dejugigas la bovojn. Oni lasas stari la bovojn kun ilia tiom peza jugo, kun la kompakta tirtrabo malantaŭ la kornoj. Tiukaze la bestoj devas resti kune kiel paro. Tie, kie unu el la bestoj sin paŝtas, ankaŭ la alia sin devas paŝti. Ili apenaŭ povas flankenturni la kapon. Kaj se unu besto movas la kapon dekstren, ankaŭ la alia besto devas movi la kapon dekstren. Estas ankoraŭ alia kaŭzo, kial dum certaj bivakoj oni ne liberigas la bovojn de la jugo, kvankam tio evidente estas neeltenebla torturo por la bestoj.

Se la bestoj sin paŝtas unuope, ili vaste disiras por trovi la plej bonan paŝtejon. Ne malofte ili foriras pli ol kvin kilometrojn de la ripozejo. Tiam la ĉaristoj devas serĉi la bestojn. Iam kaj tiam ili devas rekonduki la bestojn el la ĝangalo, ĉar la bovoj preferas certajn arbofoliojn kontraŭ la tro sveltaj herboj. Pro tiu serĉado la ĉaristoj perdas ofte duonon de tago kaj tutajn tagojn. Okazas, ke ĉiuj ĉaristoj de la tuta karavano devas serĉi du aŭ eĉ nur unu bovon. Estas komplike jam dum la taglumo, sed eĉ pli en la nokto, kiam la viroj devas rampi kun lanternoj kaj kenaj torĉoj tra vepro kaj ĝangalo por kapti la disirintajn bestojn. La ĉaristoj estas tre ekzercitaj serĉantoj de fuĝintaj bovoj. Ili scias ĝuste legi ĉiun forrompitan branĉeton, ĉiun malsupren tretitan arbuston, ĉiun hufe frapitan herbotufon, multe pli bone ol abocolibron. Ili scias precize, ĉu hufosignoj estas malnovaj tagon aŭ du semajnojn, aŭ ĉu estas la spuro de libere paŝtiĝanta grego de bovoj de proksima ranĉo aŭ de unu el la propraj bovoj. Tamen okazas, ke oni trovas la bovojn eĉ ne post tuta semajno, aŭ ĉar ili estas tre rapidaj kaj migras al sia hejma ranĉo, aŭ ĉar ili miksiĝas kun alia grego kaj kun tiu marŝas al la ranĉo de tiuj bestoj. La tempon, kiun la ĉar-

istoj perdas pro la serĉado de fuĝintaj bestoj, iel devas provi regajni. Se ili tro ofte malfruiĝas kun siaj frajtoj, iliaj mastroj ilin krude insultas, eble severe punas aŭ maldungas. Tiukaze ili havas la reputacion de sentaŭguloj kaj de nefidindaj ĉaristoj, kaj retrovas nur kun klopodo alian laboron. Tial oni ne tro haste akuzu la ĉaristojn pri krueleco al bestoj, kiam ili de tempo al tempo ne liberigas la bovojn de la jugo. Ne dejugigitaj bovoj ne povas fuĝi longan distancon, ĉar ili pro la peza jugotrabado, kiu kuŝas transverse super ili, ĉie puŝiĝas je arboj kaj tiel estas retenataj. Sed ĉiufoje lasi stari la bestojn kun jugo, tion la ĉaristoj tamen ne povas riski. Ĉar tiuj bestoj, kiuj restas en la jugo, ne povas manĝi tiel bone kaj abunde kiel bestoj, kiuj sin paŝtas libere. Tia besto restas malsata, iĝas magra, ne kapablas sufiĉe forte tiri, kaj eble oni devas eĉ lasi kuŝi ĝin iam ĉe vojrandado.

Kunpreni nutraĵon sur la ĉaroj kaj firmligi la bestojn sur la ripozejoj ne eblas. Ili estas fortaj bestoj, kaj tial ili bezonas multe da manĝo, se ili laboru bone. Sed, se oni ŝarĝus nutraĵon sur la ĉarojn, oni ne povus ŝarĝi ilin per frajto. La maizo, kiu kunportendas por la bestoj, ĉar oni ne povas aĉeti ĝin je ĉiuj lokoj de la vojo, forprenas jam sufiĉe da spaco, kaj jam sufiĉe ŝarĝas la ĉarojn.

Kion ajn bona ĉaristo elpensas, por ke li povu esti simile justa kaj al sia mastro kaj al siaj bestoj kaj al la komercisto, kiu bezonas la varojn ĝis certa dato, ĉie li puŝiĝas je rilatoj kaj kondiĉoj, kiuj estas pli potencaj kaj pli fortaj ol liaj plej bonaj intencoj.

Centmiloj de bestoj kaj milionoj de homoj devas elteni kaj transferi ŝajne neelteneblajn suferojn, por ke civilizacio povas esti, kaj por ke oni povas porti civilizacion en la plej forajn angulojn kaj anguletojn de la terglobo, tien, kie loĝas homoj.

Ĉapitro 6

6/1

La ĉarojn oni jam kunveturigis laŭ bela kaj ekzakta rekta linio. La bovojn oni jam eljungis kaj liberigis de la jugoj. Ili serĉis kuŝejon kaj ĵetiĝis teren. Ili estis tro lacaj por paŝti sin. La ĉaristoj revenis por pretigi simplan manĝon. Ĉiu serĉis sian grupon.

Dum la marŝo la ĉaroj veturis tie, kie oni envicigis ilin. Sed, kiam oni haltis por ripozi, formis la ĉaristoj de ĉiu mastro grupon, la ĉaristoj de *don* Laŭreano, tiuj de alia komisiisto, de *don* Nicasio. Kaj ankaŭ la ĉaristoj de alia mastro formis tian propran kuir-grupon. Ĉar ili pretigis la manĝojn el la nutraĵoj, kiujn iliaj mastroj donis al ili por la marŝo. De ĉiu grupo kuris viro kun gazolina ladujo al la rivereto por alporti akvon. Kelkaj aliaj kuris en la tropikan arbaron por havigi lignon. Aliaj formis per tranĉiloj la bastonojn, sur kiuj oni pendigis la kuirkaldronojn.

Estis jam tre malfrue vespere, ĉar la marŝtago estis nekutime longa.

Baldaŭ ekflamis en ĉiuj grupoj la bivakfajroj.

Apud la fajroj staris kaj sur la fajroj pendis ĉiuspecaj ujoj de rapide kaj tamen lerte faritaj stabloj, per kiuj oni kuiris.

La homoj kuiris nigrajn fabojn en sufiĉe grandaj kvantoj, por ke la faboj bezonantaj longan kuirtempon, sufiĉu eĉ por la posta matenmanĝo. Ili kuiris rizon. Ili varmigis maizoflanojn. Kaj ĉie oni kuiris kafon, la neeviteblan trinkaĵon dum ĉiuj manĝoj de vojaĝantoj en Meksiko. Se kafo estis rara, oni uzis de tempo al tempo ankaŭ pinolon. Pinolo estas polvo el disfrotitaj kaj rostitaj

maizograjnoj. Se mankis eĉ pinolo, oni kuiris teon el citronfolioj plukitaj ie survoje. La fabojn oni kuiris, ĝis kiam ili estis molaj. Poste oni bongustigis ilin per porka graso, kiu, kunprenita en boteloj, pro la varmega klimato, ĉiam estis likva kiel oleo. La rizon oni ne kuiris kiel en Eŭropo, sed kiel en Meksiko. En pato oni varmegigis porkograson. Se la graso estis sufiĉe varmega, oni ŝutis la sekajn rizograjnojn en paton kaj turnomovis ilin tiom longe tien kaj tien, ĝis kiam ili estis brunaj. Tiam oni lante enverŝis, preskaŭ guton post guto, akvon. Se oni faris tion mallerte, la flamo saltis sur la paton kaj ekflamiĝis tie tiom alta fajro, ke ofte nigrigis la tuta rizo. Ankaŭ la kafon oni kuiris meksikece. Oni verŝis akvon en konusforman ladokruĉeton. Poste oni ŝutis en ĝin manplenon de muelita kafo kaj grandan pecon de bruna nerafinita sukero. La miksaĵon oni forte boligis kiel supon. La kafon oni ne filtris, la rekremento restis en la kafo kaj oni kunglutis ĝin.

Kelkaj ĉaristoj survoje kaptis kuniklojn, aliaj ĉase pafis sovaĝan meleagron aŭ dazipon, kaj aliaj per siaj hundoj elpelis el vaka arbotrunko iun *tepezcuintle*. Apud ĉiu fajro kuŝadis la hundoj, kiuj atendis ostojn kaj la ceterajn restaĵojn de la manĝo. Ĉiu ĉaristo havis hundon ĉe si. Kiel ĉe eŭropano apartenas al la pantalono jako, tiel apartenas al indiĝeno hundo.

La ĉaristoj dum siaj marŝoj havis sufiĉe da okazoj kapti ĉirkaŭirantajn kokinojn kaj porketojn por pliampleksigi siajn manĝojn, sed ĉaristoj ne priŝtelas ranĉistojn, kaj eĉ malpli ili priŝtelas povrajn indiĝenajn kamparanojn.

Rimarko

tepezcuintle = speco de sovaĝa kuniklo en Meksiko, Kostariko ktp...

Ĉifoje multaj inoj veturis kun la karavano. Inoj, kiuj vojaĝis solaj, aliaj kun infanoj, aliaj kun siaj servoknabinoj. Kelkaj el ili vojaĝis al *San Cristóbal*, aliaj al *Comitán* aŭ pli en la internon de la ŝtato aŭ eĉ supren al Tabasko. Ili ĉiuj estis inoj de la plej subaj popoltavoloj, kies viroj ne havas sufiĉe da mono por povi rajdigi ilin sur ĉevaloj. Eĉ, se la viro eble havus ĉevalon aŭ eĉ kelkajn, li devus aŭ mem kunrajdi kaj tiel perdus tempon kaj krome li devus lasi la negocon sub la kontrolo de alia, aŭ li devus lui fidindajn virojn, kiuj akompanus lian edzinon. Tio estus tre multekosta. Sed, se la inoj vojaĝis per karavano, ili pagis por sia sidloko en la ĉaro peson aŭ eble eĉ nur duonon de peso. Kaj, ĉar ĉiam kelkaj inoj vojaĝis en karavano, ino sentis sin ne tiel sola kiel inter fremdaj viroj.

Okazis de tempo al tempo, ke en tre granda marŝkolono kunvojaĝis nur unu damo, aŭ tute sola aŭ nur kun servoknabino. Sed okazis neniam, ke ĉaristo molestis inon, nek en la tago nek en la nokto, se ŝi ne instigis tion mem kaj deziris ion, kion ŝi ne povis havi sekve de la foresto de sia edzo kaj kion ŝi kutimis kiel la ĉiutagan manĝadon kaj trinkadon. Io tia iufoje okazis, ĉar la inoj estis plej ofte indiĝenaj aŭ almenaŭ havis pli da indiĝena sango ol eŭropecan. Krome ili devenis de la sama popolklaso kiel la ĉaristoj. Ĉar veturo ofte daŭris ĝis tri aŭ kvar semajnoj, oni apenaŭ povis akuzi la inojn, kiuj ne estis skulptitaj el ligno, sed havis en siaj vejnoj vivantan varman sangon anstataŭ fridan ĉerizfolian teon. La kulpon oni ŝovas ja en ĉiu kazo al la edzo. Kial li lasis ŝin sola? Edzo, kiel ajn li turnas kaj movas la aferon, havas ja neniun sekurecon. Ĝis la hodiaŭa tago oni ne klare konstatis por kiu servo Belzebuto, en la formo de serpento, pagis la pomon al Eva. Tiam ekzistis nek oraj braceletoj nek diamantaj ringoj por la oreloj, nek ĉekoj. Eva estus preferinta perlan kolĉenon, kiu kostas du mil dolarojn. Sed ŝi prenis tion, kion ŝi povis ricevi, por

ne resti senpagita. Ankaŭ aliaj kontentiĝas ja per tri pesoĵ, se ili ne povas ricevi kvindek.

Multaj ĉaristoj havas dum veturo sian edzinon ĉe si. Indiĝeno aŭ viro, kiu estas je kvindek procentoj indiĝeno, eltenas ne longe sen sia edzino. La ĉaristoj, kiuj havas siajn edzinojn kun si, ĉe siaj mastroj ofte validas kiel pli fidindaj ol la needziĝintaj. Tiuj ĉaristoj, kiuj lasas hejme siajn edzinojn, de tempo al tempo ekhavas sovaĝan sopiron al siaj edzinoj. Ili forkuras kaj lasas stari la ĉaron ie survoje aŭ transdonas ĝin al iu el la restantaj ĉaristoj, por ke tiu kunveturigu ĝin.

La edzinoj de la ĉaristoj kompreneble kunmanĝas de la porcioj, kiujn ties edzoj ricevas por la marŝo. Sed la porcioj estas abundaj. Estas ja nur nigraj faboj kaj rizo, nutraĵoj, kiuj tie apenaŭ havas valoron. Terpomon la ĉaristo ricevas en sia tuta vivo eble ne pli ol dufoje por manĝo. Ili estas tro multekostaj. Terpomojn eĉ la mastro en sia propra mastrumado uzas nur tre ŝpareme. Estas rikaniga ironio; en la mezo de Eŭropo kaj en la nordo de Eŭropo la terpomoj estas la pano de la popolo; sur la amerika kontinento, kie la terpomoj havas sian originon, ĝi apartenas al la plej multekostaj nutraĵoj.

Ĉu de la porcioj de la ĉaristoj unu homo pli aŭ malpli kunmanĝas, patrono ne perceptas. Li eĉ ne rigardas pro tio. Li ne interesiĝas pri tio, ĉu liaj ĉaristoj veturas kun siaj edzinoj, ĉu ne. Kaj eĉ multe malpli li aŭ iu alia homo interesiĝas pri tio, ĉu la ĉaristo kaj lia edzino estas laŭleĝe geedziĝintaj ĉu ne. En kiu formo de la geedziĝo vivas ĉaristo kaj ties edzino, estas nur la afero de la ĉaristo kaj de ties edzino. Estas privata afero, kiu koncernas nur ilin ambaŭ, krome neniun en la lando.

La patrono havas ankoraŭ aliajn kaŭzojn, kial li ne kritikas kiel pedanto la nemultajn nigrajn fabojn, kiujn manĝas edzino de

ĉaristo. Per la edzino de la ĉaristo la frajtentreprenisto ricevas aldonan laboristinin, kiun li ne devas pagi, al kiu li devas doni nur la simplan manĝon. Kvankam la edzinoj de la ĉaristoj ne necesas por bona kaj sekura marŝo de ĉarokaravano, ili estas tre utilaj kaj helpas ĉe multaj aferoj.

Ili helpas ĉe la serĉado kaj rekaptado de eskapintaj bovoj. Kaj se ili ne kunhelpas serĉi ilin, ĉiuj ĉaristoj foriras por serĉado kaj la edzinoj restadas en la bivako kaj gardas la frajtojn. Aŭ ili kuiras por siaj edzoj la manĝon, kaj la edzoj intertempe povas ripari rompitaĵojn de ĉaroj. Aŭ, se la edzinoj kuiras kaj por siaj edzoj lavas la ĉemizojn kaj pantalonojn kaj surkudras flikpecojn, la edzoj povas pli bone dormi, kaj ili tiam pli bone laboras kaj ne ekdormas. Kaj se vojdistanco ne havas specialajn obstaklojn, la edzo en la ĉaro dormas profunde kaj la edzino kondukas la bovojn. Kion la patrono povus pli postuli por la manpleno da nigraj faboj, kiujn edzino de ĉaristo kunmanĝas de la porcioj!

6/3

Ne ĉiuj ĉaristoj havas edzinojn. Apenaŭ kvinonon aŭ eĉ malpli de la bovopelistoj, akompanas edzino.

Kelkaj el la ĉaristoj vivas kun siaj gepatroj aŭ kun geedziĝintaj gefratoj en iu loko ĉe la vojo. Aliaj vivas, kiam ili ne marŝas, en la domo de la mastro, en iu angulo, kiun oni translasas al ili. Aliaj havas aron de malgrandaj infanoj en sia hejma kabano kaj la edzino devas resti ĉe la infanoj. Aliaj havis edzinon, sed ŝi forkuris de ili; aŭ edzinon tedas lastfine la eterna marŝado sur la mizeraj vojoj, tage kaj nokte en tropika varmego kaj en tropikaj torentaj pluvoj; aŭ edzino estas graveda; aŭ la gepatroj de la edzino, aŭ la gepatroj de la edzo volas havi la edzinon hejme en la kabano. Alia speco de ĉaristoj estas nefidindaj edzoj. Ili baldaŭ estas sataj pri la edzino kaj forŝovas ŝin aŭ kviete aŭ per insultoj kaj ripopuŝoj.

Kaj alia speco estas neplibonigeblaj unuopuloj, kiuj nur ĉeokaze iras al ino, sed en la alia tempo kaj speciale dum marŝoj ne volas vidi jupon ĉirkaŭ si. Ili delektiĝas pri la disputoj kaj kvereloj de siaj kamaradoj, kiu jadas edzinon ĉe si.

Tial oni vidas de tempo al tempo marŝkolonojn, en kiuj eĉ ne unu edzino estas inter la ĉaristoj. En tiaj karavanoj estas plej gaje, plej ĝoje kaj plej sovaĝe. En tiaj viroj senzorge povas cedi al siaj sentoj kaj al la plezuro rakonti kaj aŭskulti la plej ekscelsajn rakontojn kaj anekdotojn. Estas ja la granda fivirto de inoj, ke ili ĉiam devas entrudiĝi kaj enmiksiĝi en la vivon de viro. Plej plaĉa estas la edzino, kiun oni povas meti en tirkeston, kaj kiun oni elprenas nur tiam, kiam oni bezonas ŝin; kiun poste oni povas denove zorgeme involvi kaj formeti ĝis venonta fojo. Sed tia ino estas nur dolĉa sonĝo de virofantazio. Ŝi estas artprodukto. Ŝi estas pli rara ol ovo de birdo fenikso. Kaj vere benata estas la edzo, kiu havas tian edzinon. Tia viro povas atingi ion tre grandan en vivo.

La ĉaristoj kompreneble ne havas tempon por serĉi ensorĉitan trezoron en ideala mondo. Kiel ĉiuj aliaj viroj ĝemantaj sub la jugo de la korpa bezono, ili devas kontentiĝi per tio, kio haveblas; kaj tiukaze ili devas provi eviti la dornojn sur rozoplana vojo. La ununura, kion ili lernas sur tiu ĉi vojo, estas la sperto, ke sur rozarbedo estas centoble pli da dornoj ol rozoj. Kaj kiaj dornoj!

6/4

Krom la edzinoj, kiuj devis vojaĝi por viziti kuraciston aŭ parencojn aŭ nupton, aŭ kiuj vojaĝas mi ne scias kien kaj kial, kaj krom la edzinoj de la ĉaristoj, troviĝas en la karavanoj ofte ankaŭ komercistinoj, kiuj aĉetis varojn en Arriaga aŭ en *Tonalá* kaj kiuj nun vagas en la internon de la federacia ŝtato por fari tie negocojn dum foiroj kaj dum festoj.

Tiuj komercistinoj kaj la vojaĝantaj inoj ne restadis en la karavano aŭ ĉe ties bivakfajroj. Ili ja ĉiuj havis iom da vojaĝmono ĉe si. Kaj ĉar ranĉoj estis proksimaj, ili foriris, tuj kiam la karavanoj haltis, en la ranĉistajn domojn.

Tie ili trovis aliajn inojn, la edzinojn de la ranĉistoj aŭ ties filinojn, aŭ ties patrinojn aŭ onklinojn aŭ iun ajn, kiu apartenas aŭ kroĉiĝas en Meksiko al familio.

Plej ofte ili konis sin reciproke, eble estis eĉ tre malproksimaj parencoj; kaj se ili ne konis sin persone, ili havis ie en la ŝtato komunajn konatojn. Tial ili senfine babiladis dum duono de nokto. La inoj sur la solecaj ranĉoj ja ĉiufaje tiom ĝojis, se ili aŭskultis iujn novaĵojn, skandalojn kaj klaĉon el aliaj lokoj.

La inoj kunmanĝis ĉe la tablo de la ranĉisto. Kutime ili pagis nenion por tio, kaj se ili tamen devis pagi ion, ne estis pli ol dudek aŭ tridek centavoj, pli pro la etiketo ol pro enspezo. Kiam ili ĉiuj sufiĉe interparoladis kaj ĉiu klaĉo atingis sian celon, aŭ pli bone dirate, la inajn orelojn, kaj ekfermiĝis ĉiuj okuloj pro laciĝo, oni proponis liton al ili, aŭ oni sternis sur planke matojn, kiuj estis dike kovrataj de abiaj pingloj. Tie la inoj pretigis la litaĵon alportitan de servopretaj ĉaristoj. Kiam ne estis ranĉoj aŭ bienegoj proksime, la inoj devis kontentiĝi pri la provizoraj dormlokoj en la frajtĉaroj. Tio estis tre malkomforta. Sed kion alian ili povus fari?

6/5

La edzinoj de la ĉaristoj, ne tiel forte ligitaj je la kutimoj de laŭregula hejma vivo, dormis tie, kie ili trovis lokon. Ili estis kutimigitaj pri dura kaj rigida vivo, plej ofte ekde la infaneco.

Ili kapablis dormi tie, kie ili kuŝis. Tute egale, kie tio estis. Se estis libera spaco en la ĉaro kaj oni povis aranĝi per frajtaĵoj kuŝejon, ili dormis en la ĉaro.

Se ne estis loko en ĉaro, aŭ la frajtaĵoj estis tro malegalaj laŭforme por povi aranĝi kuŝejon, ili dormis kiel la edzoj sub la ĉaro surtere. Aŭ ili nur kaŭris, apogante sian dorson kontraŭ rado. Aŭ ili kuŝiĝis apud la ĉaro sur herbejo. Iu loko ĉiam troviĝis por sterni la moskitoreton super si, en tiuj partoj de la vojo, kie la aero estis plena de insektoj.

La ĉaristoj mem tute ne sciis, kio estas la senco de la vorto malkomforto. Se ili havis siajn edzinojn ĉe si, ili kompreneble provis pretigi kuŝejon kiel eble plej bonan kaj komfortan. Sed por si mem ili pensis pri nenio alia ol pri tio ripozi kaj dormi.

Ili ĉiam laciĝis de la laboro tiel, ke ili, se ili jam sternis sin apud la ĉaro, eĉ ne vekiĝis, se torenta pluvo malsekigis ilin ĝis la ostoj. Aŭ, se ili tamen vekeblis, ili estis tiel kaputaj de la laboro, ke ili eĉ ne provis rampi sub la ĉaron. Ili tiris nur la kovrilon pli proksimen super la kapon.

Granda helpo tio ne estus rampi dum la pluvo sub ĉaron. Se estas drasta tropika pluvo, la tuta bivakejo troviĝas baldaŭ kvazaŭ en lago. Kaj ĉirkaŭe kuŝantaj bretoj kaj ŝnuroj tuj komencas fornaĝi.

Ĉe tia vetero la ĉaristo ne pensas pri si mem. Li zorgas nur pri la frajto, kiun li havas. Li saltas supren kaj firme kunligas la matojn, kiuj protektas ambaŭ finaĵojn de la ĉaro kontraŭ polvo kaj vetero, por ke pluvo ne povu vipi kaj tiel damaĝi frajton. Li firmplektas tegmentan kovrilon tie, kie ĝi deiĝis en marŝo, kaj plenigas fendojn per ĉifonoj aŭ herboj.

La hundoj vigliĝas kaj serĉas sekan lokon en fendoj de sakoj kaj kesto.

La ĉaristo ne estas hundo, kiu povus premi sin inter fendojn. Li estas homo kun animo, kiu flugos post laborplena kaj peniga surtera vivo iam supren en la paradizon. Li estas homo, kiu povas ami, plori kaj ridi. Li estas homo naskita de patrino, kiu amas lin, kaj kiu kun veo afliktiĝas pri la senbonfarto de sia infano.

Li estas homo kiel lia patrono. Homa estaĵo kiel la prezidanto de la patrio, la granda ŝtata viro *Don Porfirio*, kiu estas garnita tiom abunde per ordenoj,

Sed lia patrono ne povis elspezi monon por aĉeti al siaj ĉaristoj malgrandan akvorezistan tendon kaj malgrandan malpezan faldoliton, kiuj sekurigas al la ĉaristo ankaŭ en marĉa bivako sekan dormlokon. Tiom da mono la frajttransportoj ne enspezigis, la patrono havis aliajn elspezojn, kiuj estis pli gravaj ol tia sensencaĵo. *Don Porfirio*, kies bildo pendis brile en larĝa orumita krado je muro en la granda loĝoĉambro de la patrono, dekretis tiom da mirinde bonegaj leĝoj. Sed inter tiuj miloj kaj miloj de mirinde bonegaj leĝoj estis eĉ ne ununura leĝo, kiu levus la ĉariston en pli altan rangon ol la tirbovojn, kiujn li jungas al la ĉaro de patrono. Se bovoj povas ripozi en torenta pluvo sub libera ĉielo kaj staranta en lago, kial do pro ĉio en la mondo kaj pro ĉiuj sanktuloj oni pensu ĉe la fabrikado de leĝoj pri la protektado de ĉaristo?! La bovoj kostas multe da mono. La ĉaristo ne kostas monon. Se ne plaĉas al li, li povas foriri, tuj kiam li transdonis la frajton sen damaĝo kaj sekurigite en la celloko. Ekzistas sufiĉe da ĉaristoj, kiuj atendas dungigon. Ĉe la diablo, kial tiom da babilaĉo pri indiĝena ĉarulo!

Por la laboro estas pli bone, se li kuŝas ekstere en la densa pluvo. Tiukaze li vekiĝas ĝustatempe. Fariĝas ja tro maloportune por li.

Li ekstaras pro pluvego meze de nokto, li jungas la bovojn kaj veturas plu. Ĉe tio li eble gajnas eĉ dek du horojn de la vojaĝo. La patrono ricevas la reputacion kiel bona frajtentreprenisto, kiu ne malfruiĝas. Tio servas al la komerco kaj prosperigas la bonfarton de la patrio.

6/6

Ekde tiu bivakejo ĝis la pli interna parto de la federacia ŝtato oni ne plu devis timi banditojn. Iom pli danĝere fariĝis nur proksime de *Balún-Canán*, kie okazis de tempo al tempo atakoj sur la vojoj. Sed ĉi tie minacis la vojaĝantojn nur tri aŭ kvar banditoj, kiuj verŝajne estis fratoj. Ĉarojn ili kuraĝis ataki nur en tiu kazo, se ne estis pli ol du aŭ maksimume tri. Pli grandajn karavanojn ili ne kuraĝis ataki. Tiuj banditoj estis pli danĝeraj por unuopaj vojaĝantoj sur ĉevaloj. En la federacia ŝtato ili havis la aĉan reputacion de rabistoj, kiuj ĉiufoje murdas la atakitan vojaĝanton, por ke oni ne malkovru ilin.

Ĉar de tie la sekvaj cent dudek kilometroj estis sekure ireblaj kaj multaj ĉaroj de la karavano, pli ol tri kvaronoj el ili, transportis fraĵojn nur ĝis Jovel, kaj kelkaj nur ĝis Shimojol, dispartiĝis la granda karavano de tie en pli grandajn grupojn kun ok ĝis dek ĉaroj.

Ĉiu marŝkolono havis sian *encargado*, sian laborgvidanton, kiu respondecis pri la kolono, kaj kiu decidadis pri la ĉiutaga marŝo.

Ĉe unu el la marŝkolonoj la matena fajro ekflamiĝis jam denove je la unua en la nokto. La kolonestro observis, ke la bovoj de tiu kolono estas en bona stato; kaj ĉar ĝiaj ĉaristoj ŝarĝis la ĉarojn ne tro peze, li volis atingi la lokon *Ixtapa* ankoraŭ en la frua antaŭtagmezo. De tiu alta ebenaĵo ĝis *Ixtapa* estis nur ses kilometroj. Li devis tie transdoni kelkajn fraĵaĵojn al posedantoj de vendejoj.

Liaj ĉaristoj nutris la bovojn per maizo. Poste la homoj manĝis nigrajn fabojn kaj trinkis kafon. Kaj post kiam ili finis tion, ili aljugigis kaj jungis la bovojn. Tiam viro kuris transen al unu el la ranĉoj kaj frapis pordon, malantaŭ kiu dormis, kiel oni montris al li jam en la antaŭa vespero, la inoj, kiuj vojaĝos plu kun tiu marŝkolono.

„*Olla Señora, vamonos, listo.* He, sinjorino, ni ekmarŝos, ĉio pretas.“

„*Orito, muchacho momenton, momenton, knabo, mi tuj venos*“, vokis damo, tuj vekiĝinte. Ili ekstaris, sen longe etendiĝi kaj oscedi.

Ili ŝovis la kapon tra la surĵetita jupo kaj malfermis la pordon. La servoknabo saltis en la ĉambron, kaj per kelkaj lertaj manmovoj faskige kunrulis la litaĵojn de la damoj kaj kunŝnuris ilin.

La inoj trempis la mezajn fingrojn de la maldekstra kaj dekstra mano en malgrandan kavigitan kukurbujon kun akvo kaj viŝis siajn okulojn per la malsekaj mezaj fingroj. Per tiu ĉi movo la lavado de la vizaĝo estas finita ĉe la meksikanoj, ĉu viraj, ĉu inaj, kiam ili vojaĝas sur ĉaro.

Poste ili tenis ambaŭ manojn kiel pelvon al servoknabo, kiu verŝis la akvon el la kukurbujo sur la manojn de ĉiu ino. La akvo sufiĉis por la kvar inoj lavantaj sin. Estis trionlitro da akvo, pri kies centprocenta pureco oni kutime ne longe diskutas.

La damoj kunfrotis siajn malsekigitajn manojn kaj tuŝis per ili sian hararon. Per malgranda poŝkombilo kaj kvar movoj ili kombis sian hararon, ĝis kiam ĝi estis glata. Kaj tuj ili estis pretaj por la daŭrigo de la vojaĝo.

Tio iris tiel rapide, ke, de tiam, kiam la *muchacho* frapis la pordon, pasis nur du minutoj, ĝis kiam la inoj ektrinkis kelkajn varmegajn glutojn da kafo el tasoj jam enportitaj de knabino de la ranĉo. La frapado vekis ankaŭ tiun knabinon, kaj ŝi tenis varma la kafon sur fornelo en ardanta cindro.

Neniu meksikano faris pli da ceremonioj sur tiuj vojoj. Kaj ni ĉiuj, aŭ niaj avoj, faris la samon, kiam ankoraŭ ne ekzistis litvagonoj en trajno, kaj kiam oni konsideris la tambure bruantan diliĝencon kiel la plej rapidan kaj plej komfortan transportilon. Ĉar ĉaro tirata de bovoj ne estas tiel eleganta kiel elasta diliĝenco el la dua duono de la deksepa jarcento, oni ne povas atendi, ke la vojaĝantoj tiel zorgeme vestas sin kaj gladas la vestojn, kvazaŭ ili partoprenus ĉe festa vespermanĝo kun la emiro de Afganio en la diplomatosalonego en hotelo Ritz. Tualetoj, kiun oni ne adaptas al sia ĉirkaŭo, detruas la harmonion de la vivo. Kaj por la harmonio de la aĵoj en sia ĉirkaŭo la meksikano havas tre delikatan kaj kultivitan senton.

La ĉaristoj dum veturo, kiu daŭras tri aŭ kvar semajnojn, tute ne lavas sin. Ili sin ankaŭ ne razas kaj ne tondas la hararon. Tiuj, kiuj havas indiĝenan sangon, ne havas barbon aŭ nur aludon de barbo. Sed kelkaj triboj eĉ havas fortan barbokreskon. Kaj de la ĉaristoj apartenantaj al tiuj triboj, aŭ ties pragepatroj, kiuj miksiĝis kun la apartenantoj de tiaj triboj, ĉiu unuope aspektis kiel kvin kanibaloj kune, kiuj pro sia terura aspekto estis elĵetitaj el la infero de la onklino de l' diablo.

Kompreneble ĉeokaze misharmonio ĝenas tiun romantikan rabistan eksteriĝon. Kiam ili sufiĉe longe haltas en la proksimo de rivero kaj ne tro lacas, ili banas sin, kaj se ili havas eĉ pli da tempo, ili banas sin seninterrompe dum du horoj. Sed la harmonio poste baldaŭ denove ekestos. La unua, kion la ĉaristo, kiel ĉiu meksikano, matene kaj vespere faras, antaŭ ol li enverŝas eĉ

nur gluton da kafo, estas, ke li lavas zorgeme kaj persiste la buŝon. Kaj matene aŭ vespere aŭ dum la ĉaroj estas veturigataj, la ĉaristo unue lavas siajn manojn, antaŭ ol li ŝovas mordaĵon de simpla manĝo en sian buŝon. Kaj se li ne trovas akvon survoje, aŭ se lia kukurba botelo, en kiu li kunportis akvon, estas eltrinkita, li simple ne manĝas, ĉar li ne povas lavi unue la manojn al si. Kvankam la lavado de la manoj estas ofte nur simbola lavado, ĉar li disponas nur pri dek gutoj da akvo por la lavado, la manoj tamen nepre devas esti lavitaj, antaŭ ol li povas manĝi.

Tri minutojn post kiam oni vekis la inojn, ili sidis jam je kvarono laviĝintaj kaj je okono manĝintaj en siaj ĉaroj, kaj la kolono troviĝis sur la marŝo.

6/7

Intertempe dua kolono pretigis la ekmarŝon. Ĝi estis malpli rapida. Oni devis serĉi kaj eltrovi bovojn el aliaj kolonoj. Kaj tio estis sufiĉe komplika, ĉar la nokto estis ankoraŭ nigra kiel peĉo.

Ĉe alia kolono oni riparis radon. Krome oni devis kuraci karnovundojn de bovoj. Tria kolono post zorgema inspektado fare de ties kolonestro verŝajne ekveturos nur ĉirkaŭ tagmezo. La bovoj estis tro elĉerpitaj, tro lacigitaj, ili ne lasis peli sin al ekstaro. Sekve de sia trolaciĝo ili nokte apenaŭ paŝtis sin. La ĉaristoj alportis la maizon ĝis proksime antaŭ la bestajn buŝojn. por instigi ilin manĝi. Tiuj bovoj faris kvar longajn veturojn, sen permeso ripozi, kaj ĉiu veturo daŭris tri semajnojn. Tio estis la kolono de *don* Laŭreano, en kiu Andreo gvidis ĉaron. En la frajt-entrepreno de *don* Laŭreano la ĉaristoj kaj la bovoj devis labori eĉ pli streĉe kaj pli persiste, ĉar li ĉiam havis multe da frajtoj. Antaŭ ol granda frajto estis liverita, atendis jam nova sian ekspedadon. Sed la seninterrompa laborado de la bovoj estis daŭrigebla nur ĝis ekstrema limo. Se la bovoj estis tro elĉerpitaj kaj tro

lacaj, ĉar ili ne havis feriojn sur paŝtejo, okazis, ke ili sternis sin sur la vojo kaj nek per la plej bona nutraĵo nek per afablaj persvadoj lasis sin instigi denove ekiri. Batoj eĉ malpli havis efikon. Tre ofte la bovoj faris la samon, kion faras ankaŭ muloj. Ili sternis sin sur la vojo, rifuzis nutraĵojn kaj mortis.

Bovoj kaj muloj trifoje aŭ kvarfoje en jaro bezonis tri aŭ kvar feriajn semajnojn sur bona paŝtejo. Kaj ili ricevis tiujn feriojn. Bovoj kaj muloj estis multekostaj. Kaj tial la suicido de bovoj estis tre multekosta afero por la mastroj. La ĉaristoj ricevis neniam feriojn. Ili laboris tagon post tago, je dimanĉoj kaj festtagoj, tage kaj nokte, en pluvo kaj tropika ardo, dum sabloŝtormoj kaj dum fulmotondroj, kiuj ŝajne intencis diskrevigi la ĉielon. Ankaŭ la ĉaristoj de tempo al tempo ne leviĝis plu ĉe la vojo. Sed ili ne memmortigis sin pro trolaciĝo. Tio estis la privilegio de la bovoj kaj muloj. Pro tio ili estis ja stultaj bovoj kaj eĉ pli stultaj muloj. Kaj se ĉaristo sur la vojo efektive mortis aŭ ĉe la suprenlevado de ĉaro glitinta en truon glitis mem malsupren en ravinon kaj ĉe tio frakasiĝis aŭ falis sub la radojn de ĉaro, tiukaze ne estis konsiderinda perdo por la entreprenisto. Ĉaristoj kostis multe malpli ol bovoj aŭ muloj. Ili kostis eĉ ne centavon da investo, kun la escepto, ke la entreprenisto por ĉaristo transprenis la ŝuldon, kiun tiu havis ĉe antaŭa mastro. Kaj tia ŝuldo estis ĉiam tre malalta kompare al la mono, kiun kostas bovo.

6/8

Unuopaj skipoj pri la veturtempoj de la ĉaroj ne estis regulitaj. La kolonestro aranĝis la veturtempojn laŭ sia plej bona juĝo.

En la varmega malalta regiono la ĉaroj veturas nur nokte, kaj dumtage ripozas la bovoj. En granda varmego ili ne marŝas tiel bone aŭ ili tute laciĝas jam post du horoj. Ili estas bestoj de la mezvarmaj zonoj kaj ili restas bestoj de tiuj zonoj, ankaŭ se ili

naskiĝas sur paŝtejo en la tropika regiono. Estas ne nur la varmego, kiu malpliigas la laborkapablon de bovoj. Estas ankaŭ miloj de grandaj ĉevalmuŝoj, kiuj ĉirkaŭsvarmas bovojn kaj elsuĉas ilian sangon. Tiuj muŝoj mordas nur dum hela sunlumo. Tuj kiam nubo kovras la sunon, la muŝoj malaperas kiel forsorĉitaj.

En la friska alta ebenaĵo la ĉaroj estas veturigataj ankaŭ dumtage. Ĉiu marŝo daŭras kvar ĝis ses horojn, laŭ la malfacileco de la vojo kaj laŭ la distanco de unu bona bivakejo ĝis alia. Poste oni ripozas kvar ĝis kvin horojn. Kaj tiam oni denove ekmarŝas.

Por centkilometra vojdistanco kolono de ĉaroj bezonas kvin ĝis sep tagojn.

La frajton oni prikalkulas laŭ pezo kaj distanco. De tempo al tempo ankaŭ per la spaco, kiun ĝi okupas. La pezunuoj estas *arroba* kaj *quintal*. *Arroba* havas dek unu kilogramojn kaj duonon; *quintal* havas kvardek kvin kilogramojn. La frajto por *arroba* kaj distanco de cent kilometroj kostas kutime peson, kelkfoje tri kvaronojn de peso aŭ ofte eĉ nur duonon de peso. La pezon oni plej ofte ne pesas per pesilo, sed la kolonestro taksas ĝin. Ankaŭ la vojdistancon oni taksas. Oni ne prikalkulas ĝin per kilometroj, sed per *legua*, do per leŭgo. Unu leŭgo havas ĉirkaŭ kvar kilometrojn. Sed tiun ĉi leŭgon la kolonestro mezuras laŭ la tempo, kiun li bezonas por trapasi kvar kilometrojn. Kelkaj distancoj, kiujn li taksas kiel dek leŭgojn efektive havas, se oni mezuras ilin precize, nur ok kaj duonon aŭ nur sep leŭgojn, dum alia vojo, kiun li taksas kiel dek du leŭgojn efektive havas dek kvin leŭgojn. La vojdistancoj, foje iam taksitaj de ĉaristo aŭ mulisto, ne plu ŝanĝiĝas. Ili ne ŝanĝis ilin dum longa tempo, eĉ tiukaze, se la inĝenieroj precize mezuris la vojdistancojn. La ĉaristoj, kiuj taksis tiujn vojdistancojn, mortis antaŭ tricent jaroj. Neniu scias iliajn nomojn. Sed oni prikalkulas ankoraŭ nun ĉiujn frajtojn laŭ tiuj taksoj.

Sed kiom ajn malefika kaj primitiva tio ŝajne estas por civilizita eŭropano, lastfine ĉio ekvilibriĝas en mirinda harmonio. Ĉu estas kvin leŭgoj pli aŭ malpli, ĉu la pezo pesas duonon de kilogramo pli aŭ malpli, tion oni ne traktas tiel skrupule. La frajtentreprenisto interkonsentiĝas kun la klientoj, aŭ kiam li transprenas la frajton aŭ kiam li liveros ĝin.

„Aŭskultu, *don* Laŭreano, vi prikalkulis dek *arrobas* por la kesto, sed estas apenaŭ ok. Kiel vi tiukaze de mi povas postuli dek kvin pesojn por la frajto?“ demandas la komercisto.

Al tio *don* Laŭreano replikas: „*Don* Miguel, sed tion vi devas koncedi al mi, ke la kesto estas granda kaj peza. Mi ja ne scias, kion ajn vi havas en ĝi. Dek kvin pesoj estas vere sufiĉe malkaraj. Mi ne scias, kiel mi faru tiel gajnon. La maizo pli kaj pli kostas, kaj la *muchachos* volas havi pli kaj pli da salajro. Vi scias bone, *don* Miguel, ke tio estas preskaŭ kvardek leŭgoj, sed mi prikalkulis nur tridek kvin. Tamen, tiom rigora ankaŭ mi ne estas, kaj ni ja denove kune faros aliajn negocojn. Bone, pagu al mi dek tri pesojn kaj kvindek centavojn. Tion vi vere povas pagi al mi, *don* Miguel.“

Tiam ili interkonsentiĝis pri dek du pesoj kaj okdek centavoj, ambaŭ estis tre kontentaj, kaj ne postrestis ĉagreno pro tiu negoco.

Kiam *don* Miguel pagis ĉe la fervojo ekspresfrajton, li pagis precize ĝiscentave tion, kio estis skribita sur la frajtletero. La fervoja entrepreno ja ne zorgas pri tio, ĉu *don* Miguel restas amiko ĉu ne. Kaj la oficistoj, kiuj ne respondecis pri la frajttarifoj de la fervoja entrepreno, ne lasis tiri sin en longe daŭrajn debatojn kun *don* Miguel. Ili havis siajn fiksitajn laborhorojn; kaj post kiam tiuj pasis, ili iris hejmen, egale, ĉu *don* Miguel ricevis sian keston ĉu ne.

Ĉapitro 7

7/1

Andreo havis nun preskaŭ dek naŭ jarojn. Jam pli ol tri jarojn li laboris por *don* Laŭreano kiel ĉaristo. Lia ŝuldo de dudek kvin pesoĵ, por kiuj li transiris en la posedon de *don* Laŭreano, estis delonge pagita kaj li ricevis nun jam dum longa tempo sian salajron kontante.

La salajron li ne ricevis ĉiun monaton ĝustatempe, tiel, kiel tio devus esti. *Don* Laŭreano pagis tiel, kiel plaĉis al li, kaj kiam li supozis, ke tiuj kelkaj salajraj pesoĵ estas malhaveblaj sen tio, ke la negocoj pro tio suferus damaĝon.

Intertempe Andreo fariĝis tre bona kaj diligenta ĉaristo. Li konis la vojon de Arriaga ĝis *Balún-Canán* tiel bone, ke li kapablis sekure preterveturi en la plej tenebra nokto ĉiun truon kaj ĉiun terodegliton de la vojo, ĉar li konis ĉiun ŝtonon sur la vojo, ĉiun unuopan vojkurbigon, ĉiun marĉan grundon, ĉiun trairejon, kie oni travadas riveron. Li konis la profundecon de ĉiu rivera vadejo, ĝiscole precize, li sciis, kie estas la plej bona loko por vadi tra la rivero meze de junio aŭ en la mezo de septembro. Tiuj ejoj, kie eblis travadi la riveron, ŝanĝiĝis laŭ falinta pluva kvanto. En la pluvotempo oni devis atendi de tempo al tempo kelkajn horojn aŭ eĉ tagduonojn, ĝis kiam la akvo sufiĉe defluis, por ke la varoj en la ĉaro ne malsekiĝu. Li konis ĉiun haltejon ĉe la vojo laŭ la nomo donita de tiuj ĉaristoj, kiuj tie restadis antaŭ du jarcentoj kiel la unuaj. Li sciis ĉiun paŝtejon ĉe la vojo, ties nutraĵajn valorojn por la bovoj kaj kiom da ĉaroj ĝi akceptas laŭ grandeco. Li sciis ĉiun ranĉon kaj ĉiun solan indiĝenan kabanon ĉe la vojrandoj kaj konis ĉiujn homojn loĝantajn ĉe la vojo. Li lernis, kiel plej avantaĝe ŝarĝi ĉaron, li lernis, kiel ĝuste trakti la bovojn, por ke ili laboru tiom, kiom eblas maksimume. Kaj li sciis ĉiujn

eblojn kiel lerte ripari rompitan radon aŭ akson de ĉaro. Kio ajn okazis sur la vojo, li ĉiam sciis, kiel helpi al si, ankaŭ se li estis sola. Multajn fojojn li jam kiel kolonestro tute sen helpo kondukis malgrandajn marŝkolonojn. *Don* Laŭreano povis diri eĉ ne unu nefavoran vorton kontraŭ li kaj lia laboro. En ĉiu rilato li multe pli bone lernis esti majstro ol iam atendis tion la patrono.

Tial li plialtigis la salajron de *Andreo*. Li ricevis nun kvardek centavojn ĉiutage, dek du pesojn ĉiumonate. Jen tre bela kaj fieriga sumo, se li komparis ĝin kun la kvar aŭ kvin pesoĵ ĉiumonate, kiujn perlaboris tiuj peonoj, kiuj ĉiutage devis labori dek ses horojn en la sukermuelejoj, en brandofabrikoj, prilaborejoj de sisalo, tegolaj fabrikoj kaj lignokortoj, kiuj ĉiuj troviĝis proksime de la vojo. Tiuj laboristoj, kiuj vivis kun siaj familioj pli aĉe kaj pli mizere ol bestoj. Kompare al ili li vivis streĉan vivon kiel ili, sed lia vivo estis libera. Li kaj liaj kamaradoj ne estis ligitaj al horoj. Li laboris sufiĉe streĉe, sed li ne laboris ĝis ftiziĝo, ne tiel, kiel la eterne malsataj peonoj en la haciendaj fabrikoj, en kiuj oni prilaboris agrokulturajn produktojn. Se li bone ŝarĝis la frajton kaj lia ĉaro estis en bona marŝkondiĉo, se la bovoj ne estis tro lacigitaj kaj ankoraŭ ne laboris tro longe, kaj se la vojo estis bona, li povis sidi dum horoj sur la ĉaro kaj revii kaj rigardi la belaĵojn de la ĉirkaŭa naturo.

La bovoj, kiuj deĵoris jam kelkajn jarojn, kaj kiuj jam marŝis multajn fojojn la vojon, ofte sciis la vojon pli bone ol la ĉaristoj mem. Tio estis normala, ĉar la bovoj kun siaj nazoj kaj okuloj estis pli proksimaj al la vojo ol la pelistoj. Kaj la spertaj bovoj neniukaze estis tiel stultaj, kiel oni supozas bovon, se oni volas insulti aŭ ĉagreni per tiu nomo kunhomon. Ili trotadis tre lante, ĉar tio estis tiel indiferenta kiel siropo al ili, ĉu la ĉaro ankoraŭ hodiaŭ aŭ nur la sekvan semajnon atingos la vojaĝan celon. Ili havis tempon, kaj ili prenis tiun tempon por la manĝo kaj por la laboro. Eble ili sciis, ke ili ĉiam estos bovoj, kaj ke ili tiom longe,

kiom ili estos sur la piedoj, devos tiri ĉaron. Ili estis filozofoj kaj sciis sufiĉe bone, ke tio ne ŝanĝos ilian sorton, ĉu ili rapidos sur la marŝo ĉu ne. Estas ĉiam nur certaj proletoj, kiuj havas malpli da prudento ol bovoj kaj tial supozas, ke ili efektive iutage fariĝos fabrikestro aŭ membro de kontrolkonsilio, se ili fervore kaj streĉe laboras kaj ĉe ĉiuj siaj laboroj rapidas por plaĉi al siaj pelistoj. Tial estas ofendo por la bovo, sed ne por la proleto, se oni diras al proleto: „Kara mia, vi estas ja stulta kiel bovo!“ La bovo havus la rajton plendi ĉe jura instanco pro tiu ofendo, sed ne la laboristo. Rondigite prikalkulite la kvanto de mil proletoj estas proporcia al unu fabrikestro. Tion scias bovo sen la studado de statistikoj; sed proleto vendiĝas ĉiutage denove kun la fama kaj efika marŝalbastono en la tornistro.

La bovoj vere ne estis stultaj. Ili sciis sian vojon kaj ili laboris eĉ ne unu paŝon pli ol ili supozis konvena por siaj vivofortoj. Kompreneble ili ne blinde troitis antaŭen. Antaŭe ili detale rigardis la vojon, kaj tiam ili preteriris ĉiun rokan ŝtonon, ĉiun truon, ĉiun terdegliton, ĉiun arban radikon plenan de tuberoj tiom distance, kiom la alligita ĉaro permesis tion al ili. Ili faris tion certe ne por plaĉi al siaj pelistoj, sed por la propra avantaĝo. Tio plifaciligis ilian laboron kaj alvenigis ilin pli rapide al la sekva ripozejo. Tiom multe lernis ĉiuj bovoj, kaj pli ili ne devis lerni, ĉar oni bonŝance ne povis persvadi ilin, ke ili, se ili pli fervore kaj pli diligente laborus, povus preni la marŝalbastonon el sia tornistro kaj transformiĝi en la bone flegatan rajdoĉevalon de generalo. Sed, ĉar ili plifaciligis sian propran laboron, plifaciligis ankaŭ la laboro de iliaj kondukantoj. La ĉaristoj, kiuj havis spertajn bovojn antaŭ siaj ĉaroj, povis tiom revii kaj dormeti, kiom ili volis.

Bone scii la laborvaloron de la bovoj de sia kolono kaj la plej bonajn elserĉi je la komenco de veturo, tion strebis ĉiu sperta ĉaristo. La kolonestro de ĉiu marŝkolono, kiu devas atenti ankaŭ ĉiujn ceterajn ĉarojn, elektas al si unue siajn bovojn. Tiam sekvas

la ĉaristo, kiu servas jam la plej longan tempon ĉe la patrono. La ceteraj devas preni tiujn, kiuj postrestas.

Andreo lernis de spertaj ĉaristoj, kiel oni faru tion, se oni por marŝo volas interŝanĝi la proprajn bovojn kontraŭ pli bonaj de alia ĉaristo. Ĉar okazas, ke la bovoj pro tiu aŭ tiu kaŭzo ŝanĝas sian laborkvanton en marŝo. Ili ja malofte estas ĉiuj samaj rilate sian karakteron, siajn kapablojn, kapricojn kaj sian rezistovolon kontraŭ eksteraj cirkonstancoj, kiel ankaŭ la homoj ne ĉiuj estas samaj.

Kelkaj bovoj tiras bonege la unuajn kvindek kilometrojn. Poste ili malfortiĝas. Aliaj pliboniĝas dum la laboro, ili pli kaj pli adaptiĝas al ĝi kaj ŝajne tiras aldonajn fortojn el ĉiu nova marŝotago. Kelkaj faras diablajn malfacilaĵojn ĉe la trapaso de ŝlimaj vojdistancoj, sed sur rokecaj kaj malebenaj vojoj ili iras tiel trankvile kaj obeeme, kvazaŭ tio estus la vojo al la bovoparadizo.

Andreo havis la denaskan ruzecon de la subprematoj kaj elvringatoj de sia raso. Kaj ĉar la peonoj ekde la juneco dependas de tio, ke ili uzas sian ruzon por konservi sian vivon kaj por konservi sin kiel individuojn kaj kiel rason kontraŭ siaj mastroj, tiu ruzeco ne estas limigata de memĝenema moralo. Batu aŭ vi estos batata. Kaj se vi ne povas bati la alian, ĉar li estas via mastro, kiu rajtas mortpafi vin kiel hundon, se vi levis manon kontraŭ li, jen serpentumu kaj turnu vin tiel lerte, ke la bato vin ne trafu, kaj se ĝi tamen trafos vin, ke ĝi ne damaĝu tro al vi. La evitema pigrulo ĉe la soldatoj kaj ĉe la sklavo estas la prudentulo, la aliaj estas la stultuloj.

La plialtigon de sia salajro Andreo atingis per malgrandaj artifikoj. Nenie oni pagas la proletojn por tio, kion li faras efektive, sed nur por tio, kion li faras ŝajne laŭ la opinio de tiu, kiu pagas la salajron al li. Lia kulpo ne estis, ke lia moralo fariĝis tiu de fripono, estas la kulpo de tiuj, kiuj lasas al li nur tiom, kiom li nepre bezonas por kapabli labori. *Don Laŭreano* iam akompanis iun el siaj multnombraj kolonoj dum tuta tago, ĉar li ĝuste havis la saman vojon. La bovoj de ĉaro rifuzis tiri. Ili obstine rezistis kaj provis deĵeti la traban jugon. La kolonestro kaj la gvidanto de tiu ĉaro tre klopodis peli la bovojn antaŭen. Sen sukceso. *Don Laŭreano* venis al ili. Sed ankaŭ li ne sciis konsilon. Tiu ĉaro prokrastis la tutan marŝon. *Don Laŭreano* diris, ke li emas vendi la bovojn al amika frajtentreprenisto por superruzi lin, ĉar ili ne uzeblas. Kiam nun la tuta kolono haltis kaj ne povis veturi plu pro la obstine kontraŭstarema bovoparo, kaj kiam ĉiuj ceteraj ĉaristoj paroladis kaj ĉiu sciis ion alian, kio tamen ne helpis, venis kvazaŭ hazarde ankaŭ Andreo. Li provis peli la bovojn. Ili iris du, tri paŝojn, tiam ili denove rifuzis paŝi. „Mi supozas, ke mi scias, kial pigras la *bueyes*, la bovoj“, li diris. „Jes ja“, interrompis lin la kolonestro, „vi, knabo, venas kiel vokita, kvankam vi ankoraŭ estas malseka sub la postaĵo, vi volas diri al mi – al maljuna fakulo veturanta jam tridek jarojn sur tiu ĉi vojo – kio estas pri la bovoj. Kuru hejmen al via patrino, por ke ŝi ŝovu sekan vindon en vian pantalonon.“

Don Laŭreano staris tie, kaj diris nenion pri la babilado de ambaŭ. Sed Andreo ne lasis timigi sin. Li diris seke: „La rimenoj estas tro firme ligitaj al la jugotraboj, jen la problemo, aŭ tordiĝis dura rimeno.“ Sen atendi, kion la kolonestro diros, li iris al la bovoj kaj senrimenigis ilin. *Don Laŭreano* jam sidiĝis sur ŝtonon, ekbruligis plian cigaredon. Tiam li rigardis sufiĉe indifere, kion faras Andreo. Kiam Andreo estis foriginta la rimenojn, li

glatigis ilin, faris ilin laŭŝajne pli molaj kaj pli elastaj per sufiĉe granda kvanto da salivo kaj poste denove aljugigis la bovojn per rimenoj. „Ambaŭ bovoj ne eltenas tion, se oni tro firme ligas ilin per la rimenoj“, li diris. „Sed Lucio estas ankoraŭ tro nova ĉe ni, li ne konas sufiĉe la bestojn. Lia kulpo ne estas.“ Per tiuj vortoj li liberigis sian *compañero*-n Lucio de ĉiu kulpo kaj de ĉiu eblo esti atakata de *don* Laŭreano aŭ de la laborestro per laŭtaj riproĉoj pro la malbona fiksado de la rimenoj. Ĉe la deligado de la rimenoj Andreo starigis sin tiel lerte kaj faris tiajn man- kaj brakmovojn, ke tiel li ruze kovris per ombro certajn manipulojn tiel, ke nek *don* Laŭreano nek la kolonestro nek iu el la ceteraj ĉaristoj, ĉirkaŭstarantaj enuigite, povis observi la trompartifikon de Andreo. Li skulptis en la pasinta vespero el dura ligno malgrandajn pintajn konusojn. Kaj frue matene, kiam oni jungis la bovojn, li ruze ŝovis tiujn konusojn sub la rimenojn. En la unuaj tridek minutoj la bovoj ne sentis tiun maloportunaĵon, ili iris kiel kutime. Sed kiam la suno leviĝis kaj fariĝis varmega, la rimenoj iom post iom elsekiĝis kaj la konusetoj boris sin en la kapohaŭton de la bovoj. Post ĉiu plia kilometro, kiun la bovoj tiris, la konusetoj enboris sin pli profunden, frotis la haŭton, kaj kiam la haŭto estis vundfrotita, la konusetoj estigis eksterordinarajn dolorojn, kio instigis la bovojn fine kondukti kvazaŭ freneziĝinte. Andreo sciis tre bone, ke oni faris tian trukon de tempo al tempo per dornoj aŭ aliaj pikiloj, se oni volis ŝercmistifiki ĉariston. Sed la dornoj rapide pikis en la haŭton tiel, ke la bestoj ekde la komenco ne plu tiris. Tiukaze la ĉaristo kompreneble tuj sciis, pri kio temas. Li devis denove deligi la rimenojn kaj tiam plian fojon fiksi ilin. Jen la ŝerco, per kiu oni mistifikis flavbekulojn, por ke ili devu fari la laboron je dua fojo, kaj por ke oni povu nomi ilin stultuloj. Sed la artifiko kun la konuseto el dura ligno estis la eltrovaĵo de Andreo. La artifiko funkciis nur kun granda hezito kaj preskaŭ nerimarkeble. Eĉ la plej maljuna kaj plej sperta ĉaristo ne povis eltrovi, kio estas la kaŭzo, ke la bovoj unue bone marŝis kaj tiam pli kaj pli malobeis paŝi, antaŭ ol ili fine tute

rifuzis marŝi plu. Post kiam Andreo denove aljugigis kaj jungis la bovojn, li pelis ilin antaŭen. Kaj nun ili kuris tiel obeeme kaj gaje kiel altkvalite prizorgataj ĉevaloj de bierejo. La maljuna kolonestro gapis perplekse kaj decidis de nun rigardi Andreon kiel plenvaloran viron kaj maturan ĉariston, kies amikecon oni certigu por si. Des pli mirigite gapis la okuloj de *don* Laŭreano. Kvankam li ne komprenis multon pri la efektiva laboro de la ĉaristoj. Se li estus devigita konduki ĉaran kolonon de Arriaga al *Chiapa de Corso*, tiukaze estus dubinda, ĉu la karavano atingus la celon ankoraŭ en tiu ĉi jarcento. Kiam ili jam denove marŝis, li tiris Andreon ĉe okazo flanken kaj diris al li: „Aŭskultu, knabo, mi donas al vi nun tri realojn ĉiutage. Vi ellernis vian laboron kaj valoras nun la salajron de tridek ses centavoj ĉiutage.“ Plian altigon de lia salajro, kiun Andreo ricevis post kelke da tempo, li dankis denove al artífiko. En la jaroj de sia laboro kiel ĉaristo li akiris sufiĉe da saĝo por ekkoni, ke li nur pro tio, ke li fervore, streĉe kaj efike laboras, ne rajtas atendi agnoskon aŭ premion. Lian laboron oni ne multe atentis. Li devis rimarkigi sin al sia mastro, kaj li devis instigi la timon en sia mastro, ke tiu eĉ povus perdi la tre diligentan ĉariston, kiu scias pli bone trakti la bovojn ol maljuna laborestro, se li ne altigos iom lian salajron.

7/3

Pli ol kvar monatojn Andreo devis labori antaŭ ol estis nuligita la ŝuldo de dudek kvin pesoĵ, kiun lia antaŭa mastro forludis al sia aktuala. En tiuj ĉi kvar monatoj Andreo devis aĉeti al si kvin ĉemizojn, tri kalsonetojn, kvar pantalonojn, bastĉapelon, novan lanan kovrilon kaj kotonjakon. La laboro de ĉaristo voras ties vestojn kiel sulfata acido. Ĉe kesto elstaras najlo, ĉe alia kesto longa ligna splitaĵo, kaj ĉe la ŝarĝado najlo difektas la ĉemizon aŭ la pantalonon, kaj la vestoj dum mallonga tempo fendigâs striforme. Ĉe la marŝo la vestoj dum horo per pluvo tute malsekiĝas, kaj la sekvan horon la tropika suno sekigas la vestojn

sur la korpo tiom rapide, ke la ĉemizoj kaj pantalonoj post kelkaj tagoj estas kiel tindro kaj tuj disfalus, se oni, pasante rokfronton, nur tuŝus ĝin. Ĉe la vojo mem estas dornaj arbustoj kaj pikilhavaj kreskaĵoj, kiuj sur la vestoj deŝiras ie vestopecetojn, kaj ie tranĉas fendetojn en ilin. Eĉ, se oni kiel ajn bone atentis. Ĉe ĉiu manipulo, kiu necesas ĉe la ŝarĝado aŭ ĉe la marŝo, perdiĝas peceto de la vestaĵo. La ĉaristo ĉe la vojrandoj aĉetas de tempo al tempo komitekon, kiam estas vere tro fride kaj pluve kaj liaj vestoj ne fariĝas sekaj. Kelkfoje li aĉetas citronojn por fari limonadon, cigaredoskatolon, kelkajn manĝojn aŭ fromaĝopecon, por iom pliriĉigi sian vivon. Alitempe li venas al loko, kie estas festo aŭ foiro, kaj li ne volas stari ĉeflanke kiel forpelito. Ankaŭ li volas foje iom plezuriĝi. Li aĉetas buŝharmonikon aŭ malmultekostan gitaron por serenigi la vesperojn ĉirkaŭ la fajro, kiuj sufiĉe ofte estas tristaj. Krome li devas ĉeokaze aĉeti sapopeceton, lia hararo bezonas tondadon, foje li perdas sian lignan kombilon kaj bezonas novan. Iam disrompiĝas ĉe la marŝo la botelo kun *creolina*, kiun li bezonas por kuraci bovojn, kaj li do devas aĉeti ĝin kaj novan botelon. Aĉeti ŝuojn por protekti siajn piedojn sur la ŝtonplenaj vojoj, kie kuŝas ĉiaspecaj dornoj kaj pikiloj, pri tio li eĉ ne povas pensi. Li ne havas ŝuojn kaj li ne povas aĉeti ŝuojn. Li estas jam kontenta, se li povas havigi krudan ledon, por fliki la indiĝenajn sandalojn, kiujn li uzas. Kiel ajn li kalkulas kaj ŝparadas kaj vivadas eĉ pli mizere, ĉiam li ŝuldas antaŭpagon al sia mastro, ĉar sur la tuta tero nur tiu donas krediton al li. Ĉiujn aĵojn, kiujn li bezonas, kiel ekzemple ĉemizojn kaj pantalonojn kaj kovrilojn, li devas aĉeti de sia mastro, ĉar neniu komercisto ion pruntedonas al li. Kaj lia mastro fiksas la prezojn por la varoj, kiujn li vendas al siaj ĉaristoj. La antaŭpago estas ŝuldo. Kaj tiom longe, kiom li havas ŝuldojn, li ne rajtas forkuri. La polico kaptus lin, kaj la kostojn de lia kapto oni enskribus debetflanke de lia konto. Sed ĉaristo ne estas peono, kiu estas fiksa kapitalo de bieno aŭ de bienego. Li estas libera laboristo. Li devas pagi nur sian ŝuldon, kiun li havas ĉe sia patrono, kaj poste li povas iri tien,

kien li volas. La tuta mondo estas lia, kaj ĉio, kion tiu mondo produktas. Neniu devigas lin fari ŝuldojn, nek la leĝoj, nek la ŝtato. Li estas tute libera fari aŭ ne fari ŝuldojn. Se li ne uzas tiun liberon por si mem, oni povas respondeciĝi nek lian mastron, nek la ŝtaton nek la diktatoron Porfirio Diaz. Kaj, se li ne amasigas proprajon por fariĝi iutage mem frajtentreprenisto aŭ fabrikposedanto aŭ posedanto de bieno, tiukaze estas nur tial, ĉar li ne ŝparas. La mondo estas malfermita por ĉiu, kiu volas fondi bankon. Kaj, ĉar la proleto ne ŝparas, sed ĉion fordiboĉas kaj fordrinkas, tial li estas proleto kaj ne bankiero. La kapitalisma ekonomia sistemo estas nur mito, kiun la agitistoj kaj aliaj anarkiistoj kolportas por ekflamigi la mondorevolucion kaj tiel transpreni la bankojn kaj la parfumitajn filinojn de la membroj de la kontrolkonsilio. Ŝparu, proleto, kaj tiukaze vi povos akiri bankon tuj ĉe la sekva stratangulo, sen devi klopodi pri la monda revolucio.

Rimarko

Creolina = kontraŭinsekta likvaĵo, uzita ankaŭ kontraŭ puloj sur hundoj

7/4

Kiam Andreo jam forlaboris la ŝuldon de dudek kvin pesoĵ, li ŝuldis al *don* Laŭreano persone kvardek du pesoĵn por varoj, kiujn li ricevis de li, kaj dek ses kontantajn pesoĵn, kiujn li bezonis por aliaj aferoj.

Kiam li jam pli ol tri jarojn lojale kaj fidele kaj kun vera kristaneca humileco kaj modesto servis al sia mastro, li ŝuldis al *don* Laŭreano naŭdek kvar pesoĵn. Matematikisto ja ne per la propabla kalkulo, sed sendube per la certeckalkulo dum du minutoj povus diri al li, ke tiukaze, se li servus plu tiel fidele kaj obeeme kiel antaŭe al sia mastro dum kvardek jaroj, li ŝuldus al *don* Laŭreano aŭ al ties filo naŭcent dudek kvar pesoĵn kaj tridek

centavojn, precize kunkalkulinte ĉiujn plialtigojn de la salajro, kiujn Andreo estus sekuriginta al si pro fideleco aŭ lojaleco aŭ per artifiko.

Andreo, kiel ĉiuj ĉaristoj, rigardis kun bedaŭro kaj kompato malsupren sur la povrajn peonojn, kiuj ne estis liberaj, kaj kiuj restis ligitaj al la bieno, al kiu ili apartenis.

Kaj estis efektive granda diferenco inter la ekonomiaj kaj sociaj liberecoj de la ĉaristoj kaj de la peonoj en bieno.

Se ĉaristo ĉe la marŝo falis en ravinon kaj rompis sian nukon aŭ ĉaro veturis sur lin kaj dispremis lin aŭ sovaĝiĝinta bovo lin surpikis aŭ sonserpento mordis en nudan piedon de li aŭ marĉa febro forkonsumis lin, lia ŝuldo post tio ĉe la patrono estis nuligita. La patrono certe ne priplendis la ĉariston, kiu mortaĉis ĉe sia laboro, sed la perdiĝintan ŝuldosumon. La ĉaristo nun almenaŭ estis libera kaj bone konservata en la paradizo.

Male, se peono mortis, la bienulo ne perdis eĉ centavon de la ŝuldo de la peono. Kvazaŭ tio estus memkomprenebla afero, la ŝuldo transiris sen vorto al la plej maljuna filo de la peono, aŭ oni distribuis ĝin al ĉiuj filoj, aŭ ĝi transiris al la frato de la morta peono, se ne estis filoj, aŭ ili transiris al la edzoj de liaj filinoj, se li havis nur filinojn.

Se la peono estis entombigita, la patrono kunvokis la respondecajn filojn aŭ fratojn aŭ bofilojn, montris al ili la kontolibron kaj la debetan saldon de la mortinto kaj demandis: „Ĉu tio estas laŭorda?“ Kaj la demandito respondis: „Jes, patrono, tio estas laŭorda!“

Tiam la patrono foliumis ĝis la debeta saldo de la demandito, enskribis la ŝuldosumon de la mortinto, kunkalkulis la du

debetojn, diris la novan finsumon kaj demandis pluan fojon: „Ĉu tio estas en ordo, *muchacho*?“

Kaj la demandito diris: „Jes, tio estas en ordo, patrono!“

Post kiam tio okazis, la patrono malfermis la malgrandan bienan kapelon, kaj la edzinoj de la peonoj rajtis eniri por starigi kelkajn kandelojn por la animo de la mortinto sur la altaron de la sankta protektanto de la bieno kaj por ekbruligi la kandelojn.

La patrono de la bieno estis ja bona katoliko, al kiu oni notus tion kiel pekon, se li eble eĉ ne permesus oferi kelkajn kandelojn por la eterna paco de mortinta katoliko, eĉ se li estas nur povra peono.

Tio estis justa. Tio validis kiel justa. Kaj ĉar estis juste, oni gardis tion kiel ĉion alian, kio estas justa per leĝoj kaj per la ŝtato. Kiun sencon havus ŝtato, se ĝi tion, kio estas justa, ne volus gardi per la polico kaj per siaj soldatoj kaj juĝistoj kaj prizonoj?

Estis tiuj malgrandaj diferencoj, kiuj permesis al la ĉaristoj konsideri sin sur la socia eskalo rangoŝtupon pli alta ol la peonoj de bieno.

La mondo estas plena de justeco. Estas la eraro de la ĉaristoj kaj de la peonoj kaj de ĉiuj proletoj sur la mondo, ke ili ne uzas la justecon, kiu havigeblas senpage. Neniu devigas ĉariston, eble eĉ per ŝarĝita revolvero premita sur la bruston, fari ŝuldojn. Neniu surtere devigas iun. Eĉ ne kiom ajn monavida bienulo devigas peonon fari ŝuldojn. Aŭ fari aŭ ne fari ŝuldojn, tio estas la granda libereco de la proleto.

Se la ĉaristo kaj la peono uzas malĝuste kaj eĉ endanĝerigante sin mem tiun grandan liberon, kiu formas en la naciaj himnoj de ĉiuj

popoloj la kernon de la kantado, oni ne kulpigu la bienposedanton aŭ la frajtentrepreniston pri tio. Tio estas maljusta kaj ne tre nobla.

Ĉiuj homoj, sen escepto, havas ekde la naskiĝo liberan volon. Por ĉiu individuo ambaŭ vojoj estas malfermitaj, la vojo al la infero, kaj la vojo al la eternaj ĝojoj kaj jubilaj kantadoj de l' paradizo. La kreinto de la vortoj „salajro-sklavo“ kaj „sklavo de la ekonomiaj rilatoj“ estas la antikristo. La sama antikristo, pri kiu jam la apostoloj diris: Gardu vin kontraŭ tiaj. Pendumi ilin, aŭ meti ilin sur la elektran seĝon, aŭ nomi ilin fantaziuloj kaj detruantoj de la ŝtato, estas la sankta devo de ĉiuj bonuloj, de ĉiuj justuloj kaj de ĉiuj noblaj homoj.

Ĉapitro 8

8/1

Estis la lasta semajno de januaro. Meze de februaro oni festis en *Balún-Canán* la feston de sanktulo *Caralampio*.

Sankta *Carlampio* estas la sankta patrono de la urbo *Balún-Canán*. Li estis samtempe ankaŭ la sankta patrono por la urbeto *Sapaluta*, situanta sur la vasta ebenaĵo de *Balún-Canán*, ĉirkaŭ dudek kilometrojn malproksime de ĝi.

Kiel la sanktulo *Caralampio* venis al la honoro fariĝi la sankta protektanto de *Balún-Canán*, certe apenaŭ li mem povus respondi. Estis krome neniuj, kiu sciis, kial *San Caralampio* estis elektita gardi la urbon *Balún-Canán* kontraŭ la diablo kaj ĉiuj ceteraj danĝeroj. Kaj kiu decidis, ke li estu la sankta protektanto. Ankaŭ la *curas*, la klerikaro en *Balún-Canán* embarasiĝus, se ili koncize

kaj klare devus diri la kaŭzojn, kial Caralampio por la urbo fariĝis tiel grava sanktulo. Kaj neniu, inkluzive de ĉiuj klerikoj, sciis kun certeco, kiu fakte estis *San Caralampio*, kiam li vivis, kion li faris, ke oni sanktuligis lin. Ĉiu kontentiĝis per la fakto, ke lia figuro el ligno staras en la ĉefa preĝejo en *Bahún-Canán* kaj en la preĝejo en Sapoluta, kie ĉiu povas rigardi lin kiel enkorpiĝintan personon antaŭ si, por konvinkiĝi, ke *San Caralampio* efektive ekzistas.

La festo honore al la sanktulo *Caralampio* estis nenio alia krom pura kaj nuda komerca afero.

La festo daŭris tutan semajnon. Kaj ĉar ĝi estis ligita al antaŭ-festoj kaj postfestoj, ĝi daŭris fakte almenaŭ du semajnojn.

En tiuj du semajnoj faris la eklezio sian plej lukran negocon en la tuta jaro. Bonegan negocon faris la centoj de ĉirkaŭvagantaj komercistoj kaj la posedantoj de ludotabloj, kiuj el ĉiuj lokoj kaj anguloj de la ŝtato migris al tiu festo por senpezigi la piajn festpartoprenantojn de mono, havaĵo kaj posedaĵo.

Arope alvenis: petantoj de almozoj, kripluloj, poŝoŝtelistoj, friponoj, ludkarttranĉistoj, poluristoj de ĵetkuboj, aŭguristoj, fajroglutistoj, sabroglutistoj, serpentohomoj.

En la kantinoj oni stimulis la negocon per tielnomataj kelnerinoj, kiuj alvenis trupope kun siaj „patrinoj“ kaj „nutristinoj“. La patrinoj kaj nutristinoj estis la afergvidantoj de tiuj inoj.

Ĉion, kio iel eblas sub la suno, permesis la urba administraro ĉe tiu tiom pia sankta festo. Ĉar ankaŭ por la urbestro, por la imposta kolektisto, la impostmarka administranto kaj la polica prezidanto dum tiuj du semajnoj estis la plej grava kaj plej granda negoco de la jaro. Pro tiu granda negoco centoj de revolverpafoj, rivalaj kandidatoj mortpafitaj kaj balotantoj plivigligis la balot-

ojn de la urbaj oficistoj kaj de la polica ĉefo. Ĉar ĉiuj komercistoj devis pagi altan standokotizon. La ludado pri mono estis malpermesita laŭ leĝo en la tuta respubliko. Kaj ĉar nur la urbestro, la polica ĉefo kaj la politika ĉefo por tio povis doni la specialan permeson, la posedantoj de ludotabloj devis aĉeti tiun permeson per multe da mono. Sed eksterordinare multan monon devis pagi la *cantineros*, la kantinaj posedantoj, por la permeso okupi dum du semajnoj kelnerinojn por la priservado. Kaj la „patrinoj“ de la kelnerinoj devis bone pagi al la urbestro kaj al la ceteraj superaj aŭtoritatoj, por ke ili ricevu la permeson sendi ĉeokaze kelnerinojn kun gasto por horo en ĉambron. Ankaŭ la piaj civitanoj, kiuj ludonis siajn bonajn loĝoĉambrojn kaj siajn geedzajn litojn hore al la kelnerinoj, devis aĉeti tiun ludonan permeson per atentindaj sumoj de la superaj aŭtoritatoj. Por nenio oni ricevas ja nenion en tiu ĉi mondo. Ankaŭ la kuracisto, kiu ricevis de la aŭtoritatoj la privilegion ekzameni la kelnerinojn kaj skribi por ili sanecan ateston, devis interkonsentiĝi kun la urbestro rilate tiun privilegion, por ke ne ricevu ĝin eble alia kuracisto, kiu pagas pli. Ĉiu kelnerino devis renovigi la sanecan ateston trifoje dum semajno. Tio estis preskribo, kiun proklamis la urbestro kaj la polica ĉefo. Por ĉiu atesto la kelnerino devis pagi tri pesojn. Tiel ankaŭ la kuracisto konsideris la sanktigitan feston honore al *San Caralampio* kiel sian plej lukran negocon en la jaro. Lia bona burĝa klientaro lasis sin kuraci nur fakte; kaj tiuj fakturoj restis kelkfoje nepagitaj dum tri aŭ kvar jaroj. La kelnerinoj male al tio estis honesta klientaro, kiuj tuj pagis kaj ne tordis acide la vizaĝon.

La urba administraro faris ion por la mono, tiel, ke neniu en la urbo povis diri, ke la mono foriĝas en la poŝoj de viroj, kiuj apartenas al la administraro. La aŭtoritatoj aĉetis por ducent pesoj aŭ simila sumo raketojn kaj aliajn petardojn kaj aranĝis piroteknikajn lumludojn por plezurigi la loĝantaron. Ili neniam studis romian historion, sed laŭ ennaskita prudento ili agis laŭ la antik-

va romia ŝtatfilozofio: Pano kaj cirko. Ankaŭ la panon ili ne forgesis. Oni rostis bovon kaj kelkajn porkojn sur placo, kaj ĉiuj povruloj ricevis pecon de *barbacoa*. Ankaŭ pere de la lumludoj kaj la rostiloj la aŭtoritatoj enspezis, ĉar la viro, kiu volis vendi la pireteknikaĵojn al la urbo, kaj tiu, kiu liveris la rostkradojn, devis pagi honoran sumon al la disdonanto de tiuj komisionoj, por ke ne ricevu alia viro, kiu same aspiras la negocon, la komision. Neniu surtere atendas, ke iu plezurigas sen pago la popolon kaj sen kostoj nutras la povrulojn. Neniu homo povas fari tion, se li ne volas esti rigardata stultulo. Kaj ĉar tiuj viroj volis enspezi monon, ja eĉ devis enspezi ĝin, ili liveris apenaŭ la duonon de tio, kion la aŭtoritatoj pagis, aŭ ili liveris varojn tiel aĉajn, ke ili valoris eĉ multe malpli ol duonon. Ĉar ĉiu el la superaj oficistoj ie kaj iel havis manon en la ludo, neniu kontrolis tion. Tio kaŭzus ja en ĉiu kazo nur problemojn kaj ĉagrenon, kaj oni farus nenecese malamikojn. Por kio tio? La vivo estas multe pli suneca, se oni kontrolas nenion. La urbestro, la impostoficisto kaj la polica ĉefo, ĉiuj havas sufiĉe da zorgoj surtere. Kial oni ankoraŭ eĉ pli tristigu al ili la vivon, kiu jam per si mem estas malgaja, per tio, ke oni precize kontrolu iliajn kasojn kaj fakturajn librojn kaj kvitancojn kaj liverajn slipojn. Se efektive iu iam ordonas revizion – la diablo sciu, kiu – tiukaze ja ankaŭ tiuj homoj scias sufiĉe bone ŝati la valoron de kvindek peso, kiujn oni tiel facile perlaboras kvazaŭ preterire. Ni ja ĉiuj estas fratoj, kaj ĉiu el ni malpurigis jam siajn manojn, ĝi restas ja inter fratoj, ĝi restas ja en la lando. *Viva La Patria!* Vivu la bela patrujo! Kaj tie, kie la amata patrujo ne estas favora al via negoco, jen fabriku kanonojn kaj municion por la tradicia malamiko, kiu embuskas nin.

Andreo gvidis malgrandan ĉarokaravanon de *Chiapa de Corso* al Sapoluta.

Don Laŭreano konfidis la gvidadon de tiu karavano al li, ĉar tiu vojo prezentis nur kelkajn komplikaĵojn, kaj ĉar estis seka sezono. Krome *don* Laŭreano ĝuste en tiuj semajnoj ne povis rezigni pri la pli spertaj ĉaristoj, ĉar li havis eksterordinare multe da frajto sur la vojo de Arriaga al *Tuxtla* kaj la fraĵtaĵoj estis tiaj, ke necesis tre spertaj ĉaristoj, por ke la varoj ne ricevu damaĝon.

La gvidado de la karavano, estis por Andreo ankaŭ tial simpla, ĉar ĝin akompanis multaj komercistoj, viroj kaj inoj, kiuj transportis siajn varojn per ĉaroj al Sapoluta. Tiuj komercistoj havis personan intereson, ke la varoj bonorde atingu la celon. Se io okazus sur la vojo, rompo de rado aŭ necesa plibonigo de deglita voja ero, ili diligente helpus per fortaj manoj savi siajn varojn kaj atingi ankoraŭ ĝustatempe la foirplacon.

Sapoluta, kiu verŝajne havis la saman protektan sanktulon *Carampio* kiel *Balún-Canán*, ĉar la homoj ne havis sufiĉe da fantazio aŭ sciojn pri sanktuloj por elekti propran sanktulon, festis la feston jam du semajnoj pli frue ol *Balún-Canán*. Bonaj negocaj kaŭzoj instigis la piajn homojn de Sapoluta festi ne samtempe kun *Balún-Canán*. Alikaze ili estus devintaj dividi la enspezojn kun la multe pli granda urbo.

Nun ili havis la negocon tute por si mem, kaj ili povis ĉerpi la unuan plej dikan kremon.

Al la festo venis centoj da vizitantoj de *Balún-Canán*. Ili uzis la okazon de la festo por viziti amikojn kaj parencojn, kiujn ili tiom longe ne vidis kaj tamen amis tiel elkore. Per tio ili gajnis la

monon por nutrado kaj loĝado, kaj tiel ŝparis la kostojn por la hotelo. Ke oni pri ili poste parolis malice, ĉar ili estis granda ŝarĝo, tio ne ĝenis ilin, ĉar ili ja ne aŭdis tion. La bonaj homoj de Sapaluta tamen ne vane penis, ĉar la bonaj homoj de Sapaluta du semajnojn poste ĉiuj iris al *Balún-Canán* kaj tie ĉe la parencoj kaj amikoj serĉis kaj trovis nutrandon kaj loĝejon.

Sed ĉio ĉi helpis al la negoco. Ĉar la centoj da vizitantoj el ambaŭ urboj konsiderinde pligrandigis la nombron de la konsumantoj. Kaj kie estas multaj konsumantoj, tie oni havas la bonŝancon pri floranta negoco.

La tuta regiono en ĉirkaŭo de cent kilometroj vivis pro tiuj du festoj kvar semajnojn en deliro de ekscitiĝo, el kiu la tieaj loĝantoj vekiĝis nur tiam, kiam farendis la preparaj laboroj por *Semana Santa*, la Sankta Semajno. La Sanktan Semajnon festis ĉiu loko, kiom ajn malgranda ĝi estis por si mem, sen la partopreno de eksteraj vizitantoj. En tiu semajno la kernpunkto de la plezuro estis forbruligi la *judíos*, la tielnomatajn „judojn“ aŭ meti raketojn en la kartonkorpojn kaj eskplodigi ilin en la ventojn.

Ĉe tiuj du festoj de San *Caralampio* precipe la eklezio riĉe kontentigis siajn bezonojn. Neniu riproĉu la eklezion pri tio. La eklezio kreis krom la kvardek kvar mil aliaj sanktuloj ankaŭ la sanktulon *Caralampio*, kaj tial estis nur ĝuste kaj juste, ke ankaŭ la ekleziuloj ne staru kun malplenaj manoj ĉe la festo.

La centoj de vizitantoj, kiuj venis el *Balún-Canán* al Sapaluta, konsideris tion sia unua devo saluti la sanktulon *Caralampio* kaj doni monon al la eklezio. Kaj kiam la kontraŭvizitantoj de Sapaluta venis al la festo de *Balún-Canán*, estis same necese por la savo de la animoj, ke ili montru sian respekton al *San Caralampio* ankaŭ en la katedralo de *Balún-Canán*, kaj ke ankaŭ ili donu monon al la eklezio. La plej piaj homoj de la regiono, eĉ, se ili

havis nek en Sapoluta nek en *Balún-Canán* la rajton pri daŭra loĝadejo, pilgrimis al ambaŭ festoj por ne neglekti eble ion ĉe la adorado de *San Caralampio*. Pli bone dufoje doni monon al la eklezio ol nur unufoje. Sekure estas sekure. Ĉe religiaj aferoj estas multe pli bone, fari bonon tro ofte kaj tro supermezure ol tro malofte. Neniu centavo oferita al la eklezio estos forgesita, kiel oni povas legi en la preĝejoj sufiĉe klare sur la oferkesto.

La preĝejoj de Sapoluta kaj de *Balún-Canán* prenis la monon ne nur de la piuloj. La eklezio ne atentis pri tio, de kie ĝi venas kaj kiel la mono estas akirita. Des pli ĝi interesiĝas pri tio nombri la ricevitan monon, pro la trezoroj, kiujn konsumas tinea kaj rusto.

Ĉiuj komercistoj kaj ĉiuj posedantoj de ludotabloj iris, tuj, post kiam ili starigis sian standon kaj pagis ĉe la aŭtoritatoj la standokotizon kaj la imposton, en la preĝejon por petegi la sanktulon *Caralampio*, je kies honoro kaj invito ili venis ĉi tien, ke li benu iliajn negocojn per riĉa gajno, ĉar ili faris tiun longan kaj penigan vojaĝon nur tial, kvankam ili prefere restus hejme ĉe la edzino kaj la infanoj. Ili oferis kandelojn kaj metis sufiĉe da valorplenaj moneroj en la specialan oferkeston de *San Caralampio*, ĉar ili sciis, ke oni sur tiu ĉi mondo faras nenion por nenio. Ankaŭ ne en la ĉielo. Oni devas doni monon, kiam oni ankoraŭ havas vestojn kun poŝoj. Post kiam oni iris en la ĉielon, mankas kutime la poŝoj, kaj tiam estos tro malfrue. Ankaŭ la kantineroj komencis sian negocon per humila preĝo al sanktulo *Caralampio* kaj kun valorplenaj moneroj. Ili devis sekurigi kontentigan gajnon el la vendo de siaj komitekoj kaj de siaj aliaj alkoholaj trinkaĵoj. Eĉ pli arde preĝis la kelnerinoj, la *meseras*, dum kelkaj horoj antaŭ *San Caralampio* kaj oferis monon, kaj se ili ne havis ĝin, ĉar ili ankoraŭ neniom perlaboris, ili promesis al li solene laŭprocentan parton de la negoco. Kaj kun deca digno surgenuiĝis antaŭ la sanktulo la etikeditaj damoj anstataŭantaj la patrinojn de la povraj, nenion sciantaj virgaj kelnerinoj. Ili tiris per nobela gesto

sian nigran kaptukon vaste sur la vizaĝon kaj preĝis dum unu surgenuo ses rozariojn. Ili devis fari eĉ multe pli da bono ol la aliaj, ankaŭ ĉe la oferado de mono. Kaj precipe dum la oferado. Ili preĝis ja ne nur por si mem kaj por la propra animo. Ili estis sufiĉe maljunaj, por nun senpene resti virgaj kaj netuŝitaj. Sed ili ne estis egoistaj. Ili preĝis por la animoj de la kompatindaj protektatinoj al ili konfidataj, kiujn ĉiam minacis la kaptiloj de Satano, kaj kiuj ne povis defendi sin, ĉar ili havis lindajn vizaĝojn kaj tamen ne volis morti pro malsato. Per siaj preĝoj kaj ne avaraj oferoj la „patrinoj“ de tiuj knabinoj liberigis sin jam antaŭe de ĉiu kulpo. Post kiam ili faris tion, la vojo al floranta negoco estis malfermita; ĉar oni diris al ili: KREDU kaj preĝu kaj oferu, tiam oni pardonos al vi; kiu kredas kaj konfidas, al tiu la ĉiela regno estos malfermita, amen.

Ankaŭ la kripluloj kaj la almozetantoj donis sian modestan financon kontribuon kaj ne forgesis, ke estis *San Caralampio*, kiu ofertis la proksiman bonan negocon al ili. Tuj post la fino de siaj preĝoj ili elrampis el la preĝejo kaj ekde tiu tempo sidante restadis tuj apud la pordo kaj sur la ŝtupoj por komenci la negocon. Antaŭe ili kverelis kelkan tempon pri la plej proksimaj lokoj ĉe la pordo. Sed tiam ili prudentiĝis kaj organizis la aferon tiel, ke ĉiu el ili havu la rajton sidi dum du horoj plej proksime al la pordo, laŭ detale fiksitaj skipoj kaj alternadoj.

Kiam la festo de ĉiuj surteraj kaj enĉielaj aŭtoritatoj fine estis preparita, en maniero, kiu kontentigis ĉiujn, la negoco komenciĝis. Ĝi ekis per granda solena meso, kun plorantaj, ruĝiĝantaj okuloj kaj tuŝitaj koroj, kaj kun la voto ekde nun neniam plu fari ion malbonan surtere kaj ekskluzive prepari sin por la eterna vivo. *Te deum laudamus.*

Kiam la granda solena meso estis finita kaj la piaj ĉeestantoj komencis forlasi la preĝejon, sur la placo antaŭ la katedralo ludis

jam la muzikgrupoj kaj la marimbistoj. La ludotablaj bankieroj kriis: „*Se fué!*“, kaj la ruletdiskoj sur iliaj tabloj gaje ekzumis. Ĉe la standoj la komercistoj kriaĉis: „*Soy el más barato del mundo!*“ Mi estas la plej malkara de la mondo! El la kantinoj oni aŭdis la vokojn: „*Otra copita!*“ Plian malgrandan por la seka gorĝo! La kripluloj kaj almozpetantoj sur la ŝtupoj de la katedralo hurlis: „*Tengo hambre, caridad, por Dios, me muero!*“ „Mi malsatas, donu almozon, por la amo de Dio, mi mortas!“ La kelnerinoj prenis sian lipkolorilon kaj farbis sian buŝeton brilege ruĝa. La negoco honore al Sankta *Caralampio* komenciĝis.

Rimarko

¡Se fue! = Li venkis! Li finigas la ludon! *¡Se fue!* estas malnova ortografio, jen ludesprimo. Se la bankiero kaj la kunludantoj ludis domenon, „*¡Se fue!*“ signifas tio, ke unu el la ludantoj metis sur la tablon sian lastan ludmarkon; do, ke iu gajnis la ludon.

8/3

Plenumante sian taskon, Andreo gvidis la karavanon de Sapoluta al *Balún-Canán*, por veturigi la komercistojn kun iliaj varoj al la festo, kiu komenciĝis nun en BalúnCanán. Tie li devis atendi ĝis kiam la festo estos finita kaj poste li havos la taskon veturigi hejmen la homojn al *Tuxtla* aŭ al Suchiapa aŭ de kie ajn ili estis. La pezo de la varoj nur malmulte malpliigis, ĉar la komercistoj survoje aŭ sur la placoj, aŭ kie ajn ili faris siajn negocojn, ĉiam uzis la okazon aĉeti novajn varojn faritajn aŭ kultivatajn en la regiono. Tio estis, laŭ la cirkonstancoj: tabako, kafo, lano, lanaj tilmoj, feloj, petatoj, bastvaroj, korbvaroj, komiteko, ludiloj el bakita argilo. Tiujn tie malkare aĉetitajn varojn ili kunprenis aŭ vendis en la lokoj survoje aŭ transportigis ilin ĝis malsupren al la pli grandaj urboj ĉe la fervojo, kie ili enspezis altajn gajnojn el ili.

La karavanistoj de Andreo dum la festo en Sopaluga ne staradis pigre. La ĉaristoj reveturigis la ĉarojn ĝis Tsobtajal, kiu troviĝas meze de la vojo inter *Balún-Canán* kaj Jovel. Tie ili plenigis la ĉarojn per frajto de potistaj varoj, kiujn faris indiĝenoj en Tsobtajal, kaj ili liveris la frajton al la komisiitoj, kiujn *don* Laŭreano havis en tiuj urboj.

Male al tio *don* Laŭreano ĉe la ekveturo de la karavano de *Chiapa de Corso* ordonis, ke la bovoj dum la festo en *Balún-Canán* ripozu kaj bone sin paŝtu por povi reveturi dum mallonga tempo kaj sen tro granda laciĝo de la bestoj. Intertempe li jam akceptis denove sufiĉe da frajtkomisioj kaj tial ili bezonis la bestojn en taŭga konstitucio. Tiun ripozon dum preskaŭ du semajnoj la ĉaristoj uzis por foje ĝisdetale lavi sin, por reordigi siajn personajn aĵojn kaj tiom ofte, kiom eblas ebriiĝi.

Se la proleto sur la plej malsupra ŝtupo de la ekonomia kaj socia ranga ordo ne devas labori, ĉar estas festtago aŭ ripoztago, li ebriigas sin.

Li ne scias ion pli bonan. Neniu instruis lin uzi la tempon je sia propra avantaĝo. Neniu diris al li, ke li lernu pensi por si mem, anstataŭ lasi pensi aliajn por si dum la tuta vivo. Li lernis nur unu aferon, kaj tiun li lernis bone, tio estas: obei. Por tio li ricevadis batojn ekde juneco. Lia patro komencis bati lin, por ke li obeu. Kaj ĉar li lernis nur obei, kaj ĉiam nur obei, tial li ne lernis pensi por si mem. Kaj kiam li ebriiĝas, li havas senkulpigon por sia festtago, kaj li sugestas al si, ke li nun ĝojas.

Tio servas al la granda Difavoro de sia mastro, se li ebriiĝas. Sub la kondiĉo, ke lia laboro ne suferas pro tio. Kaj ĉar li ne scias, kion fari pli bonan en ripozaj tagoj, li simple drinkas en ĉiu ripozotago. Tiel li almenaŭ ne fariĝas pli inteligenta, kaj, kio estas speciale utila por lia mastro, li havas plu ŝuldojn ĉe li.

Drinki li rajtas tiom, kiom li emas. Li estas ja libera viro, kiu povas fari aŭ ne fari, kion li volas. Kiel libera viro li havas la bonan rajton ebriiĝi kaj elspezi sian monon tiel, kiel plaĉas al li. Sed li devas ĉiufoje tiom frutempe ebriiĝi, ke li, kiam lia laboro denove komenciĝos, ne neglektos sian laboron.

Rimarko

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita, sur unu ŝultro.

8/4

La ripozaj tagoj kaj eĉ la festotagoj en la vivo de ĉaristoj estis tre raraj. Nur se la bovoj nepre bezonis ripozon, ricevis ankaŭ la ĉaristo per tio ripozotagon. Sed ne, se eventuale estis riparendaj rompitaĵoj radoj. La bovoj ricevis plenajn ripozajn tagojn kaj eĉ feriojn, kaj de ties tagaj manĝoporcioj oni ne minusis certan kvanton dum la ferioj. Ili ricevis sian plenan salajron, ĉu ili havis feriojn, ĉu ne. Ĉar ili estis nur bovoj. Ili rajtis satdormi, ĉar ili ne sciis ripari rompitan radon. Tiukaze, se sufiĉe da frajtoj estis veturigendaj kaj se eblis kunpeli rezervajn bovojn en la karavanoj, tute ne estis ripozotago kaj neniam dimanĉo por ĉaristoj. Ofte ne dum tuta jaro. La ĉaristo povis ĝui siajn ripozotagojn, se li, skuata de febroy, ruliĝis kaj kurbiĝis sur sia petato aŭ, se li ne povis movi siajn gambojn, ĉar li venis sub la radojn de ĉaro.

Ses tagojn ĉiusemajne laboru kaj aranĝu ĉiujn viajn aferojn, sed la sepan tagon ne laboru, sed glori Dion, la Eternulon. Tio tre bone estis farebla de Adamo kaj Evo en la paradizo, kiuj ĉiusemajne faris ses tagojn nenion alian krom rigardi la pomujon en la ĝardeno Edeno. Sed la ĉaristoj ne vivis en la ĝardeno Edeno, sed en la dia ekonomia ordo, kie frajto ne rajtas atendi, ĉar alie suferus la civilizacio. Ili ne havis tempon glori la Eternulon pro tio, ke li donis la vivon al ili. Jen la vivo de ĉaristo. Preĝu por la

savo de via eterna vivo kaj laboru por pliigi la trezorojn de la mondo. Kvankam via stomako tiel ne pleniĝas, vi almenaŭ ĉiam restas sklavo surtere, kaj la ĉielaj ĝojoj kaj laŭdaj kantoj iam estos certaj al vi. Ne strebu al libero kaj bonfarto ĉi tie surtere, ĉaristo, alie vi falus en la maŝkaptilojn de Satano, vi metus en tumulton la bone ordigitajn rilatojn de la ŝtato kaj preterirus la dornan padon. Esti fidela kaj obeema subulo pli valoras ol aspiri la trezorojn de la bone grasigitaj mastroj. Tio estas malnova bona kaj elprovita leĝo. Tial estas pli da servistoj ol mastroj. La grandiozeco de la ĉaristoj estis, ke ili ne cerbumis pri tiaj aferoj. Ili ne havis tempon pensadi pri io alia ol pri la bonfarto de siaj bovoj kaj pri la bonstato de la ĉaroj. Krome ili estis ĉiam tro lacaj por pensi entute ion. Ili volis esti kontentaj. Nenion pli. Ĉio alia lacigis ilin eĉ pli.

Kaj ili estis kontentaj, se ne mankis al ili la centavoj por aĉeti en ripozotagoj sufiĉe da brando, por ke ili povu forte ebriigi sin. En tiu stato neniu postulis de ili, ke ili pensu.

8/5

La karavano de Andreo troviĝis ekstere de la urbo, sur vasta ebenaĵo, tuj apud la vojo, kiu kondukas al *El Puente*.

Oni estis kunveturigintaj la ĉarojn kaj bonorde laŭ rekta linio starigis ilin. La ĉaristoj faris grandspacan kampadejon por si mem.

La bovoj paŝtis sin, vaste dise, sur la ebenaĵo.

Kelkajn fojojn oni kunigis la bovojn kaj pelis ilin al la rivereto, kie ili banis sin dum horoj en la akvo por mortigi la milojn da iksodoj, kiuj boris sin en la haŭton de la bovoj.

Post la banado oni kondukis ilin al la kampadejo. La ĉaristoj zorgeme ratis la korpojn de la bestoj pro vundoj, por kuraci ilin, se tio necesas.

Poste la bestoj ricevis siajn porciojn de maizo, kaj se ili jam plenŝtopis siajn stomakojn, oni liberigis ilin, ke ili paŝtiĝu.

Sur la ebenaĵo paŝtis sin nenombritaj centoj de bovoj, muloj kaj azenoj. La ĉevaloj, muloj kaj azenoj neniam paŝtis sin en la proksimo de bovoj kaj la bovoj neniam en la proksimo de ĉevaloj. Ĉiuj bestoj, kiuj sin tie paŝtis, restadis kune en certaj grupoj. Plej ofte estis la gregoj, kiuj havis la saman posedanton; ĉar la libere paŝtigantaj bestoj prefere restas ĉe tiuj, al kiuj ili kutimiĝis per komuna plenkreskado en la korto de sia posedanto kaj per ĉeokazaj kunpeladoj kaj hejmkondukadoj al siaj ranĉoj, kie ili ricevis sian salon.

Sed multaj grupoj formiĝis pro simpatio. Kaj aliaj formiĝis pro neceso. Ĉar ties posedantoj neglektis ilin, ili tute forgesis, kien ili apartenas.

Al tiuj pli malkompaktaj grupoj aliĝis tiuj bestoj, kiuj venis nur ĉeokaze sur tiun grandan ebenaĵon. Do, la bovoj de la haltantaj ĉaristoj kaj la ĉevaloj, muloj kaj azenoj de la migrantaj komercistoj.

Kvankam sur la ebenaĵo miloj da bestoj paŝtas sin, oni vidas nur malmultajn brutarojn, ĉar la ebenaĵo estas tiom vasta, ke la bestoj en ĝi tute perdiĝas por la okuloj. Oni vidas ilin malproksime apenaŭ kiel punktetojn. Ne estis tre komplike por la ĉaristoj serĉi kaj trovi siajn bovojn sur la ebenaĵo. Survoje kaj sur la haltejoj la ĉaristoj kutimigis la bovojn resti kune kaj ne vagi tro malproksime de la ĉaroj. La bestoj ja tro malproksime vagas nur tiukaze, se ili ne trovas sufiĉe da herboj, aŭ la herboj estas tro

amaraj aŭ la paŝtejo estas tro kota pro la bestoj, kiuj antaŭe tie paŝtis sin.

Krome la bovoj de la ĉaristoj distingiĝis de la ceteraj bovoj en tia konsiderinda mezuro, ke ili estis facile ekkoneblaj eĉ el granda distanco por spertaj ĉaristoj, ĉu estas ĉarobovoj ĉu kutimaj brutoj. La ĉarobovoj estas ege grandaj fortaj bestoj kun pezaj, tre larĝe etendiĝantaj kornoj, kiuj erare apenaŭ preneblas por aliaj brutoj.

Sed tie antaŭ la urbo haltis ankoraŭ kvar aliaj karavanoj de frajtentreprenistoj. Kaj ĉar ankaŭ la bovoj de tiuj ceteraj karavanoj paŝtis sin sur la sama ebenaĵo, kompreneble povis okazi, ke la ĉaristoj, rekondukante la bestojn, marŝis kvin ĝis ok kilometrojn en la direkto de ekrigardita grupo de ĉarobovoj, nur por fine konstati ĉe la alveno, ke estas la bestoj de alia karavano, kaj ke ili iris la longan vojon por nenio. Sed ĉar ĉiu el la ĉaristoj konas la brulmarkojn de ĉiuj frajtentreprenistoj en la ŝtato, diris la diversaj ĉaristoj al la aliaj, kie ili renkontis la aliajn bestojn ĉe la serĉado de la propraj.

En la lastaj tri tagoj de la festo komenciĝis la ĝenerala rastado de la ebenaĵo pro paŝtiĝantaj bestoj. En ĉiuj direktoj oni vidis virojn surpiedajn aŭ sur ĉevaloj, kiuj serĉis siajn rajdo- kaj pakbestojn sur la ebenaĵo. Okazis kelkfoje, ke vojaĝanto, kiu venis sur ĉevalo al la festo, devis serĉi dum tuta semajno sian formarŝintan beston kaj ĝin ne trovis eĉ post tiu longa tempo kaj devis peti la posedanton de proksima ranĉo, ke li informu lin, tuj kiam la besto estos trovita ie, ĉar li ne povas atendi pluan tempon.

En la lastaj tagoj de la festo ankaŭ la posedantoj de la gregoj, kiuj paŝtis sin sur la ebenaĵo, elsendis siajn virojn, por bone gardi siajn brutarojn kaj ĉevalogregojn. Ĉar tiam venis la danĝera tempo, kiam la ŝtelistoj de ĉevaloj kaj muloj vagadis pro

negardataj bonaj bestoj. En la pelmelo de la multaj forvojaĝantaj komercistoj kaj festvizitantoj neniuj tuj povis diri, ĉu la rajdataj kaj pakitaj bestoj apartenas al la forvojaĝantoj, aŭ ĉu ili estas ŝtelitaj. Tiuj, kiuj prenis fremdajn ĉevalojn kaj mulojn kun si, marŝis ja ne sur la larĝaj vojoj, kie estis veturigataj la ĉaroj. Kiu rajdis sur ĉevalo, ekde la ebenaĵo, tiu povus formigri en ĉiu direkto, kiu plaĉus al li. Se li ne ĵus renkontis farmiston de la distrikto, kiu konas la brulmarkojn de ĉiuj siaj najbaroj, kaj lin preterire demandis, ĉu li aĉetis la bestojn kaj je kiom da mono, jen la ŝtelitaj bestoj estis post kelkaj tagoj en Tabasko aŭ eĉ en Gvatemalo.

Estis nur dum tiuj festoj, kiam multaj centoj de nekonataj homoj troviĝis en tiu loko, kiam eblis ŝteli bestojn de la ebenaĵo. En aliaj tempoj la vojaĝantoj estis tiom raraj, ke ĉiu enloĝanto tute precize sciis, kia aspektas la vojaĝanto, kia li estas vestita, kun kiaj bestoj li alvenis, kaj kun kiaj li poste forvojaĝis. Se li havis ĉe si eĉ nur unu ĉevalon eksuspektatan, ke li povus esti ŝtelinta ĝin ie sur la vojo ĉi tien aŭ reen, ili kaptus lin antaŭ ol pasus tri tagvojaĝoj, se ne jam post du horoj.

Tial en kutimaj tempoj la gregoj sur la ebenaĵo estis tiel sekuraj, kvazaŭ ili starus en stalo. Sed ĉe la ekleziaj festoj de ambaŭ urboj, kiuj estis disigitaj pere de la granda ebenaĵo, la posedantoj de la gregoj dum la lasta semajno de la festo tage kaj nokte devis sidi sur seloj kaj kunteni siajn gregojn.

8/6

Tiel kiel la maristo, kies ŝipo troviĝas en haveno por ŝarĝi aŭ malŝarĝi kargon, neniel povas pigri, kiel tion eble supozas naiva loĝanto sur firma tero, sed plej ofte devas labori pli streĉe ol tiam, kiam ŝipo estas veturigata sur alta maro, tiel tio okazis ankaŭ al ĉaristoj.

Baninte, kuracinte kaj nutrinite la bovojn, ili tuj okupiĝis pri la ĉaroj. Se poste okazus rompo en la sekvaj dek du semajnoj, hajlus riproĉoj al ili. „Pigruloj, damnitaj de Dio, vi kampadis du plenajn semajnojn en Balún Canán, la ĉarojn. Tiu rompita rado kostas al vi monatsalajron, por ke vi lernu teni vian ĉaron en ordo“, diris *don* Laŭreano. „Kion vi pensas, kial mi pagas al vi tridek cent-avojn ĉiutage? Plej prefere mi draŝus per bastono vian melonkapon, filo de hundino damnita de Dio!“

Kiel la ĉaroj aspektis, se ili veturis duonon aŭ eĉ tutan jaron sen ripoztago kaj ĉiam estis sur la vojo, oni povas imagi.

Tia ĉaro estis farita antaŭ ducent jaroj. Kompreneble de la partoj, kiuj donis al la ĉaro novan aspekton antaŭ ducent jaroj, restis eĉ ne unu peco. Unue la maldekstra rado estis tute rompita, poste la dekstra, poste la timono, poste la framo kun la tegmento. Ĝia plej nova ero eble havis aĝon kvinsemajnan, la plej malnova certe kvardekjaran.

Kaj tial, ĉar ĉiuj unuopaj partoj de la ĉaroj rilate la aĝon kaj tial ankaŭ rilate la daŭron de la uzebleco estis tre diversaj, laŭ tio, ĉu oni renovigis ilin ĉu ne, necesis multe da ekzercado kaj precizaj scioj pri la esenco de ĉaro por povi eltrovi, kiuj partoj rompiĝos en la sekva marŝo. Renovigi tiujn partojn estis la tasko de la ĉaristoj, kiam ili haltis ripozeje.

Don Laŭreano sciis tre bone, ĉu io ne estis en ordo en certa marŝo, ankaŭ tiukaze, se li ne estis ĉe la karavano, eĉ, se neniu ĉaristo diris ion pri tio. Neniu el la ĉaristoj elbabilaĉis ion pri siaj kamaradoj, nek por venĝi sin nek por kaĵoli sian mastron. Tio estis kontraŭ ilia naturo. Eĉ ne venis en iliajn kapojn povi esti tiel fiaj.

Inter si, dum marŝo aŭ en kampadejo, ili de tempo al tempo malice batalis. Ili atakis sin per tranĉiloj, aŭ per maĉetoj aŭ bastonegoj, fluis sufiĉe da sango, ekestis multnombraj ŝvelintaj tuberoj kaj bluigitaj vizaĝoj. Proletoj, ĉie surtere, trovas specialan plezuron pri tio reciproke dishaki kapojn. Tial la kapoj de iliaj mastroj restas sanaj. Ĉar la kolero, akumuliginta sub la influo de ilia mizera kaj senperspektiva ekonomia situacio, forvaporigas en la interfrata dishakado de la proletoj. Jen la kaŭzo, kial ili ne havas sufiĉe da impeta forto kaj taŭgan koleron, kiam prezentigas foje la okazo ĵeti la tutan ekonomian ordon en promesplenan malordon. Ne el bonega ordo, sed nur el furioza malordo povas naskiĝi nova prudenta socio per luktado. Sed post tiuj ardaĵ bataloj de la ĉaristoj neniam restis malamo, tiel, ke iu el ili iam pensus pri tio venĝi sin per tio, ke li eltrumpetos ion pri sia kamarado ĉe la mastro. Tio estis kontraŭ iliaj honoro kaj moralo.

Sed *don* Laŭreano tamen sufiĉe precize eksciis, kio okazis en la marŝo, kaj kial tio okazis.

Estis ĉiam kelkaj vojaĝantoj sur ĉevaloj, kiuj preterpasis haltantan karavanon kaj kompreneble vidis, kio okazis.

Ili venis al *Chiapa de Corso* kaj renkontis *don* Laŭreanon ie surstrate, aŭ ili havis eĉ negocon kun li.

„Mi vidis vian karavanon, haltanta proksime al *Santa Catarina*, *don* Laŭreano, ili streĉe laboris kaj ne povis ekveturi.“

„Kio okazis tie, *don* Cesar?“

„Rompis rado kaj bovo eskapis, nur kojoto scias, kiom la *muchachos* devis kuri, antaŭ ol ili kaptis ĝin.“

Ankaŭ la komercistoj aŭ la familioj, kiuj vojaĝis en la ĉaroj, lamentis ĉe *don* Laŭreano: „Aŭskultu, *don* Laŭreano, viaj ĉaroj estas skandalo. Trifoje ili havis rompiĝon survoje, ĉar viaj *muchachos* dormis, *tan flojos*, tiuj mallaboremaj dormavidaj pigruloj. La venontan fojon mi prefere intertraktos la frajton kun *don* Mauricio.“

Aŭ komercisto en Shimojolo skribis al *don* Laŭreano drastan leteron, ĉar la frajto alvenis du tagojn tro malfrue.

„Kial vi du tagojn malfruiĝis dum la marŝo? Ekparolu!“ vokis *don* Laŭreano al la marŝkolonestro.

Tiam ili do devis ekparoli, kiu ĉaro havis rompon, kaj kial, kaj kies kulpo tio estis.

Kaj tiun, kies ĉaro disrompiĝis, kaj kiu retenis la marŝon, oni punis per dekalkulo de unu aŭ du monatsalajroj. Tio konsiderinde helpis, ke, kiom ajn li laboris kaj kiom ajn li provis vivi ŝpareme kaj kiom ajn malofte li permesis plezuron al si, lia ŝuldoŝarĝo ne malpliigis ĉe lia mastro, sed altiĝis pli kaj pli. Tiom longe, kiom li havis ŝuldojn, li devis labori kaj elteni la vivon ĉe sia mastro, al kiu li restis ŝulda ion. Li ne povis foriri kaj serĉi okupon, kie li perlaborus pli, aŭ kie li havus pli facilan laboron, kaj kie li pli povus esperi fine foje fariĝi pli libera kaj pli sendependa kaj por fari tion, kio plaĉas al li, kaj kio ebligas al li pli agrablan vivon.

Rompita rado aŭ la deglitado de ĉaro de la vojo kelkfoje ne retenis nur la marŝkolonon dum duono de tago kaj malfruiĝis la frajtalvenon, sed ankaŭ tre ofte okazis, ke pro la rompo aŭ pro la deglitado de ĉaro transportataj varoj disrompiĝis kaj senvaloriĝis. Kesto kun porcelanvaroj aŭ kun medicino rapide senvaloriĝis pro misatento de ĉaristo. Kaj, se la malfeliĉo de rompo trafis lin, kiam

la ĉaro troviĝis meze de rivero, kiu trapasendis, tiukaze ofte la tuta frajto estis neniigita, se temis pri frajtaĵoj, kiuj ne eltenas malsekiĝon.

Ne la forsendinto de la varoj, kiu malbone pakis la varojn, devis kompensi la damaĝon. Li ne transprenis la kompensodevon por sendaĵoj sur ĉaroj. Tion li klarigis tuj en siaj vendokondiĉoj. La kompensdevigan asekuron por la sekura alveno de la varoj oni ŝarĝis al la frajtentreprenisto. Kompreneble li povis rifuzi la transprenon de la varoj, se ili estis malbone pakitaj. Sed tiukaze alia entreprenisto transprenus la riskon, kaj *don* Laŭreano perdis klientojn.

Nu, kial li havis spertajn ĉaristojn? Kaj kial li pagis akcepteblajn salajrojn al ili? Kial li transprenis la ŝuldojn de la antaŭaj mastroj, kiam ili venis al li por plibonigi sian situacion? Kial li traktis ilin ne kiel malliberajn peonojn, sed kiel liberajn laboristojn, kiujn li ne skurĝis kaj ne enfermigis ĉe manoj kaj piedoj en dupartan tabulon? Kial ĉiuj tiuj konsideroj de civilizita entreprenisto por siaj laboristoj, se tiuj siavice eĉ ne iom atentis pri tio, ke li ne suferu damaĝon?

Estis nur juste, ke li enskribis ĉiun rompon okazintan dum transporto kiel debeton en la konton de siaj ĉaristoj. Se ili bone tenas en ordo siajn ĉarojn, rompo ne okazas. Kaj se ili bone konas sian vojon kaj ne dormas dum la marŝo, sed zorgeme atentis, ekestas neniu perdoj. Estis nur pro neglektoj de la ĉaristoj, se ili malfruiĝis aŭ rompiĝis radoj aŭ varoj perdis sian valoron.

Senatentemon oni ne subtenu. Li ja pliigus la fuŝemon kaj la neatentemon de siaj ĉaristoj, se li ne lasus pagi la virojn por ĉiu damaĝo, kiu ekestas pro ilia kulpo. Li pagis la ĉaristojn ne por tio, ke ili dormu kaj drinku, sed por tio, ke ili laboru, kaj ke ili laboru por lia utilo. Kien la mondo kaj la civilizacio venus, se la laboristoj

rajtus fari aŭ ne fari, kio plaĉas al ili. Al ĉiu laboristo oni donis ja kapon, per kiu li pensu. De la bovoj li ne postulus pagon por damaĝo, ĉar tio estus stultaĵo, ĉar ĉiu prudenta homo scias, ke bovo ne kapablas pensi. Tial oni ja ankaŭ ne pagas salajron al la bovoj. Sed ĉar ĉaristoj povas pensi, tial li pagis salajrojn al ili. Kaj ĉar li pagis salajrojn, li havis tute certe la rajton postuli de ili, ke ili pensu pri utilo lia.

8/7

En la stato, en kiu la ĉaroj kutime ĉiuj troviĝis, nur unu rimedo povus helpi eviti rompojn. Kaj tiu estus anstataŭi tiujn ĉarojn, kiuj servis jam tro longe, per tute novaj. Sed ĉar kelkaj partoj de ĉiu ĉaro estis bonaj kiel novaj, ĉar oni enmetis ilin nur antaŭ kelkaj monatoj, tio estus sensenca disipo de uzvaloroj, kion la negocisto ne povus elteni.

Kiam *don* Laŭreano devis pligrandigi la nombron de la ĉaroj, ĉar la frajtoj pliiĝis, li ĉiufoje unue ie provis kunaĉeti malnovajn ĉarojn. Nur se li ne sukcesis kunaĉeti malnovajn ĉarojn, li mendis novajn.

Al la ĉaristoj ne restis alia elirvojo krom per riparo plibonigi kaj teni en bona ordo la ĉarojn, kiam ajn ili havis liberan tempon.

La plibonigado de la ĉaroj estus facila afero, se *don* Laŭreano disponigus por tio la materialon aŭ donus monon al ili por povi aĉeti materialon, kiam ĝi necesas.

Kiam la ĉaristoj estis en la hejma haltejo, en *Chiapa de Corso*, estis tie kompreneble du ĉarfaristoj, kiuj provizis la ĉarojn per taŭga materialo. Krome ĉiu karavano ricevis kelkajn novajn rezervajn radojn, jugojn kaj timonojn por la vojaĝo. Sed okazis ofte, ke kelkaj marŝkolonoj du aŭ eĉ tri monatojn ne tuŝis la

hejmlokon, sed ĉiam restadis nur sur la vojo inter Arriaga kaj *Tuxtla*, aŭ inter Jovel kaj BalúnCanán, aŭ kie ajn ili ĝuste akceptis sufiĉe da frajto.

Monon por povi aĉeti materialon survoje, la ĉaristoj ne ricevis.

„Se mi farus tion“, diris *don* Laŭreano, „mi estus sufiĉe stulta. La *muchachos* tuj en la unua vendejo ĉe la vojo fordrinkus tion aŭ ĵetkube forludus aŭ ludus surĵetadon de pesoĵ. Mi ja konas ilin, mi scias, kiaj ili estas.“

Eble li kolektis spertojn de tiu speco. Sed restis la fakto, ke la ĉaristoj neniam ricevis monon por tio. Li donis al ili nur bonhavaĵajn biletojn, por ke ili povu aĉeti maizon por la bestoj. La kreditbiletojn, kiujn li persone subskribis kaj stampis, akceptis ĉiu en la ŝtato, ĉar ili estis tiel sekuraj kiel kontanta mono.

La bovojn oni devis nutradi altkvalite. Li ne povis respondecigi ĉariston, se bovo en la marŝo renversiĝis, ĉar la bovo ja ankaŭ ie sur paŝtejo povis esti manĝinta venenajn foliojn, aŭ eble serpento mordis ĝin. La renversiĝintajn bovojn oni ne povis ripari per novaj enmetitaj eroj; kaj tial la ĉaristo ne kulpis tion. Kio ajn okazis al bovo, okazis kun la volo de la plej alta dio, kiu gardas la paserojn, por ke ne falu plumo el vosto de pasero sen ties eksplacite esprimita ordono.

Ĉar la ĉaristoj havis nek monon nek kreditbiletojn por aĉeti la necesan materialon por la plibonigado de la ĉaroj, restis ilia afero, kie kaj kiel havigi la materialon.

Teni en ordo la ĉarojn ili devis, por ne perdi kelkajn monatsalajrojn.

Tial ili devis preni la materialon tie, kie ili trovis ĝin. Eĉ la enmartelita kredo pri terura venĝo en la transmondo ne povis reteni ilin havigi al si la materialon tiel, kiel ne akordigeblis nek kun surteraj, nek kun ĉielaj, kaj plej malmulte kun ŝtataj leĝoj. Antaŭ ĉio alia ili devis pensi pri la plej proksima afero, kaj tiu estis, ĉiukaze eviti rompojn de radoj; ĉar la unua devo de taŭga, fidela kaj obeema servisto estas, ke li servas al sia mastro, ke li akcelas ties prosperon kaj gardas lin kontraŭ ĉiu damaĝo. Ĉiuj ceteraj devoj povas atendi.

8/8

Tiom malofte, kiom la unuopaj eroj de ĉaro estis enmetitaĵoj el la sama jaro, estis ĉiuj eroj el la sama materialo.

Kelkaj eroj estis el mahagona ligno, aliaj el ebono, aliaj el cedro, aliaj el kverko, aliaj el abia ligno. Ĉiuj lignoj, preterpasataj de la karavanoj survoje, estis troveblaj en la ĉaroj.

Kelkajn kilometrojn for de *Balún-Canán*, sur la vojo al *El Puente* estis mirinde bela abia arbaro, kun la plej majestaj arboj, kiuj imageblas. Estis verŝajne la beleco de tiu arbaro, kiu instigis la indiĝenojn el praa pasinteco, oferti tiun belegan arbaron al siaj dioj kiel hejmlandon. Ili starigis en ĝia mezo grupon el piramidoj kaj altaroj, por ke la dioj delektiĝu je ili. Ke la indiĝenaj dioj ankoraŭ nun loĝas en tiu arbaro apenaŭ estas supozebla; sed la piramidoj ankoraŭ ĉiuj ĉeestas.

Tiu ĉi arbaro apartenis nek al *don* Laŭreano nek al ties ĉaristoj, nek al la ceteraj ĉaristoj, kiuj ripozis sur la ebenaĵo kaj plibonigis per riparoj siajn ĉarojn.

Por rigardi tiujn piramidojn, la indiĝenoj ne havis tempon. Ili ankaŭ ne interesiĝis pri tio rigardi ilin, ĉar ili koncentris sian

intereson nur je taŭga stato de la ĉaroj. Estas neniam avantaĝe por la proletoj interesiĝi pri io, kio ne havas rilaton al la laboro. Pri la laboro ili pensu, kaj la piramidojn kaj la historion ili lasu al tiuj, kiuj estas elektitaj de la ŝtato alĝustigi la mondohistorion laŭ la bezonoj de tiu ŝtato. La bonstato de ĉiu ŝtato estas akcelata kaj ties interna paco kaj ties ordo konservata, se la ŝuisto restas ŝuisto, se la laboristo estas obeema servisto kaj la sciencisto ennebuligas la problemojn de la ekonomia vivo.

Krome la piramidoj estis multe tro malproksimaj por la ĉaristoj. Ili iris en la arbaron nur ĝis tien, kie ili trovis tiajn arbojn, kiajn ili bezonis, por fari el ili timonojn, jugojn kaj spokojn.

Poste ili kondukis la bovojn tien kaj trenis la uzopretajn anstataŭaĵojn al la kampadejo.

La posedanto de la arbaro dum tiu tempo troviĝis verŝajne en la ungegoj de kelnerino, honore al Sankta *Caralampio*. Tial li ne multe zorgis pri tio, kiu ŝtelis lignon en lia arbaro.

Sed krome mankis al la ĉaristoj aliaj gravaj aĵoj por povi teni en ordo la ĉarojn de la mastroj. Tial ili nokte ŝteliris sur la ebenaĵon kaj buĉis kelkajn bovojn. Ili bezonis la haŭtojn por tranĉi el ili novajn rimenojn, ĉar la malnovaj elsekiĝis kaj estis rompiĝemaj.

La ĉaristoj neniam ŝtelis por si mem. Facile ili ie survoje povus ŝteli kokinon kaj aliloke porketon, por fortiga manĝo, kiun ili ĉiam tiom bezonis. Sed, se la bovoj tie jam foje estis buĉitaj, malmulte ŝanĝis tion je eble leviĝantaj konscienciproĉoj, se ili nun ankaŭ kunprenis kelkajn grandajn pecojn de la bovoj al la kampadejo.

Ĉar ĉiu karavano, kiu haltis tie, devis vivi sub la samaj kondiĉoj, ĉiu karavano bezonis novan bovohaŭton. Tial kelkaj bovoj devis lasi la vivon por la bonfarto de la frajtentreprenistoj.

La ŝtelado de arboj estis embarasiga afero por la ĉaristoj, se oni kaptis ilin ĉe tio. Furiozaj riproĉoj trafis la kulpinton, kaj eble svarmo de batoj per la rajda vipo sur la kapon. Sed la bovobuĉado estis eĉ pli malica afero, se eble eĉ vakero vidis tion. Tiam ili malaperis fulmrapide en karcero. *Don* Laŭreano kompreneble ne lasis siajn ĉaristojn en la karcero, ĉar li bezonis ilin por la laboro, kaj ĉar ili havis ŝuldojn, kiujn ili devis forlabori. Se ili ne havis ŝuldojn, eble estis egale al li. Sed li devis savi sian kapitalon. Do, se ŝtelado malkovriĝis, li pagis al la posedanto de la grego la valoron de la bovo, kaj li pagis al la urbestro kaj al la polica ĉefo de la loko, kie lia ĉaristo estis prizonulo, en la *carcel municipal*, dudek pesojn da amikeca mono, kaj oni liberigis lian ĉariston. La elspezojn, kiujn *don* Laŭreano havis, kaj por la pagita bovo kaj por la amikeca mono, li skribis en la debeton de la ĉaristo. Kaj tute pravigite. *Don* Laŭreano ja neniam ordonis al siaj ĉaristoj ŝteli arbojn, buĉi bovojn, eltiri najlojn el domoj, rabi nokte feron en forĝejoj. Tiajn ordonojn *don* Laŭreano ankaŭ neniam en sia vivo donus, eĉ se unu el liaj karavanoj dum semajno devus halti sur la sama loko de la vojo. Ĉar li estis tre respektata kaj alte estimata membro de la komunumo. Li vivis en humileco antaŭ la Sankta Eklezio, kaj kvankam li konsideris la leĝojn de la lando en kelkaj kazoj kiel reformindaj favore al la posedantoj, li trovis ilin entute bonegaj; ĉar ili protektis lian juste akiritan propraĵon kaj retenis tiujn, kiuj ne havis propraĵon, malantaŭ decaj barieroj.

Sed sendepende de ĉio ĉi, la ĉaristoj, kampadantaj ĉi tie sur la ebenaĵo, riparas la ĉarojn ĝis kiam ili estis en taŭga ordo.

Ĉar ĉiuj homoj, kiuj povus ĝeni ilin, troviĝis en festekscitiĝo honore al la sanktulo *Caralampio*, estis la havigado de la necesa materialo pli facila kaj pli rapide okazis, ol la ĉaristoj atendis.

Tiel restis al ili fine ankoraŭ sufiĉe da tempo por foje rigardi la feston elproksime, por ke ili ne devu restadi por ĉiam tie ekstere sur la eterne venta ebenaĵo, tiom malproksime de la urbo, por ke ili ĝuste povu aŭdi ankoraŭ de tempo al tempo la sonorilojn kaj la eksplode krakantan pafadon de la piroteknikaĵoj.

Kiel ĉiu, kiu iras al festo, ili havis la nepripensitan esperon, ke tie okazos io precipa kaj interesa, aŭ ke falos iu bonvenigata dono en iliajn manojn.

Sed ĉe festoj okazas iu surprizo nur tiam, kiam oni atendas nenion.

En ĉiu kazo la ĉaristoj deziregis foje dum kelkaj horoj aŭskulti, vidi kaj flari ion alian ol nur ĉiam kaj eterne la ĉarojn kaj la bovojn. Eĉ la plej inteligenta homo transformiĝas tre rapide en bovon, se li vidas ĉiun tagon ĉirkaŭ si nenion alian krom bovoj.

Ĉapitro 9

9/1

Estis malfrue posttagmeze. La festo de Sankta *Caralampio* atingis sian kulminon. Antaŭ la katedralo de la malalta urboparto svarmis tumultante kaj ondadante amasoj de homoj sur la malvasta placo. Aŭdiĝis kvazaŭ gakado de aro de anseroj, krioj, bruoj, vokoj, blekado.

Ebriuloj kriaĉis kaj kantis krie.

Tie kaj tie ludis muzikgrupoj, la muzikistoj iris nudapiede kaj en flikitaj pantalonoj kaj en ĉifonitaj flanelaj ĉemizoj. Antaŭ cirko, kiu starigis sian tendon en la grandspaca interna korto de civitana domo situanta en unu el la plej proksimaj flankstratoj, ludis marimbistoj. Aliaj marimbistoj ludis sur la placo antaŭ la *cabildo*, la urbodomo. Policistoj trenis post ĉiu deka minuto eбриulon en la urbodomon por meti lin en la karceron.

La eбриuloj estis plej ofte peonoj aŭ indiĝenaj kamparanoj. Ili ne povis pagi punon. Il devis forlabori la punon, ĉar ili eбriiĝis. Maltene, se ili estis sobraj post la dormo, oni verŝis por ili varmegan nedolĉigitan nigran kafon en pelvon. Post kiam ili trinkis ĝin, ili devis purigi la placojn kaj stratojn, observate de policisto kun ŝarĝita fusilo, por tio, post reveno, ili ricevis kafon, du kulerplenaĵojn da nigraj kafograjnoj kaj kelkajn tortiljojn.

La stratpurigado estis kun mirinda precizeco enskribita kun tiom kaj tiom da tagsalajroj en la kontojn por la finkalkuladoj de la urba buĝeto. Sed, ĉar oni ĉiutage arestis sufiĉe da eбриuloj, kaj se ili mankis, kulpigis vagantajn indiĝenojn pri tio, ĉu ili eбriis, ĉu ne, la urbestro kaj la kasadministranto ne devis pagi la salajrojn, tiel precize skribitajn en la elspezkontojn.

Ankaŭ la kostojn por la prizorgado de la arestitoj oni kompreneble skribis kiel debeton en la kontojn. Se oni rigardis la finkalkulon por la kostoj de la arestitoj, oni devis supozi, ke ili fartis multe pli bone ol la honestaj civitanoj de la urbo. La arestitoj ricevis, kiel legeblis en la kostokalkulado, viandon, ovojn, fruktojn, cigaredojn. Estas vere mirige, ke la povraj indiĝenaj farmlaboristoj ĉe tia bonega traktado ne strebis ĉiutage, ke oni arestu ilin; ĉar vivi pli bone ol en la urba prizono ili povis nenie.

La placo antaŭ la katedralo troviĝis tre malalte. Pluvsezone troviĝis tiu placo ĉiufoje kelkaj tagojn.

Sed nun la placo estis tute inundata de standoj, restoraciaj tendoj, pafbudoj kaj ludotabloj, inklude de ĵetkubaj tabloj. La irejoj inter tiuj budoj kaj standoj estis tiaj malvastaj, ke la homoj, kiuj tie svarmadis, moviĝis nur lante antaŭen. Estis ĉiama ŝovado, interpuŝado kaj premado. Tiel ekestis la impresoj, kvazaŭ kelkaj dekmiloj da homoj tie troviĝas sur la placo, kvankam, se oni nombrus ilin, ĉeestus apenaŭ pli ol tri mil.

Kion tiuj urĝantaj kaj ŝovantaj interpuŝuloj kaj premuloj tie efektive serĉis, ili tute certe mem ne sciis. Tie estis aĉetinda nenio, kion ili ne povus aĉeti iam ajn alitempe same avantaĝe aŭ eĉ pli avantaĝe, pli malkare kaj multe pli fidinda en iu magazeno de la urbo. Sed ĉiuj havis sur sia vizaĝo esprimon, kvazaŭ li atendus aĉeti tie aŭtentikajn oromonerojn, kiuj popece kostas nur peson.

Ĉio, kion la homoj aĉetis tie, ili aĉetis ne tial, ĉar ili bezonis ĝin, sed ili aĉetis ĝin, ĉar ili ĝin vidis, ĉar ili estis en la humoro elspezi monon, ĉar lertaj komercistoj persvadis ilin, ke ili povas aĉeti tion aŭ tion nur ĉe li kaj ĉe neniuj aliaj en la mondo, kaj ke tio estas granda bonŝanco por ili, ke li venis en la urbon, kaj ke eĉ tiukaze, se ili momente ĝuste ne bezonus la aĉetindan varon, tiu mankus al ili certe morgaŭ, ke tiam estos tro malfrue kaj ili preterpasus la grandan kaj plej favoran okazon en sia vivo.

Tiel la homojn kaptis certa mensebrieco. Sub la influo de la kriado, bruoj kaj muziko, ofertantaj vendistoj, puŝado kaj ŝovado de la homoj ĉirkaŭ ili, kiuj aĉetis kaj aĉetis, kvazaŭ morgaŭ granda katastrofo povus detrui ĉion, la homoj perdis ĉiun kontrolon pri si kaj sia agado. Iliaj kapoj pleniĝis kaj peze

ekturniĝis kaj perdis sian trankvilan pensmanieron. Tiel ili aĉetis kaj aĉetis, la plej sensencan kaj plej superfluan fatrason. Objektojn, kiuj estas aĉaj kaj ne havas uzvaloron. Kaj ili aĉetis kaj aĉetis, ĉar ili vidis, kiel ĉiuj aliaj homoj ĉirkaŭ ili aĉetas kaj aĉetas.

Simile estis ĉe la pafbudoj kaj ĉe la standoj, kie oni rajtis ĵeti pilkojn al starigitaj nigraj katoj el kartono. Por dek centavoj oni rajtis pafi trifoje per pikilo al malgranda celdisko. Se la pafinto sukcesis trifoje trafi en la nigron, li ricevis kiel premion arabeske ornamitan kaj per orokoloro pripentritan florovazon. En la pli grandaj urboj iu magazeno popece povus oferti tian vazon por dudek centavoj, kaj neniu, kiu posedas nur iom da estetika sento aĉetus ĝin. Eĉ tie en tiu pli malgranda urbo, kie tiam estis en modo tio, kio estis en pli grandaj urboj jam antaŭ tridek jaroj rabatvaro, komercisto apenaŭ povus esperi vendi tiajn vazojn kaj la ceteron, kion la pafbudoj kaj standoj disdonis krome kiel premiojn al klientoj. Sed, se oni gajnis tian objektaĉon en pafbudo, tio estis kiel donaco. Oni portas ĝin hejmen kaj starigas ĝin en la domo. Kvankam ĝi detruas ĉian harmonion en la domo, sed kiu havus la kuraĝon ĵeti tian bele orumitan vazon en la rubujon. Oni provas uzi ĝin kiel vazon. Sed, se oni vere metas florojn en ĝin, la vazo renversiĝas kun la akvo, ĉar la ĉeĥoslovakaj fabrikantoj de tiuj vazoj pensis malpli pri la ĝustaj proporcioj de la vazoj ol pri tio doni al ili luksan aspekton. Kaj ĉar la vazo do uzeblas por nenio en la mondo, oni nur starigas ĝin en la loĝejo de la pafinto. Tial ĝi neniam disrompiĝas kaj herediĝas de generacio al generacio. Pro tio la estetika sento de la homoj restis ĉiam tia, ke ĉiu nova generacio en pafbudo penas fari por dek centavoj dudekfoje tri pafojn, por gajni tian vazon.

Sed facile tute certe ne estis efektive gajni ion en la pafbudo. Oni gajnis nur pro pura hazardo ion, kaj la hazardo ekefikis nur tiam, se oni trifoje celis al tute alia loko ol al tiu, kiun oni intencis trafi. La aerfusiloj estis tiel alĝustigitaj, ke eĉ feliĉigaj hazardoj nur tre

raris. La pafbuda viro povis vojaĝi kun siaj vazoj, tasoj por barabaj viroj, japanaj ventumiloj el Halle ĉe la rivero Saale kaj la vekhorloĝoj kaj bildoj de virgulino Maria du jarojn al kvardek diversaj jarfoiroj kaj sanktulaj festoj, kaj se oni iutage ree renkontis lin, li starigis plu la samajn vazojn kaj vekhorloĝojn. Kaj la homoj pafis ankoraŭ tiam tri pafojn por dek centavoj por gajni vekhorloĝon, kiu pro la longa servado estis rustiĝinta kaj deformiĝinta pro la multfoja enpakado kaj elpakado.

Sed la pafbuda mastro estis afabla viro. Se oni multe pafis kaj penis kaj faris kelkajn lertajn pafojn, kiuj tamen ne gajnis la vazon, sed la bonintencan kapkliniĝon de la pafbudisto: „*Otra vez, caballero, más buena suerte*, la venontan fojon, *caballero*, vi pli bonŝancos!“ La bonega pafinto ricevis medalon fiksitan sur la bruston, kiu atentigis lin inter la ceteraj festpartoprenantoj kiel elstare gravan viron.

Oni povis pafi ankaŭ al surstarigitaj skatoloj kun cigaredoj. Skatoloj kun cent cigaredoj kostis tri pesojn, kaj tia skatolo aĉetebilis en ĉiu magazeno por dek centavoj. Sed tie en la festo la homoj ege penis dekfoje fari tri pafojn por dek centavoj por povi havi tian skatolon.

Se la homoj tro malprudente forpafis sian monon kaj nun volis regajni ĝin, ili iris al la ludobudoj kaj al la ruletaj tabloj. Tie estis ja tiel facile per dudek kvin centavoj per unu fojo gajni kvin pesojn. Tiun okazon oni ne rajtis preteriri, kaj ĉiu estis dankema al la viro kun la ruleto, ke li venis al la festo kaj tiel donis al la homoj la okazon fariĝi riĉaj en unu nokto eĉ sen devi labori.

La posedantoj de la pafbudoj kaj de la ĵetstandoj kaj ĉiuj similaj homoj estis grandaj friponoj, tion sciis ĉiuj festvizitantoj. La fusiloj ne pafis laŭcele, la pafoforto estis tro malgranda kaj ne faligis eĉ nur unu skatoleton da cigaredoj, se la pafbudisto ne

deziris tion, kaj se li intence ne starigis la skatolon tiom proksime al la malantaŭa eĝo, ke ĝi jam falis, se oni nur iom tuŝis ĝin. De tempo al tempo li ja devis permesi la gajnon de kelkaj skatoloj por alogi novajn klientojn. Ankaŭ la viro kun katoj el kartono ŝovis de tempo al tempo fabokernon sub la ligneton servantan por la starigado de la kato tiel, ke la kato renversiĝis kaj la ĵetinto ricevis ses ĵetojn por nenio, por denove provi sian bonŝancon kaj gajni oran poŝhorloĝon.

Nur la viro kun la ruleto estis honesta. Tio estis konata. Kiu ajn vizitanto, kiu jam riskis sian monon, rajtis ektorni la ruleton, kaj se iu asertis, ke la ruleto staras oblikve, oni tuj ekvilibrigis ĝin. Tie friponaj agoj ne okazis. Tion ankaŭ la polico ne tolerus. Strange estis nur tio, ke la ununura viro, kiu daŭre gajnis kaj riĉiĝis, estis la posedanto de la ruleto mem. Kiel li pagu alie siajn altajn impostojn? Kaj ankaŭ vivi li volis. Kaj tamen ĉiuj homoj, kiuj riskis tie siajn pesojn, estis firme konvinkitaj, ke la viro kun la ruleto venis tien nur, ĉar li intencas riĉigi ĉiujn. Kaj, se la ludantoj spite al multfoja vetado de sia mono ne riĉiĝis, sed perdis tion, kion ili posedis, ĉiu kulpigis nur sin mem kaj diris, ke simple Fortuno ne helpis lin, ke estas lia ĉiama sorto ne havi feliĉon.

Kompreneble la ruzuloj, kiuj tie ludis, ne esperis eĉ dum sekundo, ke ili povus forgajni de la ruletposedanto almenaŭ peson. Se tiu danĝero minacus la ruletposedanton, li ja ne venus. Sed la ruzuloj ludis por gajni la monon de siaj kunludantoj, por tiel partopreni en la negoco de la ruletposedanto. La ruzuloj dum horoj eltenis ĉe la ludotablo. Ili vetis sian monon laŭ certa sistemo. Ili gajnis ofte kaj tiel helpis al la posedanto allogi novajn klientojn, ĉar la posedanto elpagis la gajnojn al la ruzuloj kun laŭta kriado: „Jen, *caballeros*, denove kvin pesojn por via *tostón*. Vi faras el mi povran viron. Morgaŭ mi devos fermi mian ruleto-tablon. Mi devas nutri familion. Sed mi estas viro de honoro.

Nova ludo komenciĝas, *cabballeros*. Vetu, *cabballeros*, vetu. *Se fué*. Rrrr. *Quince negro*. Kiu havas la nigran dek kvin? Neniu? Vetu, *caballeros*, vetu, nova ludo komenciĝas.“

La ruzuloj gajnis efektive. Dudek pesojn, tridek pesojn. Sed ili volis gajni cent pesojn kaj poste fini la ludon. Kiam nokte la rulettablo estis fermita, la posedanto faris la tutan negocon mem; kaj la ruzuloj estis same tiom malplenaj kaj elsakigitaj kiel la stultuloj. La sola persono, kiu finis la tagon kun gajno, estis la ruletbankiero.

La ruleto kaj la ceteraj tabloj, kie oni ludis je kontanta mono, havis licencon nur ĝis la naŭa vespere. Nur sub tiu kondiĉo ili ricevis la licencon. Sed la vera negoco efektive komenciĝis ja nur post la naŭa vespere, ĉar la *caballeros* en tiu tempo sendis siajn edzinojn en la liton. Kaj tiam la *caballeros* estis liberaj kaj ne plu molestataj.

La polica ĉefo sendis policiston kun la informo, ke pasis la tempo por la ruleto. La ruletbankiero translasis la tablon por certa tempo al sia kunlaboranto, kaj li iris al unu el la *cantinas*, kie li renkontis la polican ĉefon.

„Ĉu *copita*, *jefe*? Ĉu glaseton da komiteko?“ li demandis. Sen atendi la respondon de la aŭtoritato, kun kiu li parolis, li mendis du grandajn glasetojn da komiteko *añejo*. Kaj kiam ili ankoraŭ estis duone plenaj en la manoj, li mendis du pliajn glasetojn da komiteko. Tiam li eltiris kvin pesojn el la poŝo, ŝovis ilin al la polica ĉefo en la pendantan manon, grimace fermis okulon kaj diris: „Vi havas ja familion, *jefe*, estas por viaj infanoj.“

Ĝis la deka vespere montriĝis neniu policisto ĉe la ruleto. Oni gaje ludis. Laŭ la licenco ne estis permesite, ke persono vetu pli ol dek centavojn sur la sama nombrokampo. Kompreneble ĉiu rajtis veti

kvin centavojn sur dek diversajn nombrojn aŭ pli da ili en ĉiu ludo. Sed vespere je la sepa la bankiero jam malinkline tordis la vizaĝon, se iu vetis malpli ol kvaronon de peso. Je la oka oni vidis jam nur ĵetonojn kun valoro de duono de peso sur la nombroj. Je la deka la bankiero po nombro akceptis kvin pesojn.

Tiam, je la deka vespere, aperis denove policisto kun la informo, ke nun devu esti la lasta ludo, kaj ke li ne rajtas permesi pluan ludadon. La ruletviro donis al la policisto peson. Tiam li denove iris al kantino. Ĉifoje ĝi estis aliloke. Sed ĝuste, li renkontis la polican ĉefon. Estis pruvo de la prudento de la bankiero, ke ĉiufoje li sukcesis tuj trovi la polican ĉefon en la ĝusta kantino sen disipi tempon ĉe la serĉado. Kostis denove du glasetojn da *comiteco añejo*, sed ĉifoje dek pesojn por la familio.

Sed tio ne estis ĉio ĉifoje. La polica ĉefo movis iom la kapon en la direkto al sinjoro, kiu sidis ĉe tablo kun botelo da biero antaŭ si.

„Ĉu la *presidente* estas la urbestro?“, rimarkis la polica ĉefo. La ruletviro tuj komprenis.

Li iris al tiu tablo.

„*Cómo está, señor Presidente?* Kiel vi fartas?“

„Aĥ, *don Claudio, qué tal?* Kiel statas la negoco? Mi devas diri al vi, ke ni povas permesi nenial, ke via ruleto turniĝos ankoraŭ post la naŭa vespere. Vi ja konas la kondiĉojn de via licenco.“

„Mi tuj fermos ĝin, *señor Presidente*, nur kelkajn ludojn ankoraŭ. Kelkaj sinjoroj tie volas havi revanĉon. Tion mi apenaŭ povas rifuzi. La sinjoroj estas ekscititaj, kaj tio povus konduki al tumulto, eble eĉ al kelkaj pistolpafoj.“

„Vi pravas, *don Claudio*“, kapjesis la urbestro.

„Kompreneble, sub tiaj cirkonstancoj. Sed ne tro longe, ĉu vi komprenas? Ĉu vi ne volas sidiĝi al mi por botelo da biero?“

„Vi devas pardoni al mi, *señor Presidente*“, diris la ruletviro, lerte evitante la inviton, kiu tute ne estis serioze dirita. „Ĉe okazo“, li diris plu, kvazaŭ eksaltonte, por povi rekuri al sia negoco, „mi aŭdis, ke vi volas konstrui hospitalon ĉi tie. Ĉu vi permesus, *señor Presidente*, ke mi faru malgrandan kontribuon?“

„Mi tre dankas al vi en la nomo de la civitanaro“, respondis la urbestro.

La ruletviro tiris kvin ormonerojn el poŝo kaj metis ilin proksime antaŭ la urbestron kaj ŝovis ilin duone sub la urbestran brakon, ripozantan sur la tablo.

La oromoneroj malaperis, antaŭ ol la ruletbankiero denove enpoŝigis la manon.

„Kun via afabla permeso, *señor Presidente*, sed nun mi devas rapidi, por ke ne okazu ĉe mia tablo eĉ tumulto.“

„*Bueno, don Claudio*, sed memoru, ne tro longe.“

Eĉ je la unua post noktomezo la ruleto turnadis sin. Tiam la negoco atingis sian kulminon. Nun ludis la bienuloj. Ĉiuj ĉi homoj, kiuj povis veti nur duonon de peso aŭ peson, ne plu kuraĝis proksimiĝi. Oni ne vendis ĵetonojn al ili. La plej malkaraj ĵetonoj kostis nun kvin pesojn. Ĉar oni ludis nur per ĵetonoj, la ruletviro, se la polica ĉefo aŭ la urbestro fine tamen agus en la nomo de la leĝo, povus ĉiam trankvile klarigi, ke ĉiu ĵetono

valoras nur kvin centavojn. Neniu, eĉ ne spiritisto, povus vidi laŭ ĝia aspekto, je kiu prezo ili estis venditaj.

La polica ĉefo, kiu ankoraŭ trifoje estis vizitita en kantino de la bankiero, komisiis al la policistoj serĉi ebriulojn kaj skandalulojn kaj ne molesti la bienposedantojn ĉe la ruleta tablo.

La Presidente same estis vizitita ankoraŭ trifoje. Pro la hospitalo. Poste li foriris por dormi kaj konfidis la urbon al la protekto de la ludantaj bienuloj. Sub ties ŝirmo la urbo estis sekura; ĉar la bienuloj estis la defendantoj de kvieto kaj ordo, kaj ĉar ili rigardis ĉion ekzistantan kiel bonaĵon kaj kiel deziron de Dio.

Ĉapitro 10

10/1

Andreo alvenis en la urbo malfrue, kiam jam vesperiĝis.

La sencela ondado de la homoj pli intensiĝis. La kriadado de la vendistoj estis nun pli laŭta, kvankam ankaŭ pli raŭka. Ĉie oni kriadis kaj bruadis. Neniu sciis pro kio. Sed ĝi estas karakteriza pri homoj, ke tiukaze, se multaj kunestas, ili ŝatas krii. Ĉiu unuopulo el ili deziras superkrii ĉiun alian, ĉar ĉiu el ili pensas, ke tio, kion oni volas diri, estas pli grava ol tio, kion volas diri la aliaj.

„Aquí, aquí, la seda legitima de Francia y las mas barata. Ĉi tien, ĉi tien, aŭtentike franca silkoŝtofo, plej malkara tutmonde.“

La aŭtentike franca silkoŝtofo, kiun la krianta komercisto flirtigis en la aero kiel longan standardon, por ke ĝi aspektu onde rebrile,

estis sisala produkto el Jukatano. Sed, ĉar li kriis tiom laŭte, ke ĝi estas silko franca, fidis lin la ĉirkaŭstarantaj inoj, alie, se la viro mensogus, pro tiu kriadon li devus ja sufokiĝi je la propraj mensogoj.

La komercisto de silkoŝtofo estis arabo el Tabasko, dum sufiĉe longa tempo en la lando por scii, kiel oni hispanlingve plej lerte povas trompi kaj mensogi meksikanojn en malgrandaj urboj.

Kiel najbaron li havis kubanon, kiu vendis kuracilojn. Ne estis iu ajn korpa aŭ anima difekto de la homaro, por kiu li ne havis la ĝustan kuracilon: kuracajn radiketojn, herbeojn, pilolojn, ekstraktojn, boteletojn kun sanigaj akvoj. Hispano staris ĉe sia eta tablo, vendante peruan dentopulvoron. Estis la pulvoro, kiel li asertis, kiun jam uzis la inkaoj. Li diris, ke li elportis ĝin el la subteraj volbaĵoj de ruinoj en Peruo kaj Bolivio, kaj ke ne multe postrestis de tiu mirakla dentopulvoro, nur kelkaj cent kilogramoj. Kaj li aldonis, ke tiam, kiam li estos elvendinta ilin, la homoj, kiuj poste deziros konservi siajn dentojn ĉiam en sana stato, bedaŭros tion tro malfrue. Li konsilis al la homoj, ke ili aĉetu tuj kvin pakaĵetojn, anstataŭ nur unu, ĉar tio estis laŭ li la plej bona kapitala investo, kiun ili povus fari.

Kiam li atingadis tiun parton de sia parolado, li prenis malgrandan indiĝenan knabon, kiu tie staradis. Kun multaj vortoj kaj kun imponaj magiistaj gestoj li vaste malfermis la buŝon de la knabo kaj frotis al li iom de la pulvoro sur la dentojn.

„Gesinjoroj, kun tiu pulvoro vi ne plu bezonos dentbrosilon. Kun tiu mirakla dentopulvoro de la famaj inkaoj vi bezonas purigi la dentojn nur per montrofingro, ĝuste tiel, kiel faris tion la famaj inkaoj mem“, li diris, dum li poluris la knabajn dentojn per sia fingro tien kaj reen. Post kiam li finis tion, ĉiam parolinte kaj glorinte la pulvoron, li verŝis iom da akvo en la buŝon de la

malgranda knabo. Tiu devis gargari la buŝon kaj la akvon poste elkraĉi. Tiam la pulvoroviro denove draste malfermegis la buŝon de la knabo, multe pli vaste, ol la knabo normale povas malfermi ĝin, kaj turnis la vizaĝon kiel aŭtomaton al ĉiuj flankoj. La knaba rikano malkovris blindige blankajn dentojn. La ĉirkaŭstarantaj homoj estis nun konvinkitaj, ke la perua dentopulvoro efektive mankis, kaj ke tio estas la kaŭzo, kial ili havas malsanajn dentojn. Ili aĉetis la kvin ofertitajn pakajetojn, ĉar unu el ili certe ne sufiĉus ĝis la fino de ilia vivo. Ili estis ekde tiam tute certaj, ke ili neniam plu havos dentdolorojn. Tion oni ja promesis al ili.

De la kvar malgrandaj indiĝenaj knaboj, kiuj estis la ekspoziciuloj de la pulvora viro, ricevis ĉiu du centavojn da salajro. Por tio ili estis devigitaj ŝmiri sur siajn dentojn verdete flavan paston el maizo, kiun kunlaboranto de la pulvoroviro ie tenis preta en angulo. Krome la knaboj devis ĉeesti en la proksimo de la pulvoroviro, tiel ke en okazo de bezono li povis tiri ilin evidente tute hazarde el la homamaso.

Plej proksime al la pulvoroviro ne estis tablo, sed tie staris du viroj kaj damo. Unu el la viroj havis gitaron, la alia violonon, kaj la damo tenis en la manoj presitajn folietojn ruĝajn, verdajn, flavajn kaj bluajn.

„Jen nova kanto, gesinjoroj“ vokis la viro kun la gitaro. „Nun ni kantos por vi *„Soy Virgencita“*, Mi estas ankoraŭ virgolino, senmakula virgulineto. Ek do, aŭskultu do.“

Li kliniĝis antaŭen, apogis la gitaron sur la genuo de la antaŭmetita femuro, agordis ĝin, ŝanĝis per ŝovado la situon de la gitara ponteto kaj ludis akordon.

La viro kun la violono komencis ludi, kaj tiam la kantistino komencis kanti. Post la unua stanco ankaŭ la viroj ekkantis kun ŝi.

Ili kantis softe, iom plende, sed per agrablaj harmoniaj voĉoj. La damo ŝajnis kvazaŭ ŝi legus la kanton de unu el la folietoj, kiujn ŝi tenis enmane. Sed ŝi sciis ĉiun vorton parkere. Ŝi kaj la viroj kantis tiun kanton kaj sian tutan ceteran repertuaron certe jam pli ol dekmilfoje.

Ili estis *cantadores de corridos*, meksikaj kantistoj de baladoj, kiuj vagadas de loko al loko kaj mankas sur neniuj festoj en Meksiko.

Post kiam la kantado finiĝis, ili turnis sin al la pelmela aro de homoj starantaj ĉirkaŭ ili en ringo: „Tiu ĉi belegaj baladoj, kiujn ni ĵus ĉi tie prezentis por via plaĉo kaj je nia granda plezuro per dolĉaj kaj melodiaj sonoj, estas nun je via, al ni tiel agrabla kaj ŝatata dispono. *Dos surtidos cinco Centavos, cinco surtidos diez – nada más. Quién? Cuáles?* Du diversaj kantoj kostas kvin centavojn, kvin diversaj dek, ne pli. Kiu aĉetas? Kaj kiujn?“

Oni rondirigis la folietojn, oni rigardis, elserĉis kaj aĉetis ilin por dudek aŭ dudek kvin centavoj.

Kiam la vendo stagnis, la kantistoj vokis: „Neniu plu por la virgulino? *Oiga, oiga, amigos*, he, he, amikoj, tiukaze do nova, tute nova kanto: ‚Vivo, heroaĵoj kaj morto de generalo Santana‘, aŭ ĉu ni kantu por vi ‚La gringoj en *Churubusco*‘? Diru, ni kantos laŭ via deziro.“

La violonisto agordis sian violonon, kaj denove ili kantis baladon.

Jen la loko, kie Andreo haltis. Estis la plej malkara amuzo. Oni povis stari dum horoj kaj aŭskulti la baladajn kantistojn. Oni ne estis devigita aĉeti baladojn.

Al Andreo du baladoj ekplaĉis kaj li aĉetis la folietojn, ruĝan kaj verdan. Li tralegis ilin, kunfaldis ilin kaj ŝovis la folietojn en sian ĉemizan poŝon, kie li portis sian cigaredoskatolon.

Poste li opiniis sin devigita iri en la preĝejon.

10/2

La katedralaj pordoj estis vaste malfermitaj. En la sekulara kriadado kaj tumulto, kiu regis sur la placo antaŭ la preĝejo, miksiĝis de tempo al tempo kelkaj akordoj de la malgranda orgeno, kiu troviĝis en tiu preĝejo. Sed ankoraŭ pli ofte oni aŭdis la monotonan kantadon, per kiu respondis la homoj en la katedralo la ĵurpetojn de la klerikoj.

Andreo ne sciis multon pri la katolika religio, kaj eĉ malpli pri la kristana religio. Kion li konis kaj sciis, tio estis sufiĉe konfuza. Kaj nur unu aferon li konis pli bone, kaj tio estis la ceremonioj ligitaj al la religia servo. Li sciis, kiel signi sin ĝuste per kruco, li sciis kiel aspergi sin per akvo, li sciis, kiam li surgenuiĝu kaj kiom da krucosignoj li faru dum certaj tekstopartoj de la litanioj.

Li sciis de la katolika religio nek pli nek malpli ol tio, kion lia patrino kapablis instrui lin, kion liaj najbaroj en la kabanoj de la bieno sciis kaj kion li hazarde aŭdis sen iam kompreni ion, kiam li servis en la grandsinjora domo de la bona posedanto.

Ankaŭ tio, kion la familio de *don* Arnulfo sciis pri religio, estis nur tre limigita. Ankaŭ ties religiaj scioj tute ne superis la ceremoniojn, la kutimajn preĝojn kaj avemariojn. Kiel ĉiuj nur

neglekte edukitaj homoj, ili estis forlogataj al supraĵa sinteno kaj al simpla priatento de la ceremonioj, kiuj avancis en la eklezioj ja tiom, ke oni forgesas pro tio la esencan enhavon de la religio kaj identigas la ceremoniojn kun ĝi mem.

10/3

La katedralo sur la placo estis tre alte konstruita. Ĝia fundamento troviĝas pli ol dek metrojn super la nivelo de la placo. Tial la konstruaĵo ne estas damaĝita de la oftaj inundoj, kiuj okazas en la pluva sezono kaj transformigas la placon en lagon.

Sed tiun tiel favoran lokon por la katedralo tute ne malkovris la hispanaj monaĥoj. Ili simple starigis la katedralon sur la fundamentoj de la praa indiĝena templopiramido, kiu tie staras jam milojn da jaroj. Kun nur kelkaj esceptoj ĉiuj preĝejoj en Meksiko estas konstruitaj sur la fundamentoj de praindiĝenaj temploj aŭ piramidoj.

Supren al la katedralo kondukas tre vasta ŝtona ŝtuparo, tiom vasta, ke ĝi estas multe pli larĝa ol la granda portalo en la mezo de la katedralo.

Sennombraj homoj, viroj, inoj kaj infanoj, *ladinos* kaj indiĝenoj iris supren sur la ŝtuparo aŭ ili descendis sur ĝi. La inoj ĉiuj volvis siajn nigrajn lantukojn ĉirkaŭ la kapon; ĉar estas malpermesite por inoj eniri la preĝejon sen kapa kovrilo. La hararo de la inoj devas esti nevidebla. Satano, kiu ĉie embuskas kaj enŝteliĝas ankaŭ en bone katolikajn preĝejojn, povus misuzi la hararon de la inoj por tenti iujn virojn aŭ eĉ la sinjorojn *curas* mem per pekaj pensoj interne de la preĝejo.

La liberaera ŝtuparo estis plena de vivo ne nur pro la piaj preĝejoj vizitantoj, sed ankaŭ pro la almozpetantoj, kiuj tie sidis tage kaj

nokte sur la ŝtupoj. La eklezio instruas la homojn fari bonon al aliaj. Por ke la privata posedaĵo estu pli bone protektata. Malsatuloj kaj desperuloj havas nenion, kion ili povus perdi kaj tial ili facile inklinas ataki la privatan posedaĵon kaj eĉ fari revoluciojn. Sed, ĉar oni ne ĉiujn malsatulojn kaj desperuloj povas satigi per bonaj faroj, la postulado de karitataj faroj fariĝas sobra negoco kiel ĉiu alia. Al la piulo oni instruas kaj rekomendas fari bonon. Kiel fidela filo de la eklezio li sekvas tiun ordonon kaj faras bonon al tiu, kiu kaŭras plej proksime ĉe siaj piedoj kaj etendas malfermitan manon. La pia homo donas tie kaj ĉi tie centavon kaj per tio lia konscienco estas malŝarĝita.

Sur la plej supraj ŝtupoj kaj proksime al la pordoj staris dense kunpremitaj la tabloj de la komercistoj, kiuj vendadis konsekritajn kaj nekonskritajn kandelojn, bildojn de sanktuloj, preĝofolietojn, amuletojn, krucetojn, rozariojn, arĝentajn koretojn, manetojn, piedetojn, artifikajn azenojn, ĉevalojn, bovinojn kaj okulparojn. Tuj ĉe la eniro interne de la katedralo la tabloj estis pli multaj. Tie en la katedralo ili staris laŭvice ĉe la vandoj. Interne de la katedralo estis jarfoiro, kiu estis tiom ampleksa, kiom tiu ekstere de la katedralo sur la granda placo. La diferenco estis nur tiu, ke oni malpli kriis sur la jarfoiro interne de la katedralo. Tie oni nur flustris, ne laŭte interparolis, ŝakris varojn kaj vigle gestadis per brakoj kaj manoj.

10/4

Andreo supreniris sur la ŝtuparo, demetis sian truigitan bastan ĉapelon kaj iris en la preĝejon. Li trempis manon en la ŝtonan pelvon kaj aspergis sian frunton, surgenuiĝis, kliniĝis jam ĉe la enirejo antaŭ la altaro troviĝanta ĉe la alia fino de la katedralo, kaj krucosignis sin kelkfoje.

Per tiuj ĉi agoj li faris ĉion, kion li sciis pri la katolika religio. Fakte li tiel plenumis sian devon. Miloj da aliaj, eĉ *ladinos*, ne sciis pli kaj ne faris pli.

Sed Andreo estis avida je scioj kaj scivolema. Li volis observi, kion oni faras en tiu katedralo, kaj kio okazas en ĝi. Li jam sufiĉe ofte estis ankaŭ en aliaj preĝejoj, en Tenejapa, en *Chiapa de Corso*. Sed tiam li estis pli juna, kaj li malpli konsciis sian vivon kaj la aferojn, kiuj okazas ĉirkaŭ li. Ĉio estis por li tro nova kaj fremda. Nun jam pli aĝiĝinte, li fariĝis pli konscia. Kaj pro la seninterrompa kunesto kun multaj aliaj ĉaristoj de diversaj frajntreprenoj el diversaj lokoj kaj pro sennombraj ideoj kaj opinioj, kiujn li ie kaptis kaj aŭdis, apenaŭ io estis plu fremda al li en la vivo, kiun li vivis jam dum kelkaj jaroj. Li rigardis ĉiujn aĵojn kaj aferojn, kiuj perdis sian fremdecon al li, pli sobre kaj pli klare mense. Li jam komencis kompari aĵojn, okazaĵojn, statojn. Kaj tiel li komencis kritiki ilin. Li ne plu lasis kapti sin per vortoj kaj opinioj. Li rigardis tion kaj jenon, komparis ĉi tion kun aliaj aferoj, kiujn li vidis aŭ pri kiuj li aŭdis, kaj li komencis akcepti kaj alproprigi nur tion, kion li konsideris bona aŭ prava, surbaze de la akiritaj kaj pli kaj pli ampleksiĝantaj spertoj.

Li jam komencis pensi memstare. Liaj pensoj de tempo al tempoj devojiĝis kaj kunpuŝiĝis tie kaj tie kun io ajn, instruante lin per tio, ke li estas sur la malĝusta vojo. Tiukaze li reiris al la elirpunkto de sia pensado kaj sekvis novan vojon.

Lia laboro fariĝis pli facila por li, ĉar li jam sciis ĉiujn detalojn pri ĝi kaj ne plu devis pensi pri la laboro. Tiel li ricevis pli da libero por sia pensado. Dum horoj li povis sidi trankvile sur la ĉaro, se la vojo estis bona kaj la ĉaro en ordo, kaj fari ĉe tio nenion alian krom pensi kaj pensi. Liaj pensoj kuris nun tre libere kaj tre senbride. Li havis la grandan avantaĝon, kiu mankas al milionoj de homoj, ke liaj pensoj ne ricevis certan direkton per instruado.

Li ne pensis antaŭjuĝe. Sen antaŭjuĝo li konsideris ĉiun aĵon kaj procedon sen esti malhelpata per pensoj aŭ vortoj, kiujn iu alia jam havis antaŭ li aŭ diris. Li tiris siajn konkludojn el la natura stato de la aĵoj kaj el la spertoj, kiujn li faris. Li rigardis aĵojn kaj okazaĵojn ne tiel, kiel priskribis ilin iu antaŭ li, sed li rigardis ĉion tiel, kiel tio estis aŭ kiel tio laŭŝajne estis por li.

Ĉar li sciis ankaŭ pri religio tre malmulte, precize dirate, nenion, li konsideris ankaŭ la religion kaj ties ceremoniojn sufiĉe sobre. De ĉia kredo pri mirakloj, kiun la religio propagandas, kiel ekzemple pri la daŭranta virgeco post la nasko, la revivigo de mortuloj, la irado sur la maro, la nutrado de kvin mil malsataj homoj per kvin panoj kaj du ordinaraĵoj fiŝoj, la metamorfozo de akvo en vinon, la ĉieliro kaj pri ĉio simila, li estis tute libera. Se iu provus persvade altrudi tiajn aferojn kiel veron al li, li ne akceptus tion. Nur unu el ĉiuj ĉi mirakloj li certe konsideris verŝajna, la rakonton laŭ kiu Kristo post sia morto aperis al siaj apostoloj, eĉ sur la vojo al Emaŭs. Tion li certe supozis verŝajna ne tial, ĉar la aŭtoritata eklezio rakontis tion, sed, ĉar ekde infaneco li ofte aŭdis pri tiaj fantomoj en la kabano de sia patro kaj en la kabanoj de aliaj indiĝenoj. Al unu el liaj najbaroj aperis la mortinta onklo, al alia la jam delonge putrinta avino kaj al iu alia viro la murdita filo. Al li aperis ankoraŭ neniu el liaj mortintaj parencoj aŭ konatoj. Sed ĉar li plenkreskiĝis kun tiaj rakontoj, li eble akceptus, ke la mortinta Kristo aperis al kelkaj homoj, kiuj konis lin.

El ĉio ĉi montriĝas sufiĉe klare, ke Andreo estis malica pagano, pri kies konverto oni devas rezigni. Kaj li estas ekzemplo pri tio, ke la eklezio saĝe agas, ke ĝi pelas la gregon en la stalon jam tiam, kiam homo ankoraŭ estas infano kaj kredas laŭvorte ĉion, kion oni rakontas al la homo, kiu ankoraŭ ne havas la kapablon mem pensi kaj mem juĝi kaj disigi ion eblan de io propabla, kaj la neeban de simboleca. Kion oni instruas al la infano, antaŭ ol ĝi povas pensi kaj juĝi, restas enplantita kaj kunligiĝas dum

progresinta aĝo kun sentimentala junulara romantiko; kaj ĉar la plenkreskinta viro ne havas la kuraĝon ofendi sian patrinon, kiu instruis al li tiujn fabelojn, li jesas ilin. Ĉar li estis edukata en tiu maniero kaj do opinias esti utila membro de la homa socio, li vidas nur tro volonte kun profunda ĝojo kaj sentimentala rememoro je sia propra juneco, se la propra edzino al la propraj infanoj rakontas la samajn rakontojn kaj instruas la infanojn kredi ilin. La eklezio floras kaj prosperas, ĉar ĝi sekurigas al si sufiĉe frue la junan generacion.

10/5

Post la genufleksoj kaj la krucosignoj Andreo efektive ne sciis, kial li do restadu plu en la katedralo.

Sed li ankoraŭ restadis en ĝi, ĉar enestis ankaŭ tiom da aliaj homoj, kiuj vere ne sciis, kial ili restadas tie, kaj kiuj videble restadis tie nur tial, ĉar ili ne sciis kion fari aliokaze. Kaj tiel, kiel Andreo tie staradis, ĉar tiom da aliaj homoj staradis tie, estis certe ankaŭ rilate al ĉiuj aliaj ĉeestantoj. Ĉiuj estis tie, ĉar ankaŭ la aliaj tie estas. La grego deziris kunesti kaj kune restadi.

Krome estis ŝajne tiel, ke la homoj, kiuj ekster la preĝejo en sia normala vivo kaj en siaj negocoj neniam estas unuecaj kaj neniam povus esti unuecaj, tie trovas la harmonion, kiun ili bezonas kiel gregon.

Multaj centoj de kandeloj bruletis kaj flagradis. La kandeloj estis starigitaj ne nur antaŭ la altaro, kie ili kompreneble estis plej multnombraj. Kandeloj staris en ĉiuj anguloj kaj loketoj de la katedralo. En ĉiu niĉo, kie staris gipsfiguro drapirita per katuna vesto aŭ per pluŝa manteleto, brulis kandeloj. Kaj antaŭ ĉiu el la nenombreble multaj sokloj, sur kiu staris hororige aspektanta lignopupo kun vitraj kaj gapantaj okuloj kaj kun feltiĝinta aŭten-

tika homa hararo, brulis centoj de kandeloj. Ĉeestis certe dekoj da povruloj, kiuj en sia hejmo havis nur kenajn torĉojn kiel lumon, sed kiuj tie oferis sian lastan peson por aĉeti ĉe la komercistoj bele pentritajn kaj orname desegnitajn kandelojn por starigi ilin en la katedralo.

Multaj inoj kaj infanoj, kiuj tie surgenuiĝis, tenis siajn kandelojn enmane. Ili faris tion, por ke la sanktaj figuroj el vakso kaj gipso povu vidi kaj scii, kiu oferis la kandelojn. Ĉar tiukaze, se ili starigus la kandelojn inter la centoj kaj centoj de la aliaj kandeloj, tion ili supozis, la sanktulo ne plu povus scii, kiu donis la kandelon al li kaj eble eĉ forgesus plenumi la deziron de la preĝo direktita al li.

Kelkaj centoj da homoj surgenuiĝis tie. Sed inter la centoj da preĝantoj oni vidis apenaŭ pli ol dudek virojn. La plimulto estis inoj, junulinoj kaj infanoj.

Se viroj submetas sin al la influo de la eklezio kaj de ĝiaj apostoloj, tiukaze okazas, aparte de tre malmultaj esceptoj, pro negocaj kaj politikaj kaŭzoj. Ili volas brili kiel bonaj ekzemploj antaŭ la aliaj, por ke ili estu rigardataj en siaj politikaj kaj komercaj aferoj kiel virtaj kaj honoraj, ĉar tio estas utila por la negocoj. Ili volas atingi la konfidon de la ŝafoj, kiujn ili intencas tondi. Kiel atentaj observantoj ili spertis, ke la rekompenco estas riĉa, se oni estas fervora paroĥano. Male al tio la ino plej ofte en sia tuta esenco kaj en sia tuta ekzistado falas sub la influon de la eklezio, kelkfoje ĝis tioma grado, ke ŝi laŭ la ordono de la pastroj kaj potenculoj rifuzas en la lito la ĝojojn de seksa amo al sia edzo. Ke Meksiko, tiu revolucia respubliko ĝis nun ne donis la politikajn rajtojn al la meksikanino, kvankam meksikanino estas same tiel inteligenta kiel usonanino, okazas tial, ĉar la meksikaj revoluciuloj tre bone scias, ke la katolika eklezio provas regajni helpe de la ino la sinistran potencon super la meksika popolo, kiu estis rompita de

la revolucio. Ĉe la aktualaj cirkonstancoj en Meksiko doni politikajn rajtojn al la inoj, signifus, ke oni denove transdonus la meksikan popolon en la manojn de Romo. Se oni serĉas en meksika preĝejo, tute egale ĉu en Meksikurbo aŭ en fora angulo de la vasta lando inteligentajn inojn kaj knabinojn, oni devas iri en la malmultajn protestantaj preĝejojn. La inteligenteco de ino sub la influo de la protestanta eklezio povas same bone esti disrompita en mil pecojn kiel sub la influo de la katolika eklezio. La pruvo: la netoleremaj kaj bigotaj inoj en Usono. Sed en Meksiko la protestanta eklezio ne havas potencon.

10/6

La preĝantoj ĉiuj surgenuis. La katedralo havis nur kelkajn benkojn antaŭe. La sidlokoj de tiuj benkoj estis venditaj kaj luitaj al tiuj, kiuj havas sufiĉe da mono, kaj kiuj ne deziras preĝi al la sama Dio apud indiĝenino kun pedikoj. Tion oni ne povas postuli de homo, kiu havas monon; kaj legeblas ankaŭ nenie en la biblio, ke tiu, kiu lernis uzi naztukon, en la preĝejo sidiĝu apud iu, kiu boradas per fingro en la nazo. Tial oni ne riproĉu la milionulojn, ke ili posedas en la preĝejoj loĝiojn kovritajn de paneloj el mahagono.

La planko de la katedralo konsistas el duraj ŝtontabuloj. Sed la planko estis kovrita per forta tavolo de freŝaj abiaj pingloj, kies balzamaodoro miksiĝis kun la densa fulganta fumo de la kandel-oj kaj incensaj kaldronoj svingataj tien kaj tien de malgrandaj knaboj, kiuj celis prepari sin kiel sanktuloj.

Pro tiu fumigado la tuta preĝejo estis vualita en densa nebulo. Oni ne povis klare vidi la aĵojn. Ĉio perdis siajn konturojn, ĉio, kio estis, nebuliĝis.

La inoj surĵetis al si siajn nigrajn kotontukojn. Ili tiel komplete kovris sin per la nigraj kaptukoj, ke rigardate de malantaŭe, ili aspektis kiel surstarigitaj nigraj kegloj.

Multaj el la kaŝige envolvitaj inoj havis sur la dorso konsekritan sanktulan bildon, kiu pendis je blua rubando ĉirkaŭ iliaj koloj. Aliaj tie pendigis anstataŭ la bildo medalon. La inoj, kiuj pendigis dorse tiajn medalojn kaj bildetojn, estis tute piaj kredantinoj, je kiuj oni ekvidu jam surdorse, ke ili forŝovis de si ĉian surteran aferon, kaj ke neniu tento de Satano plu povas tuŝi ilin.

Kiam antaŭ la altaro nenio estis farenda kaj nenio okazis, la inoj kantis: „*Al cielo quiero ir, al cielo quiero ir*, en la ĉielon mi volas iri, en la ĉielon mi volas iri.“ Tion ili kantis nelacigeble, sen iu variaĵo. Per tio la preĝejo estis plenumata per stranga monotona kantado, kiu distingiĝis neniel de la monotonaj kantadoj antaŭ la budhaaj temploj en Barato kaj Ĉinio. El tiu ĉiam sama monotona kantado oni ne povis elaŭskulti sencon, se oni ne konis la vortojn jam antaŭe. Kio estis kantata, tio povis esti same bone ĉinlingva, aŭ japanlingva, aŭ malajlingva. Neniu povus diri tion kun certeco.

Sed la kantado troviĝis en plena harmonio kun tio, kio okazis nun antaŭ la altaro.

Tie staris sinjoro. Andreo kompreneble ankaŭ ĉe li ne povis ekoni kun certeco, ĉu li estas sinjoro aŭ sinjorino. La sinjoro surhavis robon por tuj dekomence distingiĝi de ĉiuj aliaj viroj, kiuj sin vestis per pantalono kaj por atentigi ĉiujn homojn pri tio, ke li estas eksterordinarulo. Andreo ankaŭ tuj ekhavis la impreson, ke la viro estas sorĉisto aŭ io simila.

La viro estis envolvita en vastan pezan orobrokatan mantelon, kiu tute kovris lian figuron. La mantelo kostis pli ol ĉiuj surgenuaĵinoj tie povus perlabori dum sia tuta longa vivo, kaj ĉiuj kune.

Andreo vidis nur la orobrokatan dorson de la viro. Kaj la ora mantelo estis tiel larĝa, ke oni ne povis vidi, kion la viro efektive faras per la manoj. El la movoj de la mantelo oni povis konkludi, ke la viro faris tie kelkajn diversajn misterajn agojn. Li prenis arĝentan kandelingon, kiu staris dekstre de li kaj metis ĝin maldekstre antaŭ sin. Tiam, post iom da tempo, dum tio daŭre murmurante, li starigis la kandelingon denove dekstren. Tiam li legis murmurante el ampleksa libro, kiu kuŝis maldekstre, poste denove el ampleksa libro, kiu kuŝis meze aŭ dekstre antaŭ li.

Ĉiufoje, kiam kelkaj sekundoj pasis, li kliniĝis antaŭ la libroj, kaj la sanktaj knabetoj svingadis incensajn kaldronetojn.

Tiam elpaŝis viro el la profundo de malhela fumtavolo. Li estis ordinara viro, je duono indiĝeno, nur vestita per pantalone kaj ĉemizo kaj sandaloj je la piedoj. Li kliniĝis trifoje al la altaro, kaj tiam li pendigis sur la ŝultrojn de la viro, kiu tie laboris, novan oran mantelon. La nova mantelo estis eĉ pli multekosta kaj pli bela ol la alia, abunde ornamita per pompaj buntaj juveloj kaj abunde brodita per oraj kaj arĝentaj ornamaĵoj. Nun la sinjoro havis sur sia korpo pli da riĉo ol la tuta distrikto povus pagi laŭ sia jara buĝeto.

La sinjoro kliniĝis denove kelkajn fojojn. Poste li eltiris de ie oran kalikon, kiun li kovris per ineca poŝtuketo. Li forprenis la tuketon kaj svingis la kalikon tien kaj tien. Poste li kovris la kalikon denove per la tuketo kaj starigis la kalikon ien, kie li ĝuste havis lokon sur sia magiista tablo.

Post tio li kliniĝis denove. Nun li aperigis kvazaŭ el nenio oran starigilon kun surmetita granda ora radianta krono. Li svingadis tiun starigilon tien kaj tien. Tiam li fine turniĝis kaj oni povis vidi, ke lia vizaĝo estas malbeligita de variolaj cikatroj.

Per ambaŭ manoj li tenis la radiaran kronon alte super si.

Kaj nun la ĉeestantoj falis en deliron de ekstazo. La starintoj falis sur la genuojn; kaj la surgenuantoj, precipe la kaŝige envolviĝintaj inoj, premis siajn fruntojn sur la plankoŝtonojn. La sinjoro svingis la radiaran kronon naŭfoje, trifoje en tri diversaj direktoj. Ĉe ĉiu svingo kelkaj sanktaj servoknaboj, vestitaj en ruĝa kitelo kun blanka puntopelerino, skuis faskon kun sonoriletoj. Kaj ĉe ĉiu eksonado de la sonoriletoj la kaŝige envolviĝintaj inoj batis siajn kapojn sur la plankon kaj frapis sin per la fingroj sur la frunton, la buŝon kaj la bruston. Okazis precize tiel, kiel antaŭ templo de la paganoj en sudorienta Azio. Se tie la pastroj frapas la gongon, la kredanta amaso falas sur la genuojn, apogas la platajn manojn sur la grundon kaj frapas per la kapo la teron, kaj tio ripetiĝas ĉiufoje tiam, same kiel en la katedralo, kiam la sonoriletoj sonoras.

La sinjoro en la orobrokata mantelo turnis sin denove al la altaro kaj svingis tie la starigilon kun la ora radiara krono trifoje supren kaj malsupren. Poste li starigis ĝin antaŭ la altaron kaj kliniĝis.

Post kiam tio jam daŭris kelkan tempon, li remetis la kandel-
ingon de tempo al tempo de maldekstre al dekstre kaj de dekstre al maldekstre. Poste li komencis paroli.

La kredantoj respondis tion per monotona kantado. Sed eĉ ne unu homo en la preĝejo komprenis vorton el tio, kion la sinjoro parolis murmurante.

Triono de la ĉeestantoj parolis nur la hispanan lingvon, dua triono la hispanan kaj indiĝenan lingvojn, el la cetera triono duono parolis la celtalan, la ceteraj la tojolavalan. Sed la sinjoron ŝajne ne afliktis, ĉu iu komprenas lin ĉu ne. Li parolis latinlingve.

Kiom ajn Andreo provis adaptiĝi per siaj sencoj kaj sia menso al tio, kio okazis, li akiris eĉ ne dum minuto la impreson, ke iu ajn homo en la preĝejo scias, kial la sinjoro kondutas kaj moviĝas tiel, kiel li faris tion. Ĉio ĉi estis sen senco kaj nenio pli ol nur gesto.

Ne estis la kulpo de Andreo, ke li tie vidis kaj aŭdis nur tion, kion li vidis kaj aŭdis, kiam li iris kun sia patro al la indiĝenaj festoj, en kiuj oni alvokis la diojn, por fekundigi la kampojn kaj gardi la peonajn kabanojn kontraŭ damaĝoj, malfeliĉo, epidemioj kaj demonoj! La edukita eŭropa katoliko, kiu antaŭ si vidas ofici en la plej multaj kazoj erudician klerikon, ne perceptas magion kaj maskeradon. Li scias, ke tiu supozata magio kaj ŝajna maskerado estas nur la simboloj kaj eble la ornamaĵoj.

Sed Andreo, kiel ĉiuj indiĝenoj, kiel la grandega plimulto de la suba needukita klaso tie, rimarkis nenion alian krom magio, maskerado, alivestiĝo, ŝamandanco, nekompreneblaj murmurataj magiaj kaj ensorĉigaj formuloj. Ne estis lia kulpo, ke li aŭdis nur magiajn kaj ensorĉigajn formulojn kaj vidis nenion alian krom apatia grego de homoj, kiu faras en nebuleca fumo sensencajn gestojn.

10/7

Dum la sonoriletoj sonoris, la dekoj de komercistoj, kiuj tie ofertis en la preĝejo siajn varojn, interrompis sian marĉandadon dum certa tempo. Apud siaj tabloj, ili, kiel ĉiuj aliaj homoj en la katedralo, falis sur la genuojn kaj same frapis siajn kapojn sur la plankon, humiligante sin antaŭ siaj dioj. Sed ili estis tiaj bonegaj

komercistoj, ke ili ne forgesis eĉ en tiuj momentoj sian komerc-on. Ili strabis al siaj tabloj por atenti, ke ne ŝtelu iu ajn eble kandelon aŭ bildeton aŭ eĉ tuŝu la kason. Kelkaj estis tiel diligentaj, ke ili kaŝe palpebrumis al tiuj inoj, de kiuj ĵus estis disigitaj en sia agado, kiam la monstranco kun la radiantaj krono estis svingata tien kaj reen, kaj montris per la fingroj al ili nombrojn rilatantajn al la prezoj, pri kiuj oni ankoraŭ ne povis interkonsentiĝi.

Kiam la granda ceremonio estis laste finita, komenciĝis tuj denove ĉe la tabloj la babilado kaj la marĉandado per eĉ pli laŭtaj vortoj kaj per eĉ pli viglaj gestoj, rekomenciĝante je tiu momento, kiam ili estis interrompitaj. Ankaŭ la eklezio komencis nun malfermi sian negocon. En Meksiko, kiel ankaŭ en Usono, la ŝtato ne kolektas impostojn por la eklezioj, ĉar la ŝtato konsideras la ekleziojn pro bonaj motivoj konkuranta entrepreno. Tie neniu povas esti vokata antaŭ juĝiston pro nepagitaj ekleziaj impostoj aŭ eĉ devigata transdoni garantiaĵon por certigi la pagon. En tiuj landoj la eklezioj mem devas zorgi pri tio, ke ili trovu sian profit-on. Se en Usono la protestantaj eklezioj aranĝas en la preĝejo balojn kun ĵazmuziko kaj bazarojn, en kiuj, favore al la eklezio, estas vendataj kisoj kaj malboniĝintaj konservujoj oferitaj de pia nutraĵkomercisto de delikataĵoj al la preĝejo, oni certe rajtas nomi tion honesta kaj sincera negoco, ĉar la eklezio en tiu okazo libervole kaj kuraĝe koncedas, ke ĝi sole de la rekompenco de Dio ne povas vivi kaj ne emas atendi ĝis la vivo en la paradizo, ĉar *Mr. Preacher*, la sinjoro pastoro, se li ne povas pagi la luon por la domo, same tiel rapide kaj sen mebloj estas ĵetata sur la straton kiel ĉiu alia civitano. Kaj se li ne povas aĉeti al sia edzino novajn robojn kaj ĉapelojn, minacas la danĝero, ke li ne plu praktikos la deĵoron de Dio kaj la savadon de la animoj, sed transprenos aŭtomobilagenturon de *Mr. Henry Ford*. Nur ne restu ĉe via laboro, ŝufaristo, se vi povas enspezi ĉe alia negoco eĉ pli!

La katolika eklezio ja ne estas tiel senhonta kiel la protestanta; kaj tial ĝi estas malpli grandanima ĉe la enspezado de mono. Ĝi ne aranĝas balojn en la preĝejo, en kiuj la ĉarlestono kaj la *Black-Bottom* estas dancataj per malsupren ruligitaj silkaj ŝtrumpoj kaj kun jupejoj, kiuj finiĝas sep kolorojn super la genuoj. Super la genuoj, mezurite kompreneble en la direkto de la umbiliko. Kaj la katolika eklezio en la preĝejo ankaŭ ne vendas kisojn kaj ŝtrumpligilojn de inoj favore al la sinjoro pastoro, kiu, por speciale amike rilati kun kelkaj de siaj tre influaj viraj paroĥanoj, invitas la sinjorojn malplenigi kelkajn viskiobotelojn en la grace favorata tempo de la prohibicio. En tiu tempo de la prohibicio, kiam la vidvino de laboristo, kiu, por havigi panon al siaj malsataj infanoj, vendis duonon de litro da brando, estis kondamnita pro tiu ago je dumviva prizono. Ĉe la prohibicio temas ja ne pri tio, ke oni ne vendu viskion, sed nur pri tio, al kiu socia tavolo apartenas tiu, kiu vendas la viskion. La vidvino de multobla milionulo, kiu ĉiutage povas konsumi ducent dolarojn da pensio, povas vendi po semajno kvincent kestojn da viskio tuj fronte al la polica administrejo. Enmiksiĝus neniu en ŝian honestan metion. La federacian agenton, kiu kaptus ŝin aŭ eĉ kuraĝus konfiski unu el ŝiaj plene ŝarĝitaj kamionoj, oni eksigus aŭ metus en frenezulejon, kien li apartenus efektive.

Sed la katolika eklezio, kiu volas riĉigi sin nek per baloj, nek per venditaj ŝtrumpligiloj nek per kontrabandita viskio, devas havigi la monon al si per aliaj rimedoj.

10/8

Maldekstre, proksimume en la mezo inter la altaro kaj la portalo staris sur soklo la sanktulo *Caralampio*, tiu, je kies honoro oni festis la feston.

Pli precize dirate, li ne staris sur la soklo, sed li surgenuis. Li estis el ligno, havis nimbon ĉirkaŭ la kapo, rigidajn vitrajn okulojn kaj barbon. Vestita li estis per malhele blua velurmantelo. Li surgenuis tiel, ke lia vizaĝo povas rigardi al la altaro. Ĉu estis lia persona altaro, tio ne ekkoneblis. Liaj manoj estis plate kunpremitaj kaj levitaj por preĝo. Kial li preĝis kaj al kiu, tio ne estis videbla. Kaj neniuj penis ekscii tion. Ĉiu kontentiĝis per tio, ke li estas tie, kaj ke oni povas vidi lin persone.

Certe nur tre malmultaj homoj en la katedralo rigardis lin kiel fotografaĵon aŭ kiel skulpturon. La plimulto de la homoj, la indiĝenoj ĉiuj, kaj la suba tavolo de la meksikanoj je naŭ dekonoj, firme kredis, ke la figuro, kiun adori ili venis, estas la efektiva sanktulo en propra persono, ke tiu persono ŝtoniĝis, ligniĝis kaj elsekiĝis. Ekzistas ja ankaŭ elsekiĝintaj pecoj de aliaj sanktuloj en grandaj kvantoj, haroj, ostetoj, fingroj, dentoj, peklitaj koroj en oraj rondaj skatoloj kaj cerboj en kestetoj el ebono. Sed kiom ajn forta estis la kredo ĉe kelkaj individuoj, ke la figuro tie efektive montras Sanktan *Caralampion*, pri tio ili tamen ĉiuj, sen iu escepto, estis konvinkitaj, aŭ almenaŭ ili certis pri tio, ke la spirito kaj la animo de Sankta *Caralampio* rampis en tiun figuron kaj elektis ĝin sia eterna loĝejo. Se oblato povas transformiĝi per simpla ceremonio en la veran karnon de Dio, efektiva sanktulo povas des pli verŝajne kaj same tiel certe transformiĝi en lignan figuron, tute per si mem aŭ kun la helpo de ceremonioj. Tiujn ceremoniojn oni entreprenis verŝajne antaŭ multaj jarcentoj, kaj ekde tiam la figuro estis la vera sankta *Caralampio*.

Kiam la Diservo estis finita, ĉiuj ĉeestantoj starigis sin en longaj vicoj, por ke ĉiu kiel unuopulo povu montri decan respekton al Sankta *Caralampio*.

La malhele blua velurmantelo kovris la tutan korpon de la sanktulo kaj falis vaste sur la piedojn, kiuj turnis siajn nudajn plandojn al la homoj starantaj en la vico de la atendantoj.

Tiu, kies vico estis, ekstaris proksime ĉe la plandoj de la sanktulo, murmuris preĝon aŭ petegan formulon aŭ solenan promeson, tiam levis la velurmantelon tiel, ke ekvideblis la nudaj gamboj de la sanktulo, kaj premis tri kisojn sur la plandojn de la figuro. Poste la kredanto sin krucosignis kelkfoje, murmuris denove kelkajn formulojn, kaj poste li iris plu, por cedi la lokon al alia kredanto, por ke tiu povu kisi la plandojn.

Sed tiu, kiu jam havis la okazon kisi la plandojn de la sanktulo poste ne rajtis simple foriri. Ĉe la pluirado li eniĝis en specon de baraĵo. Kaj ĉe tiu baraĵo staris viro kun almozskatolo, kiun li tenis al la kredanto proksime antaŭ la brusto. Kiu volis kisi Sanktan *Caralampion* sur la nudajn plandojn, devis pagi por tio.

Andreo observis la manipulojn, maskeradojn kaj la saltadon de la ŝamanoj kaj sorĉistoj, li vizitis cirkon, kaj li nun ĉeestis ĉe la diservo en katolika preĝejo ĉe granda sanktulofesto. Ne estis lia kulpo, ke li faris komparojn, kiuj estis malĝustaj. Estis la kulpo de tiuj, kies devo estas ebligi taŭgan edukadon al li. Sed la mastroj de la katolika preĝejo rigardis la indiĝenojn infanoj. Kaj ili konsideris tion sia sanktigita tasko, teni la indiĝenojn kaj la ceterajn proletajn tavolojn de la popolo ĉiam kaj eterne en la stato de infanoj, kies patro estas Sankta Patro en Romo kaj la sinjoroj *curas*, liaj krompatroj kaj onkloj.

Kvankam li mem ne sciis tion, Andreo estis certe la ununura persono en la katedralo, kiu tie, pro sia inteligenteco rapide disvolviĝinta dum la lastaj monatoj, faris komparojn, al kiuj neniu el la aliaj ĉeestantoj estis kapabla, ĉar ili estis infanoj kaj videble kontentaj resti infanoj. Estas tiel komforte, se oni tute ne

penas. Sed tie, starante sub la influo de la amaso, kiu kondukis kiel grego, kaptis lin, kiel ĉiujn aliajn, la imita instinkto. Ĉar ĉiuj homoj tie faris la samon, inter ili multaj, kiuj, se oni prijuĝas ilin laŭ iliaj vestoj, ŝajne multe pli prudentis, ol li supozis sin mem, li pensis, ke devas esti io kaŝita kaj por li mem nekonata en la afero, kio instigas ĉiujn tiujn homojn fari la samon. Li supozis, ke eble en lia interno okazos ŝanĝo, kiu ne videblas de ekstere. Por ekscii, ĉu tio estas prava, kaj ĉu li povus gajni novan komprenon, ankaŭ li fine enviciĝis. Li ne volis senti sin forpelito de la grego, kaj tial li faris, kion faris la grego. Ankaŭ li iris al Sankta *Caralampio* kaj kisis liajn lakitajn plandojn ekzakte tie, kie centoj da malsekaj buŝoj antaŭ li postlasis sian salivon. Kaj ankaŭ li pagis al la viro kun la almoza skatolo tion, kion li kulpis.

Kiam li fine forlasis la preĝejon, li rimarkis, ke okazis neniu ŝanĝo en li, pri kiu li esperis, ke ĝi devu okazi, se li faras ĉion, kio tie estas kutima.

Kiam li faris tiun eltrovon, li ĉesis esti infano. Li pensis pri sia patro, pri siaj onkloj kaj kuzoj, pri ĉiuj viroj de sia parenco, kaj ankaŭ pri la ŝamano, kiun li ĉiam timis. Starante ekstere antaŭ la portalo de la katedralo kaj rigardante la placon kun la krientaj kaj kriĉantaj komercistoj, li tamen sentis ŝanĝon en si.

Li klare konsciiĝis, ke li nun jam tre superas sian patron, ja eĉ la ŝamanon. Li sciis, ke li ekde tiam ne plu timos la ŝamanojn de sia popolo. Kaj tial li perdis ĉiun timon rilate al la dioj, ĉu ili estis indiĝenaj, ĉu aliaj. Li havis la impreson, ke ĉiuj dioj faras iun komercon, ĉiu laŭ sia maniero. Per tio ili ĉiuj malkovris siajn sekretojn al li. Ili perdis sian hororon, ĉar montriĝis, ke ili estas rompiĝemaj. Ili kaŭzis nek tondrojn nek fulmojn nek tertremojn. Tiujn okazaĵojn – li konkludis – bezonas nur tiuj, kiuj volas fari negocojn kun la dioj, la pretekstitaj kaŭzantoj de tiuj natur-fenomenoj.

Tiel li ekkonis, ke la eklezio kaj ĉio, kio estas en konekto kun ĝi, por aliaj homoj estas interesa kaj grava nur en tiu kazo, se ili trovas nenion alian por pensi pri ĝi.

Tiel la kristaniĝo de Andreo ĉesis antaŭ ol ĝi efektive komenciĝis. Li sciis kaj sentis, ke li ekde nun sufiĉe bone eltenos sen eklezio dum sia tuta pluvivo.

10/9

Sur la antaŭlasta malsupra ŝtupo de la katedrala ŝtuparo sidis Luis. Luis estis ĉaristo kiel Andreo, sed ĉe alia frajtentreprenisto. Ankaŭ li havis indiĝenan sangon, sed ne devenis de bieno, sed el la indiĝena urbo *Yalanchen*, kiu situas okcidente de *Balún-Canán*.

Luis maĉis *enchiladas*, enĉiladojn, kiujn li ĵus aĉetis, kaj kiuj ankoraŭ tute varmegis. La graso gutis sur liajn manojn, denove kaj denove li metis la enĉiladojn sur la alian manon, por leki la grason de la liberigita mano.

Andreo kaj Luis konis unu la alian jam delonge. Ofte ili marŝis en la sama karavano. Ĉiuj ĉaristoj estas en certa senco kamaradoj. Ĉiam denove ili renkontiĝis ĉe marŝoj, aŭ irante malsupren alla fervoja stacio aŭ irante supren sur la altan ebenajon. Ili helpis unu la alian survoje, se ĉeestis neniuj mastroj. Ili helpis unu la alian eĉ ĉe la restarigo de disrompita ĉaro, ĉe la eltirado de ĉaro kaptita en ŝlimo kaj ĉe multaj aliaj aferoj, se ili pro tio plilongigus la marŝtempon kaj riskus dekalkulon de la salajro.

„Ĉu vi estis en la preĝejo?“ Luis demandis maĉante.

„Jes“, diris Andreo kaj sidiĝis apud Luis sur la saman ŝtonŝtupon.

„Vi estas tre pia katoliko, ĉu?“ demandis Luis kun flanka rigardo.

„Mi pensas, ke ne“, respondis Andreo. „Tio estas ĉio tiel konfuziga. Oni eĉ ne iomete komprenas, kio tie okazas, kaj kion tie faras la viro en la ora mantelo.“

„Lin mi konas bone“, diris Luis, kiu metis denove la enĉiladojn el unu mano sur la alian kaj forlekis la varman grason de la fingroj. „La viro en la ora mantelo, kiu tie turnadas la orajn kalikojn kaj la nimbon en la aero, estas *don* Usebio. Usebio li nomiĝas nur ekde tiam, kiam li laboras ĉi tie en la preĝejo. Lia vera nomo estas *Nicolás*, sciuj tion. Lia patro estis tajloro en *Tonalá*. Ili gajnis tiam iutage monon en la hispana loterio, tiel estis. Mi ne scias, kiom da mono. Kaj tial la patro tiam sendis la knabon *Nicolás* en lernejon, por ke li lernu la magion, en *seminario*, jes ja. Tie *Nicolás* tiam ĝuste lernis sorĉi. Li povas ensorĉi malgrandajn tortiljojn el Harina, malgrandajn etajn bakaĵojn el faruno en homan karnon kaj hispanan ruĝan vinon en homan sangon. Tion diris Felipe al mi, ankaŭ li estis sufiĉe longe en la *seminario*, antaŭ ol ili forpelis lin, ĉar li volis geedziĝi, sed tion ili ne permesas.“

„Ĉu *Nicolás* nun povas sorĉi?“ demandis Andreo.

„Ne multe“, respondis Luis. „Li ne ĝuste lernis. Antonio, vi ja konas lin, la ĉaristo ĉe *don* Ambrosio, iutage iris ĉi tie en la katedralon, kaj jen *Nicolás* donis al li malgrandan tortiljon. Sed Antonio diris al mi, ke tiu tortiljo tute ne gustis laŭ viando, sed nur laŭ faruno, kaj ke li ekde tiam scias, ke *Nicolás* ne ĝuste lernis la magion. Sed li enspezas tie multe da mono, jes ja, ili pagas al li multajn belajn pesojn por la bapto de infanoj, por geedzigoj, por entombigoj kaj por preĝoj, kiuj savas onin el la infero. Felipe diris al mi, ke la mastroj en la *seminario* diras, ke la *curas* la homojn timigu en la preĝejo, ke oni ĉiun el ili rostos kaj pinĉos per

pinĉiloj, kiam ili estos mortaj. Sed, se ili fervore frekventas la preĝejon kaj ĉiam faras tion, kion la pastro diras, oni ne rostos ilin, sed nur varmigis kaj lavos ilin en varma akvo, por ke ili fariĝu puraj. Felipe diras, ke tio tute malpravas, ke oni nur tiel rakontas tion, por ke la homoj ĉiuj terure ektimu. Komprenu, la homoj estas ja ĉiuj tiom stultaj. *Es claro*, estas klare, se oni mortas, oni sentas nenion plu, egale ĉu ili rostas vin aŭ pinĉas per varmegaj pinĉiloj. Sed tiel estas, la homoj kredas tion, tio tiel bele hirtigas la haretojn sur ilia haŭto, se ili kredas tion, kaj tial ili kredas. La *curas* volas nur la monon de la homoj, por ke li bone povu vivi kaj ne devu labori tiel streĉe. Ankaŭ nia *brujo*, la ŝamano en *Yalanchen*, rakontis al ni ĉiufoje tiajn terurajn rakontojn pri grotoj, en kiujn oni metos nin post nia morto, kie estas serpentoj kaj jaguaroj. Sed, kiam mia patro kaj mia onklo donis al li ŝafon aŭ porketon, li diris, ke li interparolos kun la *santitos*, kun la dioj, por ke ni ne estu metitaj en la grotojn, kie atendas nin serpentoj kaj jaguaroj.“

„Tion nia *brujo* tiel ne diris“, interrompis lin Andreo. „Nia rakontis al ni, ke oni metos nin en nigran fosaĵon, kiam ni estos mortaj kaj ne faris tion, kion li ordonas. Kaj en la nigra fosaĵo estas ŝlima lago, kaj oni metos nin tiom profunde en la ŝlimon, ke ĝi tuŝos nian mentonon, kaj tiam ni ne povos morti kaj ankaŭ ne vivi, sed terure devos frostotremi, kaj ni ne povos elbarakti nin, ĉar la flankoj estas tute krutaj kaj ŝlimaj kaj kovritaj de malgrandaj serpentoj kaj de grandaj bufoj. Ni ĉiam devis doni al nia *brujo* tekilon kaj maizon, poste li dancis kaj preĝis, kaj la *santitos* en la nokto diris al li, ke ni ne sinkos en la ŝlimon, se ni faros, kion li diras, sed se iu diros al la bienulo, kiu estas la *brujo*, kiun tiu ne konas, jen ni certe estos metitaj en la ŝlimon, kaj tiam neniun tekilo kaj neniun porketo por la *brujo* povos liberigi nin el ĝi.“

„Jen mi foje volas doni al vi bonan konsilon“, diris Luis, kiu preskaŭ duoble tiom aĝis, kiom Andreo, „se vi tute ne atentastion, kion diras la *brujo* aŭ la *cura*, se vi tute ne kredas je io, ne je la rostado, ne je la grotoj kaj fosaĵoj, tiukaze vi vivos pace kaj kontente kaj vi ĉiam estos en gaja humoro, tiel kiel mi. Aŭ ĉu vi jam iam vidis min kun vinagra mieno? Certe ne. Kiam la bovoj ĉagrenas min, aŭ se ĉaro disrompiĝas, nu jes, tiam mi sakras, ke tondras. Sed tio estas nur por momento. Vivu, kaj kiam vi estas je la fino, tiam lasu zorgi la aliajn. Kiam via vivo estas finita, tiam neniu plu interesiĝos pri vi. Kiu tiom klopodu post via morto ankoraŭ dum jaroj lukti barakte kun vi?! Post via fino vivos ankoraŭ sufiĉe da aliaj, pri kiuj estas pli grave, ke oni okupiĝu pri ili. Ankaŭ ni ja ne haltas ĉe la vojo kaj skurĝas bovon, kiu ĵus mortaĉis, ĉar ĝi ĵetis ĉaron en la abismon. Sed nun mi devos ekiri por eltrinki glaseton da komiteko, por digesti la enĉiladojn.“

„Kion vi pagis por la enĉiladojn?“ demandis Andreo.

„Realon por ses. Pli bonaj ili ne povus esti.“

„Kie?“

Luis montris al tablo, kiu staris inter vandoj el faskaj folioplennaj vergoj.

Rimarko

enchiladas = enĉiladoj, molaj tortiljoj kun spica saŭco, kaj kutime ankaŭ fromaĝo, koka viando, kremo, cepo ks.

Ĉapitro 11

11/1

Luis vizitis kantonon, por verŝi komitekon en sin, kaj Andreo promenis transen al la primitiva laŭboforma restoracio konsistanta esence el tablo.

Malantaŭ la tablo staris malgranda fornelo el lado, en kiu ardis lignokarboj. Sur la forneleto kuŝis lada pleto, kiu estis iomete kavigita en la mezo. En la kavo ŝuŝis graso.

Apud la forneleto kaŭris maljuna indiĝenino, kiu ĉiam denove ardigis la lignokarbojn per bastventumilo. Ŝi estis la kuiristino de la restoracio.

Ŝi rostis enĉiladojn kaj plenigis ilin, laŭ la deziro de mendinto, per *barbacoa*, *guajolote*, *pollo*, *res*, *ternera* aŭ *queso*. *Barbacoa* estis porkaĵo rostita sur krado. *Guajolote* estis rostita meleagro, *pollo* kokineto aŭ koketo, *res* bova viando, *ternera* bovideta viando kaj *queso* raspita kaprina fromaĝo aŭ io simila, kio krome estus preta transpreni la kulpon por tiu fromaĝo.

Estis tute egale al la kuiristino, en kiu lingvo oni postulis la enĉiladojn kaj ties enhavojn. Ŝi parolis la hispanan lingvon, la cocilan, la tojolavalan kaj la celtalan. Hispano, kiu havis sian vendostandon transe de ŝi, diris, ke la indiĝenino komprenas ankaŭ la anglan kaj la araban, se oni samtempe montras per fingro sur la viandajn specojn, kiujn oni volas havi. Ĉar ĉiu ajn, kiu tie aĉetis enĉiladojn, montris perfingre, per kio estu plenigitaj la enĉiladoj, ne estis konstateble kun certeco, ĉu la indiĝenino vere komprenas alian lingvon ol la tojolavalan.

Apud la indiĝenino sur la tero troviĝis pli ol deko da argilaj pelvetoj kaj potetoj, ĉar ŝi metis krom la diversaj viandospecoj en la enĉiladojn ankaŭ cepojn, tomatojn, iom da ruĝa aŭ verda kapsiko, verdan salaton, verdajn citronfoliojn, kukurbajn florojn, kaj ankoraŭ dudek aliajn diversajn spicajn herbetojn, folietojn kaj radiketojn.

Ŝi uzis nur aluminian kuleron por turni la bruniĝantajn enĉiladojn en graso. Tranĉiloj, forkoj aŭ aliaj helpiloj estis fremdaj al ŝi. La viandon ŝi tiris de la kokineto aŭ de la bovideta femuro per nudaj fingroj. Tio okazis tre rapide, kaj ŝi deŝiris la ĝustajn porciojn por enĉiladoj tiom akurate, ke tio perpleksigas.

Estis plezuro vidi, kiel ŝi manipulas en la eta loko, kiun ŝi havas, je tiom da viandospecoj kaj legomoj, sen iam ajn erare interŝanĝi ilin. Ĉe la eta tablo staris du el ŝiaj filinoj, kiuj tie pri-servadis la aĉetantojn. Indiĝenaj knabinoj kun longa, malsupren pendanta hararo sur la dorsoj. Ili metis la pretigitajn enĉiladojn sur telereton kaj transdonis ilin tiel al la aĉetinto. La aĉetinto ricevis nek tranĉilon, nek forkon, nek kuleron, ĉar io tia ne disponeblis en la restoracio. Sed la manĝintoj ricevis grizan grasmakulitan viŝtuketon, per kiu sekigeblas la fingroj kaj la buŝo. Poste ĉiu ricevis malgrandan argilan kruĉeton kun akvo por povi gargari la buŝon. Tiuj, kiuj estis kutimiĝintaj al granda lukso, mendis aldone argilan poteton kun nigra nedolĉigita kafo, kiu kostis kvaronon de realo.

La teleretoj kaj kruĉetoj neniam estis vere purlavitaj. Tamen oni devus eviti respondi la demandon, ĉu la manĝilaro ne estas tute pura, ĉar precize oni ne povus priskribi la fakton per senduba 'jes'. La manĝilaroj estis neimageble malpuraj, sed strange, pri tio oni tie eĉ ne pensis. Neniu perceptis la manĝorestaĵojn abomena kaj naŭza aŭ ĝenanta. Ili apartenis al la afero kiel nubo al ĉielo. La harmonion de la tuta ĉirkaŭo ili detruis neniel. Kaj strange

estis, ke la manĝilaroj tamen ĉiam aspektis kiel ĵus lavitaj. Kompreneble, kie kaj kiel kaj per kio oni lavis ilin, ne eblis rigardi, ekscii kaj trovi. La telerojn kaj kruĉojn oni jam fortiris, kiam la vizitantoj ankoraŭ manĝis, kaj ili devis preni la postrest-aĵon en siajn manojn. Intertempe novaj enĉiladoj estis pretaj, la manĝilaroj el ie reaperis, kaj antaŭ ol oni havus la tempon konstati, ĉu la manĝilaroj estas lavitaj ĉu ne, la novaj ankoraŭ varmegaj kaj grase gutantaj enĉiladoj troviĝis jam sur la teleretoj, kaj tiam ne plu decideblis, ĉu la grasa bruna saŭco devenis de la novaj enĉiladoj aŭ ĉu ĝi ankoraŭ postrestis de la antaŭaj. Estis simile pri la argilaj kruĉetoj, en kiuj oni transdonis la kafon, kiun oni ĉiam tre abunde enverŝis, tiel ke ĝi inundis la kruĉeton; tial la kafomakuloj sur la eksteraĵo de la kruĉeto povis esti aŭ sekiginta restaĵo de la freŝa aŭ de la malnova kafo. Se io ŝajne ne estis tute en ordo, la servanta filino per rapida viŝado purigis la randon de la kruĉeto aŭ de la telereto. La fingrojn ŝi purigis per lekado aŭ forviŝis ilin sur la blanka antaŭtuko, kiu tiom plenis de saŭcostrioj, ke oni ankaŭ en tiu kazo ne povus diri, ĉu la knabino ĵus aŭ jam antaŭ tri horoj sekigis la fingron sur ĝi.

Tamen, la homoj, kiuj venis tien, ja ne aĉetis manĝilaron, sed volis manĝi enĉiladojn. Por ili la manĝilaro ne estis la ĉefa afero, sed bonaj kaj bongustaj enĉiladoj. Kaj la enĉiladoj estis bonegaj.

Tial la negoco prosperis. Kaj la homoj kverelis, kies vico estas.

Andreo devis atendi sufiĉe longan tempon antaŭ ol li ricevis la enĉiladojn.

11/2

Sendepende de tio, ke oni povis aĉeti ĉiujn sentaŭgajn aĵojn aŭ fatrasojn en tiu urbo, kiu estis videbla en neniu pli granda urbo, troviĝis tie apenaŭ iu vera distro aŭ amuza plezuro. Tie estis nek

karuseloj nek boatpendoloj, nek toboganoj nek io simila, kio vigligas jarfoirojn en aliaj lokoj. Tiaj maŝinoj ne transporteblis tien, ĉar la transporto estus tro komplika kaj multekosta, tiel, ke ĉiu gajno estus foruzita de la transportkostoj.

Oni devis delektiĝi je la kriadado de la komercistoj kaj je la humuraj paroladoj de lertaj viroj, kiuj vendis nerompeblajn flekseblajn orajn skriboplumojn, vitrotranĉilojn, tranĉilakrigilojn, fadentra-igilojn por kudriltruoj, vitrajn lensojn, kiuj uzeblas por legado, por la ekzamenado de falsigita silko kaj kiel teleskopo, akvon por la forigo de makuloj, purigan pomadon, medicingutojn por la stomako, likvaĵon por la okuloj, reŭmatisman unguenton, krajonajn forigilojn de papiloj, tinkturojn por piedkaloj.

Sed eĉ por Andreo ĉio ĉi fariĝis post mallonga tempo sufiĉe enua, ĉar ĉiu vendisto, tuj kiam li finis la propagandon de aĵoj, kiujn li vendis, rekomencis siajn ŝercojn kaj flirtadon kun precize la samaj vortoj kaj nuancoj.

La fajroglutistoj, serpentohomoj kaj senkatanigistoj, kiuj ĉiuj laboris sendepende de la aliaj kaj ĉiu je sia propra kalkulo, akompanataj nur de sia edzino aŭ de helpanto, same enuigis la rigardantojn, ĉar ili ĉiuj regis nur unu artifikon kaj ripetis tiun de la kvara posttagmezo ĝis la dekunua nokte tiom ofte, kiom longe antaŭ ili ankoraŭ staris almenaŭ unu vizitanto, kiu estigis la impreson, ke li verŝajne havas enpoŝe kvin centavojn, kiujn oni eble povus logi de li. Ankaŭ ĉe la ludotabloj oni perdis rapide la intereson, se oni ne kunludis mem. Sed tie ĉiam staradis homoj, observis ĉion, elpensis numeron al si kaj estis feliĉaj, se ilia numero perdis la ludon, ĉar ili tiel retenis la monon en la poŝo.

Por la plimulto de la homoj la plezuro konsistis esence el tio, ke ili vagadis, ie haltis momenton kaj aliloke restadis kvaronon de horo, rigardis aŭ aŭskultis kaj poste denove puŝiĝis plu antaŭen.

Plej plezuriĝis la gejunuloj el la urbo, kiuj uzis la ĉirkaŭpromenadon kaj la premegadon de la amaso por provoke alogi kaj pli interproksimiĝi unu al la alia sen esti atentataj, kio tiel apenaŭ eblus ĉe aliaj okazoj. Eĉ ĉe baloj ĉiam ĉeestis la patrinoj aŭ la onkloj, kaj la knabinoj ne povis fari unu propran paŝon sen akompano. Sur la placo tiu maniero de vartado ne praktikeblis. Kvankam ili iris kun siaj patrinoj sur la foirplacon, estis facile aranĝebla, ke oni perdiĝis tridek minutojn el vidodistanco. Estis ja ne la kulpo de la gejunuloj. Estis la homoj, kiuj retenis kaj flankenŝovis la gejunulojn.

Tial okazis, ke tiuj tiel bone protektataj kaj gardataj virgulinaj de la urbo povis ĝoji pli ol unufoje en la premegado aŭ ie en la ombro de domomuro pri agrabla masaĝo de la lipoj aŭ eĉ pri tio, ke oni rapide, lerte kaj kvazaŭ anatome palpis la virgulojn, kio kondukis al ĝojigaj sentoj, kiuj ne estis tro serioze traktataj, ĉar estis kontribuo por la plivigliĝo de la festo, kiun oni aranĝis por montri al la sanktulo *Caralampio* la necesan respekton. Kelkaj filinoj de alte estimataj civitanaj familioj de tempo al tempo dum pli ol tridek minutoj perdiĝis en la interpuŝado. Ili ne perdiĝis por ĉiam. Ili revenis al la maltrankviligitaj gepatroj, kiuj sensukcese serĉis ilin, kun iom taŭzita hararo, kaj ankaŭ entute iom ĉifitaj, kio sufiĉe pruvis iliajn vortojn, kiom pene ili devis trabarakti sin por retrovi siajn amatajn gepatrojn.

Kiam la ĉirkaŭpromenantaj homoj fine ne sciis kion fari, ĉar ili jam rigardis ĉiun tablon kaj ĉiun standon almenaŭ tricent okdek fojojn, ili reiris por kvarono de horo en la preĝejon, kies pordoj estis ĉiam malfermitaj, kaj en kiu ludis la orgeno, kiu instigis la vualitajn inojn kanti sub la nigraj kaptukoj. Kaj tiam la katedralo sonorigis siajn sonorilojn. Tiujn eĉ la plej fortika komercisto aŭ ruletbankiero ne povis superkrii. Tiel la ĉirkaŭpromenantaj homoj ankoraŭ ĝustatempe estis avertataj, ke ili ne disipu sian tutan

monon ĉe la komercistoj, ĉe la ruleto, por enĉiladoj kaj por komitekoj, sed lasu restaĵon por la eterna vivo.

Neniu faras pli bonan reklamon ol la katolika eklezio en Meksiko, kie oni vidas tiom ofte antaŭ la almozkolektuoj papereton kun la atrakcia anonco: „La centaveton, kiun vi ĉi tie pagas, oni repagos al vi per oro en la ĉielo.“ Bankieron, kiu elpendigus tian anoncon en sia banka fenestro, oni tuj arestigus pro defraŭdo de deponmono surbaze de mensogitaj pretendoj. La juĝisto de li postulus, ke li nepridubeble pruvu, ke la deponmonoj en la ĉielo estos repagitaj, kaj ke ĉielo ekzistas kaj kie ĝi troviĝas. La meksika eklezio ne devas prui tion. Al ĝi oni kredas. Kaj kiu ne kredas tion, tiu blasfemas Dion.

Kiel indiĝeno pri tiaj aferoj firme tenu la fadenon de kompreno?

11/3

Ankaŭ Andreo ne sciis kion fari, laŭirinte dudek fojojn la samajn vicojn tien kaj reen. Li aŭdis la monotonan kantadon el la katedralo kaj la plendantan orgenludon, kiu faras onin tiom malagema, tiom pensopigra kaj tiom senrezista, ĝis oni diras al ĉio amen.

Li eĉ ne iomete emis iri ankoraŭfoje en la katedralon. Tion eĉ malpli, ĉar proksime al la puto troviĝanta sur flanko de la placo kaj provizanta la tutan urbon per akvo, venis kelkaj muzikistoj, kiuj komencis ludi.

11/4

Tiu puto estis la ĉiutaga gazeto de la urbo. La urbo ne havis alian gazeton. Sed la puto anstataŭis tiun malavantaĝon, aŭ avant-aĝon, laŭ tio, kiel oni konsideras tion.

Ĉar la urbo ne havis akvodukton, la enloĝantoj devis havigi al si la tutan bezonatan akvon el tiu puto. Ĉiu familio havis en sia domo kelkajn argilajn kruĉojn, havantaj proksimuman kapaciton de okdek ĝis cent litroj. Tiujn grandajn kruĉojn produktis indiĝenoj en la sama formo kaj speco, kiel oni faris tion jam antaŭ dumil jaroj.

La pli bonaj familioj de la urbo rigardis tion sub sia digno sendi siajn servistinojn al la puto, por ke ili alportu la akvon en ne tre grandaj kruĉoj sur siaj kapoj. La dignosento de tiuj civitanoj prosperigis specialan negocon en la urbo, tiun de la akvoliverantoj. La liverantoj estis indiĝenoj, kiuj fariĝis urbanoj kaj loĝis en la antaŭlokoj de la urbo. Ili havis du aŭ tri azenojn, kiujn ili laborigis ĉiutage de matene je la sesa ĝis malfrue posttagmeze. La azenoj havis surdorse kadran portilon, en kiu facile transporteblis grandaj argilaj kruĉoj plenigitaj per akvo. Kun sia akvoŝarĝo la akvoportistoj iris de domo al domo kaj ofertis sian varon. Se ili trovis klienton, ili venis tiel ofte kun ŝarĝo, ĝis la grandaj provizaj kruĉoj en la klienta domo estis plenigitaj. Por tio ili postulis certan malgrandan monsumon.

La familioj, kiuj eĉ pli atentis pri sia digno ol la aliaj, kutime havis propran azenon, sur kiu indiĝena knabo, kiu servis en la domo, alportis la akvon.

La familioj, apartenantaj al la plej proksima pli suba socia tavolo, ricevadis nur ŝarĝope la akvon, por kio ili pagis realon, aŭ nur dek centavojn, aŭ eĉ malpli.

Poste sekvis plia tavolo, kies familioj de tempo al tempo sendis duan indiĝenan knabinon al la puto por alporti la akvon.

Poste estis en la vico tiu tavolo, kies apartenantoj povis permesi al si nur unu indiĝenan knabinon, kiu estas bezonata por ĉio, do ankaŭ por la alportado de la akvo.

Fine aldoniĝis la plej suba tavolo, en kiu la edzino mem aŭ ŝiaj infanoj devis alporti la akvon, ĉar eĉ la du centavoj por malgranda akvoŝarĝo estis sumo, kiun ili ne elspezas por io, kion ili povas fari mem.

Sed neniuj, eĉ ne profesia akvoportanto veninta al la puto kaj pleniginta siajn kruĉojn el unu el kelkaj tuboj, el kiuj ŝprucis la akvo seninterrompe tage kaj nokte dikstrie, tuj poste forkuris. Ĉiu, kiu venis al tiu puto iom restadis kaj babilis kun tiuj, kiuj jam staris ĉe la puto. La viroj rulumis cigaredojn kaj la knabinoj fingrumis je siaj hararoj aŭ je la jupoj. Estus kontraŭ la etiketo, se iu venus tien, prenis la akvon kaj tuj forkurus. La prenado de la akvo okazis kvazaŭ kontemple kaj sen hastaj gestoj.

Kiam la kruĉoj estis plenigitaj, la knabinoj starigis ilin sur la teron kaj nun ŝajne ekpripensis, ĉu ili tuj denove levu la kruĉon aŭ ĉu ili antaŭe ankoraŭ iom atendu. Krome necesis, ke ĉeestu almenaŭ du knabinoj, ĉar la laste alveninta knabino devis helpi al la forironta knabino levi la kruĉon sur la kapon.

Vespere ĉiuj servoknabinoj, eĉ tiuj de la distingitaj familioj, kiuj neniam sendas siajn servistinojn al la puto, serĉis pretekston por rajti iri al la puto, eĉ se nur por dek minutoj. En la domo ili klarigis, ke la akvo en la grandaj provizaj kruĉoj estas malklara kaj malfreŝa, kaj ke estus avantaĝe por la saneco kaj la bona apetito de la mastro, se ili rapide kurus al la puto por alporti freŝan fridetan akvon por la vespermanĝa tablo.

Kiam la servoknabino revenis de la puto, speciale vespere, la mastrino de la domo jam atendis ŝin en la kuirejo, sed ne pro la

akvo, sed por aŭskulti, ĉu estas efektive vere, ke *don* Jorge en tiu semajno jam trifoje iris en la domon de vidvino *doña* Amalia, kaj ĉu veras, ke li forlasis la domon nur je la unua matene, kaj kiel finiĝis la kverelo inter *señor* kaj *señora* Osorio, ĉu li vere tiom tradraŝis sian *señora*, ke ŝi ne plu povas montri sin, kaj ĉu estas fakto, ke *doña* Ana, la *partera*, la akuŝistino, diris, ke la ĵus naskita infano de *señora* Zavala alvenis monaton tro frue, aŭ ĉu la bebo estas sepmonata, ĉar la *señora* geedziĝis ja nur antaŭ ok monatoj. Tiuj aferoj estis multe pli gravaj ol la bagatelo, ke ĉe la lasta reelekto de la prezidanto *don* Porfirio nur tri procentoj el la tuta meksika popolo iris al la balotkesto, ĉar ĉiu meksikano, ĉu inteligenta ĉu ne, jam sciis duonon de jaro antaŭ la elekto de la prezidanto, kiu estos elektita, kaj ke oni parolas en ĉiuj lokoj kaj anguletoj de la respubliko pri revolucio, kiu forigu la tiranecon.

La junulinoj tie ĉe la puto ankaŭ inter si devis tiom babili pri siaj amrakontoj kaj ĵaluzkomedioj kaj tragedioj, ke ne estis miraklo, ke oni renkontis ĝis malfrue en la nokto kun kruĉoj knabinojn, kiuj devis alporti freŝan akvon por siaj mastroj. Kaj ĉar la junuloj de la urbo sciis, ke ili tie kun certeco renkontos tiujn koramatin-ojn, kiujn ili elektis, la puto en la vesperaj horoj estis multe frekventata loko.

Dum la *feria* la idilio de la puto kompreneble estis tute detruita. Estis tro laŭte en ĝia proksimo, pro la kriado de la komercistoj kaj pro la bablado de la tien kaj reen promenantaj vizitantoj. Male al la kutimaj tempoj, kiam la puto troviĝas en ega tenebro, sub la kondiĉo, ke ne estas lunlumo, nun neniuj intima ĉirkaŭbrako plu eblis. Estis tro da heleco sur la placo, heleco, kiu eliris de la iluminataj vendostandoj. Sed helecon ĉirkaŭ si ŝatas nur tiuj homoj, kiuj estas geedziĝintaj pli ol du monatojn, ĉar ili retrovis sian prudentecon kaj volas vidi, kiun ili havas antaŭ si, por povi pli bone konatiĝi al tiu persono kaj por trovi respondon al la demando: 'Nu! Kial mi, azeno, kiu mi estis, faris tion?'

11/5

La muzikantoj trovis lokon apud la puto kaj komencis gaje ludi. Estis tie libera loketo, kiun la aŭtoritatoj ne forŝakris, por ke la akvoportistoj kaj iliaj azenoj havu sufiĉe da loko.

Sur tiu loketo nun komencis danci la indiĝena junularo de la urbo. Kiam danco finiĝis, unu el la junuloj donis al la muzikantoj kvin centavojn, kaj tuj ili denove ekludis dancon.

Tre verŝajnis la antaŭdiro, ke oni dancus ĉi tie ĝis la dua aŭ tria matene, ĉar tuj, kiam la gejunuloj de la urbo aŭdis, ke oni dancas ĉe la puto, ili tre rapide venis kiel grandaj grupoj el la plej malproksimaj anguloj de la urbo. La dancadon ili ne preterlasis. Alia distro ne estis. Ne por la apartenantoj de la plej suba klaso kaj ne por tiuj de la supraj. Ankaŭ la estimataj bonstataj civitanoj, bezonante distron, dancis, en la aktuala semajno en la domo de la familio Suarez, en la sekva semajno en la domo de la familio Cota, kaj tiel plu la tutan jaron. Jen pro *cumpleaños*, la naskiĝtago de la dommastro jen pro la *día de su santo*, la sanktula tago de la dommastrino; jen en alia domo estis baptita ĵus naskita bebo; kaj jen oni festis geedziĝon. Jen krome la du semajnoj de la *posada* – la kristnaskaj festotagoj – kaj la festo por la nova jaro. Kaj se estis tute neniŭ kaŭzo por danci, la junaj sinjoroj de la urbo invitis ĉiujn damojn al balo en hotelo, nur pro la balo. Jen eĉ okazis, ke juna needzigita kuracisto forlasis la urbon kaj transloĝiĝis al Usono, por plua edukado. Honore al li oni aranĝis balon. Alia juna viro el Meksikurbo jam finis sian studadon kaj revenis por setli kiel dentkuracisto aŭ kiel juĝisto. Oni bonvenigis lin per balo.

Kion alian la homoj faru? Estis nek kinejo nek teatro, neniuj koncertoj; neniŭ preleganto, kiu entreprenus la ruinigajn penojn de vojaĝo ĝis tien. Eĉ cirko mortonta pro malsato estis rara.

La indiĝenoj eĉ multe pli sekvis la internan impulson serĉi kaj trovi distron ĉe la dancado.

La indiĝenoj dancis eĉ en siaj funebraj ceremonioj. La ĉerkon kun la mortinto oni starigis en la mezo de la plej granda ĉambro de la domo. Se la familio havis kelkajn ŝparitajn superfluaĵojn, jen oni aĉetis pastron, por ke li benu la mortan korpon kaj aspergu la mortinton per akvo. Se la homoj ne havis monon, ili ne kuraĝis mendi la pastron, ĉar ili sciis, ke li faras nenion por nenio. Kiam la pastro jam finis siajn manipulojn kaj foriris, komenciĝis gaja muziko, kaj la homoj dancis plenaj de ĝojo ĉirkaŭ la ĉerko, inklude la parencojn de la mortinto aŭ de la mortintoj. Ili dancis ĝis la frua mateno. Poste oni levis la ĉerkon kaj ĉiuj marŝis lamente kaj plorante al la tombejo.

La *ladinos*, meksikanoj kaj blankuloj, tion kompreneble ne faris. Ili konsideris tian agadon pagana barbareco. Mankis al ili la matureco de kulturo kaj ankoraŭ pli mankis al ili saniga laŭnatura filozofio. Estante dum jarcentoj sub la influo de eklezio, kiu per brila ceremonio anstataŭis la simplan instruon, kiu ne volis kaj ne volas esti io alia ol simpla instruo, la homoj fariĝis hipokrituloj; kaj tiel ili detruis en si ĉion tion, kio servas al la disvolviĝo de simpla kaj sincera homo. Ja, se oni rigardas deca danci ĉe la naskiĝo aŭ ĉe la baptado de infano ĉe ĉiu okazo, kiam oni kontraŭ sia propra volo estas pelata en la mizerojn kaj suferojn de la vivo, kial tiukaze pro ĉio en la mondo dancado estas nedeca kaj pagana, kiam oni adiaŭas sin de la suferoj kaj hasto de l' vivo kaj reiras en la landon de l' eterna paco? Sed ili estas nedignaj hipokrituloj. Se ili serioze kredus al la preĝoj de sia religio, jen ili devus ĝoji kaj devus danci pro jubila ĝojo, ke la adiaŭanto nun rajtas enpaŝi en la eternan Elizeon, kie estas laŭdokantoj kaj harpaj sonoj.

Sed la indiĝenoj estas tro stultaj por kompreni la profundajn misterojn de la katolika eklezio. Tial ili faras ĉion alie ol ni, kaj ni teruriĝas pri ilia barbareco.

11/6

Kaj tamen la indiĝenaj ĝejnuloj dancantaj tie, tute ne aspektis kiel barbaroj. Ili surhavis, almenaŭ la knabinoj, malkarajn, tre malkarajn, sed tre purajn vestojn. Ili ĉiuj zorge lavis sin kaj iliaj longaj nigraj hararoj estis tiel bone kombitaj kiel oni ne faras tion pli bone en kosmetika salono en Baltimoro, sed pli neglekte.

La knabinoj staris aŭ kaŭris sur la tero, sur unu el la flankoj, kaj la junuloj staris vice aŭ en lozaj grupoj sur la alia flanko.

La indiĝenaj junaj viroj ne iris al la knabino, kun kiu ili intencis danci; knabino ne kliniĝis antaŭ juna viro, kaj la junaj viroj ne demandis per bele formulitaj kaj bone ekzercitaj vortoj, ĉu ili rajtos havi la honoron aŭ ion ajn tian plu.

La junuloj surhavis blankajn pantalonojn kaj blankajn jak-formajn ĉemizojn. Kelkaj el ili portis sandalojn, sed la plej multaj estis nudapiedaj. La plimulto de la knabinoj same nudapiedis. Sed kelkaj portis ŝuojn el lakledo kun tre altaj kalkanumoj.

Se viro volas danci, li iras, tuj, kiam la muziko komenciĝis, duonon de paŝo antaŭen, tiras el sia ĉemizopoŝo ruĝan silkan tuketon kaj ĵetas ĝin sur la sinon de la junulino, kun kiu li intencas danci, aŭ, se ŝi staras, al la vizaĝo. La knabino kaptas la tuketon, kaj tio signifas, ke ŝi dancos kun la posedanto de la tuketo. Sed, se ŝi reĵetas la tuketon al li, tiukaze tio signifas, ke ŝi rifuzas danci kun li. Sed ŝi reĵetas la tuketon certe nur en tiu okazo, se la dancemulo estas tre ebria, aŭ tiukaze, se ŝi vidas, ke alia dancisto, kiun ŝi preferas, samtempe ĵetas la tuketon al ŝi.

Sed reĵeti la tuketon al dancemulo, tion oni konsideras kontraŭ-etiketa. La plimulto de la knabinoj akceptas la tuketon eĉ tiukaze, se la dancemulo aspektas ebria, por ne ofendi lin. Kompreneble ŝi tiam dancas kun li nur kelkajn taktojn kaj residiĝas. La dancinto tiel estas almenaŭ liberigita de la honto esti rifuzita, kaj li tute kontentas pri kelkaj dancaktoj.

La dancanto ne parolas dum la danco eĉ unu vorton kun sia dancpartnerino. Ankaŭ ne, kiam la danco finiĝas.

La dancparoj ne ĉirkaŭbrakas sin ĉe la dancado, sed ili dancas vidalvide, ĉiu por si mem. Ili interŝanĝas de tempo al tempo nur la pozicion, ĉe tio ambaŭ preterdancas la alian por atingi la alian flankon. La viroj ĉiuj dancas en unu vico sur la sama flanko, kaj la knabinoj ĉiuj sur la kontraŭa flanko. Se ili estas ŝanĝintaj la pozicion denove, ĉiuj viroj estas sur la sama flanko kaj la knabinoj sur la alia.

Dum la dancado la dancantino tenas la silkan tuketon de sia dancpartnero en la dekstra mano. Kiam la danco estas finita, ŝi redonas la tuketon al li, kaj sen diri dankvorton aŭ ion alian ŝi turnas la dorson al li kaj reiras al la ceteraj knabinoj, kiuj tie kaŭras aŭ staras.

Se la danco daŭras tro longan tempon kaj dancantino sentas sin laca aŭ pro alia kaŭzo ne volas plu danci, ŝi faras paŝon al sia partnero, redonas la tuketon al li kaj iras al sia loko.

La dancantino havas ĉiam la rajton ĉesigi la dancadon, se ŝi volas, per redono de la tuketo. La dancanto ne rajtas ĉesigi la dancadon, tiom longtempe, kiom li ne estas rericevinta sian tuketon. Okazas, ke la muziko ludas seninterrompe dum duono de horo. Kiam la dancantino estas tiel nelacigebla, kiel estas ĉiuj indiĝenaj

knabinoj, ŝi dancas ĝis la renversiĝo de sia partnero, se li ne estas same persista kiel la knabino.

La knabinoj faras tion de tempo al tempo, se ili kvazaŭ volas repagi ion al iu junulo. Ili dancigas lin en tiu kazo ĝis tia elĉerpiĝo, ke li estas detruita por la resto de la nokto. Inoj posedas fajnan instinkton por bone celata kaj bonege trafanta venĝo al viro. Ankaŭ la indiĝenaj inoj estas ege kapablaj trovi efikajn rimedojn kaj uzi ilin, se tio servas al iliaj intencoj, kaj se tio plezurigas ilin.

Sed kompreneble, tie sur la placo en la urbo estis multaj paroj, kiuj dancis kune, kiel estas kutime sur la baloj de la *ladinos*, ĉar tie certe duono de la knabinoj kaj junuloj estis parte urbaj indiĝenoj, naskitaj kaj plenkreskintaj en la urbo aŭ en loko antaŭ la urbo.

11/7

Andreo staris en la vico de la junuloj. Li emis danci. Sed ĉar li ne konis knabinon, li estis timida. Ĉirkaŭstaris ankaŭ kelkaj aliaj el la ĉaristoj, kiuj same venis de la kampadejo en la ebenaĵo. Ili puŝis sin reciproke en la ripojn por instigi la alian, ke li do dancu, por poste povi sekvi lin. Sed neniuj el la ĉaristoj ekkuraĝis. Ili sentis sin tie tro embarasitaj kaj tro fremdaj.

Andreo, ne trovante motivon, por tie stulte staradi kiel knabeto, retiriĝis iom post iom el la vico de la junaj viroj kaj leĝere promenis al domo, antaŭ kiu li sidiĝis kaj apogis sin al la muro, kun suprenigitaj genuoj kaj siaj brakoj ĉirkaŭ la genuoj.

De tie li povis observi la dancantojn same tiel bone, kiel de tie. Li aŭdis la muzikon ne tiel akrasone, sed pli harmonie, ĉar la sonoj en pli granda ĉirkaŭa spaco pli disvastiĝas kaj pli intime komunikigas. La dancantojn li povis malpli bone observi, ĉar tie staris

tro multaj gejunuloj kaŝantaj la scenejon. Li vidis nur la kapojn de la dancantaj knabinoj kaj junaj viroj kaj kaptis nur ĉeokaze klaran vidaĵon, kiam ekestis breĉo inter la ĉirkaŭstarantaj homoj.

Sed tio sufiĉis al li. Tiel li havis la eblon revii kaj neniuj ĝenis lin dum tio.

De tempo al tempo li aŭdis ridon aŭ subrideton de la knabinoj aŭ preterpasantan babiladon. Iam denove preskaŭ bruantan interparoladon de la viroj, kiuj kverelis pri io.

Tiel sidante kaj revante en la muziko kaj ensorbante la retenatan ridadon de la knabinoj, kaptis lin stranga sento, kiun li ne komprenis. Li demandis sin, kial li ekzistas, kaj por kio estas ĉi tiu. Li pensis, ke same tiel bone li povus esti morta, kaj ke tamen neniuj mankus en la mondo.

Tri knabinoj, babilante preteriris proksime ĉe li kaj ŝtelire perdiĝis post angulo en la nigra nokto. Post iom da tempo ili revenis, tirante kaj glatigante siajn vestojn. Ili babilis ĉiuj samtempe kun kvazaŭ kverantaj voĉoj.

Kaj en tiu ĉi kveranta arda babilado, kiu sonis je kelkaj koncizaj frazoj tiel profunde vualite, iom anhele, kaj foje plenvoĉe kaj peze, Andreo ekaŭdis unuafoje en sia vivo konscie la sekson.

La tri indiĝenaj knabinoj parolis hispanlingve, sed ili miksis en siajn paroladojn, kiam ili ne trovis sufiĉe rapide la ĝustan hispanajn vortojn, la celtalan, kiu estis ja lia gepatra lingvo. La knabinoj ne rimarkis lin, ĉar li sidis en la profunda ombro de la muro, kaj ili parolis tiel memforgesinte, ke ili ŝajne vidis tute nenion ĉirkaŭ si.

Tio, kion diris la knabinoj kaj de tempo al tempo jam nur flustris, li ne povis kompreni rilate la enhavon. Li aŭdis nur la bazan tonon de ilia interparolado, la melodion de iliaj voĉoj, kiuj kunfluis. Estis tiu kveranta kaj anhelanta melodio, kiu ekscitis lin. Kaptis lin sopiro. Li supozis, ke estas sopiro al la patrino. Sed tuj li sciis kaj sentis ĝin forte, ke tio estas alia sopiro. Sopiro al io. Al io ajn. Al io ajn bela. Sed ankaŭ tion li ne kapablis klare difini, el kio konsistas tiu bela afero. Poste li pensis, ke ĝi estas hejmsopiro. Sed ankaŭ tio ĝi ne estis. Estis io varmega, kio leviĝis kaj ondadis en li. Li eksentis nemezureblan malĝojon kaj profundan solecon.

Ĉio ĉi okazis al li ĝis tiam neniam.

Centfoje li aŭdis paroli inojn kaj knabinojn. Sed neniam antaŭe li aŭdis en la voĉo de ino ion, kio ekscitis lin. Dum kelkdekaj fojoj inoj estis en la karavano. Junaj inoj, maljunulinoj, belaspektulin-oj, edzinoj kaj needzinoj. Kelkfoje dum semajnoj kunveturis en la karavano inoj de ĉaristoj, kiuj akompanis siajn virojn.

Kiom ajn ofte li troviĝis en tiuj okazoj en la proksimo de inoj, li tamen neniam sentis ion precipan pro ilia ĉeesto. Li levis inojn de la ĉaro aŭ li helpis al ili supren. Li portis sennombrajn fojojn inojn sur sia dorso tra riveroj. Li vekis inojn frue matene en ranĉoj kaj trovis ilin nur parte vestitaj aŭ, pro la varmego, tute nudaj kaj ripozantaj sur ties kuŝejo. Li hazarde surprizis vojaĝantinojn kun la karavano ie post arbustoj ĉe la vojo dum ĉiuj penseblaj faroj kaj situoj. Li vidis multajn fojojn en noktoj en subita lumo de fulmo aŭ ĉe neatendita hela ekflamiĝo de kampadeja fajro virojn, kiuj brakumis siajn inojn sub ĉaro aŭ ie ajn aliloke. Ĉe la travado de riveroj, riveretoj kaj lagetoj li vidis kelkcentfoje sin banantajn inojn, kiuj estis senvestitaj ĝis la koksoj aŭ knabinoj, kiuj estis nudaj ĝis la plandoj.

Sed neniam li sentis ion, kio povus havi rilaton al li, aŭ kio vekis iujn dezirojn en li.

Ĉiu ino estis por li kiel viro. Ŝi havis nur iom alian staturon. En lia hejmloko laboris kaj la viroj kaj la inoj sen diferenco. La diferenco estis nur pri la speco de la laboro, ĉar la ino estas ja malpli forta kaj portas infanojn en si kaj naskas infanojn kaj flegas kaj nutras ilin.

Maturan inon li akceptis laŭsente kiel sian patrinon aŭ onklinon, kaj knabinon li rigardis kiel iun el siaj fratinoj.

La kabano, en kiu li plenkreskiĝis, havis nur unu ĉambron. Ekde la juneco li vidis, ke lia patro ne havas alian dormlokon ol ĉeflanke de la patrino kaj sur la sama minca petato. Tra la sveltaj stangetoj de la vandoj falis la hela lumo de tropika luno en la kabanon, kaj li vidis, kion lia patrino kaj lia patro faras sur la kuŝejo. Kaj kiam ne estis lunlumo, sed tenebro en la kabano, li povis aŭdi je la ekĝemoj de la gepatroj, kion ili faras. La gepatroj ne havis sekretojn antaŭ la infanoj. Se ili rigardis ion rekomendinda aŭ necesa, ili ne petis la permeson de la infanoj kaj ties ĉeesto ne afliktis ilin. Ili sciis tion, sed neniam rompis la kapon pri tio, ĉar tio estis memkomprenebla por ili, ke iliaj infanoj respektis ilin sen iu limigo, kaj ke tiu respekto kaj la amo de la infanoj estis skuebla per nenio, des malpli per aferoj, kiuj estis por ili tiel naturaj kiel leviĝo kaj subiro de la suno aŭ la kreskado de maizo kaj de floroj.

Mensogemajn romanojn, mensogajn poemojn kaj trompajn filmojn Andreo ne konis. Li nek vivis nek plenkreskis en lando, kie predikantoj de etiko kaj skribistoj de leĝoparagrafoj pri malĉasteco instruas infanojn kaj plenkreskintojn pri tio, kio estas obscena afero, kaj kiel oni trovu kaj utiligu ĝin al si, por tiel akiri la rajton pri aparteno al la bonkonduktaj civitanoj.

Kio povus esti la kaŭzo, kial en Andreo nun en tiu momento ekestis tia arda sopiro, li ne povis trovi.

Li provis klariĝi pri tio, ĉar io simila antaŭe neniam okazis al li. Dum duono de minuto li supozis, ke ĝi estas ekestanta febro, kiun li ie kaptis. Sed apenaŭ li ekpensis tion, li jam konsciiĝis, ke ĝi ne estas febro. *Calentura* komenciĝas alie. Li havis nek kapdolorojn nek li sentis, ke peziĝis liaj membroj.

Eĉ male, li opiniis, ke lia kapo neniam estis tiel klara kiel nun, kvankam obtuzita. Kaj li deziris migri la tutan nokton kaj la plenan sekvantan tagon, migri kaj migri. Ien. Nur migri. Sekve ne estis la pezaj membroj, kiuj molestis lin.

Estis la homoj, kiuj tie ridis kaj babilis kaj sencele promenadis sur la placo. Estis la monotona kantado kaj la teda ludado de la orgeno en la katedralo, kiu ĉiam denove miksiĝis en la dancmuzikon. Kaj estis la dancmuziko mem, sensignifa kaj tamen gaja. Estis la ekscititaj junuloj en siaj puraj blankaj pantalonejoj. Estis la subridantaj kaj babilantaj knabinoj kun sia longa nigra, bone trakombita hararo kun la enplektitaj floroj. Estis iliaj blankaj brilaj dentoj, iliaj plenaj lipoj, kaj iliaj serĉantaj noktonigraj okuloj, kiuj de tempo al tempo malsate ekbrilis kaj trafis lin. Kaj ĉiuj knabinoj zorge lavis sin kaj odoris laŭ forta sapo. Iliaj vestoj estis puregaj kiel novaj. Kaj kiam ili movis sin, videbliĝis de tempo al tempo peco de iliaj petale blankaj ĉemizoj.

Sed kiam la tri knabinoj tiom proksime preterpasis lin, kaj staris tie iom da tempo, li kaptis la odoron de ilia ioma ŝvito, kiun li rimarkis des pli bone, ĉar ĝi estis freŝa kaj eliris de bone lavitaj korpoj. Li sentis tion kiel dolĉaĵon.

Sed kio lin el ĉiuj ĉi aferoj plej multe logis, estis la knabinaj voĉoj. En ili ne estis muziko. Sed la voĉoj efikis al li kiel muziko.

Nur, ke estis muziko de alia speco. Ĝi ne estis sama al tiu muziko, kiu ludeblas per muzikiloj.

Estis la mildeco, kiu estis en la voĉoj de la knabinoj. La profunda boneco de ino, kiu povas esti kaj plej amata amatino kaj samtempe patrino, kio ondadis en la varmaj, kverantaj kaj volupte forfluantaj voĉoj, sen tio, ke la knabinoj konsciiĝis pri tio. Ŝajnis, kvazaŭ ili je tiu ĉi vespero fine klariĝis pri tio, kiu estas tiu, kiu inter ĉiuj viroj surtere sole kapablas prezenti la mondon envolvita per rozofloroj kiel donaco.

Kvankam Andreo ne sciis la kaŭzon, kiu kondukis lin al stranga vekiĝo, li tion tamen sciis, ke li ne estas plu la sama viro kiel antaŭ horo.

En li okazis ŝanĝiĝo, pri kiu li jam tiam sentis, ke ĝi tute okupas lin.

Ke inoj havas aliajn voĉojn ol viroj ne estis nova por li. Sed, ke inoj per la melodio de siaj voĉoj povas distingiĝi de la viroj tiel akre, ke ili, nur per la intonacio de la voĉo kaj per la malkovro de sia animo en tiu voĉo, povas meti tutan mondon inter viro kaj ino, estis por Andreo nedivenita nova ekkono.

Tiu eltrovo skuis lin dum momento tiom, ke kaptis lin timo. Li eksentis sian necertecon. Li subite dubis, ĉu li plu trovos la fadenon de Ariadno en la mondo. La sopiro al io nekonata, kio tamen estas bela, interligis sin en liaj sentoj kun lia disvastiĝanta necerteeco kaj timo.

Li subite ektimis inojn. Ili havis ion je si, kion li per unu fojo ne komprenis plu. Restis al li nur la pure sobra sento, ke li povas kompreni nur sian patrinon, kaj ke ŝi estas la sola ino surtere, kiun li ne timas, ne nun kaj neniam.

Sed samtempe kun tiu timo pro la fremdeco de la inoj kaptis lin la sopiro aŭskulti la paroladon de la inoj kaj lasi karesi kaj dorloti sin de la patrina boneco de ina voĉo.

Li fariĝis profunde malĝoja, kaj li havis la ardan deziron plori. La knabinoj jam senzorge iris plu. Li vidis, ke ili denove ŝovis sin en la vicojn de la knabinoj, kiuj atendis dancemulojn. Pro la ŝajne senatenta pluirado de tiuj knabinoj li ekhavis la senton, ke malgraŭ la homamaso sur la placo li nun estas tute forlasita kaj sola. Li ne havis amikon. Neniun, kiu parolus bonkorajn vortojn al li. Neniun, al kiu li povus paroli pri tio, kion li sentas kaj kio okazas en li.

Li sentis, kiel li laciĝis. Li esperis, ke li facile kaj sen doloroj formortos. En tiu momento, sen eĉ devi leviĝi.

En tiu milda reva pensado venis al li la ekkono de lia sopiro. Kaj la sopiro, tiel nedifinita kaj ŝvebanta ĝis tiam, densiĝis al klareco.

Ĉapitro 12

12/1

Estis certe malĝojige por li, ke li ne sufiĉe profunde enpenetris en la misterojn de la religio. En tiu kazo li irus en tiu momento en la katedralon, oferus al la ĉiela reĝino du grandajn kandelegojn glukovritajn per bunta papero kaj elkore petegus la reĝinon doni tion, kion li deziris en sia koro. Estas pli oportune almozpeti la diojn kaj diinojn ol mem peni havigi la deziratan, ĉu per laboro, ĉu per prudenta kaj inteligenta manipulado de la cirkonstancoj, kiuj ofertiĝas. Aferoj, kiujn oni deziras fervore, plenumiĝas ne ĉiam, kaj ili plenumiĝas nur malofte tiel, kiel oni deziris tion. Sed

aĵoj, kiujn oni fervore deziras, multe pli proksimiĝas kaj lasas sin, jam sufiĉe proksime, multe pli facile kapti kaj firme teni ol aĵoj, kiujn oni deziras nur sen pasio aŭ tute ne. Tio estas tre natura kaj certe ne mistera. La apenaŭ edukita homo kaj la ne tre inteligenta homo devas preĝi por koncentriĝi al siaj deziroj. Kaj tial estas tute egale, al kiu iu preĝas, ĉar ne estas la preĝo, sed la serioza deziro, kiu proksimigas ion deziratan. Andreo sciis bone, certe pro longa sperto, ke malaperas eĉ ne unu truo sur la vojo, se oni preĝas por tio. Se li aŭ liaj *compañeros* ne plenigus la truojn per ŝtonoj kaj ne atentus krome atente la vojon, la ĉaro simple rompiĝus. Li sciis, ke la patrono ne donus al li eĉ duonon de realo pli da salajro, se li surgenuus dum horoj antaŭ Sankta Virgulino. Li devis persone elogi tion de sia patrono, ĉu rekte, ĉu per artifiko. Kaj se bovo falas en abismon, neniuj kiom ajn fervora preĝo eltiros ĝin. Necesas horoj da turmenta sanga laboro de la ĉaristoj por retiri kaj reirigi la bovon sur la vojon, per lazoj kaj per arboj kaj per elfosado de ŝtupoj kaj aranĝo de vojsulko. Kvankam la katedralo tiel insiste vokis lin el sia malfermita portalo, venis eĉ ne dum sekundo la penso en lian kapon peti Sanktan Virgulinon pro la kamarado, kiun li bezonis.

12/2

Andreo estis sendecida, kion fari? Kaŭrante laŭ la maniero de la indiĝenoj, li apenaŭ moviĝis. El iom pli malproksima distanco rigardate, li aspektis en la ombro de la dommuro, kontraŭ kiu li apogis sin, kiel ornamstatua figuro. Eĉ la kapon li ne turnis. Ĉio, kion li volis vidi de la okazaĵoj sur la ne tre iluminata placo, li povis rigardi preskaŭ sen movi la okulojn.

Nur en sia interno li fariĝis maltrankvila pro la renkontiĝo kun la junulinoj. Li ne emis kaŭri plu, sed li ankaŭ ne volis ekiri. Io nova tie ne plu videblis. La dancado de la junaj viroj kaj knabinoj daŭris plu. Sed por tiu, kiu nur rigardas la dancadon, la dancado

baldaŭ fariĝas enua. La ebenaĵo nun estis vualita en nigra nokto. La ĉaristoj dormis, kaj tiuj, kiuj ne dormis, estis ebriaj kaj blekadis sence kvazaŭ por si mem. Ĉarojn, bovojn kaj ĉaristojn li povis vidi ĉiutage. Sed *feria*, kie li pigre kaj reve povas sidi kaj aŭskulti sen molestoj, estis rara en lia vivo. Li ne sciis, kiam li denove tiel povos partopreni tian jarfoiron. Unu aŭ du jaroj certe pasos ĝis tiam.

Pensante, ke li eble ne partoprenos dum jaroj denove sanktulo-feston, se lia laboro ne permesos tion kaj li troviĝos sur longaj marŝoj, li decidis fine denove iom promeni inter la vendostandoj, laŭboj kaj rulettabloj. Io interesa ja ĉiam videblas. Li pensis pri tio iri en kanton kaj peli tra la gorĝo malgrandan komitekon. Eble okazos, ke li renkontos knabinon, kiu ne havas amanton, kaj kiu do vagadas tie sola kiel li. La penso, ke li povus renkonti knabinon, kiu eble eĉ estas kiel unu el tiuj tri knabinoj, kiuj ekscitis lin tiel novspece kaj tiel strange, boligis lian sangon. Estus eble, ke li trafos junulinon, kiu estus preta interparoli kun li, danci kun li, promenadi kun li sur la placo, eble eĉ migri el la loko kun li, preter la domoj, trans la ponteton ĝis la lastaj ranĉodomoj, kie komenciĝas la ebenaĵo.

12/3

Li etendis la gambojn, poste li kaptis sian altan bastĉapelon, kiu glitis de lia kapo.

Kiam li disetendis la membrojn por ekstari, li aŭdis sonon, kiu similis al retenata suspiro.

Li rigardis dekstren. Dum la longa tempo, kiam li tie kaŭris, li rigardis eĉ ne unu fojon tiudirekte. Tie estis malhelo, kiu densiĝis tie, kie ĝi transiris en strateton. Tie estis nenio, kio eble povus esti

interesa. Ĉar ĉio, kio rigardindas, troviĝis antaŭ li kaj maldekstre de li. Nur la katedralo troviĝis dekstre, sed pli antaŭe.

Kiam li nun de pli proksime rigardis, li rimarkis profunde en angulo de la domo kunruliĝintan faskecan homon, kiu kvazaŭ rampis en sin mem, kvazaŭ ĝi timus forpreni tro da loko de la mondo kaj de la ceteraj homoj. Ŝajnis krome, ke tiu fasketulino opinias, ke en la urbo ŝi tute ne havas rajton je iu ajn loko. Tiel dense kunruliĝinta ŝi tie kaŭris.

La fasketulino ne moviĝis. Oni vidis nek kapon nek piedojn. Ĉio ĉi firme estis envolviĝinta en specon de *jorongo*, ĥorongon el nigra lano kun mincaj grizaj strioj.

Rimarkoj

ĥorongo = lankovrilo, ĉiam kun truo por la kapo

komiteko = *comiteco*

12/4

Andreo ne povis klarigi al si, kiel la fasketulino venis ĉi tien, tiel proksime, ke li preskaŭ povis tuŝi ŝin permane. Estis verŝajne, ke liaj pensoj vaste vagadis kaj li ne atentis, kiam kaj kial la fasketulino kaŭriĝis apud li. Eble ŝi tie estis jam, kiam li sidiĝis tie. Ĉiukaze li tiam ne rimarkis ŝin.

Kaj ĉar ŝi nun tiel neatendite tie kaŭris, ŝajnis al li, kvazaŭ la fasketulino falis de la ĉielo.

Li ŝoviĝis iom pli proksimen. Kaj kiam li faris tion, ŝajnis al li, kvazaŭ la fasketulino ankoraŭ pli rampus en sin mem.

Denove li aŭdis mallaŭtan singulton, kiu sonis kiel la transiro de longa plorado en pli kaj pli normalan spiradon.

Per milda voĉo li demandis: „Kial vi ploras, knabineto?“ Li ne ricevis respondon.

Venis en lian kapon, ke ŝi eble ne komprenas la hispanan lingvon. Kaj li demandis ŝin nun en sia gepatra celtala lingvo: „Kial, malgranda knabino, vi estas malĝoja?“

La fasketulino moviĝis kaj iom etendiĝis alten.

„Ĉu vi ne havas patrinon?“ li demandis.

„*Muquenal*“, la fasketulino diris mallaŭte, denove ĝemante.

„Do, en la tombejo“, respondis Andreo. „Kaj via patro, ĉu?“ li demandis.

„*Mee muquenal, tat milvil, nebahachisch, mucul, aquil namal*“, diris la fasketulino. „Mia patrino estas en tombejo, mia patro mortbatita, mi fariĝis nun orfino, mia hejma vilaĝo estas malproksima de ĉi tie.“

Per tiuj kelkaj vortoj ŝi rakontis evidente sian tutan rakonton.

12/5

Andreo eĉ pli proksimiĝis al ŝi.

Li diris: „Ĉu mi povas helpi al vi, malgranda knabino?“

Ŝi silentis iom, kvazaŭ ŝi devus pripensi tion. Poste ŝi diris: „*Bocon*“, „mi nun ekiros“.

„Kien vi volas iri, tiel malfrue en la nokto? La sovaĝaj hundoj mordos vin. Kaj la ebriuloj, kiuj sternis sin sur la vojoj, vin molestos.“

„Mi ne timas ilin“, ŝi respondis. „Mi havas tre akrajn dentojn kaj durajn ungojn je miaj fingroj, kaj mi elserĉos du grandajn ŝtonojn kaj portos ilin kun mi sur brako.“

Dum ŝi parolis, ŝi pli kaj pli elvolviĝis de sia ĥorongo. La kapo nun estis libera.

„Kiom da jaroj vi havas?“ li demandis.

„*Jolajuneb*, mi havas dek kvin jarojn.“

„*Anelvaneg*, fuĝinto, ĉu?“

„Jes, *anesvil*, mi fuĝis de la bieno“, ŝi diris.

Ŝia hararo estis konfuzita, tordita kaj nekombita, malpura kaj kiel Andreo facile vidis, plena de pedikoj. Sian vizaĝon kaj siajn manojn ŝi ne plu lavis dum kelkaj tagoj. Ŝia haŭto aspektis malhele bronza. Ŝiaj okuloj estis profunde nigraj kiel ŝia faska hararo, kaj tre grandaj kaj brilaj.

Andreo povis vidi ĉion tion, post kiam ŝi turnis sian kapon al li kaj la lumo de la foirplaco falis sur ŝian vizaĝon.

„Ĉu vi ne havas kuŝejon por la nokto?“ li demandis.

„Mi iros eksteren sur la ebenaĵon“, ŝi diris.

Li ridis al ŝi. Kaj kiam li vidis, ke ŝi respondis lian ridadon kun hezitema rideto, li diris: „Mi prenos vin kun mi al la ĉaroj, kaj mi

faros por vi belan varman kaj molan kuŝejon en ĉaro. Ĉu vi volas?“

„Vi estas bona al mi, *Binash Yutsil*, bela knabo“, ŝi diris simple. Kaj per tio ŝi akceptis lian inviton.

12/6

„Sed ni iru unue al la puto“, li konsilis.

„Kial?“

„*Suquel*, por lavi nin.“

Li estis galanta kaj ĝentila. Ĉar li celis, ke ŝi mem lavu sin. Sed, ĉar tio okazis nun komune, ne dolorigis ŝin aŭdi, ke ŝi nepre lavu sin.

Li tiris sapopecon el poŝo kaj donis ĝin al ŝi. Ŝi lavis sin kliniĝinte ĉe la rando de la puto, kie la akvo fluis en la trogojn por la bestoj kondukataj tien por trinkigi ilin.

„Atendu ĉi tie etan momenton“, li diris kaj forkuris.

Jam post minuto li revenis kaj alportis lignan kombilon, aĉetitan por kvin centavoj ĉe unu el la standoj. „Kaj nun ni iros kaj kombos nian hararon ĝis kiam ĝi estos bela.“

Li prenis ŝin je mano, kaj ili reiris en la ombron de la domo, kie ili trovis unu la alian.

Ŝi zorgeme komencis trakombi sian hararon. Tio daŭris longan tempon. La hararo, kiu jam kutime estis tre plena kaj faska, aspektis kiel felta bulo.

Li observis ŝin ĉe tio, ridis kaj parolis kun ŝi, kvazaŭ li konus ŝin jam dum multaj jaroj.

Ŝi fariĝis konfidema al li kiel al frato. Evidente tio efikis eksterordinare bonfartiga al ŝi, ke ŝi trovis iun, kun kiu ŝi povas interparoli tute libere.

Tiu konfidemo, kiun ŝi havis al li, plenigis lin kun stranga sento de varmo. Li sentis sin, kvazaŭ lia koro banus sin en sunlumo. Agrable tiklanta ondo trakuris lian korpon. La sopiro, kiu tiel malĝojigis lin, ĉar ĝi ŝajne estis direktata al nenio, kaj nur sopiro pro la sopiro mem solviĝis en li al kvieta kaj granda ĝojo. Li ne povis doni nomon al ĝi, ĉar estis ĝojo, kiu estis nova al li, ĝi interligeblis al nenio, kion li konis. Li deziris, ke tiu nokto neniam ĉesu, kaj ke la knabino babilu kaj babilu sen fino.

Kiam ŝi dum la kombado reĵetis la hararon por skui ĝin, iom kliniĝinte la rigardon, ŝi turnis sian vizaĝon al li, ridante kaj ludante per siaj blankaj dentoj dum sia rido, li ekhavis la senton, kvazaŭ estus naskita nova mondo. Li sentis sin nemezureble riĉa, ke li povis aĉeti kombilon por la knabino, kaj ankoraŭ pli riĉa li sentis sin, ke li estis kapabla oferti al ŝi ĉaron kiel domon.

Finfine la knabino estis kombinta sian hararon. Ŝi skuadis ĝin kaj turnis sian vizaĝon nun tute al li. Ŝi tiris la elkombitajn harojn el inter la dentoj de la kombilo, purige frapadis la kombilon sur la ŝtonoj kaj tiam transdonis ĝin al li.

„Jen via kombilo, donaco por vi de la sanktula festo“, li diris.

„Sed mi ne havas poŝon, en kiu mi povus porti ĝin“, ŝi rimarkis ridete. „Ĉu vi bonvolus porti ĝin en via poŝo?“

Li prenis kaj enpoŝigis ĝin kaj diris: „Mi tiom ĝojas, ke mi rajtas porti ĝin por vi. Tiukaze vi ĉiufoje devos reveni al mi, se vi celos kombi vian hararon.“

„Tion mi faros ja kun plezuro“, ŝi rediris.

Li ekstaris kaj diris: „Kaj nun, *vehel ta hacabaltic*, ni ekiru por vespermanĝi. Ĉu vi emas? Ĉu vi malsatas?“

Ŝi klinis la kapon malantaŭen, por rigardi el sia kaŭranta pozicio al liaj okuloj: „Mi estas tiom malsata, bela kaj bona knabo, *Binash Yutsil*, du tagojn mi ne manĝis ion.“

12/7

Ili iris al la malgranda indiĝena kuirejo, kie Andreo pli frue en la vespero aĉetis enĉiladojn. „Nu, kion vi do volas havi kiel vespermanĝon, *tujom ants*?“ li demandis amikece.

Ŝia vizaĝo profunde ruĝiĝis, kiam li diris tion, kaj ŝi rigardis kun honto malsupren; ĉar „*tujom ants*“ signifas „belulino“. Kaj kiel li diris tion kaj kiel li ridetis al ŝi ĉe tio, tio ne nur estis admiro, sed pli.

Sed tiam ŝi turnis la kapon kaj rigardis lin de la flanko ridetante kaj kun iom fermitaj okuloj.

„Nu?“ li demandis denove. „Kian vespermanĝon la malgranda knabino volas havi?“

„*Tibal*“, ŝi rediris. „Viandon, multe da viando, mi estas tre malsata.“

Li mendis la enĉiladojn. Dum ili observis la preparadon, ŝi diris: „Sed mi tute ne plu estas malgranda knabino. Mi nun estas granda. Mia sango fluas jam pli ol jaron. Tion vi povas kredi al mi, *Binash Yutsil, huinic*, belaspekta knabo.“ Ĉe tio ŝi ridis de-nove.

Ŝi estis nudapieda. La rigida nigra lana kitelo, truigita kaj priŝmirita kun strioj de sekigita tero, atingis nur ĝis la komenco de ŝiaj muskolaj suroj. Kaj la gamboj kaj la brakoj aspektis kiel facile polurita mahagona ligno. Ŝiaj piedoj estis tre malgrandaj, sed ŝiaj piedfingroj estis larĝaj kaj sanaj, unu apud la alia.

Suoj neniam malhelpis kreski ilin. Sub la kitelo ŝi ŝajne ne havis ĉemizon. Sed la brusto estis vestita per blanka lanjaketo, kies orlo estis brodita per ruĝa lano kun simplaj linioj kaj modestaj steloj. La jaketo estis tre griza de koto kaj de la enpenetrinta polvo. Sur la jaketo ŝi portis ĥorongon, nigran krudan lankovrilon kun mincaj grizaj enteksitaj strioj.

La lankovrilo havis en la mezo fendon, tra kiu ŝi estis ŝovinta la kapon. Tiel la ĥorongo falis garde trans ŝian bruston. Ĝi estis mallonga kaj atingis nur ĝis la koksoj. Ĉe la koksoj la lankitelo estis kunrulita al dika ringo, ĉar la kitelo, laŭ indiĝena modo, estis tiel vasta, ke oni ne devis ŝanĝi ĝin, kiam la portantino atendas bebon. La kitelon kuntenis larĝa ruĝa lanorubando, kiun ŝi volvis ĉirkaŭ la koksojn kaj kies finaĵojn ŝi kunplektis.

Ŝiaj brakoj estis nudaj ĝis super la kubutoj. La kolo estis libera, sed la nuko kovrita de ŝia plena, densa, krispa kaj spite la kombadon ankoraŭ nun felta hararo, kiu pendis malsupren ĝis la talio.

La enĉiladoj fine estis pretaj. Li pagis kaj petis ankoraŭ pri iom da salo, kiun li ricevis en bananfolio. Malgrandan citronon li ricevis aldone.

Tiam li diris: „Ni manĝos tie transe sur la ŝtuparo de la preĝejo kaj poste revenos ĉi tien kaj ĉiu trinkos kafon el poteto.“

„*Hutsil*“, ŝi diris ridante, „tio estas bona tiel.“

12/8

„Ĉu ne volas manĝi ankaŭ vi? ŝi demandis, kiam ili sidis sur la ŝtupoj de la ŝtuparo.

„Mi jam manĝis, kaj mi nun ne malsatas“, li ripetis.

„Sed tiukaze vi el ĉiuj enĉiladoj devas formordi pecon, alie la manĝo ne gustus al mi kaj mi restus malsata“, ŝi diris kaj tenis enĉiladon al lia buŝo.

„Kiel vi nomiĝas, knabineto?“ li demandis.

„Mi ankoraŭ ne havas nomon“, ŝi repondis. „Mia patro kaj mia patrino vokis min ĉiufoje nur *huntic*, infaneto, ne pli. Kaj en la bieno la mastrino vokis min ĉiufoje nur *antsil vinic*, servistino. Kaj *José*, la filo de la mastro, vokis min ĉiam *mejayel*.“

„Kial li vokis vin *mejayel*?“ Andreo demandis ĉagrenite. „Tia aĉa nomo por vi, malgranda knabino. Kia malica kanajlo tiu *José* devas esti! Tie transe en la kantino, rigardu tien, jen ĉiu el la ŝminkintaj knabinoj, kiuj tie alportas la komitekojn por la viroj al la tablo kaj sidiĝas sur iliajn genuojn kaj permesas palpi sin de ili sub la jupo aŭ sur la mamojn, por ke ili estu bone pagataj por tio, nu, ĉiu el ili estas *mejayel*.“

Ŝi ne tute komprenis, ĉar tio, kion Andreo parolis, estis tiel fremda al ŝi kiel al normala homo la prapeko. Sed ŝi komprenis, ke fremda kaj nekutima mondo malfermiĝas antaŭ ŝi. Ŝi vidis

neniun sencon en la okazaĵoj de tiu nova mondo. Tial ŝi pensis, almenaŭ je la unua rigardo, ke ŝi ne ekkonas interrilatton je tio. Sed, kiam ŝi pli ofte rigardis transen al tiu kantino, kaj pli ofte observis la knabinojn kaj ŝiajn manipulojn kaj ĉe tio provis, tion, kion ŝi vidis kaj observis, akordigi kun tio, kion Andreo ĵus klarigis al ŝi, ŝi ekkomprenis. Ŝi komencis eĉ pli rapide ordigi la interligojn en sia kapo ol Andreo atendis. Kaj post certa tempo de observado kaj pripensado, ŝi ekkonis, ke oni faras en tiu kantino la samon, kion ŝi vidis en la bieno. En la kantino, la plej proksima domo apud la katedralo, estis nur la maskerado kaj la iluminado alia. Jen la sola diferenco.

Ŝi diris tiam: „*José* mensogis. Mi nun scias, kio estas *mejayel*. Sed *José* mensogis, mi ne estas *mejayel*. Sed li volis fari min tia. Tion mi nun scias. Tio estas la kaŭzo, kial mi forkuris de la *finca*. Mi ĉion rakontos al vi, *Binash Yutsil*“ ŝi diris, post kiam ili manĝis.

„Antaŭe ni trinku kafon el poteto. Vi certe soifas“ respondis Andreo.

Rimarko

mejayel = prostituitino, amoristino, frivolulino

12/9

Ili sidis poste denove sur la ŝtuparo de la katedralo. El la preĝejo ili aŭdis la eternan murmuradon de la preĝulinoj, de tempo al tempo monotonan kantadon.

La bruado kaj kriado de la komercistoj sur la placo mallaŭtiĝis, iom post iom. Sed ankoraŭ nun homoj promenis tien kaj reen, sed neniun plu aĉetis ion ajn. Pli grandaj amasoj de homoj, kiuj parte ludis kaj parte observis la ludadon, plu formiĝis nur ĉe la ludotabloj, ĉe la ruleto, ĉe la ĵetkubaj tavoloj, ĉe la granda knaranta

rado kun nombroj, kie aĉe kvalitaj ore makulitaj florovazoj, japanaj ventumiloj kaj rustiĝintaj vekhorloĝoj estis gajnataj, krome ĉe la grandaj loteriaj tabloj, kie la homoj metis fabosemojn sur la ludokartojn, esperante, ke, post la elvokado de la luditaj kartoj ili povos vicigi kvar bildojn, per kio ili gajnus bukedon el paperfloroj, brandoglason aŭ kombilon.

Ĉe tiuj ludbenkaj tabloj la bruo estis plej laŭta. Oni aŭdis la kriadon de viro, kiu malkovris la kartojn por montri ilin: „*El diablo! El diablo!*“ ripetis lia helpanto, por ke ĉiu el la ludantoj povu okupi la elluditan karton per fabosemo, se ĝi kongruas kun propra karto. „*El globo!*“ – „*El globo!*“ „*El alacrán!*“ – „*El alacrán!*“; „*La vaca!*“ – „*La vaca!*“ La elvokanto de la luditaj kartoj ŝatis spici la bildojn de la montrataj kartoj per paroloj, kiujn li supozis spritaj.

Kelkaj komercistoj komencis kovri siajn tablojn per oleotremplitaj toloj; aliaj pakis siajn varojn en kestojn; aliaj kovris la sternitajn varojn per fragmitaj matoj. Kiam tio estis farita, la komercistoj kaj komercistinoj kuŝiĝis sur maton sub la tablo aŭ apud la tablo por dormi.

Pli kaj pli de la fulgantaj lanternoj kaj de la ladoboteloj, en kiuj bruletis kotonpeco trempita en oleo, estingiĝis. La homoj promenantaj tien kaj reen aperis kiel fantomaj ombroj inter la tabloj de la komercistoj, kiuj finis sian negocon en tiu tago.

Sed proksime de la puto oni ĝoje dancis plu.

El fore malantaŭa strato oni aŭdis la melankolie ŝvelantajn, flutecajn, zumantajn sonojn de marimbo. Kelkfoje ili sonis kiel harpoj, kelkfoje kiel hobojoj de ĉiuj grandoj, kelkfoje kiel la kantado de basaj sonoraj damaj voĉoj, kelkfoje kiel la delikata sonado de sonoriloj. Iu civitano de la urbo havis privatan solenaĵon en

sia domo, aŭ amanto kantis serenadon por sia koramatino, aŭ familio festis la sanktulan tagon de unu el siaj membroj.

„Ĉu vi volas iom danci kun mi?“ demandis Andreo.

„Mi volonte kun vi dancus, beleta knabo mia, sed mi timas.“

„Vi ne devas timi, malgranda knabino“, li trankviligis ŝin. „Tie ne estas ladinoj ĉe la danco, ĉiuj homoj tie estas kiel ni, indiĝenoj, kiel vi kaj mi. Ni ekiru.“

Ili iris al la dancantoj.

Neniu atentis ilin. Li aspektis kiel ĉiuj ceteraj junaj viroj tie, kaj ŝi aspektis en sia ĥorongo kiel kelkaj el la aliaj knabinoj de la ĉirkaŭaj lokoj, kiuj venis al la festo.

Li transdonis sian buntan koltukon al ŝi; kaj ili dancis indiĝenan *zapateado*, ĝoje kaj senzorge, kiel ĉiuj aliaj, kiuj iristien al la dancado.

Ili tute forgesis, ke ili konis sin ne pli longe ol dum du horoj. Kaj ne ĝenis ilin, ke neniu el ambaŭ konis la nomon de la alia. Ambaŭ havis la senton, kvazaŭ ili konus sin jam de la tempo, kiam vekiĝis la mondo.

Rimarkoj

alacrán = skorpio

el diablo = la diablo

globo = kuglo

vaca = bovino

12/10

Fariĝis malfrua nokto.

La muzikistoj laciĝis. Ili ludis tiam jam tri semajnojn, tage kaj nokte, ofte ĝis la nova hela tago. Ili perlaboris ne multe, ĉar tiuj, kiuj venis al ili por danci, havis nur iomete da elspezebla mono. Sed ili, indiĝenoj, kiel ĉiuj aliaj tie, ŝajne sentis sin sufiĉe pagataj per tio, ke ili havis la eblon ĝojigi aliajn homojn, ke ili rajtis forgesigi la zorgojn, kiujn ĉiu havis, kiu venis al ili, kaj eĉ se nur dum kelkaj gajaj horoj de la nokto.

„Nu, ni denove ekiros kaj trinkos kafon el kruĉo kaj aldone aĉetos dolĉan panon“, proponis Andreo, kiam la knabino redonis la tuketon al li.

„Tute laŭ via plaĉo, *Binash Yutsil*“, ŝi diris, ridante al li. „Ordonu kaj mi obeos vin.“

Li kaptis ŝin ĉe la kubuto kaj kondukis ŝin al la kuirejo de la indiĝenino, kiu dormeme kaŭris apud sia eta fornelo. La ino tie sidis tage kaj nokte kaj kuiris por la malsataj indiĝenaj gastoj, kiuj venis al ŝi. Kiel la plimulto de la komercistoj kaj ludotablaj posedantoj, ankaŭ ŝi jam estis ĉe la festo en Sapoluta. Ne estis diven-eble, kiam ŝi fakte dormas. Ŝi havis certe la kapablon sufiĉe dormi, dum ŝi kaŭras apud sia forneleto kaj ĝuste neniuj gastoj staras antaŭ la tablo. Ŝiaj gastoj neniam rapidis, neniam ili urĝis ŝin, neniam ili parolis laŭte kaj grumble, se la enĉiladoj ne estis sufiĉe rapide pretaj. Tiel la indiĝenino eble dormetis, dum ŝi ŝajne manipuladis ĉe la forno. Kiam ŝi vidis, ke neniuj staras ĉe la tablo, ŝi tiris sian *rebozo*, sian tukon, vaste super la kapon, kaj ŝi dormis tuj tiel firme, ke ŝi ronkis. Sed unu el ŝiaj filinoj devis nur flustre voki: „*Madrecita, dos con pollo, dos con res*“, kara panjo, du kun birdaĵoj kaj du kun bovaĵo, kaj jam ŝi vekigis el la dormo

kaj kiel aŭtomato ŝi preparis la postulitajn enĉiladojn, sen iam erari pri la diversaj salatoj kaj saŭcoj. Ŝia unua ago, kiam oni vekis ŝin el dormo, estis ĉiam kvazaŭ aŭtomate flamigi la ardetantan fajron per alblovado. Alblovi la ardetantan fajron, kiu ardas sur la tero aŭ sur argila fornelo, estas ĉiam la unua ago de indiĝenino post la vekigo; tiel, kiel estas la unua ago de indiĝena servisto, kiu akompanas vojaĝanton en la ĝangaloj kaj praarbaroj.

12/11

Fariĝis nun jam sufiĉe fride. Kaj la varmega kafo, kompletigita per kelkaj *biscochos*, dolĉaj biskvitoj, bonfartigis kaj ĝojigis la gejunulojn.

„Mi pensas, malgranda knabino, ke vi nun estas sufiĉe laca“, diris Andreo kareseme. „Ĉu vi volas dormi? Mi preparos al vi bonegan varman kuŝejon en ĉaro, kie vi povos dormi, tiom longe kaj tiom ofte kiom vi emas.“

Sen embaraso ŝi respondis: „Se vi tion ordonas, mi devas certe obei vin.“

„Ĉu vi ĉiam volas obei min, malgranda knabino?“ li demandis flustrante.

„Ĉiam“, ŝi diris simple, „ĉiam, ĉar vi estas bona al mi.“

Ili iris tra la longaj kvietaj stratoj. Ju pli ili foriĝis de la placo des pli malhele fariĝis. La stratlampoj jam ne lumis. Ili ofte stumblis.

Ĉar la instancoj, aŭ pli bone la personoj, kiuj estis la instancoj, uzis la monon destinitan por la plibonigado de la stratoj en maniero, kiu al ili ŝajne estis pli utila, kaj tial disponigis ĝin al siaj

propraj personaj celoj, tial la stratoj estis en plendinda stato, tuj, se oni ne plu estis en la centro de la urbo. Tie troviĝis elrompitaj ŝtonoj, profundaj truoj kaj fosaĵoj, en kiujn oni sinkis foje tri metrojn, se oni falis en ilin, profundaj kanaletoj kaj sulkoj plenigitaj per glitiga koto kaj fetoranta ŝlimo, akvomarĉetoj kaj flakoj, superfluantaj kloakoj, arbotrunkoj, tabuloj, ĉarotimonoj, mal-supren falintaj domaj tegmentoj, kaj forrompitaj dommuroj troviĝis ĉe ĉiu paŝo transverse kaj ĉiudirekte en la stratoj de la eksteraj urbopartoj. Pontetoj havis en la mezo grandajn truojn, kelkaj havis parapetojn, sed parte derompitajn, aliaj tute ne havis parapeton. Jam en la hela tago estis sufiĉe fortostreĉe iri sur tiuj stratoj sen iuj malagrablaj incidentoj. Nokte oni riskis rompojn de membroj kaj membanadon en fetorantaj fosaĵoj post ĉiu deka paŝo.

Andreo tiris el siaj malantaŭaj pantalonaj poŝoj kenosplitaĵojn kaj bruligis ilin por prilumi la vojon. Elektran poŝlampon, unu el siaj plej ardaĵoj deziroj en sia vivo, li ne povis akiri ĝis nun. Li ankaŭ ne vidis iun ajn estontecan eblon, iam posedi tian lampon.

Sed li, tiel kiel ankaŭ la knabino, estis kutimiĝinta al kenaj torĉoj. Nek en la domo, nek ĉe la laboro ili disponis pri alia lumo. Ĉiu ĉaro kompreneble havis lanternon, sed tiuj lanternoj efektive ne tre utilis, tial la ĉaristoj, se ili nepre bezonis bonkvalitan lumon, eklumigis kenajn torĉojn. Pro tio ili ĉiam havis sufiĉe grandan provizon de kenoj en siaj ĉaroj. La kenoj kostis al iliaj mastroj eĉ ne centavon, ĉar la ĉaristoj eltranĉis ilin survoje el abioj, kiujn ili renkontis kaj kiujn ili ne pridemandis, kies posedo ili estas. Tio malpliigis al la mastroj la elspezojn por la petrolo de la lanternoj.

La urbo estis vaste konstruita, ĉar ĉiu familio loĝis en speciala domo, kaj ĉiu familio havis grandspacan internan korton. Tial daŭris certan tempon antaŭ ol ambaŭ atingis la lastajn domojn

de la urbo. Tie la vojo fariĝis pli sekura ol en la urbo; ĉar tie sternis sin la vasta ebenaĵo antaŭ ili.

12/12

Andreo sidiĝis sur deklivo kaj diris: „Ĉu ni ĉi tie iom restadu kaj fumu cigaredon? Ĉu vi volas?“

„Mi volas“, ŝi diris, kaj sidiĝis apud li.

Li rulumis cigaredojn kaj donis unu el ili al ŝi.

La profunda nokto estis super kaj ĉirkaŭ ili kun sia tuta pezo, sed ĝi ne ŝarĝis kaj ne premis ilin. Ĝi estis vasta kaj grande spaca torentado el saturita malhelo kaj bonfartiga trankvilo. Sur la ebenaĵo violonis, zumis kaj flutis la griloj kaj kio krome eble vivas ĝoje inter herboj. De tempo al tempo oni aŭdis el granda foro la basan grumblon de bovo aŭ la plendantan trumpetadon de mulo.

La steloj brilegis kaj brile tremis super ili en tropika klareco kiel malgrandaj sunoj.

Jen kelkaj vespertoj flirtis trans iliajn kapojn, revenis kaj ĉirkaŭflugis ilin cirkle, foje ili estis proksimaj, foje malproksimaj.

En la urbo glimis kelkaj perditaj lumoj antaŭ ili.

Kelkajn fojojn eksplodis malfruiĝintaj piroteknikaĵoj super la urbo, tie kaj tie kelkaj raketoj ĵetiĝis sible en la aeron por veki Sanktan *Caralampio*-n. Li ja eble eĉ ne deziru dormi en sia naskiĝtago! Tion oni ne povus permesi al li.

12/13

Jen la knabino diris: „Kiam mi vidas sur la profunde nigra kaj tamen tiel klara ĉielo la stelojn, kiuj sternis sin tiel brilege, kvazaŭ ili volus paroli, jen mi devas pensi pri mia kara patrino. Eble ŝi nun vivas sur iu el tiuj steloj. Ŝi amis la stelojn pli ol ion alian en la granda naturo. Nokte ŝi povis sidi multajn horojn antaŭ la kabano kaj rigardi la stelojn kaj ĝoji pri ili, min tenante sur sia sino aŭ per la genuoj. Kaj iam en tia nokto, kiam la bienulo forsendis mian patron por kelkaj tagoj kun la bovoj, mia patrino rakontis al mi historion pri la steloj. Mi neniam forgesis tiun rakonton. Mi portas ĝin ĉiam en mia koro. Kaj tial mi ne timas en la nokto, kiom ajn nigra estas la nokto. Mi neniam rakontis la historion al iu, ĉar ĝi estas sankta por mi, kiel la plej kara kaj plej bela, kion mia bona patrino povis heredigi al mi. Sed al vi, *Binash Yutsil*, mi volas rakonti la historion, ĉar vi estas bona al mi, tiel bona, kiel estis al mi nur mia patrino, krome neniue en la mondo. Eĉ ne mia kara patro, kiu ĉiam estis laca pro multe da laboro kaj ĉiam kovrita de vundoj pro la laboro en la ĝangalo.“

Post longa paŭzo, kiam ŝi apogis sin al li por pli bone gardi sin kontraŭ la frideta leviĝanta vento, li diris milde kaj karese: „Tiu rakonto, malgranda knabino, estas la plej bela donaco, kiun vi povas doni al mi. Mi volas tiel bone kaj tiel pie aŭskulti vin, kvazaŭ via kara panjo parolus al vi. Mi supozas vere, ke ŝi loĝas sur unu el tiuj steloj kaj rigardas malsupren al vi kaj gardas vin per ĉiuj siaj fortoj kontraŭ fatala sorto, kiu povus trafi vin.“

Ŝi premis sin pli forte al li. Kaj li prenis ŝin al siaj brakoj kaj karesis ŝin bonfartige en ties ĥorongo.

12/14

Same tiel mallaŭte, kiel li parolis, ŝi diris poste: „Ĝi estas la rakonto pri la dio, kiu kreis la sunon. La malicaj spiritoj, kiuj volis neniigi la homaron, ĉar ĝi estis kreaĵo de la bonaj dioj, venkis la bonajn diojn kaj mortbatis ĉiun el ili.

Post kiam tio okazis, ili estingis la sunon per neĝo kaj glacio kaj per fridaj ŝtormoj.

Kaj tiam komenciĝis eterna nokto surtere.

Ĉio estis kovrita de glacio.

Homoj mortis pro frosto.

La maizo, kiu apenaŭ kreskis, vivtenis nur kun granda peno la mizere vivantajn homojn.

Sed tre multaj mortis pro malsato.

Ne plu kreskis arboj kun dolĉaj fruktoj.

Ne plu floris floroj.

Ne plu kantis birdoj.

La griloj kaj cikadoj ĉesis violoni kaj fluti.

La homoj mortadis, kaj ĉiuj bestoj de la arbaroj kaj de la ebenaĵo mortadis, tiel ke la viroj pli kaj pli malofte povis ĉasmortigi beston por nutri la inojn kaj infanojn kaj por provizi ilin per varmigaj feloj.

Kiam la mizero tiam fariĝis pli kaj pli granda, ĉiuj tribestroj kaj reĝoj de la indiĝenaj popoloj kunvokis sin por granda interkonsiliĝo, por decidi, kiel oni kreu novan sunon.

En la ĉielo staris ja nur la klaraj steloj.

La stelojn la malicaj spiritoj ne sukcesis estingi.

Sur ili vivis la spiritoj de mortintaj homoj, kiuj bone sciis kiel defendi sin, ĉar la bonaj dioj donis forton al ili, kaj ĉar estis ilia tasko eterne teni lumantaj la stelojn.

Multajn semajnojn daŭris la granda interkonsiliĝo de la reĝoj kaj tribestroj.

Sed neniu el ili sciis kiel fari novan sunon.

Inter la reĝoj estis *sabio*, saĝulo, kiu havis jam pli ol tricent jarojn kaj kiu lernis ĉiujn sekretojn de la naturo.

Kaj tiu diris: „Certe estas vojo krei novan sunon. Juna, forta kaj tre kuraĝa viro devas iri al la steloj. Tie li devas peti la spiritojn de la mortintoj doni de ĉiu stelo etan peceton. Tiujn malgrandajn pecojn li devas kolekti kaj porti kun si pli alten, pli kaj pli alten, ĝis kiam li fine atingos supre la mezan punkton de la ĉiela volb-aĵo. Tie li devos fiksi ĉiujn tiujn stelopecetojn al sia ŝirmilo. Kaj se li estos farinta tion, la ŝirmilo transformiĝos en grandan lumantan kaj varmegan sunon. Mi mem irus kaj farus tion. Sed mi estas maljuna kaj malforta. Mi jam ne kapablas plu bone salti. Tial mi ne povus salti de unu stelo al la alia. Kaj mi ankaŭ ne plu estas sufiĉe forta kaj lerta por ĵeti lancon kaj teni la ŝirmilon kaj por batali kontraŭ la malicaj spiritoj, kiuj provos malhelpi, ke nova suno estos kreita.“

Post kiam la saĝulo finis la parolon, suprensaltis ĉiuj reĝoj, tribestroj kaj grandaj batalantoj, kiuj kunsidis en la interkonsiliĝa rondo, kaj vokis: „Ni estas pretaj ekiri.“

Al tio diris la saĝulo: „Tio tre honoras vin, ke vi volas fari tion. Sed nur unu el vi povos foriri, kaj tiu devos iri sola kun sia ŝirmilo, ĉar nur unu suno estu kreata. Tro multaj sunoj bruligus la teron. Tiu, kiu faros tion, devos oferi la plej karan, kion homo povas fordoni. Li devos forlasi sian edzinon, siajn infanojn, sian patron kaj sian patrinnon, siajn amikojn kaj sian popolon. Li neniam povos reveni sur la teron. Li devos poreterne migri je la ĉiela volbaĵo, la ŝirmilon sur la maldekstra brako; kaj poreterne li devos esti armita por povi batali kontraŭ la malicaj dioj, kiuj ne ripozos por denove estingi la sunon. Li ĉiam povos vidi la teron kaj sian popolon, sed li ne plu povos reveni. Li estos por ĉiam solulo en la universo. Ĉiu el vi antaŭe pripensu tion bone antaŭ la ekiro.“

Kiam la reĝoj tion aŭskultis, ili ĉiuj tre senkuraĝiĝis. Neniu el ili deziris apartiĝi poreterne de sia edzino kaj de siaj infanoj, de sia patrino, de siaj amikoj kaj de sia popolo. Ĉiu el ili preferis iam morti kaj kuŝi en sia tero ĉe sia popolo.

Jen ekestis longa silento en la interkonsiliĝo.

Sed finfine parolis unu el la pli junaj tribestroj: „Mi volas paroli, kuraĝaj viroj. Mi estas juna kaj forta kaj bone ekzercita je la armiloj. Mi havas junan kaj belan edzinon, kiun mi tre amas, pli ol min mem. Kaj mi havas belegan knabon, kiu estas al mi tiel kara kiel mia korsango. Kaj mi havas karan bonkoran patrinnon, kies protektanto kaj espero mi estas. Kaj mi havas multajn amatajn amikojn. Kaj mi amas mian popolon, en kiu mi estis naskita, kaj de kiu mi estas nedisigebla parto. Sed pli ol mian edzinon, pli ol mian knabon, pli ol mian patrinnon, miajn amikojn kaj mian

popolon mi amas la homaron. Mi ne povas esti tute feliĉa, kiam mi vidas suferi la homaron. La homoj bezonas la sunon. Sen suno la homaro devos pere. Mi estas preta ekiri kaj krei la sunon por la homoj, kia ajn estos mia destino kaj mia sorto.“

Estis Chicovaneg, kiu tiel parolis. Li diris adiaŭ al sia edzino, al sia knabo, al sia patrino kaj al sia popolo. Provizite per la konsiloj de la saĝulo, li komencis armi sin. Li faris al si fortan ŝirmilon el jaguara felo kaj el la haŭto de serpento. Li faris al si kaskon de potenca aglo. Kaj li faris al si firmajn ŝuojn el la piedegoj de grandega jaguaro, kiun li mortigis en la ĝangalo. Tiam li eliris por serĉi la plumhavan serpenton. Li trovis ĝin post multaj jaroj de serĉado en profunda malhela kaverna. Ĝi estis la simbolo de la mondo. Tial ĝin gardis malica sorĉisto, kiu estis soldulo de la malbonaj dioj.

Per multe da ruzaĵoj kaj prudento li sukcesis mortbati la malican sorĉiston. Li faris lin ebria per dolĉaj agavaj sukoj.

Kaj kiam la malica sorĉisto kuŝis tute ebria kaj ĉiuj liaj okuloj estis fermitaj, Chicovaneg kaŝe proksimiĝis kaj mortigis lin per lanco, kiun li venenis per cent venenoj, kiujn konigis la saĝulo al li.

Poste li kantis dolĉajn kantojn, kaj per sia ŝalmo li flutis dolĉajn melodiojn; kaj jen la plumhava serpento venis kaj sekvis lin, obeante ĉiujn liajn ordonojn.

Post tio Chicovaneg longe migris, ĝis kiam li venis post multaj jaroj kaj multaj bataloj kontraŭ malbonaj dioj al la fino de la mondo.

Tie la steloj estis plej malaltaj super la tero.

La plej malsuban stelon li povis atingi per facila salto.

Li rakontis al la spiritoj de la mortintoj loĝantaj sur tiu ĉi stelo, kiuj havis nigrajn vizaĝojn, ĉar ili ne havis indiĝenan sangon, ke la homoj ne havas sunon, kaj ke li forlasis sian edzinon kaj sian popolon, por krei novan sunon por la homoj.

La spiritoj ĝoje donis al li peceton de sia stelo por helpi al la homoj.

Chicovaneg fiksas la pecon mezen de sia ŝirmilo, kie ĝi tuj ekbrilis en plena beleco kiel diamanto.

Ekde nun li jam pli bone povis vidi sian vojon en la profunda nokto, ĉar tiu eta stelo sur lia ŝirmilo prilumis la vojon. Nun li saltis de stelo al stelo.

Kaj ĉie, kien li venis, kaj tute egale, ĉu la spiritoj havis flavajn, blankajn, brunajn aŭ nigrajn okulojn, ili donis al li volonte peceton de sia stelo.

Kaj kiam li venis al tiuj, kiuj havas la saman sangon kiel li, oni akceptis lin kun granda ĝojo.

Ili estis fieraj, ke li estas unu el la propra sango, kiu volas rekrei por la homoj la sunon.

Ili fortigis lian laciĝintan korpon kaj akiris liajn armilojn.

Post ĉiu salto, kiun li faris de stelo al stelo, lia ŝirmilo fariĝis pli lumanta.

Kaj kiam la ŝirmilo finfine tiom lumis, ke ĝi forte superbrilis la plej grandan el la steloj, la malicaj dioj rimarkis lin.

Ili ekkonis, ke li estas kreonta novan sunon por la homoj.

Kaj ili komencis batali kun granda kolero kontraŭ li kaj malhelpis lin ĉe la pluirado.

Ili tremigis la teron por skui la stelojn, por ke li mise pretersaltu la sekvan stelon.

Ili sciis bone, ke tiukaze, se li pretersaltus nur unufoje, li falus en la nigran universon, el kiu li ne plu povus liberigi sin, ĉar tie la malicaj dioj havas la tutan potencon por si mem.

Sed Chicovaneg estis prudenta.

Kiam stelo estis tro malgranda, por povi vidi ĝin bone, li petis la plumhavan serpenton, ke ĝi unue ĵetu rigardon sur ĝin. Kaj ĝi diris al li la distancon, por ke li povu ekkuri per la ĝusta rapideco, ke li saltu ne tro mallonge, sed ankaŭ ne transsaltu la stelon.

Se la distanco estis tro granda por salto, la plumhava serpento unue devis flugi transen, kaj ĝi tenis pendante sian unuan finaĵon tiel, ke post la salto li facile povis kapti ĝin kaj suprengrimpigi sur la korpo de la plumhava serpento.

Kiam li nun grimpis pli kaj pli alten en la ĉiela volbaĵo kaj lia ŝirmilo fariĝis pli kaj pli hele lumanta, la homoj surtere finfine ekvidis lin.

Ili sciis, ke li nun kreas la sunon por ili.

Kaj ili fariĝis gajaj kaj festis multajn festojn.

Sed ili ankaŭ povis vidi, kiel peniga estas lia vojo.

Kaj se ili vidis la distancon al la sekva stelo kaj ekkonis, ke li saltinte eble eĉ mistrafos tiun stelon, ekkaptis ilin profunda mal-espero.

Ili ankaŭ vidis la batalon de la malicaj dioj kontraŭ li. La malbonaj dioj hurligis fortajn ŝtormojn, kiuj detruis ĉiujn kabanojn de la homoj kaj dezertigis iliajn kampojn.

La malicaj dioj inundis la teron per akvotorentoj, kaj ili ordonis al la montoj, ke ili elkraĉu fajran lafon, por neniigi la homojn antaŭ ol la suno staros en la ĉielo.

Kaj la malicaj dioj katapultis ardantajn ŝtonojn al la supren-grimpanta Chicovaneg.

Ili ĵetis tiom da ili al li, ke miloj el la ŝtonoj ankoraŭ nun flugas plu tra la nokta ĉielo.

Sed pli alten kaj pli alten grimpis Chicovaneg.

Pli kaj pli hele lumanta fariĝis lia ŝirmilo.

Floroj komencis kreski kaj flori surtere.

La birdoj revenis kaj kantis ĝojajn kantojn.

Mangoj kaj papajoj komencis maturiĝi je la arboj kaj bananoj, kaktofigoj, tomatoj baldaŭ abundis.

Kaj tiam finfine, kiam la homoj iutage suprenrigardis, staris la suno brile kaj varme en la ĉiela volbaĵo, meze de la ĉielo super ili.

Kaj ili festis grandan sunfeston, honore al Chicovaneg.

Sed la malicaj dioj seninterrompe provas estingi denove la sunon.

Tiam ili vualas la teron en nigrajn nubojn kaj la homoj ektimas, ke la suno nun estos estingita.

Sed Chicovaneg, la kuraĝulo, gardas ilin.

Post lia ora ŝirmilo li kaŭras por gardi la homojn kontraŭ malicajn diojn.

Kaj se la malbonaj dioj tro malice agas, li koleriĝas kaj ĵetas siajn fulmantajn sagojn ĉirkaŭ la teron por trafi kaj forpeli la malicajn diojn, kiuj kaŝiĝas en la nigraj dikaj nuboj.

Tiam li skuas sian ŝirmilon tiel, ke sovaĝa tondrado ekstremigas la aeron.

Kaj se li finfine estas forpelinta la malicajn diojn, tiam li pentras sian buntkoloran arkon sur la ĉielon por anonci al la homoj, ke ili estu trankvilaj, kaj ke li ne permesos, ke la suno de la malicaj dioj ankoraŭfoje estu estingita kaj detruita.

12/15

La knabino, kiu ankoraŭ nun tute dense premis sin al li, ŝajne finis sian rakonton. Ŝi diris nenion plu.

Andreo demandis post certa tempo: „Ĉu via patrino ankaŭ rakontis al vi, kiu kreis la *huh*-on, la lunon?“

„Jes“, ŝi diris. „La filo de Chicovaneg. Kiam la filo plenkreskiĝis, li volis viziti lian patron.“

Sed li ne povis trovi plumhavan serpenton, ĉar lia patro estis kunpreninta la ununuran, kiu ekzistis, kaj ĉar tiam, kiam la patro estis kreinta la sunon, li ordonis al ĝi, ke ĝi volviĝu malsupre ĉirkaŭ la teron, tie, kie la ĉiela volbaĵo apogas sin surtere.

Tie ĝi kuŝas gardante kontraŭ la malicaj dioj, kiuj troviĝas sur la alia flanko de la ĉiela volbaĵo kaj de tie volas invadi por plifortigi la potencon de la malicaj dioj sub la ĉiela volbaĵo.

Sed Chicovaneg estas prudenta.

Li ne tute fidis al la plumhava serpento kaj timas, ke ĝi eble dormas kaj neglektas la gardadon.

Tial li ĉiuvespere malsupreniĝas al ĝi por rigardi, ĉu ĝi eble eĉ dormas.

Kaj ĉar estas nur unu plumhava serpento, la filo devis serĉi alian beston, kiu povus helpi lin grimpi sur la ĉielan volbaĵon.

Li elektis kuniklon, ĉar kuniklo bone povas salti. Ankaŭ li do saltis helpe de la kuniklo de stelo al stelo.

Sed la spiritoj de la mortintoj ne plu povis doni al li tiom el siaj steloj, kiom ili donis al lia patro.

Alie la steloj fariĝus tro malgrandaj.

Kaj tial lia ŝirmilo ne estas tiel granda kaj brila kiel tiu de lia patro.

Sed por esti proksima al sia patro, li sekvas lin trans la tuta ĉiela volbaĵo, kaj se li preteriras sian patron, li salutas lin de sia patrino, kiu dormas sur alta monto sub mantelo el neĝo.

La kuniklon, kunprenitan de la filo por povi pli bone salti de stelo al stelo pro ties helpo, vi certe vidas en lia ŝirmilo.“

12/16

Andreo rigardis ĉirkaŭ si, trans la grandan ebenaĵon kaj supren al la ĉiela volbaĵo. En lia imago li vidis suprengrimpi la junan tribestron de stelo al stelo.

La poezio, kiun li sentis, kiam la knabino rakontis tiun historion de sia religio, ne estis en la historio mem. Li sentis la poezion pli en la simpla maniero, kiel la knabino rakontis ĝin, kun sia milda trankvila voĉo kaj plej forte pro tio, ke la knabino, dum ŝi rakontis tion, lasis travivi lin, ke ŝi pensas sin sekura en lia proksimo kaj inter liaj brakoj kontraŭ ĉiuj doloroj en la mondo. Li trovis sin granda kaj forta pro la konscio, ke li rajtas gardi ŝin, ke li rajtas protekti ŝin, kaj, ke ŝi tute akceptis, sen demandi kaj sen pripensi, lian protekton.

„Vi estas kiel senhelpa kantobirdeto, kiu falis el la nesto“, li diris mallaŭte. Ŝi ne respondis. Sed ŝajne ŝi aŭdis la vortojn, sed sen percepti ilin, ĉar ŝi eĉ pli kareseme premis kaj nestigis sin inter liaj brakoj.

Sed, kiam li denove rigardis supren al la vasta steloplana tegmento, la rakonto tuj denove fariĝis reala. Tuj li revidis suprengrimpi la junan tribestron, vidis lin forlasi sian edzinon kaj sian infanon, vidis kiel preterflugis lin ardanta ŝtono sendita de la malicaj dioj, sur alta flamanta arkovojo.

Kaj li demandis sin, ĉu estas dezirinde esti dio kaj vivi en radianta beleco. Estas certe necese krei por la homoj sunon, se ili ne havas sunon kaj suferas tre mizere. Kaj estis certe bela gloroplana ago, kiun plenumis la juna tribestro. Li meritis, ke li fariĝis dio kaj, ke

li estas honorata de la homoj. Sed en la profundo de sia koro Andreo ĝojis, ke la homoj nun jam rehavas la sunon, kaj ke tial la turmentoj de la konscienco kaj de la helpopreteco ne povas torturi lin por fari saman aŭ similan kiel tiu tribestro. Li sentis la knabinon varme ripozi ĉe sia brusto, kaj tio pensigis lin pri tio, ke li ja apenaŭ estus kapabla tiel oferi sin kiel tiu dio, kiu forlasis la edzinon, la infanon kaj la popolon poreterne. Tiel pensante kaj sentante, li komprenis nur des pli klare, kiom granda, kiom homama kaj grandioza estis la ago de tiu dio, kiu oferis ĉion, kio donas sencon al la vivo, por helpi al la homoj. Kaj tiom pli granda estis tiu admirinda ago, ĉar tiu dio neniam povas morti, neniam dormi, neniam forgesi, ĉar li eterne kaj eterne devas pensi pri siaj karaj, kiujn li forlasis, ĉar lia doloro pri la perdo neniam finiĝos. Kvankam li scias, ke ĉiuj, kiujn li konis surtere nun mortas jam de dekmiloj de jaroj, ili ja tamen plu vivos poreterne en lia memoro, tiel forta kiel en tiu tago, kiam li forlasis ilin, pro la homaro. Estas nur tre malgranda konsolo por li, ke lia filo estas proksima al li, kaj ke li povas ĉirkaŭbraki sian filon en la raraj tagoj, kiam malheliĝas surtere dum horo la suno. Tial estas certe laŭnature, ke en Andreo ne vekigis la ambicio fariĝi dio de sia popolo, ĉar li ekkonis post pripensado kaj konsidero, ke la sorto de la dioj ne estas enviinda. La brilo kaj la majesto de la dioj estas tre kare pagata.

12/17

Li volis diri ion. Sed tiam li vidis, ke la knabino firme endormiĝis.

Zorgeme li prenis ŝin pli proksime al si, levis ŝin kaj portis ŝin en siaj brakoj sur la vasta vojo transen al la kampadejo de la ĉaristoj.

Liaj kamaradoj ĉiuj dormis. Kelkaj ŝajne sufiĉe ebriiĝis pro la respektoplena festado de la festo honore al sanktulo Caralam-

pio. Ili ĝemis kaj gruntis endorme kaj kuŝis sur la tero kiel faligitaj arbotrunkoj.

Kareseme li demetis la knabinon. Poste li preparis por ŝi molan kuŝejon en sia ĉaro.

Kaj kiam li estis kontenta pri la kvalito de la kuŝejo, li levis ŝin zorgeme en la ĉaron kaj ennestigis ŝin.

Ŝi nur unufoje forte ĝemis pro sia granda laco.

Poste li metis sian petaton, sian maton, sur la teron sub la ĉaro kaj sternis sin por dormi.

Lia lasta duondorma penso estis, ke li neniam en sia tuta vivo ekdormis tiel ĝoja, tiel kontenta, kaj tiel esperoplena kiel hodiaŭ. Dum sia lasta endormiĝa momento li konsciiĝis en la koro, ke la plej bela kaj plej dolĉa tempo en lia vivo ĵus komenciĝis. Tempo, kiu forgesigos al li ĉiujn penojn kaj zorgojn en lia dura vivo.

Kaj li tiom devojiĝis en sia songaj pensoj, ke li flustris al si mem: „Esti ĉaristo, tio estas la plej bela afero en la mondo.“

Ĉapitro 13

13/01

La ĉaristoj, frue vekiĝinte, leviĝis. Kiel ĉiam. Estis sufiĉe da laboro. La ĉaroj ankoraŭ ne estis tiel bonordaj, kiaj ili devus esti por trapasi la sekvajn semajnojn sen rompoj. La viroj preparis sian matenmanĝon.

Kelkaj havis damne pezan kapon de la aĉa falsita tekilo, kiun ili trinkis, ĉar la mono ne sufiĉis por trinki pli bonan.

Andreo estis respondeca por la bona stato de la marŝkolono. Sed li vidis, ke en ĉi tiu tago oni ne faros multon por la plibonigado de la ĉaroj. La viroj estis ankoraŭ en festebrieco. Frue posttag-meze ili jam denove ektrinkos. Alian amuzon kaj distron ili ne scias, kaj se ili scius aliajn, ili ne trovus ilin tie.

La plej neutiligeblajn ulojn, kiuj sekve de la postebrieco estis letargiaj kiel malsekaj viŝĉifonoj, li sendis en la ebenaĵon, por ke ili okupiĝu pri la bovoj, por ke ili ne tro vaste disiru kaj ne havu vundojn de la mordemaj muŝoj. Tio estas simpla laboro, kaj la viroj povis fari tion.

Por si mem li decidis iri kun kelkaj aliaj ĉaristoj en la menciitan abian arbaron proksime de *El Puente* kaj tie ĉarpenti rezervajn timonojn kaj jugotrabojn.

Kiam la matenmanĝo estis preta, Andreo iris al sia ĉaro, por vidi, kion faras la knabino.

Ŝi jam delonge vekiĝis, sidis sur kesto en la ĉaro kaj trakombadis sian hararon.

„*Buenos dias*, malgranda knabino, bonan matenon! Kiel vi dormis?“ li demandis ridante.

Ŝi diris gaje: „Mi dormis tute bonege. Tiel bonege, kiel jam dum monatoj ne plu. Mi deziras al vi tre bonan tagon, *Binash Yutsil*.“

„Vi nun certe estas malsata“, li diris. „Ni ne havas multajn bonaĵojn por la matenmanĝo. Nigrajn fabojn, tortiljojn, kapsikon kaj kafon.“

„Tio estas ja manĝo kvazaŭ por riĉulo“, ŝi diris. „Mi jam havas grandan apetiton.“

Ŝi grimpis malsupren de la ĉaro. Tiam ŝi aranĝis sian truitan jupon, glatigis la ĥorongon sur siaj mamoj kaj venis timide pli proksimen al la bivakfajro, kie la viroj jam komencis preni la fabojn per tortiljoj kaj ŝtopi ilin en siajn malsatajn faŭkojn.

Ili ĉiuj rigardis supren, kiam la knabino proksimiĝis, sed sen direkta scivolemajn rigardojn al ŝi aŭ gapi ŝin impertinente. Ĉar Andreo venis kun ŝi de sia ĉaro, ili jam sciis, al kiu ŝi apartenas.

„*Mi mujer*“, Andreo diris koncize kaj senemocie, „edzino mia. Ŝi iras nun kun ni.“

Per tiuj ĉi vortoj estis finita ne nur la prezento de la knabino, sed samtempe ankaŭ farita la geedziĝo, kiun la kamaradoj de Andreo nun tiel respektis, kvazaŭ ĝi estus sigelita en preĝejo. Se la knabino mem ne donos motivon por tio, ŝi estos same tiel netuŝebla kaj ekstere de ĉaristaj deziroj kiel la edzino de patrono.

La ĉeestantaj ĉaristoj, kiel ĉiuj aliaj sur la vojoj, estis ankaŭ multe tro prudentaj por provi stultaĵojn. Tio kostus la vivon. Ĉiu sciis tion. Se ne en publika batalo, tiukaze nokte ie en la ĝangalo, kiam oni serĉas bovojn. Ĉiu havas ja sian maĉeton ĉe si por trati por si vojon en la vepro. Kaj maĉeto glitas pli rapide en la dorson de la kulpulo ol tiu povus ekscii, kio okazis. Oni enfosas la kulpulon. La ĉaristoj havas sian propran moralon kaj sian propran honoron. Okazis juste al la mortigito. Kial li ne lasis en paco la edzinon. Oni avertis lin ĝustatempe. Kaj la knabino tute ne volis havi lin. La verdikto de ĉiuj ĉaristoj, kiuj sciis kiel okazis, estis konciza kaj klara. Tiukaze nenio estis nebuleca. Neniu longaj debatoj kaj superflujaj vortoj. Al la patrono oni rakontas, ke la kondamnito mortis en la ĝangalo dum la serĉado de bovoj. Kaj se

la afero vere iam malkovriĝus, eble pro la babilaĉo de ebria ĉaristo, tiukaze povus okazi, ke tiu, kiu ekzekutis la mortkondamniton, devos transpreni la ŝuldojn de la mortigito. Sed neniujugisto interesiĝas pri tio. Se la jugisto volus okupiĝi pri la privataj aferoj de la ĉaristoj, la ŝtato havus nur malnecesajn elspezojn pri aferoj, kiuj, ĉar ili jam foje okazis, ne plu ŝanĝeblas. Kaj se la jugisto devus zorgi pri la privataj rajtoj de la ĉaristoj, tiam la frajntreprenistoj baldaŭ ne plu havus eĉ unu uzeblan ĉariston. Krome la jugisto havas sufiĉe da aliaj farendaj laboroj, kiuj enspezigas monon. Je la ĉaristoj li povas enspezi eĉ ne centaviton. Por kio do la peno kaj la suramasigo de aktoj, sur kiuj tavoliĝas la polvo, se neniuj legos ilin, kaj se skribante kaj ordigante oni disipus nur fortojn kaj tempon!

13/02

La ĉaristoj diris indifere: „*Cómo estás chica*; kiel vi fartas, knabineto?“ Ĉe tio ili eĉ ne ĉesis maĉi.

Estis nek io grava nek io nova, ke iu el la marŝkolono levis inon de la vojrandoj kaj kunprenis ŝin.

Tio okazis jen ĉi tie kaj jen tie dum marŝo.

Kelkfoje la ino restadis nur dum unu marŝo en la kolono. Tiukaze tio ne plaĉis al ŝi, kaj ŝi serĉis servon en iu alia loko, kiun ili trairis, aŭ ŝi trovis kamplaboriston, kies nenomada vivmaniero pli plaĉis al ŝi, aŭ kies karaktero ŝin pli altiris. En tiu kazo la divorco ĵus okazis. Sen ploroj kaj sentimentaleco.

La streĉega kaj kruda vivo de la ĉaristoj dorlotas nek la korojn nek la animojn. Ili prenas la vivon tiel, kiel ili trovas ĝin. Roman-ojn kaj filmojn kaj poemojn de plorsingultaj poetoj, poemoj tiaj, kiaj povus detrui ilian naturan fortikecon, ili ne konas. Estas nur

la mensogitaj romanoj kaj la mensogitaj poemoj, kiuj enblovas sentojn al la homoj, kiujn ili en vero tute ne havas kaj neniam sentas sen embaraso.

La viroj iom pli dense kunsidiĝis por liberigi lokon por la knabino, por ke ŝi povu sidi proksime ĉe la fajro. Estis ankoraŭ tre frue. La suno ĝuste heziteme leviĝis. Larĝa malseka nebulo vualis la ebenaĵon, kaj la aero estis senteble frida.

Andreo kaŭriĝis apud la knabino kaj donis argilan pelvon kun varmegaj faboj al ŝi, el sia akveca saŭco, kiu estis sen graso aŭ viando. Li metis la tortiljojn rekte sur la fajron por varmigi ilin. Li turnadis ilin tiel ofte super la fajro, ĝis kiam li supozis, ke ili estas nun sufiĉe varmegaj. Poste li donis ilin al la knabino.

Ili enbuŝigis la fabojn per derompitaj pecoj de la tortiljo. Kulerojn ili ne havis.

Li metis iom da *chile*, do verdajn akrajn kapsikojn sur la tortiljojn kaj donis ilin al ŝi. Ŝi demordis pecetojn de la akraj kapsikoj por spici la sengustajn nigrajn fabojn. Tiam li verŝis por ŝi varmegan kafon en sian argilan kruĉeton kaj ŝovis ĝin al ŝi. Li mem trinkis la kafon el kalabasa kruĉo. Ĉiuj ĉaristoj trinkis la kafon el tiaj kruĉoj, kaj ili ĉiuj havis nur tiajn kruĉojn por sia fabosaŭco. La kruĉeto, kiun havis la knabino, kaj la argila pelveto estis la solaj manĝiloj ĉe la fajro, kiuj memorigis iom pri la civilizacio.

Pri alte evoluita civilizacio memoris nur la blue emajlita kuirpoto, en kiu kuiriĝis la faboj. Sed tiu poto estis tiom disformita de premkavetoj, ke ĝi ŝajne apartenis en la plej bona kazo nur al surŝutita rubo aŭ al rubobarelo, kiun la civilizacio elkraĉis ie. La lada poto jam tute nigriĝis de la fumo kaj ĝi aspektis tiom primartelita kaj kavetigita, ke oni ekkonis plu nur je kelkaj etaj lokoj, ke ĝi estis antaŭ cent jaroj emajlita, ekstere blua kaj interne

blanka. Oni turnmovadis la fabojn en la potojn per pecoj de spoko-splitaĵo.

13/03

„Manĝu diligente, knabino“, diris Andreo por kuraĝigi ŝin. Ŝi kapjesis kiel obeema infano.

„Vi estas sufiĉe magra, *chica*“, diris Manuel, unu el la viroj. „Mankas al vi la kusenoj je la femuroj, knabino. Laŭ mia gusto vi ne estus, tion mi diras al vi. Mi devas senti karnon inter la manoj, se mi estu feliĉa.“

La knabino kapjesis al li. Ŝi ne komprenis, kion li diris, ĉar ŝi sciis nur malmulte la hispanan, kaj ĉar ŝi supozis, ke li diris ion similan al ŝi kiel Andreo.

„Ŝi ne komprenas la hispanan“, diris Andreo. „Kaj krome, lasu la mokadon.“

„Nu, ne ekscitiĝu, Andreĉjo“, Manuel diris ridante, „tiukaze ja estas pli bone, se ŝi ne scias la hispanan, jen ni ne devas elartikigi la lipojn pro ŝi. Sed, *hombre*, tion vi mem devas diri, kion vi trovas je tiu minca stangetulino? Se vi foje vere surseliĝos ŝin, *hombre*, ŝi tuj saltos el siaj artikoj. Ŝi ja ne plu kunus, kaj vi tuj malantaŭe elirus de ŝi.“

La viroj ridis pri tio.

Sed tio estis nek malica nek naŭza ridado. Ili tute ne pensis fariĝi obscenaj. Ĉar tio estis por ili tiel natura, kvazaŭ ili parolus pri la stato de siaj ĉaroj. Por ili pri tio estis nek malklaraj sekretoj nek subigita seksa senseco. Ili ja ne estis edukitaj sub eklezia influo.

Neniu instruis al ili, ke oni hipokritu pri naturaj fenomenoj kaj, ke memkompreneblaj agoj estas pekoj.

Kompreneble ili ne pesis siajn vortojn. Ili elparolis tion, kion ili pensis kaj kiel ili sentis tion. Kaj, se laŭ la gusto de Manuel, la knabino ne havis sufiĉe da karno, li ne povis senti emon al la knabino, kia ajn ŝi estis krome. Tio estis klara, simpla kaj objektiva. Problemoj pri psikologio kaj sekso estis fremdaj al ili. Tial oni senutile ne molestis ilin. Viro estas viro kaj ino ino, kaj se ambaŭ kunvenas, ili scias, kion ili deziras de la alia. Tio estis la sumo de ilia seksfilozofio. Kaj ili sentis sin tre bone pro tio kaj ĉiam sciis, kiel kondukti.

Andreo sciis kompreneble sufiĉe bone, kion ili opiniis kaj pri kio oni parolis. Sed iun personan sperton sur tiu tereno li kompreneble ankoraŭ ne faris. Kaj ĉu li esperis, ke li nun kun tiu knabino faros tian sperton, tion li mem ne sciis. Difinitan esperon li havis same malmulte, kiel klaran deziron. Li sentis ĝis tiu momento al la knabino nur profundan kamaradecon kaj pasian helpopret-econ. Sed li sentis ankaŭ sufiĉe forte, ke tiu emo al la knabino estis de alia naturo ol tiu al lia patrino aŭ al unu el liaj fratinoj. Se li efektive havis difinitan deziron, tiukaze estis tiu, ke inter li kaj ŝi ĉio tiel restu, kiel estis en la lasta nokto kaj matene. Li sentis, ke pri tia stato li sufiĉe kontentus. Se io plia okazus, li akceptus tion kun ĝojo kaj dankemo. Sed pri tio, ke li urĝu ŝin, li eĉ ne pensis.

Kaj kiam li pripensis tion, li sentis sin supera al siaj laborkamaradoj. Ili ja tuj sur la vojo tirus ŝin al si por elprovi ŝin kaj por scii, ĉu valoras la penon kunpreni ŝin kaj zorgi por ŝi.

Sed pri tiu punkto li tre malpravis, kiel li pli poste mirigite rimarkis. Tiam li eksciis, ke Manuel, kiu sin prezentis tiel kruda kaj tiel rekte marŝis al la celo, tute same atendente kaj esperante agis

kiel li mem. Manuel trovis knabinon kaj traktis ŝin tute tiel, kiel Andreo sian knabinon hieraŭ kaj hodiaŭ. Kaj li vidis, ke ambaŭ dum semajnoj kunestis kaj apudestis sur la marŝoj, sen tio, ke ili efektive fariĝis serioze geo. Ĝis fine venis nokto, kiam ili ĵetiĝis kiel freneziĝinte reciproke en la brakojn, superfortitaj de dezirego, kiun ili, kiel ili supozis, ne povus rezisti eĉ nur horon pli longe.

Tio estis bona instruo por Andreo, ĉar li lernis per tio, ke li vere ne havas rajton senti sin supera al siaj kamaradoj, ke li tute ne havas sentojn, kiujn nur li mem povus havi kaj de kiuj liaj kunproletoj estas ekskluditaj. Li lernis tial, ke dependas certe nur de la cirkonstancoj, ĉu iu ajn alia homo povas havi kaj evolui sentojn, pri kiuj Andreo ĝis tiam supozis, ke nur li mem estas la elektito, kiu noble kaj bone pensas kaj sentas.

13/04

Sed la aliaj viroj, des pli, ĉar ili nun ja sciis, ke la knabino ne komprenas, kion ili parolas, uzis rigore la bonŝancon daŭre mistifiki Andreon kaj plezuriĝi je liaj kostoj.

La ŝercoj neniam havis malican intencon, sed estis klaraj aludoj. Se la knabino ne sidus en la rondo, la akompanaj gestoj estus ankoraŭ multe pli klaraj ol la vortoj.

„Vi ja eble ne lasis elsekiĝi ŝin en la nokto, Andreĉjo?“

Jose demandis laŭte ridante.

„Kompreneble ne“, diris Andreo. „Kion vi pensas pri mi? Mi bone pinĉadis ŝin, Pepe, pro tio vi povas trinki grandan gluton, tion mi diras al vi.“

„Kaj ĉu vi bone eliris?“ demandis Esteban.

Andreo ridis kun supera mieno.

„Kaj kiomfoje? Ankaŭ tion ni ja volus scii“, demandis Hilario.

„Aŭskultu foje, *pollitos*, flavbekuloj“, diris Andreo, kunpinĉinte siajn okulklapojn. „Se mi surŝarĝas kestojn, tiukaze mi nombras ilin, kaj kiam en la kantino oni eldonas la monon je mia donita peso, mi nombras tion. Sed koncerne multajn aferojn mi ne nombras. Ĉu vi tion komprenas, *hombres*?“

„Tio estas abunda“, Manuel koncize rimarkis. „Se oni povas misnombri, estis bone kaj abunde.“

Li verŝis la kaforekrementon el frukta kruĉo en la fajron, ekstaris kaj poste diris: „Ni nun ekiru eltranĉi la timonojn. Mi volas iri posttagmeze denove sur la placon. Eble mi havos feliĉon kaj ankaŭ alvenos tien edziĝite ĉinokte. Sed pli da karno ŝi devus havi, tion mi diras al vi.“

Ili tiam ĉiuj ekstaris iom post iom. Du el la viroj, kiujn Andreo pro ilia postebria stato elserĉis por tio, iris eksteren sur la ebenaĵon por observi la bovojn, kaj la ceteraj kroĉis la maĉetojn al la zono kaj pretigis sin por iri en la abian arbaron. La knabino lavis la kruĉeton kaj la pelveton kun la akvo troviĝanta en disformita gazolina ladujo kaj portis la manĝilaron al la ĉaro, en kiu ŝi dormis.

Andreo sekvis ŝin.

Kiam ili staris ĉe la ĉaro, Andreo prenis tri kuprajn kvincentavajn monerojn el pantalonpoŝo, enmanigis ilin al ŝi kaj diris: „*Tujom ants*, bela ino mia, vi iru nun transen en la urbon kaj aĉetu kelk-

ajn kudrilojn kaj nigran tvirnon. Tiam vi revenu ĉi tien kaj kundrudu ĉiujn truojn en via jupo.“

„Tion mi faros“, diris la knabino. „Tion mi volonte faros, ĉar diras vi tion.“

„Kaj poste“, Andreo parolis plu, „vi iru malsupren al la rivereto, vidu tien, tie malsupre ĝi estas, kaj jen vi lavu viajn piedojn ĝis kiam ili estos puraj, kaj viajn gambojn kaj vian vizaĝon. Kaj se vi estos farinta tion, vi revenu ĉi tien kaj kombadu vian hararon tiom longe, ĝis kiam ĝi brilos.“

Ŝi ridis kaj diris: „Tion mi ĉion volonte faros, kiel vi diris tion.“

„Kiam iu demandos vin, al kiu vi apartenas, jen diru, ke vi apartenas al la ĉaristoj de *don* Laŭreano, kaj ke unu el la ĉaristoj estas via *marido*, via edzo. Tiukaze neniuj dolorigos vin kaj la polico ne metos vin en karceron, ĉar ĝi supozas, ke vi ne havas mastron kaj forkuris. Kaj se oni demandos vin, kie estas via *na*, via hejmo, kaj kie vi estas *tocvil* naskita, tiukaze vi diru, ke en Ĉiapaso. Ĉu vi tion ĉion komprenas, malgranda knabino?“

„Jes, mi komprenas ĉion“, ŝi respondis, „kaj mi ĉion tiel diros kaj faros, kiel vi ordonis tion al mi.“

„Vicente, la knabo, restados ĉi tie ĉe la ĉaroj kiel gardanto.“

Andreo estis jam ekironta, por sekvi siajn kamaradojn, kiuj jam iom malproksimiĝis. „Se Vincente alportos akvon, vi restados ĉe la ĉaroj por gardi ilin. Ĉi tie neniuj faros ion malbonan al vi, vi ne devas timi ion, malgranda knabino. Mi nun ekiros; ni havas multe da laboro.“

Rimarko

pollitos = kokidoj, kokinetoj

13/05

Andreo sciis tre bone, kial li donis ĉiujn tiujn strangajn konsilojn al la knabino.

La knabino ne estis sklavino. Neniu havis korpan rajton je ŝi. Ŝi estis libera meksika civitano. Sed, se oni renkontus ŝin en la urbo sen akompano kaj ŝi ne povus rakonti akceptindan rakonton, policano kunprenus ŝin al la urbodomo, ĉar li esperus, ke li povas perlabori peson kiel rekompenco de tiu mastro, el kies servistaro ŝi fuĝis kaj ĉe kiu ŝi certe havas ŝuldojn. Estis ja eĉ ne unu indiĝeno, ĉu vira aŭ ina, kiu ne havis ŝuldojn ĉe iu mastro, se ili ne apartenis al sendependa komunumo. Kaj se ŝi ne apartenus al iu mastro, oni arestus ŝin eĉ des pli certe. Iu kulpigo troviĝus ĉiam. Oni kulpigus ŝin esti ebria, aŭ pri tio, ke ŝi ŝtelis de la stando de iu komercisto butonon, aŭ, ke ŝi estas vagabondino sen hejmo kaj loĝloko. Poste la urbestro aŭ la polica ĉefo aŭ la impostoficisto aŭ la politika distriktĉefo, aŭ la ĉefo de la enmigra oficejo ricevus nemultekostan servistaron. Ŝi ricevus ĉiumonate peson da salajro, ĉar ŝi ja ne estis sklavino; la fihumora mastrino kaj ties ĉagrenitaj filinoj batus ŝin. Kaj se la mastro aŭ unu el ties filoj trovus plaĉon pri ŝi, ili farus al ŝi infanon, ĉu ŝi volas tion ĉu ne, ĉar ŝi devus obei kaj fari tion, kion oni ordonas, egale kion oni postulus, eĉ se oni postulus, ke ŝi sternu sin kaj malfermu la gambojn. Sed, se ŝi havis iun *marido*, viron, kiu zorgas por ŝi, policisto prefere ne kunprenis ŝin. La ĉaristoj, estas vere, ne havis pli da rajtoj ol indiĝena knabino, sed la policisto aŭ la urbestro certe foje devas rajdi al alia urbo, kaj tiam facile povus okazi – kaj eĉ okazas kun certeco, ke ĉaristoj estas sur la vojo. Kaj preskaŭ neeviteble estas inter ili iam la ĉaristo, kies knabinon oni forprenis pro tiu aŭtoritata persono. Tiu aŭtoritatulo neniam plu revenus, neniu sciis, kie li estas, neniu trovas la termonteton,

sub kiu putrus lia karno, kaj dekduo da juĝistoj nek per rekompencoj nek per arestopunoj nek per torturadoj eltrovus, kiu faris tion. Kaj ĉar ĉiuj aŭtoritatoj de la politika ĉefo ĝis la nudapieda policano ĉi tion tre bone sciis kaj sciis tre bone tion ne nur onidire, sed pro riĉa sperto, la edzino de ĉaristo estis tiel netuŝebla kiel la tribestro de sendependa indiĝena komunumo, kiam li tenas la bastonon per la mano.

La ĉaristoj havis nek sindikatojn nek ion similan. Sed ili estis respektataj en la ŝtato. Ili konis nur la interhelpon, kaj tiun ili uzis tiel konsekvence, tiel brutale kaj kun tia neevitebleco, ke fuĝo ne eblis.

Ili havis tre aĉajn salajrojn, mizeran manĝon kaj senkomplete duran laboron, kiu detruas la korpon. Tion ili akceptis, kvazaŭ tio estus neevitebla sorto, en kiun ili estis naskitaj. Sed multajn aliajn aferojn ili ne akceptis. Oni regis, subigis kaj ekspluatis ilin ĝis la lasta sangoguto, kiu estis en ili. Sed eblis nur tiukaze regi kaj sukcese ekspluati ilin, se la regantoj kaj ekspluatantoj tute precize sciis, kion ili povas riski fari kaj kion ne. Kaj la frajtentreprenisto, kiu sciis tion plej bone, havis la plej bonajn ĉaristojn kaj enspezis plej multe pere de ili. Kiel tiom da proletoj en Meksiko, Peruo, Bolivio aŭ Venezuelo, ankaŭ la ĉaristoj fajfis pri tio, ĉu oni pafmortigas aŭ pendumas ilin. Tial ili moviĝis ekstere de la leĝo, precipe de tiuj leĝoj, kiuj ne akordigeblis kun la propraj imagoj pri justeco.

13/06

Je la frua posttagmezo la viroj revenis en la kampadejon. En la sekva tago ili intencis altreni helpe de la bovoj la eltranĉitajn timonojn kaj trabojn en la kampadejon.

Ambaŭ ĉaristoj, kiuj havis la taskon serĉi la bovojn, ankoraŭ ne revenis.

Andreo diris: „Ili ie tie ekstere kuŝiĝis, kaj tie ili ankoraŭ nun dormas. Ili certe ne perdiĝos.“

La knabino fiere montris la flikitan jupon al Andreo. Ĝi estis tiel mallerte flikita, kiel tio eblas en plej aĉa kazo. Sed ŝi pruvis, ke ŝi almenaŭ havis la bonintencan volon fari tion. Ĉiukaze la jupo aspektis nun iom pli bela ol antaŭe. Iomete pli bela. Por fari bone tiun laboron, estus necesaj flikopecoj, kiujn la knabino ne havis. Sed Andreo promesis, ke li provos ricevi kelkajn ŝtofajn pecojn.

Ŝiaj piedoj kaj gamboj estis ĵus lavitaj, ankaŭ la manoj kaj la vizaĝo. Sed la plej bela estis ŝia hararo. Pro la zorgema kombado, kiu daŭris horojn, la feltiĝinta miksamaso el hararo sur ŝia kapo transformiĝis en longan briletantan profunde nigran ondaron tiom abundan kaj plenan, ke ŝi povus envualigi sian tutan supran korpoduonon per la hararo.

Andreo vidis ŝin nun unuafoje en hela lumo. Matene, kiam li foriris, la vetero estis ja tiom nebula, obtuza kaj malseka, ke li ne povis gajni ĝustan impreson pri ŝi. Kaj tio, kio eble estis videbla, estis parte kovrita de la ĥorongo, kiun ŝi metis pro la forta frido tiel sur sian korpon, ke ĝuste nur la okuloj, la nazo kaj la buŝo restis nekovritaj, kaj parte ŝi estis tiom kovrata de koto kaj polvo kaj de terkrusto, ke nur malfacile estis diveneble, kio povus esti sub tio.

Kaj Andreo vidis tre mirigite kaj ankaŭ kun granda kontentiĝo, ke ŝi estas linda knabino kun fortaj blankaj dentoj, kun regulaj trajtoj, brilaj nigraj okuloj, kurta rekta nazo, ronda mentono kaj obtuza malhela bronzokolora haŭto.

Ŝi ridis al li kaj diris: „Ĉu mi nun ĉion tiel faris, kiel vi ordonis?“

„Jes, malgranda knabino, tion vi faris“, li diris al ŝi kaj ekkaptis ŝin je ambaŭ brakoj.

„Kaj ĉu vi estas kontenta pri mi?“ ŝi demandis, pli proksimiĝante al li.

„Jes, mi estas“, li respondis.

Li turnadis ŝin kaj rigardis la knabinon de ĉiuj flankoj. Li vidis nenion alian krom nudapiedan hominfanon en tro kurta ĉemizo kaj disfalanta lanjupo. Tio estis ĉio. Estis nur la flikita kaj iom brodita ĉemizo, la malnova nigra kurta lanjupo kaj la kurta ĥorongo, kion ŝi havis pli ol besto en la ĝangalo. Kaj ŝajnis tute tiel, kvazaŭ ŝi ne bezonus pli por esti feliĉa en la mondo, ĉar ŝi montris al li sen embaraso, kiel ŝi ĝojas en lia proksimo.

„Tiam, post la manĝo“, li diris, „ni denove eliros sur la ebenaĵon, vi kaj mi, kaj sidiĝos kaj rakontos al ni reciproke ion belan.“

„Jes, tion ni certe faros“, ŝi konsentis. „Rakonti ion belan. Vi scias tiom da belaj aferoj. Ĉion, kion vi diras, *Binash Yutsil*, estas bela. Mi povus aŭskulti vin poreterne, kiam vi parolas. Ĉiu vorto estas tiel prudenta.“

Li ekhavis strangan senton, kiam ŝi diris tion. Neniam iu diris al li, ke liaj vortoj estas prudentaj, kaj ke ĉio, kion li rakontas, estas bela. Sed, ĉar diris tion ŝi, tial li fartis pli bone, ol se dirus tion lia patrino aŭ iu alia persono.

„Mi volas diri al vi ĉiam nur belajn vortojn“, li diris frustrante.

„Tiukaze mi ĝojos por ĉiam“, ŝi respondis.

13/07

La juna viro metis la fabojn frutempe sur la fajron, kaj ili estis nun jam preskaŭ molaj.

La viroj lavis siajn manojn, metis la kafokruĉetojn sur la fajron, kaj tiam ĵetiĝis lacaj sur la teron por pasigi la tempon per dormado ĝis kiam la manĝo estos preta. Nun revenis ankaŭ ambaŭ viroj, kiuj matene estis elsenditaj por serĉi la bovojn. Ili ne trovis la bovojn, kiel ili klarigis al Andreo.

„Kompreneble ne“, diris Andreo, „vi havas ja eĉ nun dormemajn okulojn. Vi dormis tie malsupre ĉe la roĵo.“

„Ĉu vi havas rajton komandi nin, *pollito*, flavbekulo?“, unu el ambaŭ demandis ĉagrenite.

„Mi ne rajtas komandi vin“, diris Andreo, „tion vi scias. Kaj mi ankaŭ ne volas komandi vin. Sed, se ni ĉi tie tri tagojn postkuras la bovojn kaj la ĉaroj ne estas veturpretaj, se la *comerciantes*, la komercistoj volas ekveturi, tiukaze mi havos mem spektaklon kun la patrono. Kaj vi ĉi tie staras kaj rikanas.“

Manuel, kiu pro laco longe kuŝis sur la tero, rektigis sin kaj diris al ambaŭ: „Andreo pravas. Sur lian kapon trafos la riproĉoj de la *viejo*, de la ĉefo, se ni ne ekveturos ĝustatempe. Kaj tio tiam estos kulpo via, hontu foje, *sinvergüenzas*, *parranderos*, *léperos*, *cabrones*!“

Hajlis svarmo de bestecaj insultvortoj, kiujn li kvazaŭ hurlis, al iliaj vizaĝoj. Dum tio li ekscitiĝis pli kaj pli. Fine li salte ekstaris kaj iris taŭre kliniĝinte rekte al ambaŭ. Li pugnigis la manojn kaj kriis al ili: „Hontu, sterkuloj insidaj. For nun! Serĉu la bovojn, aŭ mi dishakos vin en pecojn!“

La du pigremuloj sciis, ke tio ne alportos bonon, se oni serioze malamikiĝas al Manuel. Li disdonis krudajn batojn, se li opiniis tion helpema. Ili turniĝis por denove iri sur la ebenaĵon.

Sed Andreo diris: „Prefere restadu ĉi tie kaj eldormiĝu. Morgaŭ frumatene ni iros ĉiuj kune eksteren por serĉi la bovojn. Ni bezonas ilin por la altrenado de la timonoj kaj jugotraboj, kaj morgaŭ ni ankaŭ devos nutri ilin per maizo. *Oye*, Vicente, ĉu la *frijoles* estas molaj? *Bueno*. Alportu la tortiljojn. Tiukaze ni nun povos manĝi.“

Kiam ili jam manĝis kaj poste iom dormis, la viroj lavis sin kaj poste deskuis la polvon de la piedoj por iri denove en la urbon. Tie krakadis jam denove la piroteknikaĵoj.

Centmiloj, por ne diri milionoj de apartenantoj de la proleta klaso en Meksiko havas nek tutan ĉemizon nek tutan pantalonon, kaj pri paro da ŝuoj ili eĉ ne revas. Sed ili ĉiam havas monon por aĉeti ĉe la multnombraj sanktulaj festoj de la eklezio grandamase piroteknikaĵojn por pafi en la aeron la monon, monon, kiun ili tiel urĝe bezonas por la plej necesaj aĵoj en la vivo. Honore al la eklezio, kiu neniam konsilis al ili uzi la monon pli bone, tiel kiel la sama eklezio neniam konsilis ne elspezi la lastan peson havatan de proleta familio por kandeloj kaj por prilumi la sanktulojn en preĝejo. En la propra domo la milionoj de proletoj havas nur kenajn splitaĵojn por lumigi ion. Sed en tiu lando, kie la potenco de la katolika eklezio efikis tiom malfeliĉige, estas ĝuste tiuj milionoj de proletoj, kiuj havas nur kenajn torĉojn kiel lumon en siaj kabanoj, kiuj aĉetas la plej multajn kandelojn kaj la plej multajn petardojn por ke la sanktulo edifu sin. La sanktuloj restas ankaŭ tiukaze sanktuloj, se ili ne havas kandelojn kaj neniujn raketojn. Ili bone povas rezigni pri ili, ĉar ili jam delonge estas mortaj. La proleto ankoraŭ vivanta bezonas ĉemizon kaj pantalonon centfoje pli necese ol sanktulo kandelon aŭ petardon. Sed

la eklezio prenas kaj prenas kaj prenas, kaj ĝi interesiĝas malpli ol Satano pri tio, ĉu mankas aŭ ne mankas la plej necesaj aĵoj por la vivo al tiuj, al kiuj ĝi preĝas ĉiam denove doni al la eklezio kaj oferi al ĝi por veni iam en la ĉielon. La eklezion tio tute ne afliktas, ke ekzistas povruloj, kaj ke pro ties instruoj kaj pro la promeso pri la eternaj ĝojoj en la paradizo neniam ajn vidita de iu, kaj pri kiu neniu eĉ scias, kie ĝi estas, pligrandiĝas kaj disvastiĝas la povreco de milionoj da proletoj kiel nesaniĝebla malsano! Ju pli da povruloj kaj malsatuloj en la mondo estas, des pli granda estas la profito de ĉiuj tiuj, kiuj scias kiel uzi la povrulojn por riĉigi sin je ties laboro. Malsata stomako kaj disŝirita ĉemizo faras la plej servopretan proleton, kiu tial ne koleras kaj ne ribelas, ĉar lia stomako krias kaj lia haŭto postulas protektan varmon. Se nur la eklezio fariĝas riĉa, plu restas riĉa kaj kun ĝi ĉiuj tiuj, kiuj komandas kaj diras: 'Konservu al la proletaro la religion, ĉar ĝi estas nia plej granda protekto.' Kion la proleto povus havi jam ĉi tie surtere, tion vidas proleto, kies okuloj ne estas priŝmiritaj. Sed kion li iam povos havi en la paradizo, tion li ne vidas kaj ne scias. Povas okazi al la proleto, ke tiukaze, se vere ekzistas paradizo kaj li tien finfine alvenos post la penoj de la vivo, ke tie supre sidas la samaj ĉe la pelvo, kiuj jam ĉi tie surtere ĉerpis la kremon de la vivo. Tiuj ĉi homoj havas celkonsciajn firmajn manojn, kaj ili prenas al si tie, kie ili povas preni ion, en la ĉielo aŭ sur la tero. Ili ĉiam ricevas sian parton. Kaj se tro malvastas kudrilotruo, tra kiu kamelo iras pli facile ol ili, ili simple faras ĝin pli vasta kaj la damaĝo estas forigita. Nur kion vi vere havas, proleto, tio estas via kaj vi povas delektiĝi je ĝi. La pasero en la mano estas pli valora por vi ol du grasaj meleagroj en la ĝangalo. Kaj se vi ĉi tie surtere lernis bone kapti la okazon kaj preni tion, kion vi meritas, vi estas ekzercita, kiam vi alvewnos ĉielen. Eklumigu la kandelojn en via domo kaj ĝoju pri ili, se vi volas elspezi monon por kandel-oj, proleto. Fidu al tiuj, kiuj havas surteran sperton, proleto: Se vi rifuzas doni al la eklezio viajn centavojn kaj rifuzas esti devota kaj fidi pri ties aŭtoritato, tiukaze la unktitaj dioservistoj kiel vi

devas malsupreniri per lifto en la minojn kaj devas kiel vi ŝoveli karbojn, kaj kiam ili staras apud vi kaj kun vi konstruas danĝerajn minogaleriojn, tiam vi rapide ekscios, kiun valoron ili havas en vero, kiam ili ne portas sutanon kaj ne plu orobrokatan mantelon sur la ŝultroj. Kaj se ili tiam kun vi kaŭros sur la malseka tero kaj kiel vi ĉerpos per kulero la manĝaĉon el gameloj, kota kaj ŝvitmalseka, kaj se vi tiam portos en vi subkonscie la timon, ke atendas vin eksplodoj de gasmiksaĵoj en la mino, trarompoj de akvo kaj malsuprenrompiĝoj de ŝtontavoloj, tiam lasu foje rakonti al vi de ili la rakonton pri la paradizo. Ili rakontos ĝin tiam en alia maniero, kaj ili fariĝos centfoje pli rapidaj kaj pli bonaj revoluciuloj ol vi estos en via tuta vivo, se vi atendos plu la eternajn goĵojn de la paradizo anstataŭ preni al vi ĉi tie surtere tion, kio estu via kaj kio apartenas al vi pro via laboro.

De Andreo oni ne povis atendi, ke li pensus ion tian, kiam li aŭdis la krakadon de la petardoj honore al la sanktulo *Caralampio*. Li ne konis paradizon en la alia mondo. Neniu parolis pri tio al li. Sed li ankaŭ ne konis paradizon surteran. Li sciis, kiel vivas la riĉaj bienuloj, li sciis kiel vivas bonstataj komercistoj kaj sukcesaj frajtentreprenistoj. Sed, ke li povus partopreni ties bonfarton, aŭ, ke li eĉ havus rajton postuli pli grandan parton de la havaĵoj de la tero, tio ne venis en lian kapon.

Li, kiel ĉiuj ceteraj ĉaristoj, kiel homo vivanta, estis surtere en la socia ordo sur tiel malalta ŝtupo, ke por li jam signifus la paradizon, se li havus dudek kvin centavojn pli ĉiutage kiel salajron, se li trovus viandon en sia manĝo, se liaj ŝuldoj ĉe lia mastro ne estus ĉiam multe pli altaj ol li povus perlabori por malpliigi aŭ eĉ nuligi tiujn ŝuldojn.

Ĉio, kion li vere posedis surtere kaj pri kio li povis plezuriĝi, se li trovis la tempon por tio, estis la nuda vivo, kion li havis. Kaj tio

efektive estis valora. Li memoris, ke iutage, kiam li ankoraŭ estis sur la hejma bieno, peono kontraŭdiris ion en kverelo pri la prezo de porko, kiun la peono bredis mem. Komercisto ofertis al la peono ok pesojn por la porko. Sed la bienulo ofertis por la porko nur kvin pesojn. Kaj kiel peono li estis devigita vendi la porkon al la patrono por nur kvin pesoj, ĉar la patrono havis la prioritatan aĉetorajton je ĉiuj bestoj, kiuj plenkreskiĝis sur lia terposedaĵo, tute egale, kiu bredis kaj provizis ilin per la maizo, kiun la peono kultivis per siaj propraj manoj sur sia tera parceleto. Kiam la kverelo fariĝis tro al la bienulo, li koleriĝis kaj batis la peonon per maĉeto sur la kapon. La peono sangante renversiĝis, kaj kuŝante sur la tero petis mallaŭte plendante: 'Indulgon, *patroncito*, indulgon, ne mortigu min, patronĉjo.' La patrono tretis lin per piedo en la ripojn kaj diris: „Estu ĝoja, kota hundo de indiano, ke vi ankoraŭ havas la vivon. Kion vi bezonas pli?“

Andreo havis la vivon. Kion plian li postulu! Sed la eklezio, tiu granda savanto de la animoj, instruis nek al li nek al aliaj indiĝenoj vivantaj en dependeco, kion instrui devus esti la unua devo de animosavantoj kaj de redemptuloj: Faru la plej bonan kaj la plej avantaĝan el via vivo kaj poste zorgu vin pri la ceteraj aferoj.

Rimarkoj

borrachos = ebruloj

cabrones = virkaproj

léperos = lepruloj

sinvergüenzas = impertinentaj kanajloj

parranderos = lantemuloj

Ĉapitro 14

14/01

„Ĉu vi volas iri transen al la urbo, al la *plaza*?“ demandis Andreo la knabinon. „Ne, aŭ nur tiukaze, se volas vi fari tion“, ŝi respondis. „Mi prefere irus kun vi eksteren sur la ebenaĵon por sidi tie kaj rigardi la mondon kaj por aŭskulti vin, se vi parolas.“

Tial ili do iris ĝis la abia arbaro. Ĉe la unuaj arboj ili sidiĝis. De tie ili povis superrigardi la vastan ebenaĵon kaj samtempe ankaŭ longan distancon en la arbaron, kie la arboj staris, sesdek ĝis okdek metrojn altaj kaj dikaj kiel kolonoj de giganta halo. Filikoj, kelkajn metrojn altaj, staris en la arbaro. Kaj en multaj lokoj estis altaj herbejoj. Dise sur la tero kuŝis abiaj konusoj, kiuj estis tiom grandaj, kiom melonoj.

„Vi vivis ĉiam nur sur la altebenaĵo, ĉu?“ li demandis.

„Jes, ĉiam.“

„Tiukaze vi ankoraŭ ne vidis palmojn, neniun ĝangalon, neniujn tropikajn arbarojn, ĉu?“

Ŝi kapjesis.

„Pri tio mi tre ĝojas“, li diris, rigardante ŝin.

„Kial?“

„Ĉar mi tiukaze povos montri ĉion ĉi al vi, ĉar vi vidos ĉion tion je unua fojo en via vivo pro mi. Tiam ĝi estos ligita por ĉiam en via memoro kun la memoro pri mi.“

„En la memoro, ĉu?“ ŝi demandis, kun vaste malfermitaj okuloj. „Ĉu vi do ne volas, ke mi mem ĉiam restadu ĉe vi? Mi volas restadi ĉe vi, ĉiam. Mi ne volas memori vin. Mi volas esti kun vi, iri kun vi, en bonaj kaj malbonaj tempoj.“

Andreo kaptis mane ŝin. Li rigardis antaŭ si sur la teron.

Post longa tempo li diris: „Kiu sciu, ĉu mi plaĉos ĉiam al vi, knabineto? Mi ne estas bona, mi supozas. Mi ne scias, kiel mi kondutu al edzino. Mi neniam havis inon. Eble mi ne estas tia, kia vi pensas. Vi konas min ja nur unu tagon.“

Ŝi kapjesis kaj diris per voĉo, kiu fariĝis hezitema: „Jes, mi konas vin nur dum tago. Sed ankaŭ vi min konas ja ĝuste nur tagon. Sed post multaj lunoj ni konos nin tiam dum jaro.“

Li ridis, kaj ŝi ekridis kun li.

Du grandaj skaraboj persekutis unu la alian ĉe iliaj piedoj.

En tiu momento ŝi diris sen rigardi lin: „Ĉiu skarabino havas sian skarabon. Mi ne volas esti sola. Mi volas esti kun vi. Mi volas helpi al vi rilate la bovojn kaj ĉe ĉiu alia laboro. Mi lavos por vi, kaj ĉion, kion vi diros, mi faros. Mi ankaŭ lavis min kaj mian hararon por vi. Por mi mem mi ne kombus mian hararon. Tion taŭzos la vento kaj la dormo ja tamen denove. Sed por vi mi kombos ĝin denove kaj denove. Mi ankaŭ flikis mian jupon por vi. Por mi mem ne estus damaĝo, se mia jupo estus plena de truoj.“

„Tiel devas esti“, li diris kun ludata seriozeco. „Mi ne volas, ke vi estu kiel la inoj, kiujn havas kelkaj *muchachos* en la ĉaroj, kiuj neniam lavas sin, kiuj ĉiam estas tute ĉifonitaj, kiuj ebriiĝas, kiam kaj kie ili havas okazon, kaj poste ruliĝas sur la tero kaj krias kaj blekas senhontajn parolojn.“

„Ion tian mi certe neniam faros, *Binash Yutsil*“, ŝi respondis kaj mienis severe helpe dela lipoj.

Poste ŝi aldonis: „Sed kiel mi sciu, kio estas bona, kaj kio ĝustas, kaj kio plaĉas al vi, se vi ne diras tion al mi? Mi ne estas tiel prudenta kaj tiel sperta kiel vi. Vi devas ĉion diri al mi, kion mi faru por povi plenumi viajn dezirojn. Vi estas viro mia, mia *señor*. Kaj mi ĝojas, ke estas vi, vi kaj neniu alia. Nur, se vi ne diras, kio estas ĝusta kaj kio plaĉas al vi, kiel mi sciu tiukaze? Neniu zorgis pri mi, de kiam mia patro estas morta. Nur vi.“ Ŝi rigardis lin subite per vaste malfermitaj okuloj, per okuloj, en kiuj montriĝis petego, malĝojo kaj senhelpeco, ĉio samtempe. „Sed vi, edzo mia, vi zorgas pri mi kaj afliktiĝas pro mi. Vi estas la viro, kiu faras kun mi, kaj kiu rajtas fari kun mi, kaj kiu faru kun mi, kion ajn li volas.“

Li diris malrapide parolante: „Mi certe neniam forlasos vin, knabineto, kaj mi volas diri al vi, ke mi tiel supermezure ĝojas, ke mi trovis vin, kaj ke vi volas, ke mi estu via edzo.“

Li metis manon ĉirkaŭ ŝian kapon, tiris ŝin pli proksime al sia brusto kaj mankaresis ŝian hararon.

Ŝi ekkaptis lin mane, kondukis ĝin al siaj du vangoj, kiujn ŝi premis per siaj mandorsoj, kaj tiam ŝi kisis la manon. Li kliniĝis malsupren sur ŝian hararon kaj tuŝis ĝin per siaj lipoj per gesto, kiun li daŭrigis, silente kiel neeldiritan elkore karan preĝon, tiom longe, ke al li ŝajnis, kvazaŭ jarcentoj fluus nerimarkataj tra la universo.

Neniu el ambaŭ diris ion plu. Neniu el ili provis fari movon, pro spirrabe delikata timo, ke per tio povus esti detruita io bonfartiga en ilia estado kaj en la mondo.

Kaj tiel fluis la lasta laca trembrilo de la mortanta tago super la vastan ebenaĵon. La ebenaĵo envualiĝis por la nokto en nebulon longe etendiĝantan, kiu proksimiĝis ondade de ĉiuj flankoj samtempe, kaj kiu antaŭiris la rapide proksimiĝantan nokton.

La nokto venis.

Kiam ambaŭ finfine vekiĝis el sia tranca stato, kiam ili malfermis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis, ili trovis sin ĉirkaŭataj de saturita tenebro. Estis al ili, kvazaŭ nemezurebla eterneco preterhastus kaj ili, nekonsciaj pri la okazintaĵoj, sole postrestus. Ili sentis ĝojon, ke ili ne estis forŝiritaj unu de la alia, sed, ke sorto, kiu favoris ilin, kunformige miksis iliajn korojn kaj korpojn en ununuran etan parton de la naturo. Sed la nokto, kiu venis, trovis ilin ambaŭ tiel sendeziraj, kiel ilin forlasis la tago, kiam ĝi adiaŭis ilin. Ili sentis profundan kontentecon, kiu, kiel ŝajnis al ili en tiu momento, estis detruenda per nenio, kio ajn okazos ankoraŭ, kaj kion ajn la venontaj tagoj ankoraŭ kaŝos je malfeliĉo kaj zorgoj.

14/02

Ŝi solviĝis iom el liaj brakoj. Mirigite ŝi ĉirkaŭrigardis al ĉiuj flankoj. „Rigardu“, ŝi diris, „fariĝis nokto. Nigra plena nokto, kaj mi tute ne rimarkis tion.“

„Ĉu ni nun retroiru al la ĉaroj aŭ al la placo, aŭ ĉu vi volas, ke ni ankoraŭ restadu sidante ĉi tie kaj rakontu ion reciproke?“ li demandis.

„Ĉi tie estas bele“, ŝi respondis, „se vi ne devas labori tie ĉe la ĉaroj, mi certe prefere volus sidi ĉi tie kun vi, tiom longe, ĝis kiam fariĝos fride.“

„Ĉu vi ne malsatas?“ li demandis.

„Ne, mi ne malsatas, kaj se mi malsatus, la malsato volonte atendus. Mi tiom ofte devis atendi manĝon, ke mi lernis, kiel oni forgesas la malsaton. Mi ofte dum tuta tago aŭ ankaŭ dum du ne havis ion por manĝi. Sed nur de tiam, kiam mia patrino kuŝas en tombejo. Iutage ŝi estis morta. Ni ne sciis, kial. Eble estis marĉa febro. Kaj la bienulo ne havis medicinon, neniun blankan pulvoron. Li diris, ke mi foriĝu, ke la patrino estas nur tro pigra, kaj ke ŝi jam morgaŭ denove estos sana. Sed matene ŝi estis tute kvieta kaj morta. Tute trankvile ŝi foriris.

Mi tiam kuiris por la patro kaj faris ĉion en la domo. Sed tiam iutage estis la festo de la sanktulo Antonio. La bienulo donis al ĉiu peono grandan brandon. Ili trovu plaĉon je la brando. Kiam ili trovis sufiĉe da plaĉo je ĝi, ili volis havi pli da brando. Tial li ja antaŭe donis la fajrakvon al ili. Sed nun, ĉar ili volis havi pli da ĝi, ili devis aĉeti la brandon de li. Kaj li vendis tiom, kiom ili volis, sed ne je kredito.“

„Tion mi scias“, diris Andreo. „Kredite la bienuloj ne rajtas vendi *aguardiente*. Tio estas kontraŭleĝa.“

Ŝi rakontis plu: „Tiam la peonoj alportis sian lastan monon, kiun ili havis, por aĉeti *aguardiente*, poste ili alportis siajn hakilojn, siajn ĉemizojn, siajn pantaloneojn, siajn porkojn, siajn kaprinojn, siajn ŝafojn, nur por ricevi tiun *aguardiente*. Ili ne povis trinki ĉion, ili pli forverŝis, ol ili povis trinki. Sed ili aĉetis ĉiam denove. Mia patro trinkis nur tre malmulte. Li estis malĝoja, pro la patrino.

Je la sekva tago estis la granda festo, kiam oni eksigis la ĝistiamajn *capitános*, la kapitanojn, de la eklezio kaj elektis novajn kapitanojn por la eklezia jaro. Mia patro estis en tiu jaro en la vico esti elektita kiel kapitano. Sed tie estis alia viro, kiu same asertis, ke li estas en la vico. Kaj ĉar la novaj *capitános*, devas doni feston

en sia domo por ĉiuj homoj, la viro diris, ke mia patro ne povus aranĝi feston, ĉar li ne havas edzinon. Li obĵetis, ke li havas ja filinon. Jen la viro diris, ke la filino, kaj tio estis mi, ne povas kuiri kaj doni bonan feston, kaj ke la homoj ne povus havi sian sanktulan feston, se kuirus mi.

La viroj ankoraŭ ĉiuj estis ebriaj, ĉar ili aĉetis ĝis la frua mateno brandon, *aguardiente*, de la bienulo, kaj tuj matene ili jam denove komencis drinki kaj drinki. Ĉe tio ekestis kverelo pri tio, kiu estu unu el la novaj *capitános*, ĉu mia patro aŭ la alia. La kverelo pli kaj pli krudiĝis, kaj la homoj, kiuj pro sia ebrio tute ne plu sciis, kion ili faras, ludis per la maĉetoj. Ankaŭ tiuj atakoj pli kaj pli akriĝis, kaj mia patro, kiu ne havis maĉeton ĉe si, profunde estis pikita en la ventron de la alia. Li mortis ankoraŭ en la sama nokto. Sed tiam ankaŭ la alia viro estis ankoraŭ pikita. Sed li ne mortis.

Kiam la patro tiam troviĝis sur la tombejo, la bienulo alvokis miajn du fratojn kaj montris al ili la konton de mia patro. Sed ili ne povis pagi la ŝuldojn. Kaj ĉar la bienulo volis havi sian monon pro la konto de mia patro, li vendis miajn du fratojn por la ŝuldosumo al *montería*, al monterio, kie la hispanoj en la praarbaroj havigas al si mahagonlignon.“

„Kaj tio okazis al viaj kompatindaj fratoj?“ Andreo demandis kompateme.

„Jes“, ŝi diris, „tio okazis al ili. Ili estas ja ankoraŭ tiel junaj, unu el ili deksejara, la alia ne pli aĝa ol deksep jarojn. Ĉar ili estis tiel junaj, ili ne ricevis terpecon sur la bieno, kaj ĉar ili ja krome ankoraŭ ne havis edzinon. Kaj la bienulo ne volis, ke ili forlaboru la ŝuldon en la bieno. Li diris, ke li tiukaze neniam ricevus sian monon, ĉe la malmultaj centavoj, kiujn li povus pagi por ilia laboro. En monterio ili povus perlabori pli da mono. Kaj ĉar la

hispanoj neniam povas ricevi sufiĉe da viroj por la monterioj, tial ili elaĉetas ŝuldiĝintajn peonojn, kiuj tiam ĉe ili devos forlabori la ŝuldosumon.“

Andreo intencis diri, ke monterio estas pli terura ol povus esti ia ajn infero, kaj ke indiĝeno, kiun oni vendis tien, tie trovos sian tombon. Sed li prisilentigis tion, kion oni rakontis al li, por ne aflikti la knabinon.

„Ankaŭ min la bienulo volis vendi. Sed la agente de la monterio eĉ por nenio volis havi min, ĉar mi laŭ li estis tro malforta kaj tro malgranda kaj eĉ ĉe la kuirado ne povus helpi, kaj ĉar mi ne transvivus la marŝon dum semajnoj tra la ĝangalo.“

Malĝojiĝinte ŝi aldonis: „Ĉiuj en la vilaĝo diris al mi, ke mi neniam plu revidos miajn fratojn. Kiu estas vendita en monterion de la hispanoj, tiu revenos neniam plu. Li tie mizere pereos, pli mizere ol besto. Tial ĉiam la agentej vagadas ĉi tie por elaĉeti pliajn peonojn kaj por logi aliajn homojn, kiuj liberas, per kontraktoj.

Kiam miaj fratoj tiam forestis, venis la bienulo en nian kabanon kaj diris: 'La kabanon mi nun donis al Daniel. Vi venos al la *casa*, en la mastrodomon, kaj laboros en la kuirejo. Tuj.' Mi tiam laboris en la domo. Frumatene, tri horojn antaŭ la sunleviĝo mi ekstaris kaj pistis grajnojn kaj lavis la manĝilaron kaj frotlavis la ĉambrojn kaj laboris ĝis kvar horoj post sunsubiro. Li pagis nenion al mi kaj ne donis jupon al mi kaj nenion ajn.“

Andreo interrrompis ŝin: „Kaj tial vi forkuris, ĉu?“

„Ne, tial“, ŝi rediris. „Ĉiuj servistinoj ja same laboras. Sed Jose, la filo de la bienulo, estis seninterrompe ĉirkaŭ mi kaj sendis min nokte jen tien jen ĉi tien, kaj tiam li kaptis min kaj diris, ke mi

venu en lian liton. Sed mi tre timis lin. Li estas tiom kruda kaj morna. Li kunestis kun knabinoj de la peonoj, kiuj ĉiuj havas infanojn de li, kaj la knabinoj ne povas gajni indiĝenan viron, ĉar la junaj viroj ĉiuj timas, ke Jose pafmortigos ilin, ĉar la knabinoj estas ja liaj knabinoj. Kaj se efektive knabino el ili trovas junan viron, kiu ŝatas ŝin, tiukaze la viro neniam scias, kiam Jose denove volos havi ŝin, kaj tiam li batas la viron, se tiu ion diras kontraŭ tio, aŭ pafmortigas lin. Du virojn el ili li jam pafmortigis. Sed la municipaj aŭtoritatoj nenion entreprenis kontraŭ li, ĉar la *presidente* estas lia amiko. Kaj li diris, ke la du viroj per maĉetoj volis senkapigi lin, kiam li serĉis en la arbaro disirintajn bovojn kun ili, kaj ke li devis pafmortigi ambaŭ virojn por gardi sian vivon kontraŭ ili. Li ne pafmortigis ilin je la sama tago, la unuan el ili en la pasinta jaro kaj la duan en tiu ĉi jaro. Li ankaŭ volis pafmortigi alian, sed tiu prenis en la nokto sian edzinon kaj migris kun ŝi al Tabasko. Sed la knabinoj povas fari nenion kontraŭ li. Li estas tiom forta. Ili tiam devas labori en la domo, kaj li alportas por ili el la urbo silkajn rubandojn kaj perloĉenojn kaj orelingojn kaj diras al ili, ke ili ĉiam restados ĉe li, kie ili havos bonan vivon kiel ekzemple la mastrino. La knabinoj scias, ke ĉio ĉi estas granda mensogo. Sed ili povas fari nenion. Ili estas la knabinoj de peonoj. Kiam mi tiam estis ĉe la rivero, por lavi min, jen li alrajdis, haltis kaj diris: 'Vi venos hodiaŭ en mian liton, ĉu vi komprenas, rato?' Mi diris: 'Sed mi ne volas veni al vi, mi timas vin. La knabinoj ploras antaŭ vi, kaj vi batas ilin.' Jen li diris: 'Vi ne devas timi min, rato, mi estos tre bona al vi, se ankaŭ vi al mi estos tre bona. La knabinoj estas impertinentaj kaj mensogas, tial mi devas tradraŝi ilin, por ke ili ne mensogu en la vilaĝo kaj ĉe mia patrino. Mi kunportos ruĝajn silkajn rubandojn al vi, kiam mi rajdos al la poŝtejo.' Mi diris: 'Lasu min, mi petas, en paco, *patroncito*, mi ne volas veni, kaj mi ne venos.' Jen li deseliĝis de la ĉevalo kaj batis min per la vipo sur la dorson, tiel, ke mi surgenuiĝis pro doloro kaj timo. Tiam li tute proksimiĝis al mi, kaptis mian hararon kaj ŝire ekstarigis min pere de la hararo tiel,

ke mi kriis, ĉar tio tre dolorigis min. Li tiradis mian hararon per siaj pugnoj kune kun mi tien kaj ĉi tien kaj diris: 'Rato, vi venos hodiaŭ vespere en mian liton. Se vi ne venos, mi tiros vin el via angulo kaj elŝiros vian tutan hararon kune kun la haŭto, kaj tion mi tiam ĵetos antaŭ la porkojn, kaj mi enfermos vin dum la nokto en la maizgrenejon, por ke ratoj voru vin vivanta, kaj tio, kio restos de vi, mi ĵetos tiam al porkoj. Tion mi ĵuras al vi ĉe Sankta Virgulino kaj la Infano, ke mi ĉion tion faros kun vi, se vi ne venos en mian liton hodiaŭ vespere. Mi lasos la fenestron malfermita.' Tiam li puŝis min teren. Sciu, Andreo“, ŝi turnis sin al li, „jen en la maizgrenejo estas pli ol mil grandaj ratoj, kiuj formangâças ĉion, kio nokte enpenetris la grenejon. Kaj tial mi tre timis. Tial mi nokte volis iri al li, kiel li ordonis tion. Sed, kiam mi revenis de la rivero, jen venis renkonte al mi unu el liaj knabinoj, kiu havas tri infanojn de li, kaj ŝi diris: '*Chica*, mi scias, Jose vin persekutas, sed ne obeu lin. Vi ne ricevos bonan viron, sed vi ricevos infanon, kaj vi estas ankoraŭ tiom juna, vi ne scias, kion fari kun la infano, kaj tiam ĝi mortos.' Post la manĝo, kiam la patrono kaj ĉiuj aliaj en la domo dormis, kaj ankaŭ Jose, mi forkuris. Unue tra la granda arbaro, kie mi plu timis kaj volis reiri. Sed jen venis indiĝeno kun sia ino, ili pelis porkojn al Jovel. Kun tiuj mi tiam iris grandan parton de la vojo. Kaj ili diris al mi, ke en *Balún-Canán* estas la festo de sanktulo *Caralampio*, kaj ke mi iru tien, ke mi tie facile trovos servolaboron, kaj ke mi, ĉar estas urbo, estos sekura kontraŭ la bienuloj.

Ili estis tre bonaj al mi, tiu paro, ili parolis kiel mi, mian lingvon. Kiam ni tiam krucis vojon, ili diris al mi, ke mi iru tien, ĉar al *Balún-Canán* la vojo estas pli longa. Se mi irus kun ili al Jovel, mi venus tro malfrue al la sanktulofesto, ĉar tio estus granda ĉirkaŭvojo kaj kun la porkoj ili ne antaŭeniĝus tiel rapide kiel mi, ĉar mi estas sola kaj ne havas ion por porti.

Ili diris, kion mi faru, kaj ili rakontis, ke sur tiu vojo mi renkontos komercistojn, indiĝenajn potaĵkomercistojn, ĉapelfaristojn, plektistojn de petatoj, felokomercistojn, faristojn de lanrubandoj, kiuj ĉiuj kiel mi iros al *Balún-Canán* por tie vendi siajn varojn. Ili diris, ke mi aliĝu al tiuj, kiuj ŝajnas al mi plej afablaj, kaj, se iu demandus min, kial mi iras sola kaj ĉu mi estas forkurinta ie de bieno aŭ de servo, tiukaze mi diru, ke mi solene promesis al mia mortinta patrino, ke mi iros al la festo de la sanktulo *Caralampio* kaj oferos kandelon kaj kisos liajn plandojn. Ili aldonis, ke tion ĉiu kredos al mi, se mi diros tion, kaj ke mi ne diru, ke mi venis de bieno, sed ke mi estas el Bachajón, ĉar tio estas sendependa pueblo, libera indiĝena vilaĝo.

Ili donis al mi kelkajn tortiljojn, fazeolojn kaj kelkajn akrajn kapsikojn, kaj mi ektrotis. Sed je la unua tago mi ne trafis iun sur la vojo, eĉ ne dum la tuta tago. Malfrue posttagmeze mi venis al *milpa*, maizejo, kie estis du kabanoj, en kiuj vivis kelkaj indiĝenaj familioj, al kiuj apartenis tiuj du maizkampoj. Mi rakontis al ili, ke mi estas sur la vojo al *Balún-Canán* por kisi la plandojn de la granda sankta dio, ĉar tio estas solena promeso al mia morta patrino, kaj mi rakontis ĉion, kion mi laŭ la viro kaj la ino kun la porkoj devis rakonti. La homoj donis al mi manĝon kaj mi restadis dum la nokto en ilia kabano ĉe la fajro, kie estis varme. Matene, kiam la suno estis leviĝinta, mi volis ekiri, sed la homoj diris, ke mi ne iru sola, ĉar sur la vojo estas jaguaroj kaj pumoj. Pumojn ili ankoraŭ neniam vidis en tiu regiono, sed jaguarojn ja jam ofte.

Ili diris, ke mi prefere atendu, ĉar posttagmeze aŭ morgaŭ matene preterpasos multaj indiĝenaj komercistoj kun siaj inoj kaj infanoj, kiuj iros ĉiuj kiel mi kun siaj varoj al *Balún-Canán*, kaj ke ankaŭ el tiu domo, kie ni staris, kuniros viro kaj edzino, kiuj portas papagojn al la festo, por tie vendi ilin.

Tiel vere okazis. Jam tagmeze venis tiuj komercistoj kun siaj familioj. Ili venis el la regionoj de *Cancúc*, *Oshchúc*, *Chiilum*, *Hucutsín*, *Sivacjá*, *Tultepec*, *Chanjál*, kaj mi ne scias de kie plu. Ili ĉiuj kolektiĝis en *Achlumál*, kaj tie la *presidente* de la urbo ne lasis preterpasi ilin. Unue ili devis pagi kontribuojn al li por la pasrajto, do por la permeso uzi la vojojn. Ili ne sciis, ke tie la *presidente* forprenus ilian lastan monon, alikaze ili irus sur ĉirkaŭvojo, kaj tute tuŝus lokon, kie estas *presidentes*. Pro tio la *presidentes* ĉiuj fariĝis riĉaj kaj tiam baldaŭ povis aĉeti bienon. Kaj kun tiuj komercistoj mi venis tiam ĉi tien. Sed mi ne trovis servolaboron. Neniu demandis min, ĉu mi volus servi por ili. Mi timis demandi la ladinojn pro laboro kiel servistino. Ĉiufoje, kiam mi staris antaŭ dompordo, por demandi ĉu mi povus servi ĉe ili kaj iu paŝis el la domo, jen mi vidis, ke ili havas ĉiam tre malicajn vizaĝojn. Jen mi timis ilin kaj ne demandis plu pro servo. Sed, ĉar mi malsatis, mi tamen ĉiufoje atendis antaŭ la pordoj, por ke eble iu demandu min, ĉu mi volas havi servon en la domo. Sed, kiam la mastro aŭ la mastrino elvenis, ili puŝis min kontraŭŝultre kaj vokis: 'For de ĉi tie, vi certe volas ŝteli ĉi tie, foriĝu kaj ne lasu vidi vin je dua fojo ĉe ni!' Jen mi havis ĉiam denove timon. Kaj mi ne sciis, kion fari kaj kion manĝi. Kaj finfine mi sidiĝis en malhela angulo por morti, ĉar mi estis tiel malĝoja. Kaj kiam mi tie tiel malĝoja sidis kaj pensis, ke mi nun baldaŭ mortos, jen vi tiam venis, kaj vi estis afabla al mi sen koni min, kaj vi faris min via edzino sen demandi, kiu mi estas kaj de kie mi venas. Vi estas tiom bona, *Binash Yutsil*, kaj mi ĉiam estos bona al vi kaj neniam malĝojigos aŭ dolorigos vin.“

Rimarkoj

Aguardiente = brando

Binash Yutsil = bela knabo

chica = knabino

montería = monterio, laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie oni dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj ne fareblas, pro la tro altaj kostoj.

patroncito = ĉefĉjo, patronĉjo

14/03

Andreo tiris ŝin al si kaj karesis ŝian vizaĝon.

Li intencis forpeli de ŝi ĉiun malfeliĉon trasuferitan en la lastaj monatoj, li volis forgesigi al ŝi, ke ŝi estas sola surtere. Pro sia senhelpeco kaj sia soleco ŝi kondukis tiel bonvole al li pri ĉio, ke li eksentis sin kompatindulo rilate ŝin.

Li ne sciis, kion fari; ĉu konservi sian rilaton al ŝi en la ĝistiamata stato, aŭ ĉu li akceptu ŝin serioze kiel sian edzinon. Neniu ĉeestis, ne ĉe li kaj ne ĉe la ĉaroj, kiun li povus demandi pri konsilo, kion fari por ĝojigi kaj feliĉigi la knabinon. Eble, se li havus la patrinon proksime, ŝi certe povus diri al li, kio estas bona kaj ĝusta. Sed ju pli li cerbumis, des pli ŝajnis al li, ke eĉ la propra patrino pri tiu afero ne povus konsili. Fariĝis klare al li, ke estas nur lia propra afero, kaj ke tial nur li mem povas decidi kaj agi laŭ tio, kiel instigas kaj postulas tion de li lia emo al la knabino.

Pro tiu konsidero kaj pripensado li pli kaj pli malcertis. Li ne plu komprenis sin mem. Ne estis lia maniero esti nedecidema. Kaj tiom pli kiel ĉaristo hezito estis fremda por li. En la plej multaj okazoj la ĉaristoj rapide kaj kun certeco devis decidi, kion fari. Memgarda pripensado povus kosti la ĉaron, varojn, kelkajn bovojn kaj eble eĉ la vivon de kamarado.

Kvankam Andreo ankoraŭ neniam spertis ion persone pri inoj, li sentis instinkte, ke ĉe ĉiu alia ino li sciis sen longa pripensado, kion fari kaj kiel fari la ĝustan.

Male al tio li estis rilate al tiu ĉi ino ŝanceliĝema pri decido. Certa li estis nur, ke li ŝatas ŝin, kaj ke li ne volas perdi ŝian inklinon. Kaj li timis, ke li povus perdi ŝian konfidon kaj inklinon, se li farus la malĝustan. Sed kio estas en tiu momento la malĝusta, ĝuste tion li ne sciis. Povus esti, ke tio, kio momente estas la malĝusta, morgaŭ estos ĝusta.

Se li nur divenus, kion atendas la knabino. Sed de kiam li sciis, ke ŝi estas sen certa sperto, kaj ke ŝi mem pri tio, kion ŝi parte divenis, ne havas certan imagon, li ne povis ellogi eĉ per malgrandaj trukoj, kion ŝi atendas.

Plenumi al ŝi tiun parte ankoraŭ revatan kaj parte jam urĝan deziron, kiu eble leviĝis en la lasta horo en ŝi, povus same detrui tiun bonfartan staton, en kiu li troviĝas rilate ŝin, kiel la malo, se li ne plenumus ĝin.

La sola instinkto aŭ impulso, kiun li sentis tute certe rilate ŝin, estis, ke li ne volas perdi ŝin, kaj ke li tion, kion li por si mem priskribis ŝia kvieta animo, ne volas detrui.

Li rememoris tiumomente, ke li diris al la ĉaristoj, ke ŝi estas lia edzino, kaj ke tiam, kiam iliaj aludoj ne plu misinterpreteblis, li diris, ke li estis en la nokto ĉe ŝi. Sed tio ne estis la vero. Li diris tion nur, ĉar li pro denaska indiĝena ruzo tuj komprenis, ke li sufokas per tia facile donita koncedo ĉiujn pluajn demandojn. Li diris: „Kompreneble mi estis ĉe ŝi, kion alian vi pensas!“ Per tio estis kreita fakto, kiu al neniuj de liaj kamaradoj plu donis okazon enmiksiĝi per spicitaĵaj paroladoj en liajn privatajn aferojn. Kaj en tiu okazo li trafis per sia koncedo la ĝustan. Post tiuj amikece diritaj paroloj, per kiuj la viroj stimulis sin je lia geedza travivaĵo por iom kunĝui ĝin, la knabino estis gardata kontraŭ iuj obscenaj vortoj. Ŝi estis akceptita en la parenkaro kaj ekde nun oni respektis ŝin la laŭrajta edzino de membro de la parenkaro. Je

okazaĵo, foje akceptita kiel neŝanĝebla fakto de ĉiuj ĉeestantoj kaj amikoj, frakasiĝas obscenaj paroloj sen eĥo, ĉar ili fariĝas senvaloraj, senenhavaj kaj senefikaj.

La knabino ne komprenis, kial Andreo enkondukis ŝin kiel sian edzinon ĉe la ĉaristoj, ĉar li diris tion hispanlingve. Sed ŝi tre bone sentis, kion li opinias. Ŝi mem diris al li, ke ŝi nun estas lia edzino.

Sed Andreo ĝis tiam ne sciis, kiel vaste etendiĝas la senco de la vorto por la knabino, kion ŝi imagas pri edzino de viro. Li havis la impreson, ke ŝi ĝis tiu horo komprenis pri rilato inter viro kaj edzino ne pli ol tion, ke ino obeas certan viron, kiun ŝi rigardas sia mastro, kaj kiu zorgas por ŝi, kiun ŝi subtenas ĉe la laboro laŭ siaj plej bonaj fortoj kaj kapabloj.

Kiam li venis kun ĉiuj siaj konsideroj al finpunkto kaj lia plua pensado kaj pripensado ŝajne nur denove remigris al la elirpunkto kaj sin perdiĝis en cirklo, Andreo fine konvinkiĝis, ke li hodiaŭ aŭ morgaŭ neniukaze volas ŝanĝi aŭ influi la aktualan staton de ilia kunesto. Per tio li rericevis sian sekurecon. Kaj kun tiu gajnita sekureco li trovis la certecon, ke ĉio, kion li aŭ la knabino pli deziras, iutage aŭ en iu nokto okazos tute per si mem, kiel io, kio estas neŝanĝebla kaj nedeturnigebla kaj neevitebla en tiu momento, kiam ĝi okazas. Tiam tio estos plej ĝuebla, pli ĝuebla ol ĝi povus esti en tiu momento aŭ iam ajn. Tiun ĝuindan aferon travivi je la ĝusta kaj neevitebla tempo, ŝajnis instinkte al li tia dolĉa kaj perfekta, ke ĝi estas tiom valora por li, ke oni ne disipu ĝin dum necertaj konsideroj kaj flirtantaj sentoj.

Imageblis, ke la knabino pensas ion similan. Ŝi estis nesperta nur pri la ago kaj la ĝuo mem. Sed ŝi ne estis tute nesperta en certa scio pri okazaĵoj. Ŝi estis ja indiĝena knabino, natura kiel arbara besto kun siaj instinktoj, sentoj kaj impulsoj. Ŝi vidis en sia hejma domo, kio okazas, kaj aliaj, pli aĝaj kaj jam edziniĝintaj knabinoj

parolis pri tiaj agoj en la plej natura maniero, kiel pri aĵoj, kiuj estas tiel simplaj kiel manĝado, dormo, laboro kaj danco. Estis agoj, kiuj nek per vortoj nek per gestoj estis kaŝataj, pri kiuj oni parolis libere kaj sen embaraso, tiel, kiel pri la koloro de brodaĵo de ĉemizo aŭ jaketo. Estis agoj, kiuj ŝajne necesas kaj neeviteblas. Kaj des pli estis eĉ agoj, kiuj ŝajne plaĉas al ĉiu, kiuj ĝojigas ĉiun, kaj al kiuj oni konsentas, kiam ajn oni havas la deziron en si.

Ŝia deziro estis instinkta. Se Andreo eĉ nur per vorto aŭ gesto esprimus la deziron, ŝi estus preta por ĉiu ajn ago. Sed kiel ŝi sentis, ŝi estus preta nur tial, ĉar li deziras tion, kaj ŝi kiel lia edzino sentus sin devigita obei lin kaj permesi tion, kion li postulas. Parte nekonscie kaj silente ŝi demandis sian propran senton ankore kun la sama longa silentemo, kun kiu Andreo en sia kapo pesis ĉiujn pensojn kaj sopirojn.

Estis ŝia sento kaj estis ŝia instinkto, kiuj kondukis la knabinon al la sama decido, al kiu venis ankaŭ Andreo en la sama minuto. Tiel ŝi trovis tion tre bonfartiga, ke Andreo postulis nenion kaj deziris nenion, kaj nenion aludis, sed, ke li sidis nur apud ŝi kaj protektis ŝin per siaj brakoj.

Ĝuste tio, ke li ne urĝis ŝin, ne postulis ion, ke li atendis je la sama neevitebla destino, kiun atendis ŝi, estis tio, kio naskis ion en ŝia koro kaj lasis kreski tion, kion ŝi sentis neniam ĝis tiu momento. Sento, al kiu ŝi ne povis doni nomon. Sento, kiu ŝin tute varmigis, kiu faciligis ŝian animon, kiu donis al ŝi strangajn kreaĵn fortojn, kiu donis al ŝi profundan sekurecon kaj senton pri nestvarmo. Ŝi sentis, kvazaŭ ŝia koro plivastiĝadus, ĝis kiam ŝi opiniis, ke ĝi plenigas ŝian tutan korpon. Ŝi opiniis aŭskulti sian koron ne nur en la brusto, sed je ĉiu ajn parto de sia korpo. Kaptis ŝin la mistera sento pri konscio, ke ŝia koro kaj ŝia spirito, la animo kaj la korpo fariĝis ondeganta, sed nedisigebla unueco.

Tiam ŝi fine portis en si nur solan deziron plu, pri kiu ŝi supozis, ke ŝi povus esprimi ĝin per vortoj por klariĝi pri tiu deziro: Mi volus, ke li mortigu min; tio estus la plej dolĉa, kio povus okazi surtere.

Ŝi kisis liajn manojn kaj ennestigis sin pli profunden inter liajn brakojn por esti pli proksima al li. Dolorigis ŝin, ke ŝi ne povis enrampi en lin por tute unuiĝi kun li.

Jen li karesis ŝian hararon kaj diris: „Aŭskultu, *tujom ants*, mia bela malgranda edzino, vi estas kiel tute eta steleto en la ĉielo. Ĉiam, kiam mi vidas vin aŭ sentas aŭ pensas pri vi, mi devas pensi pri la historio, kiun vi rakontis al mi, kaj kiun rakontis al vi via bona patrino. Vi estas malgranda steleto je mia ĉielo, la plej bela kaj plej aminda steleto, kian mi povas imagi en mia animo. Se mi estus reĝo, kiu ekiras por doni la sunon al la kompatindaj homoj, mi fiksigus vin kiel mian unuan briletantan steleton meze de mia ŝirmilo. Tiam vi estus ĉiam kaj eterne ĉe mi, se mi suprengrimpus je la granda blua volbaĵo de la ĉielo. Tiam mi neniam estus sola, sed ĉiam ĝoja, kaj mi jubilus de sur la ĉiela katedralo, tiel, ke la tuta mondo aŭskultu tion, kiom ĝoja kaj feliĉa mi estas. Mi donacus al ĉiuj homoj nur ĝojon kaj feliĉon kaj ridadon, tiel, ke neniu malĝojo plu estus, nenie surtere, kaj ke neniuj indiĝenaj peonoj plu suferus sur la bienoj kaj devus toleri maljustecon, sed, ke ĉiuj estus ĝojaj sur sia kamparo, kies fruktoj apartenu al ili kaj al neniu alia. Kun vi, malgranda steleto en mia ŝirmilo, mi spitus al ĉiuj malicaj dioj, kaj mi ne estus afliktita stari supre meze de la ĉielo, for de la tero, kaj for de ĉio alia. Kun vi en mia ŝirmilo mi povus konkeri ĉiujn mondojn, kiuj ekzistas, por alporti al ĉiuj homoj ĝojon, kie ajn ili vivas. Vi ne havas nomon, malgranda knabino, sed mi volas doni al vi nomon: *Estrellita*. Ĉu vi scias, kion tio signifas? Ĝi signifas: Malgranda steleto. *Estrellita* mia, *dulce Estrellita*, mia dolĉa malgranda steleto, kiu falis de la ĉielo sur mian sinon.“

Ŝi, kiu malpli kapablis esprimi sin per vortoj, kion ŝi sentas kaj kion ŝi portas en la koro, diris simple: „Kaj vi, *Binash Yutsil Huinic*, vi estas mia Chicovaneg, kiu donis al mi la sunon. Sed mi ne povas doni tiun nomon al vi, ĉar ĝi estas la nomo de alia. Por mi vi estos por ĉiam kaj eterne Chicovaneg. Sed mi volas doni al vi la voknomon: *Viltesvanel*. Ĉar vi estas en vero Viltesvanel, ĉar vi al ĉiuj aĵoj surtere povas doni belajn nomojn kaj belege scias rakonti. He, mia *Binash Yutsil Huinic*, kiel plaĉas al vi via nomo?“ „Ĝi estas la plej bela nomo, kiun mi akceptas kiel mian, ĉar donis vi ĝin al mi, steleto mia.“

Ĉapitro 15

15/1

La marŝkolono de Andreo estis preta por la ekveturo. Mallongan tempon post noktomezo ili volis ekveturi de la ebenaĵo por ŝarĝi la lastajn transportendaĵojn en la urbo, kie atendis la komercistoj siaj pakaĵoj. Andreo havis la intencon esti survoje kun sia kolono jam antaŭ la kvara matene. La ĉaristoj interkonsentiĝis, ke la kolonoj, por ke ili povu formi grandan kaj fortan karavanon, atendu la aliajn kolonojn apud la malnova piramido *Junchavin*, troviĝanta dekstre de la vojo, sur kiu la karavano devas veturi. Ĉar ĝis la indiĝena urbeto *Tsobtajal* la vojo estis ne tute sekura kontraŭ banditoj, kiuj tie loĝis en solecaj ranĉoj kaj kiuj kalkulis pri tio, ke ili povos rikolti konsiderindan parton de la abundaj benoj, kiujn la sanktulo *Caralampio* donacis al centoj de komercistoj kaj ruletbankieroj, se ili kiel rabistoj nur lerte penos pri tio.

Ĉar la ĉaroj tiutempe ĉiuj troviĝis jam en bona veturstato, kaj ĉar oni jam rekondukis la bovojn kaj tenis ilin sub kontrolo proksime de la kampadejo por havi ilin rapide ĉemane, tuj kiam estos

eksoninta la marŝordono, estis vespere fakte nenio plu farenda en la kampadejo. Kaj ĉar la kampadejo mem havis eĉ ne iom da aloga forto, ĉar oni konis ĝin jam tro bone, kelkaj ĉaristoj ekiris por ankoraŭfoje viziti la urbon, por gustumi ankaŭ la lastajn restojn de la sanktula festo, kiu ĵus finiĝis kaj por ankoraŭ rapide kunpreni de la ĝojoj tion, kio ankoraŭ kapteblas en la lastaj horoj.

Inter la ĉaristoj, kiuj iris al la urbo, troviĝis ankaŭ Manuel, la amiko kaj kunlaboristo de Andreo.

Veninte en la urbon, li trovis, ke la foirplaco jam tre kvietiĝis, kaj ke la tuta urbo ŝajnas prepari sin refali post tiuj tumultaj semajnoj en sian kvietan kaj memkontentan estadon. Oni havis la impreson, almenaŭ sur la pli kaj pli trista foirplaco, ke la urbo kaj ties loĝantoj en la profundo de siaj koroj estas ĝojaj, ke tiu sovaĝa festo estas finita kaj, ke ĉiuj denove povos fordoni sin al la kvieta kontempla vivo, en kiu la solaj ĝojigaj kaj varioplenaj aferoj estas serĉi klaĉon kaj tiel bone kiel eblas disvastigi ĝin por semi malamon kaj ĵaluzon inter si kaj la parencaĵoj kaj por lerte nutri, bredi, grasigi kaj plenigi la malamon kaj la ĵaluzon. La bonaj civitanoj ekokupiĝis denove pri la naskado de novaj civitanoj, el kiuj poste multaj estis kondamnitaj de siaj gepatroj porti la nomon *Caralampio* tra la tuta vivo – por meksikaj oreloj tiu nomo estas aĉe sonanta – pro neniu alia kaŭzo krom tiu, ke la gepatroj supozis, ke la infano, kiu ricevis tiun elektitan nomon, povos ĝoji super ĉiuj mezuroj pri la speciala protekto de la sanktulo *Caralampio* rilate ĉiujn ĉielajn kaj surterajn aferojn de la vivo.

La plimulto de la komercistoj jam fermis siajn standojn, kaj ties pruntitaj tabloj kaj budoj estis jam forportitaj aŭ ĝuste malkonstruataj de la pruntedonintoj. Nur je la ludotabloj la negoco ankoraŭ estis bona, tiel, kiel ĉe la kuirejaj tabloj, je la tendorestoracioj kaj kompreneble en la kantinoj, kie la „mamnutristin-

oj“ nervoze kaj haste pelis siajn „kelnerinojn“ antaŭen por ke ili aranĝu la lastan vesperon kiel la plej sukcesan.

Tie en la kantinoj fariĝis ju pli sovaĝe, des pli malfrue estis, kaj des pli proksimiĝis la momento, kiam ankaŭ tiuj knabinoj, kiuj alportis tiom da ĝojo al la malsataj viroj de la urbo, devos pretigi sin por la vojaĝekveturo por ankoraŭ atingi sufiĉe frue la veturpretajn ĉarojn.

Rimarko

kolono = ankaŭ formacio, kies elementoj (grupoj, plotonoj, kompanioj, ŝipoj k.a.) estas aranĝitaj unu malantaŭ la alia por marŝado aŭ atako

15/2

Ĉiu, kiu estas aŭtoritato, aŭ kiu senpere servis al la aŭtoritato, troviĝis en la laŭta beateco de sufiĉe da enverŝitaj torentoj de komiteko kaj biero. La aŭtoritatoj estis ĝojaj kun la ĝojuloj. Ili ne plu vidis kaj ne plu aŭdis ion. Sankta *Caralampio* toleris kaj benis la elbalaadon de sia aktuala festo.

La honorindaj edzinoj de la bonaj kaj respektindaj civitanoj de la urbo estis laŭorde konservataj en siaj geedzaj litoj. Kaj ĉar tio en Meksiko estas kontraŭ ĉiuj moroj, ke sinjorino hastu en la noktaj horoj tra la urboj kaj rastu la kantinojn, ĝojohalojn kaj voluptotemplojn pro sia edzo, ĉar ŝi ankaŭ sen tio jam scias, kion li faras en tiu bela tempo de bonfartiga nokto, la viroj restadis sen ĝeno dum sia strebado transdoni siajn lastajn profundajn kaj respektoplenajn dankesprimojn al sanktulo *Caralampio*. La viro, kiu laboras, havu plezuron; kaj la viro, kiu ne laboras, havu eĉ pli da plezuroj.

La plimulto de la honorindaj civitanoj de *Bahún-Canán* ne laboras. Kiam komenciĝas ilia efektiva vivo de matura viro, ili

avide klopodas iel kunkolekti kvincent pesojn. Kiam ili kunhavas tiujn kvincent pesojn, aŭ kvarcent pesojn, ne dependas de kelkaj centavoj pli aŭ malpli, ili geedziĝas. Kiam ili jam estas edzoj dum du semajnoj kaj la plej supraj kremtavoloj de la geedza vivo estas jam ĉerpitaj per kulero, ili aĉetas malgrandan *tienda*, malgrandan vendejon, en kiu oni elmetas la plej necesajn bezonataĵojn de la ĉiutaga vivo.

En tiun ĉi vendejon ili metas sian edzinon, ĉar iu ja devas esti en la vendejo. La edzino donas ekde tiam al sia edzo ĉiutage du pesojn, kelkfoje tri, kaj foje nur unu peson el la gajno de la vendejo. Ĉiujn eldonojn por la domo kaj por la vivteno de la familio la edzino devas gajni per ekonomia mastrumado el la vendejo, post kiam ŝi transdonis la ĉiutagan parton de tri aŭ du pesoj.

Ŝi pliriĉigas la negocon per tio, ke ŝi muldas kandelojn, kudras vestojn, ŝakras kun la indiĝenoj, kiuj vendas siajn produktojn, ke ŝi produktas *rompope*, ovolikvoron, ke ŝi vendas pomalgrande en malantaŭa ĉambreto komitekojn sen pagi la impostojn, kaj per tio, ke ŝi intertraktas dum horoj kun la kontrabandistoj, kiuj kontrabandas silkajn ŝtofojn el Gvatemalo.

La edzo zorgas pri tio, ke ŝi ricevu multajn infanojn. Tio estas lia tuta laboro. Jen la ofico de la princa edzo. Li estas ĉiam gaja, afabla, kontenta pri la mondo, ĝenerale kaj speciale pri ĉiuj siaj kuncivitanoj. Dum cetera tempo li faras politikon. Li ĉiam havas revolveron en la zona pistolingo. Kaj se okazas balotado, li provas kapti postenon por fariĝi urbestro aŭ polica ĉefo aŭ vendisto de impostmarkoj aŭ impostkolektisto aŭ poŝteja estro. Se li fariĝas urbestro, ĉiuj liaj plej bonaj amikoj ricevas bonan postenon. Li forgesas neniun. Pro tia vivo kaj pro la nekompareble bela, dum la tuta jaro same balzama klimato de la regiono, kie neniam estas tuberkulozo aŭ kancero, li fariĝas, sen fari ion por tio, okdekjara,

cent- aŭ eĉ cent tridek jara. Jen aĝo, kiun oni ne vidas je lia aspekto; ĉar lia edzino ĉiam denove naskas infanojn al li, kiam li jam estas avo dum dudek jaroj. Cetere li mortas ĝenerale nur se la baloto eliras sen decido, ĉar la plej efika balotilo estas la revolvero. Kompreneble ne la revolvero portata kiel ornamo en la abunde ornamita zono por montri, ke la portanto efektive estas viro, sed la revolvero, per kiu oni pafas al tiuj, kiuj ne povas konsenti al la revolvera viro rilate la politikan opinion de la kuncivitanoj, kiuj volas havi postenon. Sed, ĉar ankaŭ aliaj balotantoj havas revolveron, la libera elekto ne estas limigata unuflanke je certa grupo. La plej bona celpafisto, kiu havas la plej lertajn celpafistojn kiel partianojn, estas elektata kiel urbestro. Jen la respubliko kaj la balotsistemo laŭ la modelo de la multe prikantata malnova honorinda respubliko Romo. Murdu Cezaron kaj vi fariĝos Unua Romia Konsulo; murdu la prezidanton Francisko Madero kaj vi fariĝos la prezidanto de la plej bela kaj plej riĉa lando surtere, prezidanto de la plej aminda kaj plej pacienca loĝantaro surtere, prezidanto de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksiko.

Tial, se ne estas baloto, restas al la viroj de la plaĉa kaj gastafabla urbeto Balún Canán nenio alia krom la festo de Sanktulo *Caralampio*, kiam ili iom volas distri sin en sia kvietaj, kontempla kaj kutime ne tre ekscitiga civitana vivo.

En bona respubliko la aŭtoritatoj eliras de la popolo. Sed tiuj, kiuj estas la aŭtoritato, ne distingiĝas de la aliaj civitanoj de la urbo. La aŭtoritatoj morgaŭ denove estos civitanoj, kaj tiuj, kiuj nun estas civitanoj, morgaŭ estos aŭtoritatoj. Jes ja, por kio do en la mondo oni en tiu kazo acidigu la plezuron al la homoj, se ĉiu rigardas la plezuron la plej grava parto de la vivo, kiu kutime estas tiom trista. Ke la homoj vivas por la laboro estas la filozofio de la pietistoj kaj de tiuj, kiuj estas kastritaj per iu moralo. Se la vivo de la homoj entute havas sencon, kio estas pridubinda, jen

la senco estas sole nur tiu: Plezuriĝu laŭplaĉe kaj permesu, ke ĉiu alia plezuriĝu laŭ sia maniero; kaj tiom longe, kiom li damaĝas nek vin nek viajn kunhomojn, lasu lin nepre en paco; ĉar vi estas eĉ ne je joto pli bona ol li, kaj li estas eĉ ne joton pli sankta kaj pli valora ol vi mem; ĉar la nesanktuloj, la maliculoj kaj krimuloj estas ĉiam nur tiuj, kiujn oni kaptis ĉe iliaj fiagoj.

Morgaŭ la festo de la sanktulo *Caralampio* denove estos finita por tuta jaro. Tial ni ĝoju hodiaŭ, kiam estas la tempo por tio, kiam ni staras sub la protekto de sanktulo *Caralampio*, je kies honoro ni plezuriĝas kaj je kies laŭdado ĉiuj niaj pekoj estas pardonataj en pekokonfeso aŭ por bone pagita meso aŭ por surplanka pergenua glitado de la preĝeja pordo ĝis la altaro. Kiuj homoj sub kiu ajn religio eltenus tiom longe, se la religio ne permesus karnavalon al ili, kun la rajto je maskolibero. Sub la kondiĉo, ke plu estu sanktigita Cindromerkredo, je kiu oni ne preterlasu la meson, ankoraŭ en nebula ebrieco kaj kun nelavita umbiliko.

15/3

Ho, amata sanktulo *Caralampio*, ke vi ne povis vidi tion, kio okazis en la lasta nokto je via honoro en la kantinoj. La dankon meritas la prudentuloj, kiuj ĝustatempe starigis la lignan sanktulon *Caralampio* en kvietan malluman anguleton de la katedralo kaj fermis kaj riglis la preĝejajn pordojn, ke li, kiel Harun-al-Raŝido, en la nokto ne povu eliri por vidi, kion faras liaj kredantoj.

En la kantinoj neniuj plu tenis folion antaŭ si, nek sube nek supre. La kelnerinoj dancis tiel, kiel oni volis, eĉ sen vestoj. De sub unu el la viroj supren kaj poste sub alian viron malsupren. Kaj tial, ĉar la lastaj kaj la plej lastaj pesoj devis esti enspezitaj tiom rapide, kiel rapida salto permesas tion, ĉar la ĉaroj jam atendis, neniuj

disipis la tempon per tio, ke li malsuprentiris kurtenojn, riglis pordojn kaj fermis fenestrojn. Multaj, por ne suferigi la negocon, ne uzis eĉ tiom da tempo por kuri ĝis iu el la familioj, kiuj ludonis ĉambrojn *para un ratito*, por mallonga tempo, eĉ ne tiom da tempo por iri al ĉeokaza ĉambreto, kiun havis la gastejestro, kaj kiun li ofertis sufiĉe multekoste. Tiuj ĉambroj estis preskaŭ ĉiam, kiel *Road-Houses* en Usono, okupitaj de tri aŭ kvar personoj samtempe, pro la urĝeco de la afero kaj pro la limigitaj ĉambretoj. Sed eĉ tiom da tempo ne plu estis, ĉar la mamnutristinoj kaj patrinoj urĝis la virojn kaj indigniĝis pro la procentoj. Do tuj rapida fiko en angulo aŭ en anguleto. Kaj se la anguloj kaj anguletoj en kaj ĉe la kantino estis okupitaj, jen do transe en angulo de unu el la katedralaj pordoj, proksime al la protektanta sanktulo *Caralampio*.

Estis publika ĝojofesto, la orgio pri la ora bovido. Ĉio estis publika. Tiu, kiu havis la tempon kaj la emon, povis plezuriĝi per rigardado. Estis tiel ju pli la horoj avancis, des pli senbride kaj des pli senhonte oni feste tumultis inter kaj sur aliaj. Sed ĉio okazis paceme. De tempo al tempo iu blekis ion aŭ iu alia kriis aŭ alia kantis ion. Sed ĉiuj konkordis fratece. Krome oni ŝajne pagis ĉion ĝuste; ĉar oni ne aŭdis iun kvereladon pri mono. La civitanoj de la urbo estis jam lacaj aŭ jam elspezis ĉion, kion ili havis. La nombro de la vidataj homoj pli kaj pli malpliigis. La scenejon fine regis nur la bienuloj, la agentoj kaj kontraktistoj de la monterioj kaj la eksterurbaj komercistoj, kiuj nun finfine ankaŭ volis iom kunĝui la benon de sanktulo *Caralampio*.

15/4

Sed ĉe la puto la publika danco tamen trankvile daŭris. Kompare al la sovaĝa tumulto en la kantinoj estis modeste kaj modele morale tie, kie plezuriĝis honore al sanktulo *Caralampio* tiu parto de la loĝantaro, kiu devis perlabori ĉiun centaviton per dura

laboro. Ne tial, ĉar la homoj tie eble estus pli bonaj kaj pli piaj ol la ceteraj, sed ĉar ili ne havis la monon petole moviĝi en la kantinoj. Eĉ se ili havus la monon, tamen mankus al ili la rutino, kiun havas tiuj, kiuj ĉiam disponas pri sufiĉe da mono, pri kiu ili ne scias, kion fari per ĝi. Ĝuste kaj sukcese plezuriĝi estas io, kion oni devas ekzerci longan tempon, tiel, kiel ĉiun alian okupon.

Ankaŭ de tie, de la publika danco de tempo al tempo retiriĝis paroj al la senlumaj katedralaj pordoj por tie studi arkitekturon. Sed al la plimulto de la tie dancantaj homoj ŝajne pli plaĉis la danco, kaj nur la danco, pli ol iuj aliaj aferoj. Eble ili sciis, ke ili povus havi la aliajn plezurojn je ĉiu ajn alia vespero, se ili nur volus; sed dancon ili ne povus havi ĉiun vesperon, ĉar kutime ne estis muziko kaj la marimbistoj ne tiel malmultekoste ekludis dum dancoj, kiel tion faris la vagantaj indiĝenaj muzikantoj.

Ankaŭ Manuel, la ĉaristo, fine tien alvenis, ĉar krome sur la placo jam ne rigardeblis io interesa. La ludotabloj, kie oni laboris nun tiel, kiel en la kantinoj kun sovaĝa hasto, por elpremi dum la lastaj horoj ankoraŭ la lastan kurban centavon el la ŝatata *Balún-Canán*, fariĝis enuaj por Manuel, ĉar li ne havis ion, kion li povus forludi kaj li ne havis tiom da konfido al Fortuno, ke li povus esperi gajni per siaj kelkaj centavoj grandan posedaĵon aŭ almenaŭ kelkajn pesojn. Tie ĉe la danco, kie estis nur anoj de lia propra tavolo, li tamen sentis sin plej gaja kaj laŭ sia sento plej amuziĝis.

Kiam li ĉirkaŭrigardis por serĉi dancistinojn, li rimarkis junulinon, kiu tenis kunligitaĵon en la mano. Ŝajne ŝi apartenis al ne-niu, kaj eble ŝi estis la servistino de komercistino, kiu estis veturonta frumatene hejmen kun la ĉaroj.

Li pli proksimiĝis al la knabino. Poste li staris dum certa tempo sendecide. Li supozis, ke eble unu el la dancantaj junaj viroj estas

ŝia edzo, kaj ke ŝi atendas lin. Sed kiam kelkaj dancoj pasis kaj neniu el la viroj iris al ŝi, li proksimiĝis al ŝi ankoraŭ iom pli.

Denove li staris dum iom da tempo. Tiam ŝi lin ŝajne rimarkis. Ŝi rigardis lin. Kaj kiam ŝi rigardis al li, li ridis. Ŝi same ridis. Pro tio li diris: „Ĉu ni dancu, *chica*?“

„*Cómo no*“, ŝi diris, „kial ne, sed kie mi lasu mian kunligitan fasketon? Mi ja ne povas danci kun ĝi.“

„Ho tio, la fasketon, ĉu?“ li respondis, „tiun mi prenos permane.“

Li prenis la fasketon dekstramane, kaj ĉar li ja ne devis ĉirkaŭbraki ŝin dum la dancado, li dancis kun la fasketo ĉemane. Tio aspektis komika, sed neniu el la dancantoj interesiĝis pri tio, ĉu tie iu dancas kun fasko ĉe la mano aŭ kun kesto sub la brako. Kaj se iu serioze atentus pri tio, li dirus al si, ke, se iu dancas kun fasko ĉemane, li certe havas bonan kaŭzon por tio, ĉar ĝi ne estas oportuna.

Post la unua danco li invitis ŝin kune trinki kruĉeton da kafo. Ŝi ŝajne ĝojis pri tio. Kaj kiam ili trinkis la kafon, ŝi ŝmace sorbis ĝin kun tia granda plezuro, ke li demandis: „Ĉu vi estas tre malsata?“

Ŝi diris, ke jes, kaj li aĉetis kelkajn enĉiladojn por ŝi.

Li demandis la indiĝeninon tie, kie ili trinkis la kafon, ĉu li eble povus lasi la fasketon dum horo sub ŝia protekto.

Tiam ili denove iris transen al la dancantoj.

„Kiel vi do nomiĝas, kara“, li demandis post danco.

„Kial vi volas scii tion?“ ŝi demandis.

„Mi ja ne povas diri al vi ĉiam *chica*, se mi prenas vin kun mi“, li diris ridante.

„Tiel rapide?“

„Kial ne“, li diris seke. „mi devas esti rapida, ĉar tuj post nokto-mezo ni ektrotos. Mi estas ĉaristo. Kaj se vi volas, vi iru kun mi.“

Nur dum sekundo ŝi pripensis tion, kaj tiam ŝi diris: „Kien vi iras?“ Kvazaŭ la tuta karavano estus lia propra, li diris: „Unue mi iros kun mia kolono al Jovel, poste al Niba, tiam al *Chiapa*. Tie mi ricevos novajn ordonojn. Tiam mi iros verŝajne al *Tuxtla* kaj tiam malsupren al Arriaga kaj eble ankaŭ ĝis *Tonalá*.“

„Tio certe plaĉus al mi“, ŝi diris, „*Tuxtla*, tio estas granda, tie mi certe povus ricevi bone pagatan servon, je dek aŭ eĉ je dek kvar pesoj.“

Kompreneble li interrompis ŝin. „Kaj se vi tie ne ricevos servon kaj volos plu veturi, ankaŭ tie estas sufiĉe agrable en Arriaga kaj en *Tonalá*, kaj tie ili ĉiam bezonas *kriadas*, servoknabinojn. Sed, se vi ne diros al mi kiel vi nomiĝas, mi ne kunprenos vin, kaj lasos vin ĉi tie.“

„*Rosario López, su servidora*, via obeema servistino“, ŝi diris ĝentile.

„Do, *Rosario. Rosita, querida mía*, mia amata.“

Sed ŝi tuj obĵetis, sed kun ridado: „*Mira, mira, caballero*, ne tiel rapide, ne tiel rapide. *Querida suya*, via amata, tion ni unue observu. Ne tiel rapide. Vi ja ankoraŭ tute ne scias, ĉu vi vere plaĉas al mi. Nu. *Pero, pensando*, sed pensante pri tio, *yo creo que sí*.“

„Kial *que sí?*“ li demandis. „Kion do? Ĉu mi plaĉas al vi aŭ ne, diru tion klare, konfesu do!“

Ŝi ruĝiĝis kaj embarasite diris: „Mi supozas, ke vi plaĉas al mi.“

„Bone, interkonsentite“, li diris koncize. „Do, mi vin kunprenos. La ceteron ni tiam ekscios sur la vojo. Hodiaŭ ne estos multe da dormo por mi. Ni ankoraŭ devos ŝarĝi la ĉarojn kaj enjungi la bovojn. Sed vi povos dormi du aŭ tri horojn. Mi faros al vi neston sub jam ŝarĝita ĉaro. Ni havos ankoraŭ alian knabinon kun ni, la edzinon de Andreo. Vi dormu kun ŝi, por ke vi tenu vin ambaŭ varmaj. Ni, ankaŭ Andreo, hodiaŭ nokte ne havos tempon okupiĝi pri niaj damoj. Ĉiu horo estos plenŝtopita per laboro. Jen komenciĝas nova danco. Antaŭen, *Rosita*, ek do, kaj movu la gambojn.“

Dum la dancado li komencis nun trankvile pensadi pri la rapida svatado kaj geedziĝo. Li rigardis ŝin kelkfoje, sen tio, ke ŝi rimarkus tion, ĉar ŝi rigardis dum la dancado per siaj okuloj sur siajn moviĝantajn piedojn, kiel decas por dancistino ĉe indiĝena *zapateado*.

Ŝi plaĉis al li ju pli kaj des pli ofte li rigardis ŝin. Ŝi estis indiĝenino, sed plenkreskis en urbo, ĉar ŝi parolis puran meksikan hispanan, miksitajn kun esprimojn el Gvatemalo, kiel oni parolas en la limregionoj de la ŝtato. Ŝi estis sendube sperta kaj tute ne sen scioj pri la vivo. Sen tordiĝo kaj sen hezito ŝi konsentis pri tio, kion li aludis sen diri tion. Ŝi nur iom kritikis la subitecon kaj la rektecon kaj la evidentecon de lia edziĝpropono, kion ĉiu knabino rigardas sia devo por povi teni firme almenaŭ la lastan fadenon de la vualo de modesteco je vestanguleto. Neniu ino ŝatas, se tiu, kiun ŝi honorigis per sia elekto, poste iam riproĉos ŝin, ke ŝi falis sub liajn gambojn jam en la unua minuto. Ŝi ne ŝatas tion eĉ

tiukaze, se ŝi sopire atendas kaj atendis fali tiom rapide, kiom eblas, en la ĝusta loko, tuj kiam ofertiĝas la okazo.

Kaj pensante pri tio, li trovis ŝin nur tiom pli aloga. Al la diablo la estintecon de la knabino, se lin urĝas, kaj oni ne povas havi iun pli bonan. Post iom da tempo ĉiam montriĝos, ke la diferencoj estas nur imagataj kaj ne realaj. Ĉiu ino povas esti bona kaj ĉiu neeltenebla, egale kia estas ŝi aŭ ŝia estinteco. Je ino multe pli malofte kroĉiĝas la estinteco ol al viro. La viro ĉiam tro inklinas esti pedanta, morala kaj centprocente respektinda, plagata de konscienciproĉoj kaj preta oferi pro sia limigita malgrandanima honoro ĉion, eĉ sian edzinon. Escepte de la elsekigitaj preĝulinoj kaj de la paliĝantaj velkulinoj, kiuj jam de longa tempo ne plu ŝanĝis siajn vidpunktojn, la viro estas multe pli neeltenebla virkapra stinkema kaj pli elkraĉanta pietisto de nazmuko ol ino. Ĉe la ludonado de meblitaj ĉambroj al senfamiliaj viroj la viro estas multe pli naŭza ol ino, kiu multe pli facile komprenas homojn kaj multe pli vastanimas kaj per tio estas multe pli deca kaj en vero pli laŭmorala. Ŝian moralon oni fuŝas nur en tiuj landoj, en kiuj ankoraŭ ekzistas leĝoj el la tempo de la severe tondranta Lutero, en kiuj oni sence babiladas pri fisvato kaj kaŭzado de publikaj skandaloj, pri aferoj, kiuj estas tute relativaj kaj kiujn oni ne povas difini kiel ekzemple ŝteladon en banko. Sed ne estas la inoj, sed la viroj, kiuj persistas pri la daŭrigado de tiaj idiotecaj leĝoj kaj kiuj defendas ilin, kaj, ĉar ili ne havas ion alian, uzas ilin por hipokrite montri al la publiko kiom respektindaj kaj kiom profunde laŭmoralaj ili estas. Sed la vero estas, ke ĝuste la laŭmoralaj viroj volas havi ĉiujn inojn por si mem kaj neniun inon volas cedi al alia. La plej bona ekzemplo en la historio estas la granda moralisto kaj mondopliboniganto Josefo Smith, la fondinto de la mormona eklezio en la nordo de Usono. Ĉasteco, moralo kaj religio estis la altaj idealoj de la viro, kiu en la flortempo de la mormona sekto nomis okdek edzinojn sia propraĵo, tiel, kiel oni nomas ĉevalojn aŭ bovinojn sia propraĵo.

Post kiam Manuel ankoraŭ dancis kelkfoje kun sia ĵus konkerita knabino, li rigardis supren al la steloj por vidi laŭ la steloj, kioma horo estas.

„Ni povos danci ankoraŭ du fojojn, *querida*, kaj poste ni foriros“, li diris. „Ni havas multe da laboro“.

Kiam ambaŭ dancoj estis finitaj, Manuel prenis la knabinon ĉe brako kaj poste ili foriris al la indiĝenino por repreni la kunligitan fasketon. Ili preteriris kantonon.

„Jen, *chica*, rigardu foje tion“, li diris haltante. „La bienuloj kaj grandaj sinjoroj de la monterioj disipas la monon, kvazaŭ ĝi estus sen valoro. Ili festas la sanktulon *Caralampio* pli ol nur bone, ĉu? Damne! Ĉiu el ili havas du el tiuj ŝminkitaj inoj rajdantaj sur siaj genuoj, kaj jen sub la tablo aliaj ruliĝadas. Kaj jen malantaŭe en la angulo, rigardu foje tien, jen ili havas tri el ili sur la tablo antaŭ si, la inoj sidas preskaŭ nudaj tie, nur la ŝtrumpojn, ili ankoraŭ surhavas. Iliaj vestoj ĉiuj pendas je la ĉapelhokoj. Tamburoj kaj flutoj, tio estas vivo! La kantinisto devas meti la monon en sakojn, kaj multe da ĝi.“

„Kial vi ĝuste rigardas tien?“ ŝi demandis spite kaj tiris lin ĉe la brako plu. „Ĉu vi eble volus partopreni tion, ĉu? Tio povus plaĉi al vi.“

„*Celosa? Ĉu ĵaluza?*“ li demandis kaj ekridis. „Tio ja bone komen- ciĝas, *querida mía*. Sed lasu tion, *chica*, ni ja bone interkonsent- iĝos. Vi ne devos plendi pri mi. Sed“, li aldonis, „se mi vidas, kiel ili tie diboĉas, jen mi ja tamen devas pensi pri la turmentitaj peonoj kaj pri la kompatindaj *muchachos* en la monterioj, kiuj havas nenion, kiuj tie mortaĉas kaj pereas pli terure ol muloj aŭ

hundoj, kaj ĉi tie ili forfikas kaj fordrinkas kaj disipas la monon kaj ŝovas ĝin antaŭe kaj malantaŭe en la inaĉojn, tien, kie ili volas havi ĝin, se nur estas ormoneroj. Kaj la inoj eĉ ne riĉiĝas tiel. La plej grandan parton ricevas iliaj *dueñas*, iliaj mastrinoj, kiuj ŝtelas ĝin de ili, kiam la kompatindaj knabinoj ebrie falas en la litojn. Kaj tion, kio restas al ili, tion forprenas iliaj patronecaj amikoj hejme, kiuj vivas de la mono, en *Tapachula*, *Verakruco*, *Frontera*, *El Carmen kaj Progreso*, aŭ de kie ajn venis la knabinoj. Tiuj fiuloj prenas la monon, kiun la knabinoj ĉi tie perlaboras, por disipi ĝin kun aliaj knabinoj. En kolono, kiu venis kun ni, estis grego el tiaj knabinoj. Jen mi aŭskultis, kion ili diris kaj rakontis, kaj kiam ili kverelis. Kia mondo tio estas! Dio mia! Damne!“

Li kaptis subite sian knabinon firme ĉe brako kaj impete tiris ŝin al si, premis ŝin firme kontraŭ sian korpon kaj diris: „Aĥ, perdo kaj merdo, *querida*, ni ekiru. Se mi pensas pri niaj ĉaroj kaj vidas tion ĉi tie kaj tiam pripensas, kiel ni firme gluiĝas en la koto kaj neniam havas tutan veston sur niaj kadavraj korpoj! Jen mi, ĉe Dio en la ĉielo, damnite, tamen volonte scius, kiu kreis ĉi tiun mondon!“

Ili iris iom. Sed io tumultis plu en li, ĉar ĝi foje komenciĝis.

Kiam li sentis la varman korpon de la knabino proksime ĉe si kaj stumble troitis tra la malhelaj stratoj, evitante ŝtonojn kaj truojn kaj flakojn, li komencis, verŝajne la unuan fojon en sia vivo, klare vidi sian ekonomian situacion, ja sian tutan mizeran vivon.

La knabino estis forta kaj sana, tute malsama al la infano, kiun Andreo havis kiel edzinon. Kiam li dancis kaj staris kun ŝi kaj trinkis kun ŝi kafon, li vidis ion novan je ino. Io, kion li ĝis tiam ne vidis. La sincereco de tiu forta kaj sana knabino, havanta tiajn durajn manojn pro la laboro, ŝia grandanimeco al li, kaj la varma

plena ina maniero, kiu elradiis de ŝi, vekis sovaĝan kaj samtempe preskaŭ humilan deziron en li.

Certan distancon de la vojo ili ankoraŭ iris plu. Tiam li haltis, tiris ŝin proksime al sia brusto kaj diris: „*Rosita*, mi konas vin nun nur dum momento. Sed al mi estas tute egale, kio vi estas kaj kial vi forkuras. Mi volas, ke vi fariĝu mia edzino.“

Ŝi diris: „Sed, atendu, mi petas vin, kiam ni estos sur la vojo aŭ – ne ĝuste ĉi tie – estas ankoraŭ sufiĉe da tempo, kaj kompreneble mi volas ĝin, vi ja kunprenas min al *Tuxtla*, kaj mi scias ja bone, kial vi kunprenas min. Mi volas, ja tamen. Tion vi scias – sed...”

„Ne, ne“, li respondis, „ne tion mi opinias. Jes, ankaŭ tion mi opinias, sed mi celas ion alian. Mi vere volus, ke vi, sendepende de ĉio alia, estu mia edzino. Mi volas diri per tio, por ĉiam. Kion mi opinias, estas, ke mi volas loĝi kun vi en kabano, sur peco da tero. Aŭ ni iru en urbon, kie mi povos trovi laboron, kaj kie vi ĉiam estos kun mi. Aŭskultu, atentu, kion mi volas havi, estas infanoj kun vi, kaj ke ni estu ĝustaj geedzoj. Mi provos ricevi iom da mono. Kiam ni alvenos en *Arriaga*, mi fuĝos kun vi al la plej proksima trajnstacio. Tie ni aĉetos bileton, kaj ni veturos ĝis kiam ni alvenos en urbon, kie neniuj konas nin, kie oni ne scias, ke mi forkuris kaj ke mi havas ŝuldojn ĉe la patrono. Mi diros, ke mi estas de *Tapachula*. Kaj post iom da tempo ni ankoraŭ foriros plu, al pli granda urbo. Tie tiam neniuj plu scios ion pri ni. Kaj mi povos labori en fabriko aŭ ie. Kaj ni havos tiam vivon tute por ni mem, nur por vi kaj por mi kaj kun infanoj. Ĉu vi volas tion, Rosita?“

„Mi pensas, ke mi volas tion“, ŝi diris simple.

Pro tiu interparolado, sed eble ankoraŭ pli pro la simpla kaj neromantika respondo de la knabino, Manuel eksentis serenon kaj

saturitan kontentecon, kiu dissolvis kaj forblovis la urĝajn dezirojn, kiuj akre direktiĝis al certa momento. Okazis en lia animo io simila, kio okazis kelkajn noktojn antaŭe en la animo de Andreo; kvankam la kaŭzoj kaj kondiĉoj estis tute diversaj. Tiel diversaj, kiel Andreo de Manuel kaj *Estrellita* de *Rosario*. Por Manuel la proksima kunestado kun ino ne estis nova. Kaj kiel li bone sentis, ankaŭ *Rosario* estis iniciita en la naturajn sekretojn de la vivo. Tute certe ekzistis nek por li nek por ŝi nesolvitaj misteroj en la videblaj kaj senteblaj homaj manifestadoj de la vivo. Sed anstataŭ la urĝa deziro, kiu turmentis lin dum la lastaj horoj, kreskis en li la espero pri io bela. Ĉu ĝi estas bela, pri tio li ne estis certa. Sed laŭ lia sento ĝi ŝajnis al li esti la plej bona, kion la vivo povus oferti al li. Kiel ĉaristo li centfoje pensis, ke oni same tiel bone tute ne vivu ol plu elteni tiun senesperan kaj duran vivon, kiu en tiu formo finiĝas ŝajne neniam.

Sed vidalvide kun la forta, sana kaj sincera knabino ekflamis en li la denaska sovaĝa sopiro al familio, al familio, kun kiu estas ligita hejmo kaj kamparo, kie estas laboro, kiun oni komencas, kiun oni vidas disvolviĝi kaj maturiĝi, kies celojn kaj rikoltajn fruktojn oni superrigardas. Estis la neniam kontentigebla, neni-am satigebla sopiro de la homoj al trankvila punkto, al mez-punkto de la vivo. De la vivo, kiu ĉiam kaj ĉiam estas seninter-rompa movo.

La profesio, en kiu li estis katenita, preskaŭ sufokis tian sopiron en la homoj, kiuj estis kaptitaj de ĝi. Kaj ĝis tiu tempo, ja ĝis tiu horo tiu sopiro de Manuel apenaŭ estis konscia. La ĉaroj efektive preskaŭ sukcesis mortigi tiun deziron en li.

Kiam li ekkonis ĉion tion, li finis la impertinentan atakemon, kiun li montris al ŝi dum la tuta vespero. Li ne plu rigardis ŝin kiel ĝuste nur trovitan aŭ alkurintan knabinon, kun kiu oni seksumas, kaj kiun oni poste akceptas aŭ ne akceptas ĉe si, laŭ tio, kiel oni

sentas. Tiun inon li volis havi por ĉiam. Kaj por povi reteni ŝin, li pensis, ke li devas antaŭe gajni ŝin.

Ne estis sentimentaleco, kiu gvidis lin, kaj mistifikojn kaj trukojn li ne konis. Softaj kaj dolĉaj sentoj estis fremdaj al li; li ankaŭ ne povus kutimiĝi pri tio en la vivo. Kaj se li opiniis gajni la inon, jen ne laŭ tiu senco, ke li pensus efiki per longaj paroladoj kaj belaj vortoj aŭ per precipa ĝentileco kaj servopreta respekto. Io tia ne venis en lian kapon. Tio venus neniam en la kapon de iu indiĝeno, kiu ankoraŭ konservis sian naturecon kaj sanan vivmanieron.

Sekvante sian instinkton, li provis gajni la inon per tio, ke li ĉion tion, kion li estus povinta havi en tiu momento, ne prenis, ke li eĉ rezignis pri ĉia penso pri tio. Ne estis tiel, ke li eble estis plagata de la imago, ke tio estas fia aŭ malmorala, aŭ ke ĝuste sub tiuj cirkonstancoj tio ne estas honesta ago.

Lin tute subite kaptis la sopiro liberigi sin. Li sentis en sia animo, ke li povus liberigi sin nur pere de tiu ino kaj nur kun ŝi. Tiom longe, kiom tiu ino estus la mezpunkto de tiu sopiro, li neniam delasus de la penso liberigi sin de la ĉaroj. Povus esti, ke en tiu kazo, se li ne rezistus sian deziron, la ino jam en tiu tago ne plu estus tia, kia li deziras ŝin. Eble ne. Sed li ne volis ludi senpripense per tiu „eble ne“. Kun la deziro pri hejmo kaj familio ligis sin la deziro konservi ion belan por okazo, kiu prezentigas ne tiel hazarde kaj nevokite kiel en tiu ĉi momento.

Se Manuel estus alte evoluita viroproduktado de la civilizo, tia agado devus peri la impreson, ke li pensas en subtila ruza maniero nur pri sia propra ĝuo kaj pri tio, kiel pligrandigi tiun ĝuon. Sed Manuel estis indiĝeno kaj ĉaristo. Kiel oni povas pligrandigi ĝuojn per lertaj spekuladoj, preparoj kaj hezitoj, tion li ne sciis. Eĉ se li havus tiajn ideojn, li neniam penus uzi ilin. Tio daŭrus tro longan tempon por li. Tiajn artifikaĵojn li ne konis. La celo, laŭ lia

opinio, estis atingebla plej certe sur la plej rekta vojo, jen lia opinio.

Kial li agis tiel, li ne povis klarigi. Li instinkte ekhavis tiun imagon. Se li povus reteni la inon nur per tio, ke li ne hezitas eĉ dum horo, li certe farus tion. Sed li sentis, ke li povos pli bone interkompreniĝi kun tiu ino kaj, ke ili pli bone amikiĝos, se li atendos. Tio laŭ li ekpensigos ŝin, kial li ne prenas tion, kion ŝi atendas, ke li prenos ĝin. Tiel ŝi ekkomprenos, ke li pli multe kaj pli serioze ŝatas ŝin, ol ŝi supozis ĝis tiu momento.

Li agis tiumaniere, ĉar li ne sciis, kiel alie esprimi sin por diri al ŝi, kion li sentas pri ŝi, kaj ke tio, kion li sentas, venas el la profundo de lia koro. Formi vortojn li ne povis por tiu ĉi sento. Li ne tre kapablis esprimi per vortoj profundajn sentojn, tiel, kiel li ne povis elpremi plorojn, kiam li sentis en sia animo funebron aŭ doloron.

15/6

Intertempe ili denove iris survoje.

Manuel ne plu tenis ŝin proksime ĉe si. Diskutante kun si mem por klariĝi, kion li celas, ambaŭ jam solviĝis unu de la alia, sen efektive rimarki tion.

La vera kaŭzo certe estis la vojo: la ŝtonoj, truoj, flakoj, kavaĵoj plenaj de akvo, fosaĵoj kaj traboj, kiuj komplikigis la iradon en la tenebra strato. Tial ili finis sian brakumon pro la stumblado. Oni pli facile iris tie, se ĉiu unuope trabaraktis sin sur la vojo.

Kiam la lasta, la plej ekstera strato de la urbo estis trairita kaj ili staris antaŭ la libera ebenaĵo, la vojo fariĝis pli bona.

Rosario iris nun apud li.

Li rememoris pri io kaj li diris: „*Rosita*, sed vi devas diri eĉ ne unu vorton al iu el la *muchachos*, ke mi volas forkuri. Vi sciu, se la patrono ekscius tion, li ne plu lasus veturi min malsupren al *Arriaga* kaj al la stacioj. Aŭ fariĝos eĉ miloble pli terure, se li vendus min pro mia ŝuldo ĉe li al monterio, por povi esti sekura, ke li ne perdu sian monon pro mia forkuro. El monterio oni ne povas fuĝi, tie oni retenas la *muchachos* multe pli sekure ol en punkolonio.“

„Mi tute certe diros nenion, *muchacho*“, ŝi trankviligis lin. Tiam ŝi aldonis: „Sed kiel vi nomiĝas, karulo, por ke mi sciu kiel mi voku vin. – Ha, tiel? Manuel. Jes certe, Manuel, tion mi sankte ĵuras al vi: mi ne perfidos vin.“

Ĉar ŝi promesis teni sekreta lian planon, tio ligis lin en lia sento des pli forte kun ŝi. Ili de tiu momento estis aliancanoj. El la tono, per kiu ŝi parolis al li, li aŭdis, ke li povas fidi al ŝi, ke ŝi tenas la promeson, kiun ŝi donis solene. Ili de tiam ne nur estis aliancanoj, sed fariĝis ankaŭ fidelaj gekamaradoj. Estis tiaj malmultaj, ŝajne negravaj vortoj, per kiuj ili ligis sin pli proksime kaj pli intime. Sed ne estis sole la vortoj, estis multe pli la tono kaj la maniero, kiel ŝi parolis, kio lasis ekkoni al li, ke li estas sur bona vojo kun ino, kiu havas sian valoron.

Multon ŝi ankoraŭ ne diris ĝis tiam. Ŝi ŝajne ne estis tre babilema. Tio estis kontraŭ ŝia karaktero, kiel li supozis.

Ŝi jam de longa tempo ne plu estis infano. Ŝi havis certe dudek kvin jarojn aŭ similan aĝon.

15/7

Nun irante apud ŝi en la tenebro, kiun heligis nur iom la klaraj lumantaj steloj, li vidis ŝin nur kiel ombron. Ŝi estis nur iom pli malalta ol li.

Ŝi estis nudapieda kaj iris per longaj sekuraj paŝoj.

Li portis ankoraŭ nun ŝian kunligitan faskon.

Kaj nur por diri ion, ĉar ili iradis tiel silente, li demandis: „Kion vi havas en via fasketo, *querida*?“

„Nur mian dimanĉan robon, du ĉemizojn, mantukon kaj du parojn da duonŝuoj kaj paron da longaj kotonŝtrumpoj“, ŝi diris.

„Ne estas multe, kion mi kunportas por vi, knabo, sed mi ne ŝtelis kaj mi ne bezonas multon.“

Per kruele faktaj frazoj ŝi rakontis al li sen iu plibeligo tion, kio okazis, sen timo, ke ŝi povus perdi lin, kaj sen la pensado, ke li povus ekmalestimi ŝin. Ŝi ne vidis tragikon en siaj travivaĵoj, tiel, kiel li neniam rigardis la vivon de ĉaristo tragiko, aŭ eĉ malbeno de la sorto. Al ili, kiel al ĉiuj aliaj de ilia speco, ĉiu aĵo, ĉiu okazaĵo, ĉiu travivaĵo estas natura afero; ĉiu mizero kaj ĉiu ĝojo, kiujn oni eble povas eviti ruze, sed kiujn oni devas akcepti, se ĝi trafas onin, kaj se oni ne povas fuĝi ĝustatempe. Kaj, se ili tamen serĉas klarigon, tiukaze ili respondas laŭ bone dresita humileco de subulo: Dio ne deziris tion alie. Ke Dio volas nur tion, kion la homo per sia prudento, per sia pacienco kaj sia volo eldevigas al si, tio por ili estis nekutima penso. Alie ili ja ne rangus tiom sube, en la plej suba kaj plej povra tavolo de la popolo. Estas pro pacienca piemo kaj pro naiva kredo, kial ili transcedas ĉion al Dio, anstataŭ mem

forte kapti la okazon. Jen la plej granda obstaklo, kial la proletoj ne prenas al si tion, kion ili meritas.

15/8

Rosario rakontis, kiam ili iris nun sur la ebenaĵo, ke ŝi, kiam ŝi havis dek du jarojn, devis forlasi la sendependan indiĝenan vilaĝeton, en kiu ŝi naskiĝis, ĉar estis tro da infanoj hejme. La parcelo, kiun la komunumo donis al la patro, estis plena de ŝtonoj, magra kaj tro eta por granda familio. La fekundan kaj fruktoriĉan grondon de la komunumo iom post iom forprenis la politikaj ĉefoj de *don* Porfirio kaj vendis ĝin al hispanaj kaj germanaj grandbienuloj.

Rosario iris al *Yajatón* por servi tie ĉe ladino, kiu havis tie magazenon. Ŝi ricevis kiel salajron peson ĉiumonate. Antaŭ ol ŝi fariĝis dekkvarjara, ŝia servomastro gravedigis ŝin. Ŝi restis en la servo kaj ricevis ĉiumonate salajron unupesan kaj kvindek centavojn. Ŝia infano mortis, kaj ŝia servomastro volis havigi al ŝi duan infanon.

La unuan infanon ŝi naskis sen scii, kiel tio okazis. Ŝi miris pri tio, kiam la infano venis subite en la mondon, dum ŝi staris antaŭ la fornelo kaj kuiris kaj la bebo subite falis antaŭ ŝiajn piedojn. Ŝia servomastrino alvenis kaj donis la unuan helpon. Ŝi sciis, de kiu devenis la infano. Tial la knabino restis sen ĝeno en la domo, ĉar la infano ja laŭrajte apartenis al la familio. En Meksiko ne estas tragiko ligita al tiaj tute naturaj okazaĵoj. La edzino dum kelkaj horoj skandale tumultas kontraŭ sia edzo; kaj poste ili denove repaciĝas. Pri divorco ŝi ne pensas eĉ dum sekundo. Ili estas bonaj katolikaj geedzoj, kaj la eklezio permesas ĉiun fivoluton en la edzeco, la batadon de la edzino kaj skandalojn, sed divorcon ĝi ne permesas, eĉ ne tiukaze, se geedzoj povas nek flari nek vidi sin reciproke pro malamego. Dio ja kunigis ilin, ankaŭ

en tiu kazo, se nupto estis nur afero pri mono aŭ proviza asekuro aŭ impulso, kiu ne daŭris.

Kiam nun ŝia servomastro denove proksimiĝis al ŝi, atendante, ke nun estas eĉ pli facile, ĉar li supozis, ke li akiris rajtojn je ŝi, ŝi estis jam pli prudenta. Pro sia sperto ŝi lernis, de kio venas la infanoj kaj per kio. Meze de la nokto ŝi ekbruis alarme. La servo-mastrino alvenis, kaj la infanfarulo ne povis deŝarĝi sin.

Rosario restis ankoraŭ kelkajn monatojn en la domo. Sed fariĝis por ŝi pli kaj pli neelteneble, ĉar la viro ne lasis ŝin en paco. Finfine ŝi foriris kaj servis en la sekvantaj jaroj en diversaj lokoj de la regiono, por du, tri aŭ kvar pesoj ĉiumonate. Fine ŝi venis al *Bahún-Canán*. Tie ŝi servis en diversaj domoj kiel kuiristino kaj kiel servistino por ĉio. Post kelkaj ŝanĝoj ŝi ricevis laboron ĉe vidvino, kiu pro la ĉagreno, ke ŝi ne havas viron en la lito, monaton post monato fariĝis karaktere pli kaj pli malica. Sed ŝi havis tempojn, kiam ŝi fariĝis intima al *Rosario*; kaj ofte tiom intima, ke tiu indiĝena knabino, kiu tute ne estis koruptita je siaj seksaj instinktoj, ne povis eltrovi, ĉu la meksika mastrino estas pli vira ol ina. Ŝi postulis aferojn kaj agojn, kiuj konfuzis kaj plej ofte ĝisnaŭze molestis la knabinon.

Tial la knabino iom post iom havis timon pro la mastrino, timon, kiu estis multe pli forta ol tiu, kiun ŝi havis pro sia unua servomastro, al kiu ŝi estis subigita ja nur pro tro granda timo kaj pro liaj batoj.

Ŝi maldungiĝis de sia servo. La ino, troviĝanta en la plej aĉa tempo de la transiraj jaroj, perdis nun ĉian prudenton. Ŝi estis esperinta trovi taŭgan subjekton, pri kiu ŝi supozis, ke ŝi povus inklinigi ŝin en la paso de la tempo per donacoj kaj aliaj favoraĵoj por siaj deziregoj deflankiĝantaj de seksa normaleco. Kiam *Rosario* ne volis nuligi sian maldungon, la ino venĝis sin je ŝi, eĉ

tiam plu kun la espero, ke ŝi povos cedi la knabinon. La ino iris al la polico kaj akuzis la knabinon, ke ŝi ŝtelis monon de ŝi. La monon oni efektive trovis en la malhela truo, kie dormis la knabino.

Se la afero estus traktita en kortumo, oni devus verdikti la knabinon per prizonpuno. Sed la ino, ankoraŭ nun en la espero, ke ŝi povos malkuraĝigi kaj obeigi la knabinon, preparolis kun la polica ĉefo, ke ŝi ne volas konduki la akuzon ĝis la ekstremo, sed ke la polica ĉefo metu ŝin en la vilaĝan prizonon kaj punu la knabinon per *multa*, per kvindekpesa monpuno. Tiun monpunon la polica ĉefo tre preferis. Li ne havus gajnon el tio, se iu troviĝus en prizono. Li gajnis pli, se oni pagis la punmonon, ĉar li povis interkalkuli la monpunon tiel, ke la pli granda parto de ĝi trovas la vojon en lian monujon. Tiuj *multas* estas ja unu el la kaŭzoj, kial en la malgrandaj urboj post la nova balotado de la urbestro kutime restis kuŝi mortaj sur la batalkampo kvin aŭ kvindek balotrajtigitoj, laŭ la emfazo de la batalo. Se ili bonŝancis, nur kiel kripluloj.

La mastrino atendis, ke *Rosario* en la prizono fariĝos malrezistema, kaj ke ŝi petos ŝin, ke ŝi do pagu la punmonon, por ke *Rosario* povu eliri el la prizono. La mastrino liberigus ŝin sub la kondiĉo, ke *Rosario* promesus sub la bildo de Sankta Virgulino senkondiĉan obeon, kaj ke tiu obeado devas rilati al ĉio, kion ordonas la mastrino.

Sed *Rosario* tute ne estis tiel timema pro la prizono, kiel la mastrino supozis. Ŝi prefere restis en la prizono, anstataŭ komenci aferon kun sia mastrino laŭ ties deziroj.

Eble la kaŭzo estis ankaŭ tiu, ke oni ne traktis ŝin malbone en la prizono. La prizonoj en la pli malgrandaj lokoj en Meksiko estas ja plej ofte veraj pestkavernoj, plenaj de ratoj, puloj, pedikoj kaj

la plej aĉa koto. Sed tio estas abunde kompensata per la foresto de disciplino. Plej ofte dum la tago la prizonuloj estas en la korto. Ili rajtas ludi kaj fumi tiom, kiom ili volas. Ili rajtas akcepti vizitojn, kiam ili volas kaj kiom longe ili volas. Ili rajtas akcepti ĉion, plej ofte nur post tute supraĵa ekzamenado de la manĝoj, trinkaĵoj, cigaredoj, vestaĵoj, libroj kaj gazetoj, kiujn kunportis amikoj por ili. La inoj plej ofte havas siajn infanojn ĉe si, kaj bebojn oni neniam forprenas de ili, ofte eĉ ne en la grandaj, bone organizitaj ŝtataj kaj federaciaj prizonoj. Forpreni de ino la infanojn, tion rigardas la meksikano krueleco. Eĉ punkaptitoj el la severa kategorio ĉeokaze rajtas akcepti siajn inojn, ili rajtas esti kun ili solaj dum la hela parto de la tago kaj kelkfoje eĉ en la nokto. La meksikano scias, ke tio estas bona por la sano kaj la anima stato de la prizonulo kaj pli favora por la natura konduto de la kaptitoj ol apartigo. El ĉiuj landoj de la tero Meksiko havas nun la plej grandaniman kaj plej humanan prizonsistemon, spite al la cirkonstanco, ke, kiel ĉe ĉiuj homaj agoj, ankaŭ en tiu sistemo okazas sufiĉe da transpaŝoj de la leĝo kaj malĵustaĵoj.

Rosario ricevis multe pli da privilegioj ol ŝi atendis en la plej bona kazo. Ĉar ŝi estis knabino diligenta, kutimigita pri laboro kaj laborpreta, ŝi laboris jam en la unua prizontago en la domo de la polica ĉefo. En la dua tago ŝi iris jam sola sur la foirplacon por fari aĉetojn, kaj la edzino de la polica ĉefo sen hezito konfidis la necesan monon por la aĉetoj al ŝi. La edzino de la ĉefo eĉ ne dum horo traktis ŝin kiel punkaptiton. Je la tria tago ŝi jam ne dormis en la prizono, sed en la domo de la polica ĉefo, kiu ĝojis tiom, kiom lia edzino, havi en la domo tian laborfortulinon, tian diligentan knabinon, al kiu li devas pagi neniom. Eĉ male, la nutrokostojn por ŝi li povis kontigi kiel urbajn kostojn, kaj ĉar la knabino manĝis en la domo, li povis meti en sian monujon tiujn centavojn, per kiuj li pagis la bezonatajn cigaredojn.

La servomastrino tute malsukcesis rilate sian venĝon, kaj des pli ŝi perdis sian esperon tamen ankoraŭ gajni amatinon. Ŝi nun ne plu povis fari ion, ĉar ŝi jam interkonsentiĝis kun la polica ĉefo pri la persekutado kaj kondamno de la knabino.

Sed la polican ĉefon pli interesis la kvindekpesa punmono ol la malkara servoknabino. Venis sufiĉe da junaj inoj kaj knabinoj en la prizanon, kiujn li povus okupigi en la domo por neniom. Havi la ĉagrenon, se ili komprenis nenion pri la domservado, estis ja la afero de lia edzino. Tio ne interesis lin.

Estis en la tria semajno de ŝia punkaptiteco, kiam la polica ĉefo en la hotelo renkontis kuraciston, kiu transloĝiĝis en la urbon, kaj kiu rakontis al li, ke lia edzino lamentas pri tio, ke ŝi ne povas trovi kapablan kuiristinon. Ili interparolis pri tio kaj la polica ĉefo proponis al la kuracisto, ke li povus havi *Rosarion* kiel kuiristinon, se li estus preta pagi la kvindekpesan punmonon kaj ok pesojn por ŝia nutrado, li, la kuracisto ja povus enskribi la punmonon en la konton de la knabino kiel ŝuldon, kiun li povus minusi de ŝia salajro, ĉar tio estas laŭrajta, kiel ĉe ĉiu alia ŝuldo, kiun havas laboristo. La polica ĉefo diris tute malkaŝe al li, ke li ne pensas, ke la knabino estas friponino, kaj ke en tiu kazo temas pri kalumnia akuzo, sed ke li povas fari nenion kontraŭ tio, ĉar la iama servomastrino estas respektata civitanino, kies rango pli valoras ol la vortoj de indiĝena knabino.

La kuracisto diris, ke li parolos pri tio kun la edzino. La edzino diris, ke ŝi elprovos la knabinon. Ŝi prenis ŝin en la domon kaj estis tiom kontenta pri ŝia laboro kaj pri ŝia pureco, ke ŝi diris al sia viro, ke li pagu la punmonon por *Rosario*.

Tial la polica ĉefo vendis *Rosario*-n al la kuracisto por la *multa* kaj la nutrokostojn. La edzino de la kuracisto ne estis avara. Ŝi pagis la neimageblan kaj multe priparolatan ĉiumonate sep

pesojn de salajro al *Rosario*, kvankam la knabino, kiel la edzino de la kuracisto sincere klarigis, eĉ ne per dudek pesoj estus tro pagata, ĉar ŝi ne plu devas zorgi pri io en la domo.

Sed ok monatojn *Rosario* devis nun servi por nenio, ĉar ŝi devis pagi la ŝuldon per laboro. Ŝi estis ankoraŭ tiam punkaptito kaj oni povis meti ŝin en ĉiu momento denove en la prizonon, ekzemple, se ŝi estus forkurinta, antaŭ ol la ŝuldo estus pagita. Tion la polica ĉefo devis promesi al la kuracisto, ke li garantias por la knabino.

Rosario kompreneble bezonis kelkajn vestaĵojn, ĉemizojn, jupojn kaj kelkajn aliajn aĵojn. Kaj por povi aĉeti tiujn aĵojn, ŝi devis pruntepreni monon de la mastrino, per kio ŝi pligrandigis sian ŝuldon.

Sed post dek ok monatoj ŝi estis libera de la ŝuldo kaj rajtis iri tien, kien ŝi volis. Ŝi intencis iri al *Tuxtla*, kie oni pagas, kiel ŝi sciis, pli bonajn salajrojn ol en la urboj de la provincregiono. Sed kiam ŝi volis maldungi la servon, la edzino de la doktoro ofertis dek pesojn ĉiumonate al ŝi kaj *Rosario* restis. Pro tiu salajro la ceteraj inoj de ŝia socia klaso en la urbo kvazaŭ anatemis la doktoran edzinon, ĉar ŝi fuŝis la salajrojn de la servoknabinoj kaj malbonigis la laborkondiĉojn kaj la traktadon de la servistaro malfavore el la vidpunkto de la honorindaj enurbaj civitaninoj, kiuj kutimis havi sklavojn ĉirkaŭ si.

Rosario laboris du jarojn en la domo de la doktoro. Verŝajne ŝi estus laborinta tie du pliajn jarojn. Sed la doktoro, kiu serĉis distrion for de sia edzino, al kiu li tro kutimiĝis, kaj kiu pro tio ne plu povis sufiĉe kontentigi lin en ĉiu kazo, ektrovis plaĉon pri *Rosario*, ĉar ŝi, kiel li esperis, povus doni al li pli multajn kaj pli bonajn plezurojn ol lia edzino.

Iutage iris lia edzino pro posttagmeza klaĉado al aliaj. La doktoro estis sola. Li vokis la knabinon en sian konsultejon kaj diris al ŝi: „*Rosario*, mi rimarkis, ke via pulmo ne estas sana. Vi facile povus ricevi tuberkulozon.

Li klarigis al ŝi, kio tio estas, kaj timigis ŝin per tio, ke ŝi povus morti, ke ŝi fariĝus magra kaj malbela, kaj, ke neniuj viroj plu edzinigus ŝin, kaj ke tiukaze, se ŝi tamen edziniĝus, ĉiuj ŝiaj infanoj mortus junaj, kaj ke ŝi fariĝus tre malfeliĉa en sia vivo.

La lasta minaco estis decida. *Rosario* volis edziniĝi, tuj kiam ŝi trovos, kiu plaĉos al ŝi. Ŝi estis tro multe ino por povi resti daŭre sen edzo. Kaj eĉ pli ŝi deziris infanojn de sia edzo.

Ŝi lasis esplori sin, post kiam la doktoro sufiĉe longe persvadis ŝin kaj ŝin tiel ege timigis, kiel la pastroj timigas la homojn per la infero kaj la diablo, kiam ili havas ilin en la preĝejo kaj volas enkasigi ilian monon.

Li diris al ŝi, ke ŝi, kiel li jam supozis, efektive grave malsaniĝis je la pulmo, kaj ke estus la plej urĝa tempo komenci kuracadon, sed, ke la kuracado estas kara, kvankam li ne volas prikalkuli ion por sia laboro, ĉar ŝi apartenas al la domo, kaj, ke li tamen mem devos aĉeti la medikamentojn kaj la injektaĵojn.

Unu injekton li faris tuj, por reteni la malsanon, kiun ŝi tute ne havis, ĉar ŝi estis tiom sana, kiom pursanga indiĝena knabino nur povas esti.

Kiam li estis sterilizinta la injektilon, li diris: „La injektaĵo kostas tri pesojn, sed por vi nur du pesojn. Sed en ĉiu semajno ni devas injekti trifoje, se mi konservu vin vivanta kaj sana.“

„Sed, sinjoro doktoro“, ŝi objetis, „kiel mi pagu la ses pesojn ĉiusemajne, se mi perloboras ĉiusemajne nur du kaj duonon da pesoj?“

Li manipuladis siajn instrumentojn aŭ almenaŭ ŝajnis tion.

Poste li turnis sin al ŝi kaj diris: „Tion mi akceptas, *Rosario*, tiom vi ne povas pagi. Sed mi tamen ne povas donaci tion al vi. Estas mia profesio. Tio estas kontraŭ la profesia honoro, komprenu, ke ni kuracistoj donacu ion. La studado kostis multe da mono, kaj la instrumentoj kaj medikamentoj estas tre multekostaj. Sed kion vi gajnus el tio, se vi mortus, kvankam vi tiel facile saveblas! Vi ja ne volas morti eble eĉ libervole, ĉu? Aŭ ĉu vi volas?“

„Ne, tion mi ne volas“, ŝi diris ektimigite. „Kara sinjoro doktoro, helpu do al mi, por ke mi ne devu morti.“

Li fariĝis pli bonkora kaj diris: „Tio estas en ordo. Tio plaĉas al mi. Por kio morti, se vi saveblas kaj povas fariĝi feliĉa en via vivo kun edzo kaj infanoj!“

Rosario ridis, sed ŝi havis malsekajn okulojn, kiam ŝi ridis.

„Mi pripensis tion, *Rosario*“, li parolis plu, „rigardu min. Mi devas diri ion al vi. Sed ne diru tion al mia edzino. Alie ŝi mortbatos vin. Mia edzino ne estas tute sana, kvankam ŝi aspektas tiel. Kion mi volas diri, estas tio: Ŝi ne povas gedormi kun mi. Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri per tio?“

„Jes, mi komprenas“, ŝi diris, jam divenante, kio sekvos. Estis simile al tio, kion diris la unua servomastro al ŝi, nur per pli krudaj kaj pli drastaj vortoj. Sed la unua servomastro perfortis ŝin, batis ŝin, kaj minacis strangoli kaj pafmortigi ŝin, se ŝi ne anstataŭus lian edzinon.

„Kaj pensu, *Rosario*“, diris la doktoro, „vi jam komprenas, kion mi celas. Mi devas havi inon. Mi ne povas forvojaĝi ĉiun monaton al *Tapachula* aŭ Tonalá aŭ kien ajn. Mi trifoje ĉiun semajnon injektos al vi tion, kion vi bezonas, por ke vi saniĝu, kaj vi pagos por tio, – mi volas diri, ke vi montros vin dankema por ĉiu injektado. Mi pensas, ke via vivo kaj via saneco kaj la vivo de la estontaj infanoj tiom valoras. Ĉu vi ne pensas tion?“

La mencio pri la infanoj obĵetigis ŝin: „Sed mi ne volas havi infanojn de vi, sinjoro doktoro. En tiu kazo poste ne estus tiel facile ricevi bonan kaj ĝustan viron. Tion ja ankaŭ vi scias, doktoro.“

Li frapis al ŝi trankvilige sur la ŝultrojn kaj diris: „Mi ja estas doktoro, ĉu ne, tio mi ja estas! Tial vi ne devas afliktiĝi pri tio. Mi scias, kiel preventi infanojn. Mi ne volas havi skandalon kun mia Esposa. Bone do, tion vi ja akceptos de mi. Se vi naskus infanojn, tiukaze la doktora sinjorino ekscius ĉion. Estu tute trankvila pro tio.“

Ŝi diris nenion.

Li iom malpacientiĝis: „Do, kiel vi volas, *Rosario*. Se vi volas morti, mortu do, estas egale al mi.“

Ŝi glutis kaj diris tiam: „Ne, morti mi ne volas.“ Kaj hezitante kaj mallaŭte ŝi aldonis: „Jes, tiukaze mi devas do, kiel vi diras, sinjoro doktoro.“

Tio daŭris tri semajnojn.

Poste en iu vespero la doktora sinjorino venis pli frue hejmen de la klaĉrondo ol la sinjoro doktoro atendis tion. Ŝi trovis la sinjoron doktoro kaj *Rosario*-n tuj en tia situacio kaj eĉ sur lia

propra lito en la geedza dormoĉambro, ke eĉ la plej aŭdaca samtempa ĵurado ĉe Dio, ĉe Sankta Virgulino kaj ĉe ĉiuj sanktuloj ne permesus dubon, kion ŝi trovis kaj rigardis.

Eĉ en tago de la festo honore al Sankta *Caralampio*.

La doktora sinjorino ne kriis kaj ne kaŭzis skandalon. Ŝi videble retenis ĉion tion por la doktoro.

Ŝi diris koncize kaj severe: „*Rosario*, kunpaku viajn aĵojn kaj venu en mian ĉambron, pro la salajro. Estas bedaŭrinde, ke mi devas forsendi vin. Vi estis diligenta servistino. Sed vi devas forlasi la domon! Vi estas perfekte sana. La doktoro ne devas kuraci vin.“

Pro tiuj vortoj Rosario faris novan sperton. Ŝi ne estis la unua, kiun la doktoro volis liberigi de mortiga malsano. Kaj spite la honton, kiun ŝi sentis esti tiel surprizita kaj elĵetita kvazaŭ ceramika rompopeco de la mastrino, kiun ŝi respektis kaj adoris, ŝi tamen tre ĝojis, kiam ŝi nun eksciis, ke ŝi ne havas mortigan malsanon, kaj ke pliaj kuraciloj ne necesas.

Dum kvin minutoj ŝi kunpakis sian fasketon. Ŝi iris iom timeme en la ĉambron de la mastrino, sed la *señora* ne estis kolera pri ŝi. Certe ŝi konis sian edzon. Ankaŭ divorco ne eblis, ĉar ŝi estis katolika. Ŝi devis elteni tion, kaj ĉiun ekskurson de la sinjoro doktoro al la najbaroj.

Dum momento ŝi pripensis ne elĵeti *Rosario*-n, ĉar ŝi sciis, ke ĉiu nova servistino fine tute certe same intimiĝus al sinjoro doktoro.

„Jen via salajro, Rosario“, ŝi diris. „Kaj mi tre dankas al vi por via bona laboro ĉi tie en mia domo. Jen dek pesoj pli ol vi devus ricevi. Sed morgaŭ matene vi foriĝu el la urbo aŭ mi ĵetos vin pere

de la polico en la prizonon. Kaj jen ankoraŭ plia afero, se vi diros ion pri tio, kio okazis ĉi tie, mi zorgos pri tio, ke vi restos dum jaro en la prizono, pro ofendo de mia familio. Nun vi scias tion. *Adios, Rosario.*“

Rosario prenis la monon. Ŝi staris nudapieda antaŭ sia mastrino, vestita nur per sia lana laborkitelo. Sian kunligitan fasketon ŝi portis en la irejon al la dompordo. Ŝi diris: „*Mil gracias, Señora* doktoro, por la kara traktado, kiun mi havis ĉi tie ĉe vi. Mi memoros vian bonecon en mia tuta vivo. Kaj mil dankojn por la mono. Mi foriros morgaŭ frue matene, kiel vi ordonis al mi, kaj tute certe mi diros nenion al iu, tion mi ĵure promesas ĉe Sankta Virgulino.“

Ŝi defendis sin per neniun vorto, ke ŝi fariĝis la viktimo de sinjoro doktoro, sen efektive deziri tion. Ŝi pensis, ke tio povus esti doloriga por la *Señora*. Ŝi surgenuiĝis kaj kisis manon de la sinjorino.

Poste ŝi eliris el la domo.

Tial ŝi venis kun sia fasketo al la dancantoj kun la espero trovi iun, kun kiu ŝi frue matene povus migri el la urbo. Ŝi pensis, ke ŝi povus aliĝi al vojaĝantaj komercistoj, tiel, ke ŝi ne devos iri sola.

„Do, tiel estis, Manuel“, ŝi finiĝis, „tio estas ĉio. Se vi emas, kunprenu kaj edzinigu min. Kaj, se vi ne emas, diru tion, kaj mi iros kun aliaj. Sed, ĉar mi volas esti tute honesta al vi, tial mi diris al vi ĉion, kiel okazis. Estu ankaŭ vi honesta al mi, kaj ne diru al iu, kion mi ĵurpromesis diri al neniun pri la *Señora*. Sed al vi mi devis diri tion, por ke vi konu min. Neniu alia surtere ekscios tion de mi. La *Señora* ĉiam bone traktis min. Ŝi estas *santa*, sanktulino, kiun mi pli adoras ol ĉiujn sanktajn virgulinojn, el kiuj neniun iam donis ion al mi.“

Manuel lasis fali ŝian faskon, ĉirkaŭbrakis ŝin kaj diris: „*Querida linda*, amatino, kion vi rakontis al mi, tion mi jam forgesis. Verŝajne, se mi pripensas tion, mi eĉ ne aŭskultis vin bone, kaj la plej multan el tio, kion vi rakontis, mi eble tute ne aŭdis, ĉar mi ĉiam nur pensis, ke vi estas pli kaj pli mia edzino, ĉar vi ĉion ĉi rakontis al mi. Mi pensis nur pri vi kaj kion mi povas fari por feliĉigi vin en via koro. Nova vivo komenciĝas por vi kaj por mi. Mi nun scias, kion mi volas. Kaj tion mi scias ankaŭ pere de vi. Mi volas foriri de la ĉaroj, kie ne estas espero. Kaj mi volas foriri kun vi tiom malproksimen, kiom niaj piedoj portos nin. En la malproksimo estas la libero.“

Ŝi diris tion tute instinkte, sen konsciiĝi pri la vero de tiuj vortoj: „Ĉiam en la malproksimo estas la libero.“

15/9

Brakumante sin reciproke kaj firme alpremiĝante unu la alian, ili staris tiel dum kelka tempo sur la vasta ebenaĵo. Sen plu paroli ion, sen pensi ion, ili sentis kaj komprenis kaj fidis sin reciproke.

Super ili estis la steloj, kaj ĉirkaŭ ilin la tenebra noktomezo.

En proksima distanco leviĝis la ombroj de la ĉaroj kaj ripozantaj bovoj antaŭ la nigre blua horizonto. La bivakfajroj de la ĉaristoj komencis flagri kiel helaj lekantaj langoj kaj ruĝaj flamoj, kiuj aŭ montris per sia vasta lumado la ĉarojn, la bovojn kaj laborantajn ĉaristojn aŭ lasis ilin en profundaj ombroj.

Li apartigis sin el ŝiaj brakoj, levis ŝian kunligitan fasketon, kaj ili iris unu apud la alia al la proksima kampadejo de lia marŝkolono.

La viroj tie, kaj tiuj de la najbaraj kolonoj jam ĉiuj vekiĝis.

La fulgokovritaj ladaj kruĉoj kun kafo kaj la preme kavetigitaj grandaj emajlopotoj kun la nigraj faboj staris jam sur la fajro.

La ĉaristoj alkondukis la trovitajn bovojn kaj komencis aljugi kaj jungi la bestojn.

Manuel dum certa tempo staris heziteme kaj rigardis la vigliĝantan kampadejon. Li jam sentis sin ne plu tute apartenanta tie. En siaj pensoj li estis jam en granda malproksimo kun sia edzino.

„*Hola!*“ Andreo vokis gaje humure, ekvidante Manuelon, „bone, ke vi estas ĉi tie, Manuelito. Vi mankas al ni. Vi ja scias, la aliaj estas junaj ŝafidoj, scias nenion pri boko kaj kojonoj. Ni havas damnitan laboron kun la bovoj, ili ne volas kaj ne volas alveni. Ili tute dekutimiĝis de la rutino.“

„Ne afliktiĝu, Andreĉjo“, respondis Manuel, kiu kvazaŭ tuj refalis en la kutiman jungilaron, „ni ja trotigos ilin.“

„Mi jam pensis“, diris Andreo ridante, ŝovante la hararon for de la vizaĝo, „ke vi engorĝigis grandan aron de glutaĵoj, por adiaŭi vin de *Caralampio*, kaj tiel, ke ni nun devas kunŝarĝi vin.“

„Preskaŭ“, diris Manuel, „sed mi faris ion alian.“

„*He, hombre!*“ Andreo vokis nun en laborsperta maniero, „*hombre*, rigardu foje, kie troviĝas tiu de Dio damnita *Amarillo*, tiu kun la parte forrompita korno. Ĝi ĵus ĉi tie glitis tra niaj fingroj. Ŝajne ĝi estas tie transe ĉe la kolono de *Luciano*.“

Tiam Andreo ekvidis Rosarion.

„*Buenos días, muchacha*“, li salutis ŝin afable.

„Mi estas la edzino de Manuel“, ŝi prezentis sin, „kaj mi iros kun vi ĉiuj malsupren al Arriaga.“

„*Felicitaciones*“, Andreo vokis ridante, „multe da feliĉo al vi ambaŭ. *Bienvenido*, estu bonvena.“ Li mansalutis ŝin kaj diris: „Jen mia Steleto ja nun ne plu restos sola. Iru transen al ŝi, *muchacha*. Steleto mia kuŝas tie sub la ĉaro maldekstre. Kuŝigu vin apud ŝi sur la mato kaj dormu iom. Dum duono de horo ni ĉi tie ankoraŭ devos streĉi la muskolojn, antaŭ ol ni ektrotos. Vi ambaŭ devos iri piede, la ĉaroj estas plenŝtopitaj ĝis la tegmentoj. Se vi emas, trinku iom da kafo kaj kunprenu la kruĉeton transen al Steleto.“

Ŝi iris al la ĉaro kaj rampis proksimen al *Estrellita*, kiu vekiĝis, kaj al kiu paroladis kaj flustris *Rosario* el sia ĝoja koro en la lingvo, kiu al ambaŭ estis familiara.

Ili tuj kondukis, kvazaŭ ili estus malnovaj konatinoj, ĉar ili de la unua momento komprenis sin, ĉar ambaŭ estis animitaj de la sama ĝojiga espero, en kiu leviĝis la suno post tristaj, nubopezaj tagoj.

Sed antaŭ ol ili tiam povis ekdormi, jam de la ebenaĵo komencis formarŝi la ĉaristoj de la unuaj ŝanceliĝantaj, knarantaj kaj grincantaj ĉaroj el la kolono.

F I N O

GLOSARO

Hispanaj vortoj kaj parolturnoj tiel, kiel oni uzas ilin en Meksiko

aceptado = akceptite, akceptita

aguardiente = speco de brando

alacrán = skorpio

amigo = amiko

Aquí, aquí, la seda legitima de Francia y las mas barata. = Ĉi tien, ĉi tien, aŭtentika franca silko, la plej malmultekosta.

arriero = mulisto, mulpelisto

barbacoa = rostkrado kaj kradorostaĵo: viando rostita sur krado. Krome la proceso de la rostkradado mem, kaj la produkto de la viandokuirado en granda truo en la tero, kvazaŭ en forno.

bodega = gardejo por vendaĵoj kiel nutraĵoj, kutime ne vendejo

bueno = bone, bona

bueno, muy bueno = bone, bonege

caballeros = sinjoroj, ĝentlemanoj, kavaliroj

cabrones = virkaproj (kiel insultvorto)

cantinas = kantinoj

carcel municipal = municipa karcero

carreta = ĉaro, kutime durada

carretero = ĉaristo

celtalo = ano de la celtaloj, de indiĝena popolo

chica = knabino

chile = akra kapsiko

cinturón rojo de lana = ruĝa lanrubando

comedor = manĝejo en domo, manĝoĉambro

comerciante = komercisto

comiteco = komiteko, speco de brando, produkita en *Comitán*, en Ĉiapaso

comiteco añejo = pli longe aĝigita komiteko en lignaj bareloj ol simpla komiteko

compañeros = kunuloj, akompanantoj, kamaradoj

creolina = kontraŭinsekta likvaĵo, uzita ankaŭ kontraŭ puloj sur hundoj

cura = pastro

diablo = diablo

don = sinjoro

dulces = dolĉaĵoj

encargado = iu ajn respondeculo aŭ laborestro, zorganto

enchiladas = enĉiladoj, molaj tortiljoj kun spica saŭco, kaj kutime ankaŭ fromaĝo, koka viando, kremo, cepo ks.

feria = foiro, jarfoiro

fiesta = festo

finca = bieno

frijoles = fazeoloj

globo = kuglo, globo

gracias = dankon

gringo = fiusionano, sed en Meksiko ankaŭ simple usonano

hacienda = bieno, haciendo

hijito = fileto, filĉjo

hola = he, halo

hombre = homo, kamarado

jacalito = kabaneto

Jefe Politico = politika ĉefo

lorongo = ĥorongo, lankovrilo ĉiam kun entranĉaĵo por la kapo en la mezo, uzata kiel mantelo, egalas al sudamerika „ponĉo“.

Jovel = oficiale kaj hispanlingve *San Cristobál*, pli ofte uzate de la celtaloj kaj cociloj

kolono = Formacio, kies elementoj (grupoj, plotonoj, kompanioj, ŝipoj k.a.) estas aranĝitaj unu malantaŭ la alia por marŝado aŭ atako

ladino = mestizo = ido de blankulo kaj de indiĝeno, en Ĉiapaso uzate specife por kontrasti indiĝenojn kaj neindiĝenojn, do ne nur nepre mestizo, sed ĉeokaze ankaŭ blankulo

La Concordia = La Konkordo

La patria, tu pais propio = La patrolando, via propra lando

La Providencia = La Providenco = providenco = Saĝa regado de Dio super la aferoj de la mondo k de la homoj.

mayordomo = intendanto, domkortega mastroadministristo, domisto

medio = ses centavoj

mejayel = prostituitino, amoristino, frivolulino

meseras = kelnerinoj, la knabinoj, kiuj alportas manĝaĵon al klientaj tabloj en restoracio, kafejo ks.

mestizoj = miksituloj kun indiĝenaj kaj blankaj gepatroj

milpa = maizejo

montería = monterio: laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie oni dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn, por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj pro la altaj kostoj ne fareblas.

muchacho = knabo, junulo, eŭfemisme: servisto

multa = punmono

multas = punmonoj

municipalidad = komunuma administrejo, municipo aŭ municipio de urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron

Orito, muchacho = Momenton, viro (amiko, kamarado, ks)

Otra copita! = Ankoraŭ plian!

parranderos = lantermuloj
patria = patrio, patrolando, hejmlando
patrono = sanktulo aŭ ĉefo
patroncito = ĉefĉjo, patronĉjo
peso = monunuo en Meksiko
petate = petato, specifa tipo de mato, plektaĵo el palmfolioj

Qué tal? = Kiel vi fartas?
Quién sabe! = Kiu scias!
quinto = kvin centavoj

ranchito = malgranda ranĉo, malgranda bieno
realo = dudek kvin centavoj
rebozo = tuko

Se fué! = Li venkis! Li finigas la ludon! („*Se fué*“ estas malnova ortografio) Ĝi estas ludesprimo. Se la bankiero kaj kunludantoj ludis domemon, „*¡se fue!*“ tio signifas ke unu el la ludantoj metis sur la tablon sian lastan ludmarkon; do, ke iu gajnis la ludon.

señor = sinjoro
señora = sinjorino
sierra = montaro, montĉeno
siete y medio = sep kaj duono (kartludo)
sinvergüenzas = impertinentaj kanajloj

tan flojos = tiaj malaktivaj dormemaj pigruloj
Tengo hambre, caridad, por Dios, me muero! = Mi malsatas, donu almozon, je la amo de dio, mi mortas!
tepezcuintle = speco de sovaĝa kuniklo en Meksiko, Kostariko ks.
tienda = vendejo, butikoj
tienda de abarrotes = nutraĵvendejo kaj magazeno por ĉiuj specoj de varoj

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro.

tortillas = tortiljoj, rostitaj maizoflanoj el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj

vaca = bovino

Wanamaker Department Store = grandmagazeno
